EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 1: A – D

ELDONA

EBBE VILBORG

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

VOLUMO 1: A – D

ELDONA SOCIETO ESPERANTO
MALMÖ 1989

Ebbe Vilborg:
ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
Volumo 1: A – D

Eldono: Eldona Societo Esperanto
Malmö 1989
Kompostado: Omnibus, Tyresö
Kovrilo kaj grafika aranĝo: Franko Luin
Preso: Kristianstads Boktryckeri 1989

ISBN 91 85288 17 9

14.50

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO

Antaŭparolo

Ĉiu iom grava lingvo havas sian etimologian vortaron, kiu klarigas la historion de ĝia vortprovizo. Nur la Internacia Lingvo estas en tiu rilato malbone ekipita. La "Naŭlingva Etimologia Leksikono" de Bastien, kvankam ĝi sendube faris gravajn servojn al la esperantistaro, estas pli ĝuste registro ol vortaro; krome ĝi lasas sen etimo ĉiujn gramatikajn vortojn. La manko estas des pli bedaŭrinda, ĉar la etimologio de Esperanto estas iasence pli multfaceta ol tiu de la naciaj lingvoj: per sia internacia karaktero ĝi helpas klarigi la interajn rilatojn de la komuna eŭropa vortostoko.

Ekde mia esperantistiĝo antaŭ pluraj jardekoj mi esperis pri apero de esperanta etimologia vortaro. La intereso pri etimologiaj problemoj inter esperantistoj tamen longtempe estis preskaŭ nula, kaj kiam mi komprenis, ke mia atendado estos vana, mi en la 60-aj jaroj komencis kolekti materialon kaj elfaris provizoran manuskripton. Intervenis la laboro super granda sveda-esperanta vortaro. Kiam tiu tasko estis finita, mi ree turnis min al la etimologia vortaro, kiun mi nun prezentas en prilaborita formo – por ke grava breĉo estu ŝtopita almenaŭ je la centdekjara jubileo! Al multaj la vortaro eble ŝajnos tro malfrua, eĉ anakronisma; mi tamen rigardis ĝin nepre farenda laboro, por ke oni povu plukonstrui. Estas ĝojiga fakto, ke etimologiaj problemoj denove interesas eminentajn esperantologojn. Espereble tiu ĉi vortaro, kiel ajn mankhava, povos instigi al etimologiaj reserĉado kaj (re)-konsideroj. Tio estas unu motivo por publikigi la verkon en formo pokajera. Tiel jam dum la aperado de la kajeroj necesaj ĝustigoj kaj aldonoj povas esti farataj. Mi faris *pro virili parte* – kiom povas unu persono. Neniu konscias pli bone ol mi, ke tio apenaŭ sufiĉas por tasko tiel granda.

Göteborg, printempe 1989.

Ebbe Vilborg

Amplekso kaj arangô

La vortaro ampleksas la oficialan radikaron (Fundamento plus ok aldonoj). Neoficialaj radikoj estas nur okaze atentataj (ekzemple, se ili en iu rilato ilustras la historion aŭ evoluon de iu oficiala radiko). Afiksoj, korelativaj vortoj kaj gramatikaj morfemoj estos pritraktataj en apendico fine de la verko.

Ĉiu radiko estas normale citata kun la radikkaraktero donita en PIV. Se pro iu motivo (ekz. ĉar la radikformo evidente baziĝas sur alia vortkategorio en la fontlingvoj) mi devojiĝis de tiu normo, tio estas signata per uzo de minusklo: ABEL/O (laŭ PIV), ADICI/o (kontraŭ PIV).

Por ĉiu radiko estas indikata:

1. La okazo de oficialiĝo (Fundamento aŭ unu el la oficialaj aldonoj).

2. La unua apero de la radiko (ĉu en Unua Libro, ĉu en iu el la vortaroj Rusa-Internacia de 1889, Beaufront de 1902, Jürgensen-Zamenhof de 1909, Kabe de 1910, Wüster de 1923-, Plena Vortaro de 1934, Waringhien de 1957, Plena Ilustrita Vortaro de 1970). Mi klopodis ĉiam citi la ateston de unu el la nomitaj verkoj; se mi scias pri unuafoja apero aliloke, mi kompreneble citas ankaŭ ĝin (ĉe kio mi uzas la numerserion donitan de Zamenhof al la unuaj verkoj esperantaj). Por malfrue oficialigitaj radikoj, mi donas la antaŭe uzitan ekvivalenton, se tia ekzistas.

3. La etimo de la radiko. Kiel fontlingvoj estas citataj la angla, franca, germana, itala, pola kaj rusa (en latinlitera transskribo) plus la latina. Estas fakto, ke Z ne utiligis la hispanan; tamen tiu lingvo estas tre grava por doni bildon pri la disvastigiteco de radiko (kaj certe ludis rolon ĉe la formado de nezamenhofaj radikoj): mi tial citas ĝin interparenteze. Okazas, ke formoj el aliaj lingvoj estas citataj, se ili prezentas specialan intereson por la koncerna esperanta radiko aŭ apogas ĝin; tiaj estas ne malofte la jidaj formoj (kiujn mi prenis el la traktaĵo de Gold 1980). – Interkrampe [ ] mi donas proksimumajn prononcindikojn, se ili estas necesaj por prijuĝi la rilaton de la citita fontlingva formo al la esperanta radiko. Normalaj kaj ĝenerale konataj prononcoj, kiaj *ck* = [k], *q* = [k], *x* = [ks], ne estas donataj.

4. Se necese, mi komentas la traktadon de la vortformo en Esperanto, menciante eventualajn ŝanĝojn, modifojn kaj oportunigojn kun referencoj al similaj okazoj. Se Zamenhof ne uzis la koncernan radikon, tio estas indikita.

5. Eventualaj praesperantaj ekvivalentoj (kun klarigo, se necese) kaj eventualaj ŝanĝoj de la radikformo proponitaj de Zamenhof en 1894 (vd. PVZ 3, 162 – 164; 169 – 175) kaj en 1906 (1906a, vd. PVZ 7, 236 – 251; 1906b, vd. PVZ 7, 387 – 405). (Estas vere, ke multaj el la ŝanĝoj en 1894 koncernas nur la ortografion, sed por kompleteco mi enprenis ankaŭ tiujn.)

6. Ekvivalentoj en la aliaj gravaj planlingvoj: Ido, Interlingue (Occidental) kaj Interlingua. (Tiu ero estas ellasita, se ties formoj estas nuraj kopioj de neniel problema internacia vorto.) Miaj ĉefaj fontoj tiurilate estis: por Ido, Dyer 1924 (Ido-English Dictionary); por Interlingue, Berger 1947 (Fundamental Vocabularium de Occidental); por Interlingua, IALA 1951 (Interlingua-English Dictionary). Vortoj de tiuj lingvoj ne troviĝantaj en la menciitaj verkoj estas signitaj per asterisko.

Ne malofte Ido kaj Interlingue en sia vortaro estis inspiritaj de Esperanto; tiajn okazojn mi signas per "esperantismo". – Ekvivalentoj de Volapük ĝenerale ne estas citataj (estante plej ofte tro malsimilaj al Esperanto); ili fojfoje estas diskutataj en la komentario, se ili prezentas intereson.

7. La praorigino de la fontlingva vorto; se ĝi apartenas al iom grava hindeŭropa vortfamilio, mi citas ankaŭ la rekonstruitan praformon (praradikon). Por ĝermanaj vortoj mi klopodas doni la praĝermanan formon. Ĉe tio, mi uzis por la diversaj lingvoj kutimajn etimologiajn vortarojn (por la angla: Oxford Dictionary of English Etymology; Partridge; Skeat; por la franca: Bloch-von Wartburg; Meillet; Gamillscheg; por la germana: Kluge; Walshe; por la hispana: Corominas; por la itala: Migliorini-Duro; por la pola: Brückner; por la rusa: Vasmer; por la latina: Walde-Hofmann; Ernout-Meillet; por la greka: Frisk; Boisacq; Hofmann; por la sanskrita: Mayrhofer; por la sveda: Hellquist; por la dana: Nielsen; por la norvega kaj dana: Falk-Torp; por la tuta hindeŭropa materialo: Pokorny; Grandsaignes d'Hauterive; por ekstereŭropaj vortoj: Lokotsch. Nur pri la greka kaj la latina mi povas pretendi fakulecon. – Se la origino de vorto estas tre pridisputata, mi plej ofte rezignas doni la diversajn proponojn. Apenaŭ necesas diri, ke ne malgranda nombro da vortoj restas sen akceptebla etimologio. – Ŝajnas al mi grave substreki, ke multegaj vortoj de scienca karaktero estas 'konstruitaj': por tiuj, speciale interesaj por anoj de planlingvo, mi klopodis konstati la tempopunkton de la kreado kaj la aŭtorecon. – Mi multe penis por doni kompreneblan klarigon de semantikaj ŝanĝoj, eĉ pli ol faras la menciitaj etimologiaj vortaroj; por amatoraj uzantoj, tiuj konsistigas ofte pli konsternan evoluon ol la formaj ŝanĝoj.

8. Samfamiliaj aŭ parencaj radikoj en Esperanto.

Klarigo de signoj

*	neatestita, nur supozata formo
†	arĥaikiĝinta aŭ malofte uzata vorto [formo]
>	evoluis al
<	evoluis el
=	post la sigloj Io (Ido), Ie (Interlingue), Ia (Interlingua) indikas, ke la responda vorto en la resp. lingvo havas formon identan kun la Esperanta
[ ]	interkrampe estas metataj proksimumaj prononcindikoj, bazitaj sur la esperanta alfabeto; rimarku jenajn specialajn signojn:
ó	(ktp) indikas lokon de la akcento
ô	(ktp) indikas nazalan vokalon
o:	(ktp) indikas longan vokalon
dh	indikas voĉan dentalan frikativon (A *th* en *the*)
th	indikas nevoĉan dentalan frikativon (A *th* en *thing*)
l'	indikas moligitan l-sonon kiel en I *figlio*
n'	indikas moligitan n-sonon kiel en F *baigner*
1-8	indikas la numeron de tiu Oficiala Aldono, en kiu la koncerna radiko estas oficialigita

Sigloj de vortaroj kaj aliaj fontoj

Ald	Aldono al la Dua Libro (1888)
Bat	Batalo de l' vivo (tradukis Zamenhof)
Be	de Beaufront, Dictionnaire Espéranto-Francais (1902)
Du	Dua Libro de l'Lingvo Internacia (1888)
EG	Meza Vortaro Internacia-Germana (1889)
Ekz	Ekzercaro
ER	Plena Vortaro Esperanta-Rusa (1909)
f	fundamenta radiko
f'	radiko trovebla en la Fundamento ekster Universala Vortaro
Fab	Fabeloj de Andersen
Fund	Fundamento de Esperanto
GD	Waringhien, Grand Dictionnaire Espéranto-Francais (1957)
GE	Zamenhof-Jürgensen, Wörterbuch Deutsch-Esperanto, 1-a eld. (1904)
GE2	sama verko, 2-a eld. (1906)
Gen	Genezo
Jü	Jürgensen, Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 3-a eld. (1909)
Ka	Kabe, Vortaro de Esperanto (1910)
Kor,UV	Korektoj de la UV
LI	Lingvo Internacia (periodaĵo 1895-1914)
LR	Lingvaj respondoj
LZ	Leteroj de Zamenhof, eld. de G.Waringhien (1948)
Mart	Marta (tradukis Zamenhof)
Mk	Evangelio laŭ Marko
OA	Oficiala Aldono (OA1 – OA8)
PG	Parnasa Gvidlibro (1932)
PIV	Plena Ilustrita Vortaro (1970)
PL	Planlingvistiko (periodaĵo 1981 – 1986)
PR	Poŝa Lernolibro por Rusoj (1890)
PV	Plena Vortaro (1934)

PVS	Plena Vortaro, Suplemento (1954)
PVZ	Plena Verkaro de Zamenhof (Kioto 1973 –)
RE	Plena Vortaro Rusa-Internacia (1889)
Un	Unua Libro (1887)
Un Po	Unua libro, pola eldono
UV	Universala Vortaro (1894)
Wü	Wüster, Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana (1923-1929)

Mallongigoj de lingvoj

A	angla
Ar	araba
As	asiria
Av	avesta
Bt	bretona
C	ĉina
Ĉe	ĉeĥa
Da	dana
Eg	egipta
Eo	Esperanto
eo	Esperanto (neoficiala)
F	franca
Fi	finna
Fk	franka
G	germana
Gr	greka (= helena)
Gt	gota
H	hispana
HE	hindeŭropa pralingvo
He	hebrea
Hi	hindia
I	itala
Ia	Interlingua
Ie	Interlingue (Occidental)
Io	Ido
Ir	irlanda
J	japana
Ji	jida
Ki	kimra
Kt	kataluna
L	latina
Li	litova
Nd	nederlanda
No	norvega
Oc	okcitana
Pe	persa
pEo	pra-Esperanto
Pg	portugala
pĜ	pra-ĝermana
Po	pola
Pr	prakrita
pSl	pra-slava
R	rusa
Sa	sanskrita
SK	serbokroata
Sk	skandinava
Sv	sveda
Us	usona
Vp	Volapük

Ankaŭ aliaj nomoj de lingvoj okaze citataj estas skribataj kun komenca majusklo, ekz. Azteka, Kopta, Tupia.

La koncerna nomo de lingvo estas ofte kompletigata per aldono signanta epokon aŭ nivelon, ekz. por la latina: L mez., L vulg. ktp. Tiuj aldonoj estas klarigataj en la listo de mallongigoj.

Transskriboj

Transskribo de la helena alfabeto:

a, b, g, d, e, z, ê, th, i, k, l, m, n, x, o, p, r, s, t, y, ph, kh, ps, ô.

Akcento estas markata per akuta signo (la komputoro tamen ne permesis tian signadon super y).

Transskribo de la rusa alfabeto:

a, b, v, g, d, e, ë, ĵ, z, i, j, k, l, m, n, o, p, r, s, t, u, f, ĥ, c, ĉ, ŝ, ŝĉ, -, y, ', e, ju, ja.

En polaj vortoj, la diakritaj literoj estas redonataj tiel:

c', l', n', ó, s', z'.

Nazalaj a kaj e ne estas speciale markataj.

Ceteraj mallongigoj

abstr.	abstrakta
adj.	adjektivo
adv.	adverbo
akt.	aktiva
akuz.	akuzativo
ank.	ankaŭ
anst.	anstataŭ
ant.	antikva
arĥ.	arĥaika
ark.	arkitektura termino
art.	artikolo
biz.	bizanca
bot.	botanika termino
C	konsonanto
ĉ.	ĉirkaŭ
dem.	demonstrativa
der.	deriv/aĵo, -ita
dial.	dialekta formo
dif.	difina
dim.	diminutivo
Ea	esperanta
ekl.	eklezia
eld.	eldono
espismo	esperantismo, imitaĵo de esperanta formo
ev.	eventual/a, -e
fakt.	faktitiva
fig.	figura senco
fil.	filozofia termino
fin.	financa termino
fon.	fonetika termino
fut.	futur/a, -o
gen.	genitivo
geom.	geometria termino
ĝerm.	ĝermana
HE	hindeŭropa
(H)E	(hind)eŭropa: praradiko atestita nur sur eŭropa teritorio
int.	internaci/a, -e
itj	interjekcio
jc	jarcento
k	kaj
k.a.	kaj aliaj
kem.	kemia termino
kl(as).	klasika
kom.	komerca termino
komp.	komparativo
konkr.	konkreta
kp	komparu
k.s.	kaj simile
kunm.	kunmet/o, -ita
L.	Lineo
l.c.	loko citita
lit.	literatura termino
LK	Lingva Komitato
mat.	matematika termino
med.	medicina termino, medicina lingvaĵo
mek.	mekanika termino

metr.	metrika termino
mez.	mezepoka
mil.	militista termino
min.	mineralogia termino
mit.	mitologia termino
mll	mallongigo
mod.	moderna
muz.	muzika termino
nunt.	nuntempe
orig.	origin/a, -e, -o
p.	paĝo
par.	parenca
perf.	perfekta
perm.	permes/ita, -is
pers.	persono
pf	prefikso
p.K.	post Kristo
plur.	pluralo
postkl.	postklasika
pp.	parolante pri
prapar.	praparenca
pref.	prefikso
prep.	prepozicio
prez.	prezenc/a, -o
proks.	proksimume
pron.	pronomo
prop.	propon/o, -ita
propr.	propradire
ps-pf	pseŭdoprefikso
ps-sf	pseŭdosufikso
ptc.	participo
rad.	radiko
refl.	refleksiva
resp.	respektiv/a, -e
rim.	rimark/u, -o
s.	kaj sekva(j)
sc.	scilicet (latine = nome, subkromprenite)
sekv.	(la) sekv(ant)a
signif.	signifanta
sk.	subkomprenu
snn	sinonimo
spec.	speciale
sport.	sporta termino
s.s.	sama senco
subj.	subjunkcio
subst.	substantivo
suf.	sufikso
sup.	supin/o, -a
s.v.	sub la vorto
teat.	teatra termino
tekn.	teknika termino
term.	termino
Us	Usono
V	vokalo
var.	varianto
vb	verbo
vd.	vidu
vulg.	vulgara
War.	Waringhien
Z	Zamenhof
Za	zamenhofa
zool.	zoologia termino

Zamenhof pri la fontoj

(1) ...Krom tio mi donis komunan regulon, ke ĉiuj vortoj, kiuj jam fariĝis internaciaj (la tiel nomataj "fremdaj vortoj"), restas en la lingvo internacia neŝanĝataj, akceptante nur la internacian ortografion; tiamaniere grandega nombro da vortoj fariĝas superflua por la lernado; ekzemple: lokomotivo, redakcio, telegrafo, nervo, temperaturo, centro, formo, publiko, platino, botaniko, figuro, vagono, komedio, ekspluati, deklami, advokato, doktoro, teatro k.t.p., k.t.p. ...

(2) ...La vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo. Tiel ekzemple la vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn "fremdajn" kaj "teĥnikajn"), mi lasis tute sen ia ŝanĝo; el la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj; en tiuj okazoj, kiam la donita vorto en ĉiu lingvo sonas alie, mi penis trovi vorton, kiu havus eble nur signifon proksimuman aŭ uzon pli malloftan, sed estus konata al la plej ĉefaj nacioj (ekzemple la vorto "proksima" en ĉiu lingvo sonas alie; sed se ni prenos la latinan "plej proksima" (*proximus*), tiam ni vidos, ke ĝi, en diversaj ŝanĝoj, estas uzata en ĉiuj plej ĉefaj lingvoj; sekve se mi la vorton "proksima" nomos *proksim*, mi estos pli aŭ malpli komprenata de ĉiu klera homo); en la ceteraj okazoj mi prenadis ordinare el la lingvo latina, kiel lingvo duone-internacia. (Mi flankiĝadis de tiuj ĉi reguloj nur tie, kie tion ĉi postulis apartaj cirkonstancoj, kiel ekzemple la evito de homonimoj, la simpleco de la ortografio k.t.p.

1887, Antaŭparolo al la Unua Libro (trad. Zamenhof).

Eld. Setälä (Helsinki 1948), p. 43, 45.

– Plena Verkaro de Zamenhof, vol. 1, p. 15, 21.

(3) ...ni montradis, ke la lingvo Esperanto *malgraŭ sia absoluta reguleco kaj facileco* penis kiom nur eble konservi la neŝanĝitan formon de la vortoj. ... La lingvo Esperanto estas kreita en la sekvanta maniero: estas prenitaj la plej konataj vortoj de la lingvoj ariaj kaj tre garde preparitaj tiel, ke ili alformiĝu al absolute regula gramatiko, ortografio kaj praktika uzebleco, kaj ke la vortoj kaj formoj ne venu en kolizion unu kun alia.

1891, Pri la manieroj de vastigado. La Esperantisto, n-ro 3.

– Originala Verkaro, parto II, n-ro 36.

– Plena Verkaro de Zamenhof, vol. 2, p. 164 s.

(4) ... *Pri la fundamento* de Esperanto (simpla gramatiko kun vortaro proksimume romana-germana) neniu nun dubas, ke ĝi estas ĝusta, kaj ĉiuj projektantoj ja proponas tian saman fundamenton kaj disputas nur pri detaloj...

1893, Novaj lingvoj tutmondaj. La Esperantisto, n-ro 2.

– Originala Verkaro, parto II, n-ro 69.

– Plena Verkaro de Zamenhof, vol. 3, p. 87.

A

ABAT/O (f; RE): A *abbot*, F *abbé*, G *Abt*, I *abate*, R *abbat*, (H *abad*); L *abb/as -atis*. Eo-formo laŭ L (eklezia termino) apogata de IR. ¶ Io *abado* (por eviti similecon al *abatar* "buĉi"), Ie *abate*, Ia *abbate*.

Pere de Gr *ábbas* el Aramea *abba* "patro", orig. infanvorto de la sama tipo kiel *mamo, papo*.

ABDIK/I (3; Ka): A *ab/dicate*, F *-diquer*, IL *-dicare*. Ps-pf *ab-*.

L vorto, kunm. de *ab-* "for-" k *dicare* "proklami" (par. al *dicere*, vd. *diri*).

ABEL/O (f; RE): F *abeille* [-ej]; kp H *abeja*, Pg *abelha*. Bazita sur F kun *-l-* reprezentanta latinidan [-l'-], kp la analogajn *botelo, orelo* kaj plue *batali, patrolo, vanilo*). Por zoologia termino oni atendus L bazon (L *apis*). Laŭ Modrijan 37, Z evitis **apo* pro malbonsoneco; tamen Z proponis ĝuste *ap-* en 1894. ¶ Io *abelo*, IeIa *ape*.

El L *apicula*, dim. de *apis*.

ABI/O (f; RE): L *abi/es -etis*; I *abete*, (H *abeto*). Botanika termino bazita sur L. Radiko apokopita por eviti aspekton de diminutivo; analoge ĉe *lorno, socio*. ¶ 1894 *abiet-*. ¶ Io *abieto*, IeIa *abiete*.

ABISM/O (1; Jü): A *abyss* [-is], *abysm* [-izm], F *abîme*, I *abisso*, (H *abismo*). Formo identa al H pro koincido; bazita sur AF. Ps-sf *a(n)-*. ¶ Io *abismo*, Ie *abisse*, Ia *abysmo*.

Pere de L mez. *abysmus*, L postkl. *abyssus* el Gr *ábyssos* s.s., orig. adj. "senfunda": *a-* "ne-, sen-"; *byssos* "(marpro)fundo", kp *bathys* "profunda".

ABITURIENT/O (4; EG): G *Abiturient*, R *ab-*. Ps-pf *ab-*; ps-sf *-ent*. ¶ Ie *abituriente*; mankas en IoIa.

El L mod. *abituri/ens -entis*, ptc. prez. de *abiturire* "esti eksiĝema", dezirespriva verbo de *ab-ire* "for-iri", vd. *iri*.

ABLATIV/O (f; RE): L *ablativus (casus)*; A *ablat/ive*, F *-if*, I(H) *-ivo*. Ps-pf *ab-*; ps-sf *-iv*.

Orig. "forporta (kazo)" el *ab-* "for-" k radiko *(t)lat-* "porti" (vd. *relativa*).

ABNEGACI/O (2; Jü): A *ab/negation*, F *-négation*, I *-negazione*, (H *-negación*). Ps-pf *ab-*; ps-sf *-cio*.

Orig. "rezigno (neado) de la propra avantaĝo" el L *abnegatio* de *abnegare* "fornei" el *ab-* "for-" k *negare* "nei" (vd. *ne*).

ABOMEN/I (f; RE): A *abomin/ate*, F *-er*, I *-are* (H *-ar*); L *-ari*. Ps-pf *ab-*. Vokalŝanĝo *i* > *e*, probable por eviti aspekton de virinsufiksa vorto. Analoge en *arlekeno, azeno, baldakeno, baseno, bobeno, bulteno, ĉagreno, delfeno, diveni, domeno, ermeno, festeno, floreno, frakseno, gelateno, jasmeno, kameno, kanabeno, karabeno, karpeno, kurteno, kuseno, lameno, magazeno, mandareno, marĝeno, marokeno, nankeno, palankeno, plateno, rabeno, rosmareno, rubeno, sukceno, tendeno, veleno*. Tie ĉi la ŝanĝon eble sugestis la L fontvorto *omen*, vd. sube. ¶ 1881 *blenoro* "abomenulo" (etimologio nekonata, vd. War. LV 46); 1894 *abo-*

min-. ¶ IoIeIa *abominar.*

Orig. "fordeziri [ion] kiel malbonan antaŭsignon", de L *ab* "for" k *om/en -inis* "antaŭsigno".

ABON/I (f; RE): F *s'abonner*, I *abbonarsi*, R *abonirovatsa*, (H *abonarse*); sen refleksiva pron. G *abonnieren*, Po *abonowac'*. Ps-pf *a(d)-*. Kp la senrefleksivigon en *abstini, barakti, enui, kvereli, moki, plendi.* ¶ Io *abonar*, Ie *abonnar*, Ia *abonar se.*

Orig. "difini (al si certan rajton)", el F ant. (*a* "al" kaj) *bonne* "lim(ŝton)o" (F mod. *borne*). Por la sencevoluo, kp. la parencecon de *difini* kaj *fini.*

ABORT/I (1; Jü): A *abort*, G *-ieren*, I *-ire*, (H *-ar*), F *avorter*; kp L *abortus* "-o", *aboriri* "-i". Ps-pf *ab-*.

Kunm. de L *ab* "de, for" (tie ĉi signifanta deflankiĝon, mison) kaj *oriri* "ekesti, aperi" (vd. *oriento*).

ABRIKOT/O (f; RE): A *apricot*, F *abricot*, G *Aprikose*, I *albicocca*, R *abrikos*. Kp Pg *abricó*. Eo-formo laŭ F kun apogo de R (*ab-*) kaj A (*-cot*). ¶ Io =, Ie *abricote*, Ia *albricoc.*

Pere de Ar *al-barqûq* (dif. art. *al*, vd. *algebro*) el Gr postkl. *praikókion* (Gr mod. *berekyko*), der. de L *praecox* "frue matura (kompare al persiko)" de *prae-* "antaŭ" (vd. ps-pf *pre-*) k *coquere* "kuiri; maturigi" (vd. *kuiri*).

ABRUPT/A (2; Jü): AF(G) *abrupt*, (H *-o*); L *-us*. Ps-pf *ab-*.

Propr. "derompita", ptc. perf. de L *ab-rumpere* "de-rompi" (vd. *rompi*).

ABSCES/O (f; RE): A *ab/scess*, F *-cès*, R *-sces*, (H *-ceso*), L med. *-scessus*. Ps-pf *ab-*. ¶ Io *abceso*, Ie *abscess/e*, Ia *-o.*

Orig. "sekrecio, eliro (de puso)", subst. de L *abscedere* "foriri" el *abs*, var. de *ab* "for, de", k *cedere* "iri" (vd. *cedi*).

ABSINT/O (f; RE): A *absinth*, F *-e*, G *Absinth*, I *assenzio*, Po *absynt* (H *absintio, ajenjo*); L *absinthium* (bot.).

El Gr *apsínthion* (bot.); la suf. *-inth-* sugestas ne-HE originon (kp *hiacinto, labirinto*).

ABSOLUT/A (f', 1; Du, RE): A *absol/--ute*, F *-u*, G *-ut*, R *-jutnyj*, (H *-uto*), I *assoluto*; L *absolutus*. Ps-pf *ab-*.

Propr. "malligita", ptc. perf. de L *absolvere* "malligi, liberigi" (> eo *absolvi* Jü) el *ab* "de, for" k *solvere* "malligi, solvi" (vd. tiun).

ABSORB/I (3; Jü): A *absorb*, F *-er*, G *-ieren*, I *-ire*, Po *-owac'*, (H *-er*); L *absorbere.* Ps-pf *ab-*.

Propr. "forsuĉi", el *ab* "for" k *sorbere* "sorbi" (vd. tiun).

ABSTIN/I (4; PV; antaŭe *abstinenc/o* Jü): A *abstain*, F *s'abstenir*, I *astenersi* (H *abstenerse*); L *abstinere.* Ps-pf *ab-*. Ne-Za radiko. Senrefleksivigo en Eo, sugestita de AL; kp *aboni.* Vokalismo laŭ L aŭ laŭ la jama substantivo (< AF *abstin/ence*, L *-entia* ktp). ¶ Io *abstenar*, Ie *abstener se*, Ia *abstiner se.*

Propr. "deteni (sin)", el *abs-*, var. de *ab* "de", k *tenere* "teni" (vd. tiun).

ABSTRAKT/A (1; RE): A *abs/tract*, F *-trait*, G *-trakt*, R *-traktnyj*, (H *-tracto*), I *astratto*; pri L, vd. sube. Ps-pf *ab-*.

Orig. signifo "apartigita (per pensado)", el L *abstractus*, ptc. perf. de *abstrahere* "apartigi, fortiri", el *abs-*, var. de *ab* "for", k *trahere* "tiri" (vd. *ekstrakto*).

ABSURD/A (1; Be): AG *absurd*, F *-e*, R *-nyj*, (H *-o*), I *assurdo*; L *absurdus*. Ps-pf *ab-*.

Orig. "missonanta", el *ab* "for" (tie ĉi eble intensiga pref.) k *surdus* "kiu ne [malnete] aŭd(iĝ)as", vd. *surda.*

ABUND/i (3; Ka): A *ab/ound*, F *-onder*, I *-bondare*, (H *-undar*); L *abundare.* Adoptita en Eon kiel adjektiva radiko, por kiu funkcio la fontlingvoj uzas la ptc. prez. de la citita verbo: A *ab/undant*, F *-ondant*, I *-bondante*, L *-undans*, (H *-undante*). (Kp *petol/a* < L *petulans.*) Ps-pf *ab-*. ¶ IoIeIa *abundar.*

Orig. "superakvi", de L *ab* "de" k *unda* "ondo" (vd. tiun).

ACER/O (f; RE): L *acer*; I *acero*, (H *arce*). Kp Pg *ácer*. Botanika termino bazita sur L. ¶ Io =, IeIa *acere.*

Kp plue F *érable* s.s. < L vulg. *acerabulus*;

G *Ahorn* s.s. Kredeble de HE rad. **ak-* "akra" (vd. tiun) pro la akraj folientrancoj de la koncerna arbo.

ACID/A (f; Un): A *acid*, F *-e*, I *-o*, (H *ácido*); L *acidus*. Ps-sf *-id* 1. ¶ Io =, Ie *acid*, Ia *-e*.

De L *acere* "esti acida", kp *acer* "akra" (> F *aigre* "acida") de HE rad. **ak-* "akra", vd. tiun.

AĈET/I (f; Un): F *acheter*. Same F *ch* > Eo *ĉ* en *arĉo, dimanĉo, kraĉi, maĉi, marĉandi, pioĉo, tranĉi* kaj multaj radikoj komenciĝantaj per *ĉ-*, ekz. *ĉapitro, ĉe, ĉemizo, ĉevalo*. (Alifoje *ch* reprezentiĝas per ŝ, vd. plue *buŝo*.) – Bastien citas ank. H *rescatar*, I *riscattare*, Pg *resgatar*, kiuj parte havas la saman etimologion sed alian signifon ("re-, el/aĉeti") kaj certe ne influis Z en tiu ĉi kazo. ¶ 1894 *kompr-* (< I *compr/are*, kp H *-ar*). ¶ Io *komprar*, Ie *comprar*; Ia *emer* (< L *emere*).

El L *acceptare* "preni al si": etimologie identa kun *akcepti*, vd. tiun.

ADAPT/I (3; Jü): A *adapt*, F *-er* (H *-ar*), I *adattare*; L *adaptare*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "konformigi, alĝustigi", el L *ad* "al" k *aptare* "ĝustigi", fakt. verbo de *aptus* "ĝusta" (L rad. *ap-*, kp *adepto, apud*).

ADEPT/O (1; Du, RE): APo *adept*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Adept*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "inicita, atinginta scion pri io", el L *adeptus* "atinginta", ptc. perf. de *adipisci* "atingi" el *ad* "al" k rad. *ap-*, vd. *apud*.

ADIAŬ (f; Un): F *adieu*, I *addio*, (H *adiós*). Kp Pg *adeus*; iam ank. AG *adieu*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894 *adiu*; 1906b *adie*. ¶ Io *adio*, Ie *adío*, Ia *adeo*.

Orig. "(mi rekomendas vin) al Dio", el la resp. latinidaj vortoj por "al" k "Dio" (vd. tiujn).

ADICI/o (2; Jü): AF *ad/dition*, I *-dizione*, (H *-ición*), G *Addition*; L *additio*. Ps-pf *a(d)-*; ps-sf *-cio*.

Orig. "aldonado", subst. de L *addere* "aldoni" de *ad* "al" k *dare* "doni" (vd. tiun).

ADJEKTIV/O (f; RE): A *ad/jective*, F *-jectif*, (H *-jetivo*), G *Adjektiv(um)*, I *aggettivo*; L *adiectivum (nomen)*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-iv*.

Propr. "aldonita (nomo)", der. de L *adicere* "aldoni", de *ad* "al" k *iacere* "ĵeti, meti" (vd. *ĵeti*). La termino estas traduko de Gr *epítheton*, vd. *epiteto*.

ADJUTANT/O (1; RE): AFR *ad/jutant*, Po *-iutant*, G *Adjutant*, I *aiutante*, (H *ayudante*). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-ant*.

Orig. signifo "helpanta (oficiro)", el L *adiut/ans -antis*, ptc. prez. de *adiutare* "helpi", der. de *adiuvare* s.s., de *ad* "al, apud" k *iuvare* "helpi, apogi".

ADMINISTR/I (f; RE): A *administ/er*, F *-rer*, G *-rieren*, Po *-rowac'*, (H *-rar*), I *amministrare*; L *administrare*. Ps-pf *a(d)-*. – Agadnomo: **ADMINISTRACI/O** (3; Be): AF *administra/tion*, Po *-cja*, R *-cija*, (H *-ción*), G *Administration*, I *amministrazione*; L *administratio*. Ps-sf *-cio*.

Kunm. de L *ad* "al, apud" k *ministrare* "servi", der. de *minister* "servisto, asistanto" (vd. *ministro*).

ADMIR/I (f; RE): A *admir/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *-ari*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "miri je (io)", de L *ad* "al, je" k *mirari* "miri" (vd. tiun).

ADMIRAL/O (1; RE): AR *admiral*, F *amiral*, G *Admiral*, I *ammiraglio*, Po *admiral'*, (H *almirante*). ¶ Io =, Ia *admiral*, Ie *-e*. – Nomo de oficejo kaj personaro: **ADMIRALITAT/O** (3; Jü): A *admiralty*, F *amirauté*, G *Admiralität*. Ps-sf *-t(at)-*, kp *aŭtoritato, fakultato, universitato*. ¶ Mankas en Io; Ie *admiralità*, Ia *admiral/ato, -itate*.

Orig. mallongigo de Ar *amîr-al-baḥr* "komandanto de la maro" aŭ simila esprimo (*amîr* "ĉefo" el *amara* "komandi"; *al* dif. art., vd. *algebro*). – Komenco *ad-* en pluraj lingvoj pro malĝusta asociigo al la radiko *admir-*.

ADMON/I (f; RE): A *admon/ish*, F *-ester*, I *ammonire*, (H *amonestar*); L *admonere*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *exhortar* (< A *exhort*); Ie *admon/ir*, Ia *-er*.

Kunm. de L *ad* "al" k *monere* "admoni". HE rad. **men-*, vd. *menso*.

ADOPT/I (1; Jü): A *adopt*, F *-er*, G *-ieren*, Po *-owac'*, (H *-ar*), I *adottare*; L *adoptare*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "deziri al si", el L *ad* "al" k *optare* "deziri" (vd. *opinio*).

ADOR/I (f; RE): A *ador/e*, F *-er*, I *-are*, Po *-owac'* (H *-ar*); L *-are*. Ps-pf *a(d)-*.

Propr. "alpreĝi", el L *ad* "al" k *orare* "preĝi, peti" (vd. *oratoro*).

ADRES/O (f';Un): A *address*, F *adresse*, G *Adresse*, PoR *adres*. Ps-pf *a(d)-*.

Subst. der. de F *adresser* "adresi, direkti" el L vulg. **addirectiare* "direkti al" el L *ad* "al" k *directus* "direktita" (vd. *direkti*).

ADULT/o (f; RE): A *adult/ery*, F *-ère*, I(H) *-erio*; L *adulterium*. Radikamputo en Eo, eble por eviti similecon al suf. *-er-* (multaj radikoj tamen montras tiun finon) aŭ tutsimple ĉar la radiko estas sufiĉe karakteriza sen tiu lasta silabo. Iel analogaj estas la apokopoj en *akcel-*, *papav-*, *pulv-*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894 *adulter-*. ¶ Io *adult/ero*, Ie *-erie*, Ia *-erio*.

Der. de L *adulterare* "adulti; korupti, falsi", orig. "ŝanĝi", el *ad* "al" k *alterare* "ŝanĝi, aliigi" (kp *alterni*; vd. sub *alia*).

ADVENT/O (1;Jü): A *ad/vent*, Po *-went*, (H *-viento*), F *avent*, G *Advent*, I *avvento*. Kp ank. L. Ps-pf *a(d)-*.

El L *adventus* "alveno (de Kristo)", subst. de *advenire* "alveni": ' *ad* "al", *venire* "veni" (vd. tiujn). Kp spec. *aventuro*, *avenuo*.

ADVERB/O (f; Du, RE): A *adverb*, F *-e*, (H *-io*), G *Adverb(ium)*, I *avverbio*; L *adverbium*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "kromvorto, aldono al alia vorto [verbo]" el L *ad* "al, apud" k *verbum* "vorto; verbo" (vd. *verbo*).

ADVOKAT/O (1; RE): A *advocate*†, F *avocat*, G *Advokat*†, I *avvocato*, Po *ad/wokat*, R *-vokat*, (H *abogado*); L *advocatus*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-at* 1.

Propr. "alvokito", ptc. perf. de L *advocare* "alvoki": *ad* "al", *vocare* "voki" (vd. tiujn).

AER/O (f; Un): L(Gr) *aer*; AF *air* (adj. A *aerial*, F *aérien*), I *aria* (adj. *aereo*); kp H *aire* (adj. *aéreo*). La radikformon evidente determinis L-Gr; fortan apogon donas aro da internaciaj vortoj kun *aero-* kiel unua elemento (ekz. *-dromo*, *-lito*, *-naŭtiko*, *-plano*). ¶ Io =, Ie *aere*, Ia *aer*.

El Gr *aêr* s.s. (de multaj etimologoj asociita kun *aênai* "blovi", vd. sub *vento*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *-lito*, *-plano*, *ario*, *malario*. Kp. ev. *atmosfero*.

AEROLIT/O (1; Jü): A *aero/lite*, *-lith*, I(H) *-lito*, PoR *-lit*, F *aérolithe*, G *Aerolith*. Konstruita el Gr *aêr* "aero" (vd. tiun) k *líthos* "ŝtono" (vd. *litografi*).

AEROPLAN/O (3; Wü): A *aeroplane*, *airplane*, F *aéroplane*, G *Aeroplan*, (H)I *aero/plano*, PoR *-plan*.

Konstruita (en F, ĉ. 1855) el Gr *aêr* "aero" (vd. tiun) kaj la radiko de F *planer* "ŝvebi", de L *planus* "ebena" (vd. *plano*).

AFABL/A (f; RE): F *af/fable*, I *-fabile*, (H *-able*); L *-fabilis*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-bl*. ¶ Io =, Ie *affabil*, Ia *-e*.

Orig. "alparolebla", de L *affari* "alparoli": *ad* "al", *fari* "paroli" (vd. resp. *al*kaj *infano*).

AFEKT/I (f; RE): A *af/fect*, F *-fecter*, G *-fektieren*, I *-fettare*, R *-fektirovat'*, (H *afectar*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *afektacar* (kp *afektar* "afekcii"), Ie *afectar*, Ia *affectar*.

Orig. "aspiri, voli posedi (iun senton)", der. de L *afficere* "influi [iun], impresi [iun] (per iu sento)" (subst.: *affectio* > eo *afekcio* "emociego" Ka), de *ad* "al" k *facere* "fari" (vd. tiujn). (La ekzakta semantika evoluo estas neklara.)

AFER/O (f; Un) 1) abstr. 2) konkr.: A *affair* (1), F *affaire* [afér] (1,2), G *Affäre* (1), I *affare* (1). Kp R *afera* "fiafero, spekulacio", Po *afera* "trompafero". Formo laŭ prononco de la originlingvo F (F *ai* > Eo *e* kiel en *ĉeno*, *pledi*), apogata fonetike de la AG prononco kaj ortografie de la (tamen alisignifa) slava formo. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1882 *ri-* (< L *res*, gen.: *rei*, vd. PVZ 5, 145). ¶ Io =, Ie *afere*, Ia *affaire*.

El la F esprimo *avoir une chose à faire* "havi ion por fari": *à* "al, por", *faire* "fari" (vd. *al*

resp. *fari*).

AFIKS/O (1; Jü): A *affix*, F *-e*, G *Affix*, I *affisso*, Po *afiks*, (H *afijo*). Ps-pf *a(d)-*.

El L *affixum* "alfiksitaĵo", ptc. perf. de *affigere* "alfiksi": *ad* "al", *figere* "fiksi" (vd. tiujn). Kp sekv.

AFIŜ/O (1; RE): F *affiche* [afiŝ], G *Affiche*† [=F], I *affisso*, Po *afisz* [-ŝ], R *afiŝa*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *afisho*, Ie *afiche*; Ia *placard* (<F).

Subst. de F *afficher* "alfiksi", kunm. de *à* "al" k *ficher* "fiksi" el L vulg. **figicare*, der. de L *figere* "fiksi" (vd. tiun). Kp *afikso*.

AFLIKT/I (3; Wü): A *afflict*, F *af/fliger* (subst.: *-fliction*), I *affliggere*, (H *afligir*, subst. *aflicción*); L *afflictare, affligere*. Bazita sur L supina radiko, uzata verbe en AL kaj en la responda substantivo. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *afliktar*, Ie *aflicter*, Ia *affliger*.

Orig. "(al)bati", de L *ad* "al" k *fligere* "bati" (vd. *konflikto*).

AFORISM/O (1; Jü): A *aphorism*, F *-e*, G *Aphorismus*, I(H) *afor/ismo*, Po *-yzm*, R *-izm*. Ps-sf *-ism*.

El Gr *aphorismós* "maksimo; difino", subst. de *aphorízein* "difini", orig. "determini per limoj, limigi", el *apo* "de" (vd. ps-pf *apo*) k *horízein* "limigi" (vd. *horizonto*).

AFRANK/I (1; Jü): A *frank*, F *affranchir*, G *frankieren*, I *(af)francare*, Po *frankowac'*, R *frankirovat'*, (H *franquear*). Ea formo laŭ FI; *frank-* estis neebla, ĉar ekzistanta en Eo (f',1) kun alia signifo (vd. *franko*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *afrankar*, Ie *afrancar*, Ia *timbrar* (*timbro* "poŝtmarko").

Orig. "liberigi (de pago)", der. de F *franc*, HI *franco* "libera" (*a-* funkcias kiel fakt. pref., vd. ps-pf *a(d)-*), orig. identa kun la popola nomo (vd. sub *franco*).

AFRIK/O (8; PR, Jü): AI *Africa*, F *Afrique*, GR *Afrika*, Po *Afryka*, (H *África*); L *Africa*. Ps-sf *-ik*.

Orig. nomo de romia provinco, der. de *Afri*, nomo de gento loĝinta en nuna Tunizio.

AFUST/O (1; Jü): F *affût*, I *affusto*, (H *afuste*). La Ea formo ŝajnas farita laŭ I; rim. krome ke la cirkumflekso en F indikas forfalintan *-s-* (kp F *fenêtre* = Eo *fenestro*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io =, Ie *afuste*; Ia *affuste**.

Der. de F ant. *afuster*, orig. "klini al arbotrunko" el *à* "al" k *fust* "trunko" (F mod. *fût* "fusto") el L *fustis* "bastono, ŝtipo" (kp H *fuste* "fusto, stango", I *fusto* "tigo, trunko" > eo *fusto* Wü). Samfamilia radiko: *fusteno*; praparenca estas ank. *amboso*. – Eo *fosto*, citita de Bastien s.v., ne estas parenca.

AG/I (f; RE): L *agere* (supina radiko: *act-*); A *act*, F *agir*, I *agire*, (H *actuar*). L estas sendube la modelo de la Eo-formo; la radiko estas krome konata per internaciaj derivaĵoj kiel *agento* (vd. tiun) kaj *re/agi* (ekz. G *re/agieren*, Po *-agowac'*, R *-agirovat'*). ¶ Io *agar*, Ie *acter*, Ia *ager*.

Latin (id)a vorto, en L signifanta "agi, esti aktiva, okupiĝi [pri io]", orig. "ekpeli, ekfari [ion], ekmovi [ion]", de HE rad. **ag-* "(ek)peli", kp Sa *ájati* "pelas", Gr *ágein* "peli, konduki". Samfamiliaj radikoj en Eo: *agento, agiti, akcio, akso, akto, aktiva, aktoro, aktuala, ekzakta, navigacio, reakcio, red/akcio, -akti, -aktoro*. Parencaj estas ankaŭ (per Gr) *agonio, agronom(i)o, aksiomo, demagogo, pedagog(i)o, strategio, sinagogo*. Kp ank. *kaŝi*.

AGAC/I (f; RE): F *agacer*. ¶ Io *agacar*; mankas en IeIa.

El L vulg. **adaciare* "akrigi", der. de L *ad* "al" (tie ĉi funkcianta kiel iga pref.) kaj *acies* "tranĉrando (de la dentoj)", vd. sub *akra*.

AGAT/O (1; RE): AF *agate*, G *Achat*, (H)I *agata*, PoR *agat*.

Pere de L *achates* el Gr *akhátês* (laŭ la samnoma rivero en Sicilio, kie la mineralo unuafoje estis trovata).

AGENT/O (1; Du, RE): AFPoR *agent*, (H)I *-e*, G *Agent*. Ps-sf *-ent*.

El L *ag/ens -entis* "aganto", ptc. prez. de *agere* "agi" (vd. tiun).

AGIT/I (2; RE) 1) varbi 2) malkvietigi: A *agit/ate* (1,2), F *-er* (1,2), G *-ieren* (1), I *-are* (1,2), Po *-owac'* (1), R *-irovat'* (1);

kp H *-ar* (1,2). ¶ IoIeIa *agitar* (1,2).

El L *agitare* "ekmovi, skui, peladi; inciti, instigi", verbo intensa de *agere* "(ek)peli, agi" (vd. *agi*).

AGL/O (f; Un): A *eagle*, F *aigle*, IL *aquila*, (H *águila*). Oni povus karakterizi la Ean radikon kiel miksformon (*-gl-* laŭ AF, *a-* laŭ FIL) aŭ kiel simpligitan A resp. F formon; ĝi montras rimarkindan koincidon kun Oc *aglo* (vd. Albault 1961, 88). Formo **akvil-* laŭ LI estus neebla laŭ Z-aj principoj (*akv/il/o!*). ¶ Io = (espismo), Ie *áquil*, Ia *aquila*.

Orig. L adj. (*aquilus*), signifanta "nigreca, malhela", probable der. de *aqua* "akvo" (vd. tiun).

AGONI/O (1; RE): A *agon/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Agonie*. Ps-.sf *-i* 1.

El Gr *agônía* "angoro; streĉiĝo; batalo, konkurso", der. de *agôn* "konkurs(ej)o", orig. "(loko) kiu kunvenigas (homojn)", der. de *ágein* "peli" (vd. *agi*).

AGORD/I (f; RE): F *accord/er*, I *-are* (H *acordar*). Arbitra sonŝanĝo *k* > *g* por diferencigi la radikon disde *akord-* (sama ŝanĝo en *logi*, *pargeto*, *pego*, *pigo*); kiel rimarkigis Wiener 1950, 100, la diferencigo estas nenecesa, ĉar estus eble uzi 'akordigi' por 'agordi'. ¶ 1894 *akord-*. ¶ Io *akordigar*, Ie *acordar*, Ia *accordar*.

Vd. *akordo*.

AGRABL/A (f; Un): A *agreeable*, F *agréable*, I *(ag)gradevole*, (H *agradable*). Bazita sur F, tamen kun forstreko de *-e-* por eviti hiaton. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-bl-*. ¶ Io *agreabla*, Ie *agreabil*, Ia *agradabile*.

Der. de resp. F *agréer* "plaĉi; aprobi", H *agradar* "plaĉi", I *aggradare* "plaĉi", ĉiuj el L *ad* "al" k *gratus* "plaĉa, agrabla" (vd. *gratuli*).

AGRAF/O (1; Jü): F *agraffe*, G *Agraffe*†, Po *agraf(k)a*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io =, Ie *agraffe*, Ia *fibula* (< L).

Subst. de F *agrafer* "alkroĉi", el *à* "al" k F ant. *grafe* "hoko" el G ant. *krapfo* s.s. (kp G mod. *Krampe* "krampo", vd. tiun).

AGRONOM/O (7; Ka; antaŭe *agronomi/isto*): A *agronom/ist*, F *-e*, I *-o*, G *Agronom*, PoR *agronom*, (H *agrónomo*). – Nomo de scienco: **AGRONOMI/O** (1; RE): A *agronom/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija* (H *-ía*), G *Agronomie*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *agronomía* "terkultura administrado" de *agronómos* "terkultura oficisto", orig. "kampulo", kunm. de *agrós* "kampo" k *-nomos*, agantnomo de *némein* "posedi; loĝi" (vd. plue *astronomo*). – Gr *agrós* estas identa kun Sa *ájra-*, L *ager*, G *Acker* "kampo", kp A *acre* "akreo (area mezurunuo)", el HE **agros*, kredeble orig. "loko, kien oni pelas brutojn" el rad. **ag-* "peli" (vd. *agi*).

AĜO (f; Un): A *age* [ejĝ], F *âge* [a:ĵ]. En radikoj bazitaj sur AF, Eo *ĝ* normale respondas al A *g* [ĝ]/F *g* [ĵ], imitante la AF ortografion sed samtempe indikante molan prononcon (kp *arĝento*, *dangero*, *ĝenerala*, *kaĝo*, *larĝa*, *paĝo*, *ŝanĝi*). ¶ 1894 *etad-* (I *età*, H *etad*, L *ae/tas -tatis*). ¶ Io *evo* (< L *aevum*), Ie *età*, Ia *etate*.

El L vulg. **aetaticum*, der. de L *ae/tas -tatis* "aĝo" el L ant. *aevitas*. Kp L *aevum* "aĝo, epoko, eterno", *aeternus* "eterna"; Gr *aiôn* "vivodaŭro; eterno" (> eo *eono* Wü), *a(i)eí* "ĉiam"; A *ever* "ĉiam"; G *ewig* "eterna" (HE rad. **ajŭ-*). Samfamilia radiko en Eo: *eterna*.

AĜI/O (3; Jü): AF(H) *agio*, G *Agio*, I *aggio* [áĝo], Po *agio*, *az'io*, R *ažio*. Eo *-ĝ-* respegulas molan prononcon komunan al la fontlingvoj (AGI [ĝ], FPoR [ĵ]).

Itala komerca termino, kredeble identa kun I *agio* "oportuno" (por la semantika evoluo, kp eo *interezo*, etimologie identa kun *intereso*), el F *aise* "komforto, kontenteco".

AJL/O (f; RE): F *ail*, I *aglio*, (H *ajo*, Pg *alho*); L *al(l)ium*. Eo-formo bazita sur F ortografio; *-jl-* reprezentanta latinidan [l'] same aperas en *emajlo*, *kanajlo*, *pajlo*, *serajlo* (pri aliaj transskriboj de la sama sono, vd. *abelo*, *bataliono*). ¶ 1894 *ail-*. ¶ Io *alio*, Ie *alie*, Ia *allio*.

Necerta etimologio.

AJN (f; Un): Sen evidenta etimologio.

Plej aprobata ŝajnas la hipotezo ke *ajn* reprezentas laŭprononcan transskribon de G *ein* en la kombino *irgend ein* "iu (ajn)" (tiel Waringhien 1946, 20, ank. LV 61; kp Gregor 1958, 105). Golden, kiu akcentas la volapukan influon sur la Ean leksikon, konsideras kiel etimon Vp *ai* s.s., kiu tamen estas prefiksa: *aikel* "(k)iu ajn" ktp (Golden 1979b). Waringhien 1946 notas kiel eventualan apogon Sv *än*, ekz. *vem än* "kiu ajn", sed forstrekis, certe prave, tiun sugeston en la dua eldono de la libro. ¶ 1894 *kunku* (< L *quicumque*, F *quiconque* "kiu ajn"); 1906b *an* (modifo de *ajn?*). ¶ Io *irg/u, -a* "(k)iu ajn" (< G), Ie *(qui)cunc* "(kiu) ajn" (< L), Ia *(qui)cunque* "(kiu) ajn" (< L).

AKACI/O (1; RE): AFI(H) *acacia*, G *Akazie*, Po *akacja*, R *akacija*; L *acacia*.

El Gr *akakía* s.s., probable de orienta (egipta?) origino sed per popola etimologio asociita kun *akê* "pinto" k.s. (vd. *akra*).

AKADEMI/O (1; Du, RE): A *acad/emy*, F *-émie*, (H *-emia*), G *Akademie*, I *accademia*, Po *akadem/ia*, R *-ija*; L *academia*.

El Gr *Akadêmeia*, nomo de loko apud Ateno (konsekrita al la mita heroo *Akádêmos*), kie instruis Platono.

AKAPAR/I (2; Jü): F *accapa/rer*, I *-rrare*, (H *acaparar*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *akaparar*, Ie *acaparar*; mankas en Ia.

Itala komerca termino, orig. "aĉetante doni konfirman antaŭpagon", el *a* "al" kaj *caparra* "antaŭpago", kies unua elemento estas de necerta origino; la dua estas *arra* "garantiaĵo" el L *arra(bo)* s.s. el Gr *arrabôn* s.s. el He *'êrâbôn* s.s.

AKAR/O (f; RE): F *acar/us*, I *-o*, (H *ácaro*); L zool. *Acarus*. ¶ Io =, Ie *acare*, Ia *acarina**.

Formita en L mod. el Gr *akarí* s.s., probable ligita kun *akarês* "malgrandega", propr. "ne distranĉebla" el *a-* "ne" (vd. *atomo*) k *keírein* "tranĉi" (pri ev. HE parencoj, vd. sub *korko*).

AKCEL/I (f: RE): A *acceler/ate*, I *-are*, F *accélérer*, (H *acelerar*); L *accelerare*, ĉiuj "plirapidigi"; la figura senco "progresigi, antaŭenigi" estas esperantismo (jam en UV). La responda subst. estas pli internacia kiel teknika termino (A *acceler/ation*, I *-azione*, F *accélération*, G *Akzeleration*, H *aceleración*, Po *akceleracja*). Amputo de la radika finsilabo analoga al tiu en *adult-*: ĝi neebligas konfuzon kun la sufikso *-er-* kaj oportunigas la radikon per mallongigo. Ps-pf *a(d)-*. – Eo *-kc-* en latindevenaj vortoj (*akceli, akcento, akcepti, akcesora, akcidento, akcipitro, akcizo, okcidento*) ĝenerale respondas al L *-cc-* [k > ks] (ofte asimilita el *-dc-*, vd. la unuopajn vortojn), AF *-cc-* [ks], G *-kz-* [kts], I *-cc-* [ĉ], PoR *-kc-* [kts]. La Eo-formoj do ortografie plej konformas al Po, prononce al GPoR. Alie en *(re)akcio*, kie *k* apartenas al la bazo kaj *c* al la ps-sf *-cio* (L *actio*). ¶ 1894 *akceler-*. ¶ Io *acelerar*, IeIa *accelerar*, ĉiuj "plirapidigi".

El L *ad* "al" (tie ĉi servanta kiel iga pref.) k *celerare* "rapidigi" de *celer* "rapida" (HE rad. **kel-* "peli", vd. sub *halti*).

AKCENT/O (f; RE): AF *accent*, I *-o*, G *Akzent*, PoR *akcent*, (H *acento*); L *accentus*. Ps-pf *a(d)-*. Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*.

Orig. "melodio akompananta la paroladon", el L *ad* "al" k *cantus* "kanto" (vd. *kanti*). La vorto estas paŭsaĵo de Gr *prosôdía*, vd. *prozodio*.

AKCEPT/I (f; RE): A *accept*, F *-er*, G *akzeptieren*, I *accettare*, Po *akceptowac'*, (H *aceptar*). Ps-pf *a(d)-*. Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. – Semantike, *akcepti* kombinas la sencojn de F *accepter* kaj *recevoir* ("akcepti [gastojn] ktp"); eble temas pri influo de R *prinimat'* (tiel Back 1980, 272; vd. ankaŭ Waringhien LV 81). ¶ Io *aceptar*, Ie *accept/er*, Ia *-ar*.

El L *acceptare*, orig. "preni al si", el *ad* "al" k *captare* "preni, kapti" (vd. *kapti*). Etimologie identa estas *aĉeti*, kp tiun.

AKCESOR/A (3; Jü): A *access/ory*, F *-oire*, I *-orio*, G *akzessorisch*†, (H *acesorio*). Kp Po

akcesoria "akcesorajoj", R *aksessuar* "akcesorajo". Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-or* 3. ¶ Io *acesora*, IeIa *accessori*.

El L mez. *accessorius*, propr. "krome venanta", de *accedere* "veni aldone" el *ad* "al" k *cedere* "iri, veni" (vd. *cedi*).

AKCI/O (1; RE): F *action*, G *Aktie* [-kts-], I *azione*, Po *akcja*, R *akcija*, (H *acción*). Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *aciono*, IeIa *action*.

La komerca signifo de la vorto estiĝis en Nd *actie* "akcio < pretendo pri posedrajto < apelacio". El L *actio* "apelacio, proceso, (jura) agado", subst. de *agere* "agi" (vd. tiun).

AKCIDENT/O (2; Jü): AF *accident*, I (H) *-e*. Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-ent*.

El L *accid/ens -entis* "(io) okazanta", ptc. prez. de *accidere* "okazi", propr. "fali al [iu], renkonti [iun]" (kp semantike *aventuro, okazo*) el *ad* "al" k *cadere* "fali" (vd. *kazo*).

AKCIPITR/O (f; RE): L *accipi/ter -tris*. Kp A *accipitral* "akcipitreca". Zoologia termino bazita sur L. Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. ¶ Io *acipitro*, Ie *astor* (< L zool. *Astur*, F *autour*, H *azor*); mankas en Ia.

Propr. "rapide-fluganto", kp Gr *ôkypteros*, Sa *âcupatvan-* "rapide fluganta": HE rad. **ak-* (vd. *akra*) resp. **pet-* (vd. *peti*).

AKCIZ/O (1; RE): F *accise* [-z], G *Akzise* [-ze], Po *akcyza*, R *akciz*. Kp A *excise* s.s. Pri Eo *-kc-*, vd. *akceli*. Ps-pf *a(d)-*.

El L mez. *accis(i)a* "feŭda imposto", propr. "detranĉita (parto)", ptc. perf. de L *accidere* "fortranĉi (parton)" el *ad* "al, ĉe" k *caedere* "tranĉi, haki" (vd. *decidi*).

AKIR/I (f; RE): A *acquire*, F *acquérir* [aker-], I *acquistare* (kp *acquirente* "akiranto, aĉetanto"), (H *adquirir*); L *acquirere*. Eo *-k-* (anst. **-kv-*) laŭ F prononco, *-i-* laŭ la plimulto de fontlingvoj. Oni komparu precipe la etimologie paralelan *konkeri* (antaŭe *konkiri* Ka). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *aquirar*, Ie *aquisiter*, Ia *acquirer*.

Orig. "krome havigi (al si)", el L *ad* "al; aldone, krome" k *quaerere* "serĉi, demandi, peti; gajni, havigi al si" (vd. plue *konkeri*).

AKLAM/I (3; Jü): A *ac/claim*, F *-clamer*, I *-clamare*, (H *-lamar*), Po *aklamowac'*. Kp G *Akklamation* "aklamo". Ps-pf *a(d)-*.

El L *acclamare* "alvoki": *ad* "al", *clamare* "laŭte voki" (kp *deklami, proklami*; vd. plue *klara*).

AKN/O (f; RE): I *acne*. Internacia kiel nomo de haŭtmalsano karakterizata per aknoj: L med. *acne*; A *acne*, F (H) *acné*, G *Akne* (> eo *akneo* Wü). Medicina termino, sendube bazita sur L. ¶ Io *akneo* (malsano); vd. plue *pustulo*.

El Gr *akmê* "punkto, pinto" (el HE rad. **ak-*, vd. *akra*); la formon kun *-n-* kaŭzis misskribo de kopiisto.

AKOMPAN/I (f; Un) 1) iri kun [iu] 2) muz.: A *accompany* (1,2), F *accompagner* (1,2), G *akkompagnieren*† (2), I *accompagnare* (1,2), Po *akompaniowac'* (2), R *ak(k)ompanirovat'* (2), (H *acompañar* 1,2). Latinida [n'] redonita per nura *-n-* (tie ĉi eble laŭ modelo de AR) kiel en *bani, bezoni, ĉampano, kalkano, kaŝtano, kompanio, lorno, ponardo* (pri aliaj transskriboj de la sama sono, vd. *cikonio, digna, kastanjeto*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *akompanar*, Ie *acompaniar*, Ia *accompaniar*.

Orig. signifo "kunesti kun", el L *ad* "al; apud" k L vulg. *companio* "kunulo, kamarado", propr. "kunmanĝanto", formita el *cum* "kun" k *panis* "pano" (vd. tiujn). Parte identan etimologion havas *kompanio*, kp tiun.

AKORD/O (1; RE) 1) sameco de sentoj aŭ opinioj, 2) muz.: A *accord* (1), F *accord* (1,2), G *Akkord* (2), I *accordo* (1,2), Po *akord* (2), R *ak(k)ord* (2), (H *acuerdo* 1, *acorde* 2). Ps-pf *a(d)-*.

Der. de la responda verbo F *accord/er*, I *-are*, H *acordar* "akordi; agordi", kunfandiĝo der du verboj en L vulg.: 1) **accordare* "akordi" el L *ad* "al; apud" kaj *cor/cordis* "koro" (vd. tiun; analoge formita estas *konkordi*); 2) **acchordare* "agordi" el *ad* "al"

k *chorda* "kordo" (vd.tiun). Etimologie identa: *agordi.*

AKR/A (f; Un): L *acer* (radiko *acr-*). Kp A *acrid*, F *âcre*, *aigre*, I(H) *acre* "maldolĉa, pika" (pri voĉoj, gustoj, odoroj ktp, ne pri konkretaj objektoj). La semantiko de Eo *akra* baziĝas ekskluzive sur L. ¶ 1894 *akut-*. ¶ Io *akra*, Ie *acri*, Ia *acre* "maldolĉa, pika"; Io *akuta*, Ie *acut*, Ia *-e* "tranĉa, pika". Kp *akuta.*

El HE rad. **ak-/ok-* "akra": Sa *ácri-* "angulo; tranĉrando"; Gr *akê* "pinto" (vd. *akacio*), *akmê* "punkto, pinto" (vd. *akno*), *ákros* "plej alta, surpinta" (vd. *akrobato*, ev. *akrido*), *oxys* "acida" (vd. *oksigeno, oksikoko, paroksismo*); L *acetum* "vinagro", *acidus* "acida" (vd. tiun), *acies* "akraĵo, tranĉrando" (vd. *agaci*), *acuere* "akrigi" (vd. *akuta*), ev. *acer* "acero" (vd. tiun); A *ear* "spiko", *edge* "tranĉrando" (>eo *eĝo*Wü); G *Ähre* "spiko", *Ecke* "angulo", *Egge* "tranĉrando"; Po *ostry*, R *ostryj* "akra". – HE **oku-* "rapida" (< "akramova"): Sa *âcú-*, Gr *ôkys* "rapida" (vd. *akcipitro*). Kp ank. *ok.*

AKRID/O (f; RE): L zool. *Acridium*; F *acridien.* Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =; mankas en IeIa, kiuj ŝajnas kontentiĝi per *locust/e* resp. *-a* (kp eo *lokusto* PV).

Formita en L mod. el Gr *akr/ís -ídos* s.s., eble propr. "kiu iras piedpinte", de *ákros* "surpinta" (vd. *akra*); kp sekv.

AKROBAT/O (2; Jü): A *acrobat*, F *-e*, I *-a*, R *akrobat*, Po *-a*, (H *acróbata*).

El Gr *akrobátês* "iranta piedpinte" el *ákros* "surpinta" (vd. *akra*) k *-batês*, agantnomo de *baínein* "iri" (vd. *bazo*).

AKS/O (f; RE) 1) mek., 2) geom.: A *axle* (1), *axis* (2), F *essieu* (1), *axe* (2), G *Achse* [-ks-] (1,2), I *asse* (1,2), (H *eje* 1,2); L *axis* (1). ¶ Io *axo*, IeIa *axe.*

El HE **aks-* kun diversaj sufiksoj: Sa *ákŝa-*, Gr *áxôn*, PoR *os'* "akso". Orig. "turnpunkto" el rad. **ag-* "peli, movi" (vd. *agi*). Samfamilia radiko: *akselo.*

AKSEL/O (4; Jü): G *Achselhöhle* [ks] (*Achsel* "ŝultro", *Höhle* "kavaĵo"); F *aisselle* (kp *axillaire* "aksela"), I *ascella*, (H *axila*); L *axilla.* Malgraŭ la iom diversa vortstrukturo oni povas rigardi la germanan kaj la latindevenan vortojn kiel komunan bazon de la Ea radiko. Z preferis *-e-* (GFI) al *-i-*, supozeble por eviti similecon al la suf. *-il* (**aks-il-o*!).

Bazo etimologie identa al *akso* kaj do orig. signifanta 2 "turnpunkto (de la brako)": L *axilla* dim. de *axis* "akso".

AKSIOM/O (1; RE): A *axiom*, F *-e*, (H *-a*), G *Axiom*, I *assioma*, Po *aksjomat*, R *aksioma.* Ps-sf *-m(at).*

El Gr *aksíôma* s.s., orig. "opinio pri ĝusto, konsidero, taksado", de *aksioún* "taksi", der. de *áxios* "valora, inda", orig. "peza", de *ágein* "pezi" (identa kun *ágein* "peli", se orig. "ekmovi pesilon", kp ev. *agi*).

AKT/O (1; RE) 1) teat., 2) dokumento: A *act* (1,2), F *-e* (1,2), G *Akt* (1), *Akte* (2), I *atto* (1,2), PoR *akt* (1,2), (H *acto* 1, *acta* 2).

El L *actus* "ago" resp. *acta* "protokolo" (propr. "faritaĵoj"), ambaŭ de *agere* "agi, fari" (vd. *agi*).

AKTIV/A (f',1; Be): A *act/ive*, F *-if*, (H *-ivo*), G *aktiv*, R *-nyj*, I *attivo*, Po *aktywny.* Ps-sf *-iv.*

El L *activus* "aganta" de *agere* "agi" (vd. tiun).

AKTOR/O (1; RE): A(H) *act/or*, F *-eur*, G *Akteur*†, I *attore*, Po *akt/or*, R *-ër*; L *actor.* Ps-sf *-or* 1.

Orig. "aganto", agantnomo de *agere* "agi" (vd. tiun).

AKTUAL/A (4; ER): F *actuel* (kp *actualité* "aktual/eco, -aĵo"), G *aktuell* (kp *Aktualität* "aktualeco"), I *attuale*, Po *aktualny*, R *aktual'nyj*, (H *actual*). Ps-sf *-al.*

Orig. "reala, vera" (tiel A *actual*; la signifo "nun ekzistanta" estas neprimara), de L postkl. *actualis* de L *actus* "ago" (vd. *akto*).

AKURAT/A (1; Ald, RE): Po *akuratny*, R *akkuratnyj.* Rimarkinda akcepto de latinida vorto kun slava semantiko (kp A *accurate* "ekzakta, preciza", I *accurato* "zorg(em)a, diligenta", G *akkurat* "pre-

ciza") sen ekzaktaj paraleloj. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io = (espismo); Ie *punctual* (< A *punctual*, F *ponctuel*), *acurat*, Ia *punctual*.

El *accuratus* "zorga, ekzakta", ptc. perf. de *accurare* "zorge fari, prizorgi" el *ad* "al" k *curare* "prizorgi", de *cura* "zorgo" (vd. *kuraci*).

AKUŜ/I (f; RE): F *accoucher* [akuŝé]. Kp A *accouchement*† "akuŝo", Po *akuszerka* [-ŝ-] "-istino", R *akuŝerka* s.s. ¶ 1894 *obstetr-* (< L *obstetrix* "akuŝistino"). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *akushar* "akuŝigi", Ie *acuchar* s.s.; Ia *delivrar* s.s. (< A *deliver*).

Orig. "kuŝ(iĝ)i", el F "al" (tie ĉi komenca pref.) k *coucher* "kuŝi" (vd. tiun).

AKUT/A (2; Jü) 1) geom., 2) med., 3) fon.: A *acut/e* (1, 2, 3), I *-o* (1, 2, 3; ank. "pinta"), F *aigu* (1,2,3; ank. "akra, pinta"), kp *acutesse* "akuteco", G *akut* (2), (H *agudo* 1, 2, 3; ank. "akra, pinta"). ¶ Pri IoIeIa, vd. *akra*.

El L *acutus* "akra", ptc. perf. de *acuere* "akrigi" (vd. sub *akra*).

AKUZ/I (3; Ka; antaŭe *kulp/igi* RE): A *accus/e* [-z], F *-er* [-z-], I *-are* [-z-], (H *acusar*); L *accusare*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "fari proceson al (iu)", el L *ad* "al" k *causa* "proceso", orig. "kaŭzo" (vd. tiun). Kp sekv.

AKUZATIV/O (f; Du, RE): A *accusat/ive* [-z-], F *-if* [-z-], I *-ivo* [-z-], G *Akkusativ*, (H *acusativo*); L *accusativus (casus)*. Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-iv-*. ¶ 1894 *akusativ-*.

Orig. "akuza (kazo)", de L *accusare* "akuzi" (vd. tiun). La termino tamen envere estas mistraduko de Gr *aitiatikê* "kaŭza (kazo)".

AKV/O (f; Un): L *aqua*; I *acqua*, (H *agua*, Pg *água*). Kp A *aquat/ic*, F *-ique* "akva". Apogata de internaciaj derivaĵoj, ekz. *akvario* (kp tiun). L *qu* normale reprezentiĝas per *kv* en Eo (kelkaj ekzemploj: *antikva, ekvatoro, elokventa, inkvizicio, konsekvenco, likvoro, oblikva, skvamo*; ank. multaj radikoj komenciĝantaj per *kv-*). ¶ Io *aquo*, IeIa *aqua*.

Latinida vorto (kp ank. F *eau* s.s.), el HE **akŭa*, kp Gt *ahwa* "rivero, akvo". Samfamiliaj radikoj en Eo: *akva/forto, -relo, -rio, akvilegio*.

AKVAFORT/O (4; Jü): F *eau-forte* (kp *aquafortiste* "akvafortisto"), Po *akwaforta*, R *ofort*, (H *aguafuerte*, kp *acuafortista* "akvafortisto"). Kp A *aquafortis*, I *acquaforte* "fortakvo, nitrata acido". La Eo-formo de la du komponantoj (*akv-, fort-*) ankaŭ konsistigas la plej internacian formon de tiu ĉi termino. ¶ Io *aquafort/o* "fortakvo", *-ajo* "akvaforto"; Ie *aquaforte* "fortakvo"; Ia *aqua forte* "fortakvo; akvaforto".

Propr. "forta akvo", vd. tiujn vortojn.

AKVAREL/O (1; Jü): AF *aquarelle*, G *Aquarell* [-kv-], I *acquerella*, Po *akwarela*, R *akvarel'*, (H *acuarela*). Pri *-kv-*, vd. *akvo*.

Orig. "akvofarbo", der. de I *acqua* "akvo", vd. tiun.

AKVARI/O (1; Jü): AF *aquarium*, G *Aquarium* [-kv-], I *acquario*, Po *akwarium*, R *akvarij*, (H *acuario*). Pri *-kv-*, vd. *akvo*. Ps-sf *-ari*.

El L *aquarium* "akvujo" de *aqua* "akvo" (vd. tiun).

AKVILEGI/O (2; Jü): L mez., bot. *aquilegia*; F *ancolie*, G *Akelei*, I *aquilegia*, (H *aguileña*). Botanika termino bazita sur L. ¶ Io *aquilegi/o*, IeIa *-a*.

Propr. "akvokolektanto", el L *aqua* "akvo" k *legere* "kolekti" (la floro havas urnoformajn kavetojn). Vd. *akvo* resp. *legi* (kp *kolekti*).

AL (f; Un): Estas klare, ke la etimologio de Eo *al* iel estas ligita al la samsignifa latin(id)a prepozicio: L *ad*; F *à*, I(HPg) *a*, sed ties ekzakta rilato al la Ea formo restas necerta. Oni povas konstati, ke nek **a* nek **ad* estus ebla laŭ la principoj de Z en 1887: **a* pro la adjektiva finaĵo *-a*, **ad* pro la sufikso *-ad-* (Modrijan 44). Cetere *al* prezentas la avantaĝon, ke ĝi "plej facile ligiĝas kun la aliaj konsonantoj" (Waringhien LV 62), ekz. *albordiĝi, alceli, aldoni, alfiksi, alglui,*

alkroĉi, alligi, almeti, alparoli, altiri, alveni; **ad* kaŭzus asimilajn problemojn, kaj **a* estigus koliziojn kun la (tre ofta) pseŭdoprefikso *a(d)-*. Pri la formo *al* du hipotezoj estas starigitaj: 1) Ĝi fontas en la formo asimilita *al-*, trovebla en L kaj latinidaj lingvoj, sed nur en kunmetoj antaŭ sekva *l*: L *adlicere* aŭ *allicere* "allogi"; F *allouer* "asigni", I *allogare* "lui" (< L **adlocare*). Kp krome I(H) *al* "al la", imitita de Z en pEo 1881: *a* "al", *al* "al la". 2) Ĝi estas transprenita el Vp *al* s.s. (Jespersen 1928 36, Golden 1979a) . Laŭ mia opinio oni ne povas reserĉi la etimologion de *al* sen konsidero de ĝia kvazaŭa antonimo *el*, kiu havas same oportunigitan formon. Nu, por *el* volapuka etimo estas ekster diskuto (Eo *el* = Vp *se*). Cetere, ĉar pEo 1881 jam montras influon de Vp (Waringhien LV 47) sed tamen havas la latinidan formon de la prepozicio (*ad*), ŝajnas prudente rigardi *al* kiel poste faritan modifon de tiu formo. ¶ IoIe *a(d)*, Ia *a*.

L *ad* "al; apud; aldone" el HE **ad*, kp A *at* "ĉe". Identa kun la ps-pf *a(d)-*, kp tiun.

ALABASTR/O (1; RE): APo *alabaster*, I(H) *-ro*, F *albâtre*, G *Alabaster*, R *alebastr*.

El Gr *alábastr/os, -on* "ungventujo el alabastro", de negreka (egipta?) origino.

ALARM/O (1; Jü): APo *alarm*, F *-e*, (H *-a*), G *Alarm*, I *allarme*. Ps-pf *a(d)-*.

El I esprimo *all'arme* "al la armiloj!"; vd. *al* resp. *armi*.

ALAŬD/O (f; RE): L *alauda*; F *alouette*, I *allodola*, (H *alondra*). Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io *alaud/o*, Ie *-e*, Ia *aloda*.

Latin(id)a vorto (la FI formoj estas diminutivoj) de gaŭla origino.

ALBAN/O (8; Jü): A *Alban/ian*, F *-ais*, G *-er, -ese*, I *alban/ese*, R *-ec*, (H *-és*), Po *Alban'czyk*.

Orig. nomo de antikvepoka gento (Gr *Albanoí*) proksime de Durrês; etimologio necerta.

ALBIN/O (4; Wü; *albinos/o* Jü): AI(H) *albino*, FPoR *-s*, G *Albino*. Ps-sf *-in* 1.

El Pg *albino*, de L *albus* "blanka" (vd. sekv.).

ALBUM/O (1; RE): AFIPo *album*, G *Album*, R *al'bom*, (H *álbum*). Pri *-um*, kp *forumo*.

El L *album* "blanka afiŝtabulo", propr. "blankaĵo", de *albus* "blanka". Kp L *albumen* "blankaĵo de ovo" (> eo *albumino* Ka); R *lebed'* "cigno"; G *Elbe* (rivernomo); prafonto HE **albho-* "blanka". Samfamilia radiko en Eo: *albino*.

ALCION/O (f; RE): A *halcyon* [-i-], F *alcyon* [-i-], I *alcione*, (H *alción*); L *alcyon*. Scienca sinonimo L *alcedo* (> eo *alcedo* Wü). ¶ Io *alcedo*, Ie *alcion*; mankas en Ia.

El Gr *(h)alkyôn* s.s. (*h-* pro asociiĝo kun Gr *hals* "maro").

ALD/O (2; RE): AF *alto*, G *Alt*, Po *alt*, R *al't*; I(H) *contralto*. Konsonantŝanĝo *t* > *d* en Eo por diferencigi la radikon disde *alt-*; analoga ŝanĝo en *bufedo, bukedo, cendo, cigaredo, klopodi, krado, lado, lodo, pikedo, plado, plando, planedo, pordo, sterledo, tendo* (vd. la unuopajn vortojn). ¶ Io *alto-voco*, IeIa *alto*.

Itala muzika termino, el L *altus* "alta" (kp *vox alta* "alta voĉo"), vd. tiun. Pri la HI kunmeto, vd. *kontralto*.

ALE/O (1; Du, RE): F *allée*, G *Allee*, Po *aleja*, R *alleja*. ¶ Io =, Ie *allé*, Ia *allée*.

Propr. "pasejo, irejo", de F *aller* "iri" (kiu, malgraŭ multegaj hipotezoj, restas etimologie neklara).

ALEGORI/O (1; RE): A *all/egory*, F *-égorie*, I *-egoria*, R *-egorija*, G *Allegorie*, Po *alegoria*, (H *alegoría*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *allêgoría* s.s., propr. "parolo komprenenda alimaniere ol ĝi estas dirata", el *állos* "alia" (vd. tiun) k *agoreúein* "paroli (publike)" de *agorá* "(kunven)placo, kunveno", subst. de *ageírein* "kolekti, kunvenigi". Samfamilia radiko: *kategorio*. Vd. ank. *grego*.

ALEN/O (4; Jü): F *alêne*, G *Ahle*, (H *alesna, lezna*). Formo bazita sur F; eble kontribuis la parte samsona G vorto. ¶ Io =, Ie *alen*; Ia *subula* (< L).

La latinidaj formoj (ank. I *lesina*) el

ĝermana lingvo (praformo **alisna*; el samradika pĜ **êlô* devenas A *awl*, G *Ahle*). Kp Sa *ârâ* s.s. (HE **êlâ*).

ALFABET/O (f', 1; N-ro 15 1888, RE): AF *alphabet*, G *Alphabet*, I(H) *alfa/beto*, Po *-bet*, R *-vit*.

Pere de L postkl. *alphabetum* el Gr *alphábêtos* s.s., formita el la nomoj de la du unuaj literoj de la greka aboco: *álpha* kaj *bêta*, transprenitaj (kune kun la literoj) el fenicaj nomoj respondaj al He *'alef* (kp *'elef* "bovo": la litero orig. havis formon de bova kapo) resp. *bejt* (kp *bajit* "domo").

ALG/O (2; Jü): AIPoL(H) *alga*, F *algue* [-g], G *Alge*.

L vorto, eble parenca al la vortoj cititaj sub *velki*.

ALGEBR/O (1; RE): AIPoR *algebra*, F *algèbre*, G *Algebra*, (H *álgebra*).

Pere de L mez. *algebra* el Ar *al-ĝebr* "rekunigo, restaŭro": *al* dif. art. (ank. en *Alĝerio, alĥemio, alkoholo, alkovo, artiŝoko*; kp *admiralo*); *ĝebr* subst. de *ĝabara* "restaŭri". La plena Ar termino por algebra kalkulado estis *ilm al-ĝebr wa'lmuqabalah* "scienco de restaŭro kaj komparo".

ALĜERI/O (8; Jü): AI *Algeria* [-ĝ-], F *Algérie* [-ĵ-], G *Algerien*, Po *Algier(ia)*, R *Alĵir* (H *Argelia* [-ĥ-]). Eo *-ĝ-* respegulas la molan prononcon en la plimulto de fontlingvoj. Ps-sf *-i* 3. ¶ Io *Aljeria*, IeIa *Algeria*.

El Ar *Al-Ĝazâ'ir* s.s., propr. "la insuloj": *al* dif. art. (vd. *algebro*), *ĝazîra* "insulo" (la ĉefurbo Alĝero estis fondita sur insuloj).

ALĤEMI/O (2; RE; *alkemio* 8): A *alchemy* [-k-], F *alchimie* [-ŝ-], G *Alchimie* [-c'-], I *alchimia* [-k-], Po *alchemia* [-ĥ-], R *alĥimija*, (H *alquimia* [-k-]. Formo sendube laŭ *ĥemio*, kp. tiun.

El Ar *al-kîmîâ*, propr. "la ĥemio": *al* dif. art. (vd. *algebro*), *kîmîâ* (< Gr) "ĥemio" (vd. tiun).

ALI/A (f; Un): L *alius*. Du L adverboj, en kiuj la radiko enestas, atingis internaciecon: *alibi* "aliloke" (vd. *alibio*) kaj *alias* "alinome". ¶ 1881 *alia*. ¶ Io *altr/a*, Ie *-i*, Ia *altere* (< L *alter*, vd. sube).

El HE **alio-* s.s. (formita el adv. **ali* "tie, transe", el rad. **al-* "tiu", vd. *la*), kp Gr *állos* s.s. (en *alegorio, paralela*), A *else* "alie". Samradika formaĵo L *alter* "la alia (el du)" (kp *altern/i, -ativo*) > F *autre*, I *altro*, H *otro* "alia"; der. L *alterare* "aliigi, ŝanĝi" (vd. sub *adulto*).

ALIBI/O (2; Jü): AFIPoR(H) *alibi*, G *Alibi*.

Orig. L adv., propr. "(foresto) en alia loko", el L *ali-* "alia" (vd. tiun) k *ibi* "tie" (kp Sa *iha* "tie ĉi"; HE **idha*).

ALIGATOR/O (1; Jü): AFR *alligator*, I *-e*, G *Alligator*, Po(H) *aligator*.

Orig. (angla) kripligo de H *el lagarto (de Indias)* "la lacerto (de [Okcidenta] Hindujo)"; vd. *la* resp. *lacerto*.

ALINE/O (2; Jü): F *alinéa*, I *alinea*, Po *a linea*. Ps-pf *ab-*. ¶ Io =, Ie *alinea*; Ia *alinea**.

El L *a linea* "de (nova) linio": *a* var. de *ab* "de", *linea* "linio" (vd. tiun).

ALK/O (f; RE): L *alces*; I(H) *alce*. Kp A *elk*, G *Elch* [-k] s.s. (La radikformo krome koincidas kun Gr *álkê* s.s.) Bazita sur L klasika prononco [alk-] aŭ (malpli probable) miksita el L kaj A. ¶ Io =, Ie *alco* [-k-], Ia *alce*.

Ĝermana vorto (praformo **alkhi-*) el HE **elk-/olk-*, kp RPo *los* "alko", Sa *rcya-* "virantilopo".

ALKOHOL/O (1; RE): A(H) *alco/hol*, FI *-ol*, G *Alkohol*, Po *alko/hol*, R *-gol'*.

Pere de L mez. *alcohol (vini)* s.s., pli frue "la plej subtila parto de io" < "subtila pulvoro", el Ar *al-kuĥl*: *al* dif. art. (vd. *algebro*), *kuĥl* "okulŝminka pulvoro, kolirio".

ALKOV/O (1; RE): A *al/cove*, F *-côve*, I *-cova*, (H *-coba*), G *Alkoven*, Po *alkowa*, R *al'kov*.

El Ar *al-qubba*: *al* dif. art. (vd. *algebro*), *qubba* "(kamero kun) volbo" de *qabba* "dehaki".

ALMANAK/O (1; RE): A *alman/ac*, F *-ach* [-k], I *-acco*, Po *-ach*, (H *-aque*), G *Almanach*, R *al'manaĥ*.

Pere de L mez. *almanach(us)* el Gr (4a jc

p.Kr.) *almenikhiaká* "egipta kalendaro". Negreka vorto; Ar origino ofte supozata, sed ne pruvita.

ALMENAŬ (f; Un): F *au moins*, I *almeno*, (H *al menos*). Bazita sur I same kiel pluraj aliaj aŭ-adverboj (*ankaŭ, ankoraŭ, apenaŭ*). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1882 *pas'* (sen etimologio, vd. PVZ 5, 143; 1894 *almenu.* ¶ Io *adminime* ("je minimumo"), Ie *admínim*; Ia *al minus.*

Orig. "je malplej, minimume", kombino de la prep. F *à*, IH *a* (vd. *al*) k F *le moins*, I *il meno*, H *lo menos* "malplej" (dif. art. plus vorto signifanta "malpli", vd. *la* resp. *minus*).

ALMOZ/O (f; RE): A *alms* [-z], F *aumône*, G *Almosen* [-z-], I *(e)lemosina* [-z-], Po *jal'muz'na*, (H *limosna* [-z-]). (Kp ank. Sv *allmosa.*) Bazita sur G. ¶ 1894 *almos-.* ¶ Io *almono*, Ie *almosn/e*, Ia *-a.*

El Gr *eleêmosynê* s.s., orig. "kompato, bonfaremo", de *eleêmôn* "kompatema" de *eleeín* "kompati" (kp *kyrie eleison* "Sinjoro, kompatu!").

ALN/O (f; RE): L *alnus*; F *aune.* Botanika termino bazita sur L. ¶ IoIa =, I *alne.* Kp ank. I *ontano* s.s. < L vulg. **alnetanus.*

HE bazo **el-*, kp. (s.s.) A *alder*, G *Erle*, Po *olcha*, R *ol'ha.* Kp ev. *ulmo.*

ALO/O (4; RE): AIR(H)L *aloe*, F *aloès*, G *Aloe*, Po *aloes.* La hiato *-o/o* troviĝas ankaŭ en *heroo, karoo.* Por tiu ĉi termino, **al/o* estus nesufiĉe karakteriza (kp cetere Eo *al*, eo *al/o* Wü), kaj **aloe/o* estus neoportuna pro tri sinsekvaj vokaloj. ¶ Io =, Ie *aloé*; mankas en Ia.

El Gr *alóê* s.s., probable de orienta origino, kp He *'ahâlîm* "aloaj arboj".

ALT/A (f; Un): L *altus*; I(H) *alto*, F *haut.* Kp AF *altitude*, F *altesse* "alteco". ¶ 1882 *hota* (< F). ¶ Io =, Ie *alt*, Ia *-e.*

Orig. "kreskinta"; kp L *alere* "nutri", *adolescere* "elkreski" (> eo *adoleski*), *proles* "idaro" (vd. *proletario*). HE rad. **al-* "kresk(ig)i", kp ank. A *old*, G *alt* "maljuna" (orig. "plenkreskinta"). Etimologie identa kun *aldo*, kp tiun.

ALTAR/O (f; Un): A(H) *altar*, I *-e*, F *autel*, G *Altar*, Po *oltarz*, R *altar'*; L *altare.*

Orig. kredeble "loko por bruligi oferaĵojn", kp Sa *alâtam* "brulaĵo, karbo" (HE rad. **al-* "bruli").

ALTE/O (f; EG): L *althaea*, I(H) *altea.* Botanika termino bazita ĉefe sur L.

El Gr *althaía* s.s., propr. "kuraca (planto)", kp *althaínein* "kuraci" (parenceco al la vortoj cititaj sub *alta* estas supozata).

ALTERN/I (f; RE): A *altern/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-arsi*, Po *-owac'*, (H *-ar*); L *alternare.*

Der. de L *alternus* "alterna, sekvanta unu la alian" de *alter* "unu aŭ la alia" (vd. *alia*); pri *-ter-*, vd. sub *neŭtra.* Kp sekv.

ALTERNATIV/O (2; Jü): AF *alternat/ive*, I(H) *-iva*, Po *-ywa*, G *Alternative.* Ps-sf *-iv.*

Orig. adj. de la verbo citita sub *alterni*, vd. tiun kaj kp *alia.*

ALUD/I (f; RE): A *allud/e*, I *-ere*, (H *-ir*); L *alludere.* Kp F *allusion*, Po *aluzja* "aludo". Ps-pf *a(d)-.*

Orig. "(vort)ludi je (io)", el L *ad* "al, je" k *ludere* "ludi" (vd. tiun). Rilate la semantikon, kp G *anspielen* s.s. el *an* "ĉe" k *spielen* "ludi".

ALUMET/O (f; Un): F *allumette.* Internacia vorto mankas; Z eble elektis F pro la oportuna asociiĝo kun la nocio "lumo". Rimarku radikfinon *et*: ĉar **alum-* ne ekzistas, konfuzo kun diminutivo ne estas imagebla (kontraste kp *cigaredo* Un). Ps-pf *a(d)-.* ¶ 1906 *alumo.* ¶ Io =, Ie *inflammette* (konstruita vorto), Ia *flammifero* (< I *fiammifero*).

Der. de F *allumer* "ekbruligi, eklumigi", el L vulg. **alluminare* de L *ad* "al" k *luminare* "lumigi" de *lumen* "lumo" (vd. tiun).

ALUMINI/O (4; Jü): AFPo *alumin/ium*, (H *-io*), G *Aluminium*, I *alluminio*, R *aljuminij.* Ps-sf *-i* 2.

Konstruita (en A, komence de 19a jc) el L *alu/men -minis* "aluno" (vd. tiun).

ALUN/O (f; RE): A *alum*, F *alun*, G

Alaun, (H *alumbre*), I *allume*, Po *al'un*. Eo *-n-* videble laŭ FPo; **alum-* estus neoportuna pro la ekzisto de *alumeto*. ¶ Io =, Ie *alun*; mankas en Ia.

El L *alu/men -minis* s.s., par. al A *ale* "(speco de) biero". Samfamilia radiko en Eo: *aluminio*.

AM/I (f; Un): L *amare*, F *aimer* (kp *amant* "amanto"), I *amare*, (H *amar*). Kp A *amorous* "amema", *enamoured* "enamiĝinta", R *amur* "amafero"; ank. la internacie konatan nomon de la amodio, L *Amor* (vd. *Amoro*). ¶ Io *amar* (ĝenerale), *amorar* (sekse), IeIa *amar*. Samfamiliaj vortoj en Eo: *amatoro, amoro, amiko*.

Der. de infanlingva **ama* "patrino" (kp ekz. G *Amme* "nutristino").

AMAR/A (4; ER; antaŭe *mal/dolĉ/a*): L *amarus*; F *amer*, I *amaro*, (H *amargo*). ¶ Io *bitra* (< AG *bitter*); Ie *amari*, Ia *amar* (tamen kun semantiko malpli vasta ol la Ea vorto).

El HE **amro-*, kp Sa *amlá-* "acida".

AMAS/O (f; Un): F *amas*, I *ammasso*. Kp A *amass* "amasigi". ¶ Io =, Ie *amasse*, Ia *cumulo* (< L *cumulus*), *massa*.

Der. de F *amasser*, I *ammassare* "amasigi" el resp. F *à*, I *a* "al" k F *masse*, I *massa* "maso" (vd. tiun).

AMATOR/O (8; ER): AF *amat/eur*, I *-ore*, Po *-or*. Ps-sf *-or* 1.

El L *amator* "amanto, ŝatanto", agantnomo de *amare* "ami" (vd. tiun). Kp semantike G *Liebhaber* "amatoro", propr. "amanto".

AMBASAD/O (8; Wü; antaŭe *ambasador/ejo*): A *embassy*, F *amba/ssade*, I *-sciata*, Po *-sada*, (H *embajada*). Diplomatia termino bazita sur F. Ps-sf *-ad*. – Personnomo: **AMBASADOR/O** (1; Jü): A *amba/ssador*, F *-ssadeur*, I *-sciatore*, Po *-sador*, (H *embajador*). La ps-sf *-or* 1 alprenis la en Eo kutiman formon, cetere laŭ la plimulto de fontlingvoj. ¶ Io *ambasad/o, -isto*; Ie *ambassad/e, -or*; Ia *ambassat/a, -or*.

El Oc *ambais(s)ad/a, -or*, der. de L mez. *ambactia* "ofico, servo" de *ambactus* "servisto", vorto de gaŭla orig., propr. "dissendito", el *amb-* "ĉirkaŭ" (vd. *ambicio*) k **aktos*, ptc. perf. de *ag-* "peli" (vd. *agi*).

AMBAŬ (f; RE): L *ambo*; (H *ambos*). Kp I *ambedue*† s.s. (*due* "du"). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1882 *baj* (< G *beide*); 1894 *ambi*; 1906b *amboy*. ¶ Io *la du, omna du*, Ie *ambi*, Ia *ambe*.

El HE **ambhoŭ* "ambaŭ": kp Sa *ubháu*, Gr *amphô*, PoR *oba* s.s. La unua elemento de la HE vorto estas identa kun **ambhi* "ĉirkaŭ, ambaŭflanke" (vd. *ambicio*); rilate la duan (**bho*), kp A *both*, G *beide* "ambaŭ".

AMBICI/O (1; Jü): AF *ambi/tion*, I *-zione*, Po *-cja*, R *-cija*, (H *-ción*), G *Ambition*. Ps-sf *-cio*.

El L *ambitio* "ambicio, aspiro je populareco, gloramo", propr. "ĉirkaŭirado (por varbi voĉojn)", de *ambire* "ĉirkaŭiri": *am(b)-* "ĉirkaŭ" k *ire* "iri" (vd. tiun). – L *am(b)-* (ank. en *ambulanco, amplekso*, kp *ambasad/o, -oro*) el HE **ambhi* "ĉirkaŭ, ambaŭflanke (de)", kp Gr *amphí* "ĉirkaŭ" (vd. *amfi/bio, -teatro, amforo*), G *um* s.s. Kp spec. *ambaŭ*.

AMBOS/O (f; RE): G *Amboss*. Kp Da *ambolt*. Bazita sur G sole, sed Z hezitis inter tiu kaj la L ekvivalento: 1894 *inkud-* (< L *in/cus -cudis*). ¶ Io =; IeIa *incude*.

Orig. "tio, al kio oni batas", el G ant. *ana* (G *an*) "sur, ĉe" k *bozzan* "bati" (kp A *beat*), praparenca al L *fustis* "bastono" (vd. *afusto*).

AMBR/O (1; Jü): A *ambergris* (*-gris* "griza"), F *ambr/e*, IPoR *-a*, G *Ambra*, (H *ámbar*).

El Ar *'anbar* s.s.

AMBROZI/O (1; RE): AI *ambro/sia*, F *-isie*, Po *-zja*, R *-zija*, (H *-sía*), G *Ambrosia*. Eo *-z-* laŭ la prononco en la plimulto de fontlingvoj (AFIPoR). Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *ambrosía* s.s., propr. "senmorteco", de *ambrósios* "senmortula, dieca" el *a-* "ne-, sen-" k *brotós* "mortulo, mortonta homo" (< *mr-*, vd. *morti*).

AMBULANC/O (1;Jü): AF *ambul/ance*, I *-anza*, Po *-ans*, (H *-ancia*), G *Ambulanz*. Ps-sf *-anc*.

Der. de F *ambulant* "migranta" (*hôpital ambulant* "ambulancmalsanulejo") el L *ambul/ans -antis*, part. prez. de *ambulare* "promeni, vagi" (unua elemento *amb-* "ĉirkaŭ", vd. *ambicio*; por la dua, kp Gr *aláomai* "vagas").

AMEL/O (f; RE): L *amylum*; F *amidon*, I *amido*, (H *almidón*). Bazita sur la L formo, internacie konata per la ĥemia termino A *amyl*, F *-e*, G *Amyl* (> eo *amilo* Wü). Normale, al L-Gr *y* respondas Eo *i*; alie en tiu ĉi radiko, eble por eviti eventualan konfuzon kun *am-il-o*. Ekzakta paralelo mankas; pri kelkaj kazoj, kie *-il-* estas redonata per *-el-*, vd. *fringelo*. Ps-pf *a(n)-*. ¶ 1894 *amid-*. ¶ Io *amilo*, Ie *amidon*, Ia *amido*.

El Gr *ámylon* s.s., propr. "ne muelita", el *a-* "ne-" (vd. la ps-pf) k *mylê* "muelilo" (vd. *mueli*).

AMERIK/O (8; PR, Be): AI *America*, F *Amérique*, GR *Amerika*, Po *Ameryka*, (H *América*).

El L (1507) *terra America* "la lando de Amerigo", laŭ la nomo de florencano Amerigo Vespucci (pro liaj malkovroj de novaj teritorioj ĉ. 1500). La nomo *Amerigo* estas de ĝermana origino; ĝia dua elemento estas *rik* "reganto".

AMETIST/O (2; Jü): A *amet/hyst*, I(H) *-ista*, Po *-yst*, R *-ist*, F *améthyste*, G *Amethyst*. Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *améthystos* s.s., propr. "malebri(ig)a" (la ŝtono havas la violecan koloron de ruĝa vino tiel miksita kun akvo, ke ĝi ne povas ebriigi), el *a-* "ne-" (vd. la ps-pf) k *methyein* "esti ebria" de *méthy* "vino". Kp Sa *mádhu* "miel(trinkaĵ)o"; A *mead*, G *Met* "mielbiero"; R *mëd* "mielo" (HE **medhu*). Kp ank. Fi *mete* "mielo".

AMFIBI/O (f; RE): A *amphib/ian*, F *-ie*, Po *-ia*, R *-ija*, G *Amphibie*, I(H) *anfibio*; L zool. *Amphibia* (plur.).

El Gr *amphíbios* "vivanta surtere kaj enakve", propr. "ambaŭloke vivanta", de *amphí* "ambaŭflanke (de), ĉirkaŭ" (vd. *ambicio*; kp *amfiteatro, amforo*) k *bíos* "vivo" (vd. *vivi*; kp *bio/grafio, -logio*).

AMFITEATR/O (2; RE): A *amphi/theatre*, F *-théatre*, G *Amphitheater*, I(H) *anfiteatro*, PoR *amfiteatr*; L *amphitheatrum*.

El Gr *amphithéatron* s.s., propr. "ĉirkaŭteatro" (t.e. teatro kun sidlokoj ĉirkaŭ la areno): *amphí* "ĉirkaŭ" k *théatron* (vd. *amfibio* resp. *teatro*).

AMFOR/O (1; Jü): L *amphora*; A *amphor/a*, F *-e*, G *Amphora*, I *anfora*, PoR *amfora*, (H *ánfora*).

El Gr *amphoréus* s.s., pli frue *amphiphoréus*, propr. "(vazo) portata ĉe ambaŭ flankoj", de *amphí* "ambaŭflanke" (vd. *amfibio*) k *phoréus* "portanto", agantnomo de *phérein* "porti" (kp *fosforo, metaforo*; vd. sub *oferi*). Samfamilia vorto en Eo: *ampolo*.

AMIK/O (f; Un): L *amicus*; F *ami* (kp *amical* "amika"), I *amico*, (H *amigo*). Kp A *amicable* "amikeca". ¶ 1881 *miko*. ¶ Io =, Ie *amíco*, Ia *amico*.

Der. de L *amare* "ami", vd. tiun.

AMNESTI/O (1; RE): A *amn/esty*, F *-istie*, Po *-estia*, R *-istija*, (H *-istía*), G *Amnestie*, I *amnistia, annistia*. La elekton inter *-e-* kaj *-i-* kredeble influis la Gr fontvorto, vd. sube (*-e-*ankaŭ en IoIeIa). Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *amnêstía* s.s., propr. "forgeso (de kulpoj)", de *ámnêstos* "forgesita" el *a-* "ne-" k *mnêsthai* "memori" (vd. sub *menso*).

AMONIAK/O (f; RE): A *ammon/ia* (kp *ammoniacal* "amoniaka"), F *-iac*, I *-iaca*, G *Ammoniak*, Po *amoniak*, R *ammiak*, (H *amoníaco*).

El L *sal Ammoniacum* "salamoniako" (tiel nomita, ĉar ĝi estis produktata en oazo kun templo de la egipta dio *Ammon* "Amono").

AMOR/O (4; N-ro 15 1888,GE): L *Amor* (personigo de *amor* "amo"); F *Amour* (kp *amour* "amo"), G *Amor*, I *Amore* (kp *amore* "amo"), Po *Amor*; R *amur* "amoreto (figuro)". La oficiala radiko signifas

la dion de la amo; eble laŭ senconuancoj kiel A *amour* "amafero", R *amurit'sa* "flirtaĉi, karesaĉi", la vorto en Eo ekuziĝis kun la senco "seksa amo" (PV), distingo ne trovebla en la fontlingvoj. Ŝajnas probable, ke ankaŭ la paro Io *amar/amorar* ludis rolon en tiu evoluo. Ps-sf *-or* 2.

Der. de L *amare* "ami", vd. tiun.

AMORTIZ/I (2; Jü): A *amort/ize*, F *-ir* (kp *amortissement* "amortizo"), G *-isieren*, I *-izzare*, Po *-yzowac'*, R *-izirovat'*, (H *-izar*). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-iz.*

El L mez. *a(d)mortizare*, propr. "mortigi", el L *ad* "al" k *mor/s -tis* "morto" (vd. tiun).

AMPLEKS/O (f; RE): La radikformo montras al L *amplexus* kiel fonto, sed tiu etimo starigas semantikan problemon: la koncerna L vorto signifas nur "ĉirkaŭ/preno, -brako". Eĉ se la sencevoluo "ĉirkaŭpreno > volumena grandeco" ne prezentas malfacilaĵon, ĝi tamen ne okazis en L aŭ en la latinidaj lingvoj (kp ank. I *amplesso* "ĉirkaŭpreno"). Ŝajnas, ke Z iel estis influata de (neparenca) L *amplus* "ampleksa" (kun moderna idaro, kp F *ampleur* "amplekso", H *amplitud* "amplekso, vasteco" k.a.), utiliganta ĝin por doni figuran sencon al *ampleks-*. ¶ Io *ampl/eso*, Ie *ampl/ore*, Ia *ampl/itude* (de resp. adj. *ampl/a, -i, -e* "ampleksa, vasta"). En IeIa ank. *extension*, propr. "etendiĝo".

L *amplexus* subst. de *amplecti*, propr. "ĉirkaŭplekti": *am(b)-* "ĉirkaŭ" (vd. *ambicio*), *plectere* "plekti" (vd. tiun).

AMPOL/O (8; Wü; ne ĉe Z) 1) vitra boteleto 2) elektra lampo: A *ampoule* (1), F *ampoule* (1,2), G *Ampulle* (1), I(H) *ampolla* (1), Po *ampul'ka* (1), R *ampula* (1). Malgraŭ prononco [u] en la plimulto de fontlingvoj (AFGPoR), Eo montras *o*, evidente laŭ la tradicio kiel eble plej eviti radikfinon *ul* (vd. *artikolo*); kiel ofte, I tie ĉi apogas la Ean formon. ¶ Io *ampulo* (1), Ie *ampulle* (1,2), Ia *ampulla* (1,2).

El L *ampulla* "vazo por ŝminko, ungvento k.s.", dim. de *amphora* (vd. *amforo*).

AMPUT/I (1; Jü): A *amput/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*); L *amputare.*

Propr. "ĉirkaŭtranĉi", de *am(b)-* "ĉirkaŭ" (vd. *ambicio*) k *putare* "tranĉi", orig. "netigi", de *putus* "pura" (vd. tiun). Samfamiliaj radikoj en Eo: *deputi, disputi, kont(or)o, reputacio.*

AMULET/O (2; Jü): A *amul/et*, F *-ette*, I(H) *-eto*, PoR *-et*, G *Amulett*; L *amuletum.*

Asociita (per popola etimologio?) kun L *amoliri* "forigi" (sk. malbonon, malfeliĉon), el *a* "for" (= ps-pf *ab*) k *moles* "pezaĵo" (vd. *molekulo*).

AMUZ/I (f; RE): A *amuse* [-z], F *amuser* [-z-], G *amüsieren*† [-z-]. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894, 1906a *amus-*. ¶ Io *amuzar*, IeIa *amusar.*

De F *à* "al" k *muser* "gapvagi, nenifaradi", orig. "teni la buŝon malfermita" (kp la difinon de *gapi* en PIV), de F ant. *muse* "buŝo, muzelo" (F mod. *museau*) el L mez. *musum* s.s.

ANAGAL/O (2; Jü): L *anagall/is -idis*; I *anagallide.* Botanika termino bazita sur L. Formo kun amputita *-is* analoge al *miozoto* kaj *okzalo* sed kontraste al *irido.* Vd. Wüster Esp. princ., 58. ¶ Io =; mankas en IeIa.

El Gr *anagall/ís -ídos* s.s.

ANAGRAM/O (2; Be): APo *anagram*, F *-me*, R(H) *-a*, I *-ma*, G *Anagramm.* Ps-pf *ana-*, ps-sf *-m(at).*

El Gr *anágramma* s.s., de *ana* "reen, inverse" (kp sekv.) k *grámma* "litero, skribaĵo" de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafi*).

ANAKRONISMO (2; Jü): A *anachron/ism*, F *-isme*, Po *-izm*, G *Anachronismus*, I(H) *anacronismo*, R *anaĥronizm.* Ps-pf *ana-*, ps-sf *-ism.*

El Gr *anakhronismós* s.s., el *ana* "reen" (kp *anagramo*) k *khrónos* "tempo" (vd. *kronologio*).

ANALIZ/I (1; Du, RE): A *ana/lyze*, F *-lyser* [-z-], G *-lysieren*, I *-lizzare*, Po *-lizo-*

wac', R *-lizirovat'*, (H *-lizar*). Ps-pf *ana-*, ps-sf *-z*.

Der. de responda subst. (A *ana/lysis*, F *-lyse* ktp) el Gr *análysis* s.s., propr. "dismeto, dissolvo", de *ana* "reen; dis-, mal-" k *lyein* "solvi" (kp *paralizi*, vd. sub *solvi*).

ANALOG/A (7; PV; antaŭe *analogi/a*): A *ana/logous*, F *-logue*, G *-log*, I *-logo*, Po *-logiczny*, R *-logičeskij*, (H *análogo*). – Subst.: **ANALOGI/O** (1; RE): A *analog/-y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Analogie*; L *analogia*. Ps-pf *ana-* (adj., subst.), ps-sf *-i* 1 (subst.).

El Gr *análogos* "analoga; proporcia" (subst.: *analogía*), el la esprimo *anà lógon* "laŭ-proporcie; laŭracie": *aná* "laŭ", *lógos* "racio; kalkulo; proporcio" (vd. *logiko*).

ANANAS/O (f; RE): FPoR *anan/as*, I *-asso*, (H *-ná(s)*), G *Ananas*; kp L bot. *Ananas sativus* "ananasujo". ¶ Io =, IeIa *ananas*.

Pere de Pg *ananás* el Tupia (Brazilo) *ananá*.

ANAPEST/O (2; Jü): APoR *anapest*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Anapäst*. Ps-pf *ana-*.

El Gr *anápaistos* s.s., propr. "inversigita (daktilo)", el *aná* "reen, inverse" k *paíein* "bati" (vd. sub *pavimo*).

ANARĤI/O (3; Jü; *anarki/o* Wü): A *anar/chy* [-k-], F *-chie* [-ŝ-], I *-chia* [-k-], Po *-chia* [-ĥ-], R *-ĥija*, (H *-quía* [-k-], G *Anarchie* [-c-]. Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *anarkhía* s.s., de *ánarkhos* "sen/mastra, -estra" el *an-* "ne-, sen-" k *árkhos* "estro, ĉefo, reganto" (kp *árkhein* "regi, esti la unua", vd. *arĥitekto*).

ANAS/O (f; RE): L *an/as -atis*; I *anatra, anitra*, (H *ánade*). Zoologia termino bazita sur L. La elekton de la L nominativa formo kredeble influis konsidero al la sufiksoj *ad, at*. ¶ 1894 *anatr-*. ¶ Io *anado*, IeIa *anate*.

Kp (s.s.) Sa *âtí-*, Gr *nêssa*, G *Ente*, R *utka* (HE **ant-*).

ANATOMI/O (1; Be; kp *anatomisto* "-isto" N-ro 30 1889): A *anatom/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Anatomie*; L postkl. *anatomia*. Ps-pf *ana-*, ps-sf *-i* 1.

De Gr *anatomê* "sekco, distranĉo", subst. de *anatémnein* "distranĉi": *ana-* "dis-", *témnein* "tranĉi" (vd. *atomo*).

ANĈOV/O (1; Jü): A *anchovy* [-ĉ-], F *anchois*, G *Anschovis*, Po *anczos(y)* [-ĉ-], R *ančous*, (H *anchoa* [-ĉ-]). Ŝajne bazita sur A kun (ortografia) apogo de F. ¶ Io *anchov/o*, Ie *-e*, mankas en Ia.

Mediteranea vorto kun tre varia formo (kp I *acciuga*); kiel etimon oni proponas vaskan *anchu* s.s. (orig. "seka"?) aŭ Gr *aphyê* "speco de fiŝeto".

ANEKDOT/O (1; RE): AF *ane/cdote*, I *-ddoto*, Po *-gdota*, R *-kdot*, G *Anekdote*, (H *anécdota*). Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *anekdotá* "neeldonitaj (skribaĵoj)", titolo de la nepublikigitaj memorskriboj de Prokopio (verkisto en la orientromia regno, 6a jc p.K.), kiuj enhavis multajn historietojn; el *an-* "ne-" k *ékdotos* de *ekdidónai* "eldoni": *ek* "el" (vd. tiun), *didónai* "doni" (vd. tiun; kp *dozo*).

ANEKS/I (2; Jü): A *annex*, F *-er*, G *annektieren*, I *annettere*, Po *anektowac'*, (H *anex(ion)ar*). Bazita sur L supina radiko, kiu en pluraj fontlingvoj funkcias kiel subst. (vd. sube) sed estas uzata verbe en AF(H). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *anexar*, Ie *anexer*, Ia *annecter*.

De la responda subst. (A *annex*, F *-e*, H *anexo*), el L *annexus* "alligo", subst. de *annectere* "alligi" (kp GIPo supre): *ad* "al", *nectere* "ligi" (vd. sub *nodo*).

ANEMON/O (2; Jü): AI *anemon/e*, R(H) *-a*, F *anémone*, G *Anemone*; L *anemone*.

El Gr *anemônê* s.s., propr. "ventofloro" (nomo diversmaniere klarigita), de *ánemos* "vento" (vd. *animo*).

ANGELIK/O (2; Jü): L bot. *Angelica*; AI *ang/elica*, F *-élique*, (H *-élica*). Bazita sur la ortografio (mola prononco de *-g-* en AFHI). Kp *angêlo*. Ps- sf *-ik*.

Propr. "angeleca (floro)" (tiel nomata pro kuraca efiko) de L *angelus* "angelo" (vd. tiun). Kp semantike G *Engelwurz* s.s., propr. "angela radiko".

ANGIL/O (f; RE): F *anguille* [-gi-], I *anguilla*, (H *anguila* [-gi-]); L *anguilla*. Bazita sur F prononco; kp la iel analogajn *distingi* (F *distinguer*), *lango* (F *langue*). ¶ Io *anguilo*, Ie *anguill/e*, Ia *-a*.

Propr. "serpenteto", dim. de L *anguis* "serpento" (> eo *angviso* Wü). Kp Sa *áhi-* "serpento", Gr *ékhis* "serpento", *énkhelys* "angilo", R *uj* "serpento", *ugor'* "angilo" (HE **agŭi-* aŭ **angŭi-*).

ANGIN/O (1; RE): L *angina*; AIPo(H) *angin/a*, F *-e*. Internacia medicina termino.

El Gr *ankhónê* "strangolado; ŝnuro" de *ánkhein* "strangoli". Kp *angoro*.

ANGL/O (f', 7; Un): A *Englishman* (kp *Anglo-Saxon* "anglosaksa"), F *Anglais*, G *Engländer* (kp *Angelsachse* "anglosakso"), I *inglese*, Po *Anglik*, R *angličanin*, (H *inglés*). Al la Ea formo (FPoR) probable kontribuis ankaŭ L mez. *Angli* "angloj" (el kiu doktaj terminoj kiel A *anglicize* "angligi"). ¶ Io *Anglo*, Ie *angles/o*, Ia *-e*.

Orig. nomo de ĝermana tribo ekloĝinta en Britujo en la 5a j.c p.Kr., devenanta de la distrikto *Angul* (Slesvigo), nomo kredeble orig. signanta malvastan fjordon kaj tiukaze parenca al la vortoj cititaj sub *angoro*.

ANGOR/O (6;Mart, Wü): L *angor*. Kp (s.s.) A *ang/uish*, F *-oisse*, I *-oscia*, (H *-oja*), G *Angst*. Estante kvazaŭmedicina termino, la vorto invitis al alpreno de L formo. Ps-sf *-or* 2. ¶ Io =; Ie *angusti/e*, Ia *-a* (vd. sube).

L *angor*, propr. "premo", subst. de *angere* "kunpremi, sufoki". La AFHI vortoj devenas de L *angustia* "malvasto; embaraso" de *angustus* "malvasta". Ambaŭ (samkiel G *Angst*) el HE rad. **angh-* "kunpremi", kp Sa *amhú-* "malvasta"; Gr *ánkhein* "strangoli" (vd. sub *angino*); L *anxius* "maltrankvila"; A *anger* "kolero"; G *eng* "malvasta"; R *uzkij* "malvasta".

ANGUL/O (f; Un;) 1) geom., 2) elstara eĝo kie du surfacoj sin renkontas, 3) malvasta loko: L *angulus* (1,2,3); AF *angle* (1,2), I *angolo* (1,2,3), (H *ángulo* 1,2,3). Ea formo laŭ L, ne montranta la plej oftan rezulton de vortfina L *-ulus/-ula/-ulum* (kp *artikolo*); tamen jam en Un krom tiu ĉi troviĝas *makulo* (*macula*), *nebulo* (*nebula*), *okulo* (*oculus*), *spegulo* (*speculum*). ¶ IoIa =, Ie *angul*.

La latin(id)a vorto devenas, same kiel R *ugol* "angulo", el HE rad. **ang-/ank-* "fleksi, kurbigi", kp Sa *áncati* "kurbigas", *ankás* "hoko"; Gr *ánkyra* "ankro" (vd. tiun), *ónkos* "hoko"; L *uncus* "hoko"; G *Angel* "fiŝhoko".

ANĜEL/O (f; Un): A *angel* [-ĝ-], F *ange* [-ĵ-] (kp *angélique* "anĝeleca"), G *Engel*, I *angelo* [-ĝ-], Po *aniol'*, R *angel*, (H *ángel* [-ĥ-]); L *angelus*. Formo kombinanta la internacian ortografion (*g*) kun la mola prononco en AFI(H). ¶ 1894 *angel-*. ¶ Io *anjelo*, Ie *ángel*, Ia *angelo*.

El Gr *ángelos* s.s., orig. "mesaĝisto, sendito (de Dio)", kp *angéllein* "sciigi, raporti". Samfamiliaj radikoj en Eo: *angeliko*, *evangelio*.

ANILIN/O (4; Jü): AF *anilin/e*, IPo(H) *-a*, G *Anilin*, R *anilin*. Ps-sf *-in* 2.

Konstruita en G (de Fritsche, 1841) el FPg *anil* "indigo" el Ar *an-nîl* s.s.: *al* (var.: *an-*) dif. art. (vd. *algebro*), *nîl* el Sa *nîlî* "indigo" de *nîla-* "malhele blua".

ANIM/O (f; Un): L *anima*; F *âme* (kp *magnanime* "grandanima"), I *anima*, (H *alma*, *ánima*). Kp ank. A *magnanimous* "grandanima" k.s. ¶ Io *anmo*, Ie *ánim*, Ia *anima*.

Orig. "spirito", el HE rad. **an-* "spiri, blovi", kp Sa *ániti* "spiras"; Gr *ánemos* "vento" (vd. *anemono*); Sv *andas* "spiri". Samfamilia radiko en Eo: *animalo*.

ANIMAL/O (8; Wü; ne ĉe Z): AF(H) *animal*, I *-e*.

El L *animal* "vivanta estaĵo; besto" de *anima* "viv(ofort)o, spirito" (vd. *animo*).

ANIZ/O (f; RE): A *anise*, F *anis* (kp *anisette* [-z-] "anizlikvoro"), G *Anis*, I *anice*, *anace* (kp *anisetta* [-z-] "anizlikvoro"), Po *anyz'*, R *anis*, (H *anís*); L *anisum*. Eo *-z-* havas malfortan apogon en la fontlingvoj sed laŭas la ĝeneralan ten-

dencon voĉigi intervokalan *s*; kp *huzo, pizo.*

El Gr *ánison* s.s., kredeble variantformo de *ánêthon* (> eo *aneto* Wü), de negreka origino.

ANKAŬ (f; Un): I *anche* [-k-]. Oni rimarku, ke Z prenis ankaŭ du aliajn aŭ-adverbojn el I, nome *ankoraŭ* kaj *apenaŭ*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1881 *os* (< F *aussi*); 1894 *anku*. ¶ Io *anke*, Ie *anc*, Ia *anque, etiam* (< L).

Etimologio nekonata.

ANKORAŬ (f; Un): F *encore* [k-], I *ancora*. La formo montras al I kiel primara fonto (kp *ankaŭ, apenaŭ*). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1881 *es* (< R *eŝĉe*); 1894 *ankoru*. ¶ Io *ankore*, Ie *ancor*, Ia *adhuc* (< L), *ancora*.

Probable el L *(ad) hanc horam* "ĝis tiu ĉi horo": *hanc* akuz. de *hic* "tiu ĉi", (vd. *hodiaŭ*), *horam* "horo".

ANKR/O (f; RE): A *anchor* [-k-], F *ancre*, G *Anker*, I *ancora*, (H *ancla, áncora*); L *ancora*. Z kopiis la F formon (akcentata *a* ankaŭ en la aliaj fontlingvoj). Formo **ankor-* estus neoportuna pro *ankoraŭ*, kaj *anker-* estis uzata de Z (RE) kun alia signifo ("mezuro por likvaĵoj"). ¶ Io =, Ie *ancre*, Ia *ancora*.

El Gr *ánkyra* s.s., el HE rad. **ank-* "fleksi, kurbigi" (vd. *angulo*).

ANOMALI/O (2; Be): A *anomal/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Anomalie*. Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *anomalía* s.s., de *anômalos* "neregula, neegala": *an-* "ne-", *homalós* "egala" (kp *homonimo*, vd. sub *sama*).

ANONC/I (f; RE): A *an/nounce*, F *-noncer*, I *-nunziare*, Po *-onsowac'*, (H *-unciar*). La F formo, sur kiu baziĝas la Ea, iom disvastiĝis internacie (> Po; kp G *Annonce*, Sv *annons* "gazetanonco"). Kp, kun alia vokalismo, *Anunciacio*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894 *anonz-*. ¶ Io *anuncar*, Ie *anunciar*, Ia *annunciar*.

El L *annuntiare* s.s., de *ad* "al" k *nuntiare* "anonci, sciigi" de *nuntius* "mesaĝisto", probable el **novi-ventius* "kiu venas kun novaĵoj" (vd. *nova* resp. *veni*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *Anunciacio, denunci, pronunci.*

ANONIM/A (1; Be): A *anonym/ous*, F *-e*, G *anonym*, I *anonim/o*, Po *-owy*, R *anonim(nyj)*, (H *anónimo*). Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *anônymos* "sennoma" el *an-* "sen-, ne-" k *ónyma*, dial. formo de *ónoma* "nomo" (vd. tiun). Samfamiliaj radikoj en Eo: *pseŭdonimo, sinonimo.*

ANSER/O (f; N-ro 15 1888, RE): L *anser*, (H *ánsar*). Zoologia termino bazita sur L (*Anser anser* "griza ansero"). Almenaŭ mnemoteknikan apogon donas G *Gans*, HPg *ganso* s.s. ¶ Io *ganso*, Ie *ganse*, Ia *ansere*.

El HE **ghans-* "ansero", kp Sa *hamsá-*, Gr *khên*, A *goose*, R *gus'*, Po *ges'*. Kredeble plivastigo de rad. **ghe(n)-* "oscedi, malfermi la buŝon" (> G *gähnen*).

ANSTATAŬ (f; Un): G *anstatt*. Nurgermana bazo (same kiel en unu alia prep.: *laŭ*). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1894 *inloku* (< L *in loco*); 1906a *lo* (< L *loco*), 1906b *stete* (miksformo de A *instead* kaj G *anstatt*?). ¶ IoIe *vice* (vd. *vico*), Ia *in vice de*.

Propr. "sur loko de (iu,io)" (analoge la respondaj esprimoj A *instead of*, F *au lieu de*, H *en lugar de*, I *in luogo di*, L *in loco* + gen.), kunm. de *an* "sur, ĉe" (kp. sub *amboso*) k *Statt* "loko, ejo" (vd. sub *stari*).

ANTAŬ (f; Un) 1) pri tempo, 2) pri loko, 3) en ĉeesto de: L *ante* (1,2); (H *ante* (3), *antes de* (1)). Krome kiel dua elemento en kunmetoj: F *av/ant* (1), *dev/ant* (2), I *(d)av/anti (a)* (1,2,3), (H *del/ante de* (2,3)). Kp A(H) *anterior*, I *-e*, F *antérieur* "antaŭa"; I *ante/cessore* "antaŭulo"; (H *ante/ayer* "antaŭhieraŭ") ktp. Laŭ Manders 1947, 315, Z modifis la L formon, ĉar **ante* donus la adverbon **antee*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1882 *vi* (etimologio nekonata, vd. PVZ 5, 149;

ĉu eble F *vis-à-vis?*); 1894 *antu*; 1906b *vor* (1; < G *vor*), *davan* (2). Krome en pEo 1881 *pin* "antaŭ ol" (< Gr *prin*); kp 1906 *antu-kvam* (< L *antequam*, propr. "antaŭ ol"). ¶ Io *ante* (1), *avan* (2; < F), *koram* (3; < L *coram*); Ie *ante* (1), *avan* (2), *coram* (3); Ia *ante* (1,2), *coram* (3). Krome Io *ante ke*, IeIa *ante que* "antaŭ ol".

El HE **anti* "vid-al-vide al, fronte al", kp Sa *ánti* "antaŭ, proksime de"; Gr *antí* "vid-al-vide al, kontraŭ" (vd. *antipatio*); A *an/swer*, G *Ant/wort* "respondo". Samfamiliaj radikoj en Eo: *anticipi, antikva.*

ANTEN/O (1; Jü) 1) zool., 2) tekn.: AI *ant/enna* (1,2), F *-enne* (1,2), Po *-ena* (2), R *-enna* (2), (H *-ena* 1,2), G *Antenne* (1,2). Adoptita de Z por la zoologia signifo; teknika termino en Wü ktp.

El L *antenna* "velstango". Zool. termino ekde 15a jc; tekn. unue en I (Marconi).

ANTICIP/I (3; Jü): A *anticip/ate*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*), G *antizipieren*†, Po *antycypować*; L *anticipare.*

Propr. "antaŭpreni", el L *ante* "antaŭ" (vd. tiun) kaj *capere* "preni" (vd. *kapti*).

ANTIKV/A (f; RE): L *antiquus* [-kŭ-]; AF *antique*, G *antik* (kp *Antiquität* [-kv-] "antikvaĵo", I *antico*, R *antičnyj*, (H *antiguo*). Bazita precipe sur L, kies kombino *qu* normale reprezentiĝas en Eo per *kv*, vd. *akvo*. ¶ 1882 *arh'a* (< Gr *arkhaíos*). ¶ Io *antiqu/a*, Ie *-i*, Ia *-e*; krome, kun la sencnuanco "longe ekzistinta", Io *anciena*, IeIa *ancian* (< F *ancien*).

Der. de L *ante* "antaŭ(e)" (vd. tiun).

ANTILOP/O (1; RE): A *antelope*, FI *antilop/e*, R *-a*, G *Antilope*, Po *antylopa*, (H *antílope*).

El Gr *anthólops*, nomo de fabela besto. Nuna signifo ekde 18a jc.

ANTIMON/O (f; RE): A *anti/mony*, F *-moine*, I (H) *-monio*, G *Antimon*, Po *antymon.*

El L mez. *antimonium* s.s., probable el Ar *al* (dif. art.., vd. *al- gebro*) k *itmid* "antimono", el Gr *stímmi* "antimona ŝminko", el Eg *ŝt(i)m* s.s.

ANTIPATI/O (1; RE): A *anti/pathy*, F *-pathie*, I *-patia*, R *-patija*, (H *-patía*), G *Antipathie*, Po *antypatia.* Ps-pf *anti-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *antipátheias* s.s., el *antí* "kontraŭ" (ank. en *anti/podo, -tezo*) k *páthos* "pasio, sento" (vd. *patoso*).

ANTIPOD/O (1; RE): R *antipod*, AFI *-e*, G *Antipode*, Po *antypoda*, (H *antípoda*). Ps-pf *anti-.*

El Gr *antí/pous -podos*, propr. "kontraŭpiedulo": *antí* "kontraŭ" (kp *antipatio*), *pous* "piedo" (vd. tiun).

ANTITEZ/O (2; Jü): A *anti/thesis*, F *-thèse* [-z], I *-tesi* [-z-], R *-teza*, G *Antithese*, Po *antyteza*, (H *antítesis*). Ps-pf *anti-*; ps-sf *-z.*

El Gr *antíthesis* s.s., propr. "kontraŭmet(aĵ)o": *antí* "kontraŭ", *thésis* "met(aĵ)o" (vd. *tezo*).

ANTOLOGI/O (2; Jü): A *anthолog/y*, F *-ie*, G *Anthologie*, IPo *antolog/ia*, R *-ija*, (H *ía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *anthología* s.s., propr. "florkolekto" (kp L *florilegium* "florkolekto; antologio"), el *ánthos* "floro" (identa kun Sa *ándhas-* "herbo") k *légein* "pluki, kolekti" (vd. *legi*). La unua elemento troviĝas ankaŭ en Eo *dianto, krizantemo.*

ANTROPOLOG/O (7; Ka; antaŭe *antropologi/isto*): A *anthropo/logist*, F *-logue*, G *Anthropolog*, I *antrop/ologo*, PoR *-olog*, (H *-ólogo*). – Sciencnomo: **ANTROPOLOGI/O** (1; Jü): A *anthropolog/y*, F *-ie*, G *Anthropologie*, IPo *antropolog/ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

La sciencistnomo estas formita el la sciencnomo analoge al *arkeolog-* ktp. Sciencnomo formita en l7a jc el Gr *ánthrôpos* "homo" (kun nekonata etimologio) k *lógos* "scienco" (vd. *logiko*).

ANUNCIACI/O (f; RE): A *Annunciation*, F *Annonciation*, I *Annunziazione*, (H *Anunciación*). Ps-sf *-cio.* ¶ 1894 *Anunziazi-.*

El L *annuntiatio* "sciigo, anonco", de *an-*

nuntiare "anonci" (vd. tiun).

AORT/O (2;Jü): AIPoR(H) *aort/a*, F *-e*, G *Aorta*; L med. *aorta*.

El Gr *aortê* s.s., orig. "alpendaĵo, alligaĵo", de *aeírein* "alligi". Kp *arterio*.

APARAT/O (1; RE): A *appar/atus*, F *-eil*, I *-ecchio*, R *-at*, G *Apparat*, Po *aparat*, (H *-o*). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-at* 1.

El L *apparatus* "aparato(j), ilo(j), preparitaĵo(j)", de *apparare* "prepari, pretigi": *ad* "al", *parare* "pretigi" (vd. *prepari*).

APART/A (f; Un): Adjektivigo de la adverba esprimo A *apart* "aparte, dise", F *à part* "aparte; krom", I *a parte* "aparte", (H *aparte* "aparte, flanke, dise"). La vorto ekzistas, kun speciala senconuanco, kiel adjektivo en G: *apart*† "kurioza, neordinara", kiel adv. ank. "dise, aparte". Ps-pf *ab-* aŭ *a(d)-*, vd. sube. ¶ Io =, Ie *apart* (espismo), Ia *a parte* (adv.).

El L *a parte, ad partem* "je (unu) flanko" resp. "al (unu) flanko": prep. *a* "de, je" resp. *ad* "al" k *pa/rs -rtis* "flanko, parto" (vd. tiun). Kp sekv.

APARTAMENT/O (3; Jü): APo *apartment*, F *appart/ement*, I *-amento*, (H *-amiento*). Ps-sf *-ment*.

Orig. "aparta(j) ĉambro(j), kien oni retiriĝas", subst. de I *appartarsi* "retiriĝi, disiĝi", de *a parte* "aparte, dise" (vd. *aparta*).

APARTEN/I (f; Un): A *appertain*, F *appartenir*, I *appartenere*. Vokalismo laŭ FI. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *apartenar*, Ie *apartener*, Ia *pertiner*.

El L *appertinere* s.s., de *ad* "al" k *pertinere* "esti ligita kun, koncerni", propr. "etendiĝi al": *per* "tra, ĝis" (vd. *per*), *tenere* "ten(iĝ)i" (vd. *teni*).

APATI/O (1; Be): A *apath/y*, F *-ie*, G *Apathie*, IPo *apat/ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *apátheia* "sensenteco", de *apathês* "sensenta": *a-* "ne-, sen-", *páthos* "sento, pasio" (vd. *patoso*).

APELACI/o (3; Jü): Po *apel/acja*, R *-jacija*, (H *-ación*); kp G *Appellationsgericht* "apelacia tribunalo". Oficialigita kiel verba radiko, kvankam la formo montras substantivan devenon. Ne estas klare, kial Z preferis la malpli internacian longan formon al la mallonga (kp la verbon A *appeal*, F *appeler*, G *appellieren*, I *appellarsi*, Po *apelowac'*, R *appelirovat'*, H *apelar* > eo *apel/i* PV = *apelaci/i*); eble li trovis, ke la longa radikformo pli ekzakte indikas la juran sencon (la cititaj verbaj formoj signifas ankaŭ ĝenerale "alvoki"). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-cio*. ¶ Io *apelar*, Ie *apellar*, Ia *appellar* "apelacii".

El L *appellatio*, subst. de *appellare* "apelacii, alvoki", orig. "admoni, instigi": *ad* "al", *pellere* "peli" (vd. tiun).

APENAŬ (f; Un): F *à peine* [apén], I *appena*, (H *apenas*). La vorto eniras la italdevenan adverbserion *ankaŭ, ankoraŭ, apenaŭ*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1882 *kaŭ* (< G *kaum*); 1894 *apenu*. ¶ Io *apene*, Ie *apen*, Ia *a pena*.

Orig. "kun peno": F *à*, IH *a* "al, je" k F *peine*, IH *pena* "peno" (vd. tiun).

APER/I (f; RE): A *appear*, F *apparaître*, I *apparire*, (H *aparecer*); L *apparere*. Eo *-e-* (apogata nur de A) ne estas kontentige klarigita; eventuala konfuzo kun derivaĵoj de la radiko *aparat-* estas tre neprobabla. Ŝajnas, ke la sono de F *-aî-* kaj L *-e(re)* efikis retrograde. Ps-pf *a(d)-*.¶ Io *apar/ar*, Ie *-ir*, Ia *apparer*.

De L *ad* "al" k *parere* "aperi".

APERTUR/O (6; ER; antaŭe *mal/ferm/-aĵ/o*): A *apertur/e*, I(H) *-a*; L *apertura*. Kp F *ouverture*. Ps-sf *-ur*.

De L *apertus* "malfermita" (> eo *apert/i* PV, *-a* PIV), ptc. perf. de *aperire* "malfermi", kredeble el **ap-ver-*, kp Sa *apa-vrnóti* "malfermas, malkovras" (HE rad. **ŭer-* "kovri, ŝirmi"). Etimologie identa radiko: *uverturo*.

APETIT/O (1; N-ro 14 1888, RE): A *ap/petite*, F *-pétit*, I *-petito*, Po *-etyt*, R *-petit*, (H *-etito*), G *Appetit*. Ps-pf *a(d)-*.

El L *appetitus* "avido, deziro", de *appetere*

"avidi, aspiri": *ad* "al" k *petere* "aspiri, postuli, peti" (vd. *peti*).

API/O (2; Jü): L *apium*; F *ache*, I *appio*†, (H *apio*). Kp G *Eppich*. Botanika termino bazita sur L. ¶ Io =; mankas en IeIa (kp *celerio*).

Propr. "(kreskaĵo ŝatata) de la abeloj", de L *apis* "abelo" (vd. tiun).

APLAŬD/I (f; RE): A *applaud*, F *-ir*, G *-ieren*, I *-ire*, R *aplodirovat'*, (H *aplaudir*); L *applaudere*. Ps-pf *a(d)-*.

De L *ad* "al" k *plaudere* "aplaŭdi, manklaki" (vd. *plaŭdi*).

APLIK/I (3; Jü): A *ap/ply* (kp *-plication* "aplikado"), F *-pliquer* [-ké], I *-plicare*, (H *-licar*). Ps-pf *a(d)-*.

El L *applicare* "almeti" (kp en Eo 'apliki kuracilon' ktp), "alproksimigi, direkti", (refl.) "aniĝi (al)", orig. eble "kliniĝi al": *ad* "al", *plicare* "faldi" (vd. *kompliki*).

APLOMB/O (6; Be): FPoR *aplomb*, G *Aplomb*†, (H *aplomo*). ¶ Io =, Ie *aplombe*; mankas en Ia. Ps-pf *a(d)-*.

Subst.-igo de esprimo orig. signifanta "vertikale, rekte" (kp I *appiombo* "vertikala"), poste "kun memfido"; propr. "laŭ la plumbaĵo", ekz. F *à* "al; laŭ" k *plomb* "plumbo" (vd. tiun).

APOG/I (f; RE): F *appuyer*, I *appoggiare*, (H *apoyar*). El la formoj konataj al Z (FI), I probable ŝajnis pli facile asimilebla. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *apogar*, Ie *apoyar*, Ia *appoiar*.

El L vulg. **appodiare*, de L *ad* "al" k *podium* "podio" (vd. tiun).

APOGE/O (1; Be): A *apo/gee*, F *-gée*, I(H) *-geo*, Po *-geum*, R *-gej*, G *Apogäum*. Ps-pf *apo-*.

El Gr *apógaion* s.s., propr. "(io) malproksima de la tero", de *apó* "for de" k *gaía* (> *gê*) "tero" (vd. *geografio*).

APOKRIF/A (1; Be): A *apo/cryphal*, F *-cryphe*, G *apokryph(isch)*, I *-crifo*, Po *-kryficzny*, R *-krifičeskij* (kp PoR *-krif* "apokrifaĵo"), (H *apócrifo*). Ps-pf *apo-*.

El Gr *apókryphos* "kaŝita", de *apokryptein* "kaŝi": *apó* "for, de", *kryptein* "kaŝi" (vd. *kripto*).

APOLOG/O (1; Be): AF *apologue*, G *Apolog*, PoR *apolog*, I *-o*, (H *apólogo*); L *apologus*. Ps-pf *apo-*. ¶ IoIa =, Ie *apolog*.

El Gr *apólogos* "apologo; rakonto, raporto", de *apó* "de" k *lógos* "rakonto, parolo" (vd. *logiko*).

APOPLEKSI/O (1; RE): A *apo/plexy*, F *-plexie*, I *-plessia*, Po *-pleksja*, R *-pleksija*, (H *-plejía*), G *Apoplexie*; L *apoplexia*. Ps-pf *apo-*, ps-sf *-i* 1.

El Gr *apoplêxía* s.s., de *apoplêssein* "terenbati; difekti (korpe aŭ anime)": *apó* "de", *plêssein* "bati", kp *plêgê* "bato" (vd. *plago*), *plêktron* "batilo" (> eo *plektro* PVS); vd. ank. *plendi*.

APOSTOL/O (1; RE): A *apo/stle*, I *-stolo*, Po *-stol'*, R *-stol*, F *apôtre*, G *Apostel*, (H *apóstol*); L *apostolus*. Ps-pf *apo-*.

El Gr *apóstolos* s.s., propr. "(dis)sendito", de *apostéllein* "forsendi": *apó* "for, de", *stéllein* "sendi". Kp eo *epistolo* Jü < Gr *epistolê* "letero", propr. "alsenditaĵo".

APOSTROF/O (2; Be): AF *apo/strophe*, PoR *apostrof*, I *-o*, G *Apostroph*, (H *apóstrofo*). Ps-pf *apo-*.

El Gr *apóstrophos* s.s., propr. "forturnita (signo)", de *apostréphein* "forturni": *apó* "for, de", *stréphein* "turni" (vd. *strofo*).

APOTEK/O (1; Du, RE): G *Apotheke*, PoR *apteka*; kp Sv *apotek*; ank. A *apothecary*, F *apothicaire* "apotekisto". Z do preferis la ĝermanan-slavan terminon al la romana, rezervante la lastan por la nomo de la scienco (vd. *farmacio*). Ps-pf *apo-*. ¶ Io =, Ie *apo/teca*, Ia *-theca*.

El Gr *apothêkê* "deponejo, varejo", de *apotithénai* "deponi, formeti": *apó* "for, de", *tithénai* "meti" (vd. *tezo*). Kp spec. *biblioteko*, *hipoteko* (kaj eo *teko* PV). Etimologie identa radiko: *butiko*.

APOTEOZ/O (2; Be): A *apo/theosis*, F *-théose [-z]*, *I* -teosi [-z-], Po *-teoza*, R *-feoz*, (H *-teosis*), G *Apotheose*. Ps-pf *apo-*, ps-sf *-z*.

El Gr *apothéôsis* s.s., de *apotheoún* "diigi", propr. "apartigi kiel dion", el *apó* "de" k

theós "dio" (vd. *teologo*).

APOZICI/O (2;Jü): AF *apposition* [-z-], G *Apposition* [-zits-], I *apposizione* [-zits-], Po *apozycja*, (H *aposición*). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-cio.*

El L *appositio* "apudmet(ad)o", de *apponere* "apudmeti": *ad* "al, apud, ĉe", *ponere* "meti" (vd. *pozicio*).

APR/O (f; RE): L *ap/er -ri.* Kp G *Eber*, R *vepr'*. Zoologia termino bazita sur L. Latina substantivo kun nur nominativa *-e-*, kiu normale forfalas en Eo; kp *akcipitro, libro, ministro.* ¶ IoIe =; Ia *apro*, porco salvage** ("porko sovaĝa").

HE praformo **epero-*. (A *boar*, citita de Bastien s.v., ne estas parenca.)

APRIL/O (f; Du, RE): AG *April*, F *avril*, I *aprile*, R *aprel'*, (H *abril*); L (*mensis*) *Aprilis.*

Necerta etimologio (eble orig. "la dua (monato)", kp Sa *ápara-* "posta, malantaŭa", A *after* "post"?).

APROB/I (f; RE): A *approve*, F *approuver* (kp AF *approbation* "aprobo"), I *approvare*, (H *aprobar*); L *approbare.* Ps-pf *a(d)-*.

De L *ad* "al" (ofte iga pref.) k *probare* "aprobi (post provado); provi" (vd. *provi*).

APUD (f; Un): L *apud.* Kp I *appo*† "ĉe, apud". ¶ 1906a *ad* (< L *ad* aŭ mallongigo de *apud*?). ¶ Io =, Ie *apu*, Ia *apud, juxta* (< L *iuxta*).

Orig. ptc. perf. akt. **apŭod* "atinginta" (> "proksima al") de HE rad. **ap-* "atingi", kp L *apisci* "atingi" (vd. *adepto*), Sa *apnóti* "atingas".

ARAB/O (8; PR,Be): APo *Arab*, F *arabe*, G *Araber*, I *arabo*, R *arab*, (H *árabe*); L *Ara/bs -bis.*

Pere de Gr *Ara/ps -bos* el Ar *'arab* s.s., kun probabla origina signifo "dezertulo", par. al He *'arébéh* "stepo, dezerto". Kp sekv.

ARABESK/O (2; Be): AF *arabesque* [-k], G *Arabeske*, I *(a)rabesco*, R *arabesk*, Po *-a*, (H *arabesco*). Ps-sf *-esk.*

Propr. "arab(ec)a (ornamaĵo)", der. de I *arabo* (vd. tiun).

ARANE/O (f; RE): L *arane/us, -a*; F *araignée*, I *(a)ragno*, (H *araña*). Zoologia termino bazita sur L. ¶ 1894 *arakn-* (< Gr, vd. sube). ¶ Io *aran/eo*, Ie Ia *-ea.*

La latin (id) a vorto estas probable parenca al Gr *arákhnê* s.s.

ARANĜ/I (f; RE): A *arrang/e*, F *-er*, G *-ieren*, R *aranĵirovat'*. Formo kombinanta la ortografion de la latinalfabetaj fontlingvoj (*-g-*) kun la mola prononco (A [ĝ], FGR [j]). ¶ Io *aranjar*, Ie *arang/ear*, Ia *-iar.*

Orig. "ordigi, envicigi", el F *à* "al" k *rang* "ordo, vico, rango" (vd. *rango*).

ARB/O (f; Un): L *arbor*; F *arbre*, I *albero* (kp *arboreo* "arbeca"), (H *árbol*). Kp ank. Oc *arbe* (Albault 1961, 89), kiu tamen ne estas necesa por klarigi la Ean formon: aŭ Z adoptis la "komunan trunkon" (Albault l.c.) de LF, aŭ li uzis la enradikan *-o-* de L *arbor* kiel substantivsignon (la traktado de *korp/o* el *corpor-* estas iel analoga; kp ank. *ĉamo*). Analoga procedo estas trovebla ĉe adjektivaj radikoj, vd. *arbitra.* ¶ Io *arboro*, Ie *árbor*, Ia *arbore.*

Kredeble par. al L *arduus* "alta; kruta". Samfamilia radiko en Eo: *arbusto*

ARBALEST/O (2;Jü): A *arbalest*, F *arbalète*, G *Armbrust*, I *balestra*, (H *ballesta*). Rimarkinde ĉe radiko de latinida origino, la formo identas kun A (kp tamen F ant. *arbaleste*). ¶ Io *arbalest/o*, Ie *-e*, Ia *arcoballista* (< L, vd. sube).

El L *arcuballista* s.s., de *arcus* "arko" (vd. tiun) k *ballista* "ĵetilego, katapulto" (vd. *balistiko*). HI senpere el L; G montras transformon laŭ popola etimologio (*Arm* "brako", *Brust* "brusto").

ARBITR/A (f; RE): A *arbitr/ary*, F *-aire*, I(H) *-ario*, Po *-alny*; L *arbitrarius.* Z fortrancis la sufikson *-ari*, donante al ĝia unua vokalo la rolon de Ea adjektiva signo (kp la analogan procedon en *arb/o*); radikfino-*ar*cetere koincidus kun la homonima sufikso. Same *necesa* < L *necessarius* (pri aliaj traktadoj de *-ari*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj). ¶ Io *arbi-*

tr/iala, IeIa *-ari*.

De L *arbiter* "arbitracianto, juĝanto", orig. "inter-, al/venanto" (= 'kiu venas por inspekti aferon'), el *ar-* (var. de *ad*) "al" k *baetere* "iri". Kp sekv.

ARBITRACI/O (3; Jü): A *arbitration*; kp F *arbitr/age*, I *-aggio*, *-ato*, Po *-az'*, R *-aĵ*, (H *-aje*). Ps-sf *-cio*. Oni atendus **arbitraĝ/o* (kp *masaĝo* k.a. kun ps-sf *-aĝ*), sed tiu formo estus tro facile konfuzebla kun *arbitr/aĵo* "io arbitra" (fatala konfuzo, se ĝi okazus!). ¶ Io *arbitro*, IeIa *arbitration*.

De L *arbitrari* "arbitracii, prijuĝi, opinii", de *arbiter* "arbitracianto" (vd. sub *arbitra*).

ARBUST/O (6; Jü): F *arbust/e*, I(H) *-o*. ¶ IoIa *arbust/o*, Ie *-e*.

El L *arbustum* "arboplantejo, bosko", de *arbor* "arbo" (vd. tiun).

ARĈ/O (f; RE): F *archet*, I *archetto*, (H *arco*). Apokopo de *-et* estis necesa por eviti aspekton de diminutivo; Z krome, inspirite de la mola prononco en F [-ŝ-], metis *-ĉ-* por diferencigi la radikon de *ark/o*. (Analoga ŝanĝo, same por eviti homonimecon, en *perĉo*, *voĉo*.) – Szerdahelyi 1987, 127, komparas la [ĉ] en R *smyčok*, Po *smyczek* s.s. ¶ 1894 *arket-*. ¶ Io *ark-eto*, IeIa *arco*.

Propr. "arko" (kp A *bow* "arko; arĉo"), el L *arcus* "arko" (vd. tiun).

ARD/I (3; Jü): L *ardere*; I *ard/ere*, (H *-er*). Kp AF *ardent* "arda", F *ardeur* "ardo (fig.)". ¶ Io *ardorar*, IeIa *arder*.

De L *ar(i)dus* "seka". Kp Sa *ésa-* "cindro; polvo", Gr *azaléos* "seka", A *ashes*, G *Asche* "cindro" (HE rad. **as-* "brul-").

ARDE/O (f; RE): L *ardea*. Kp (kun neklarigita komenca sono) H *garza*. Zoologia termino bazita sur L. ¶ 1894 *heron-* (< A *heron*, F *héron*). ¶ Ie *heron*, Io *-o*; Ia *hairon*.

Kp Gr *erôdiós* s.s.

ARDEZ/O (f; RE): F *ardoise* [-z], I *ardesia* [-z-]. Bazita sur I, pli facile asimilebla ol F. ¶ 1894 *ardes-*. ¶ Io *ard/ezo*, Ie *-ese*, Ia *-esia*.

Nordfranca vorto de nekonata origino.

AREN/O (f; RE): AIPoR(H) *arena*, F *arène*, G *Arena*.

El L *(h)arena* "areno, sablejo", orig. "sablo" (kp H *arena* ank. "sablo").

AREOMETR/O (1; Jü): A *areo/meter*, I *-metro*, PoR *-metr*, F *aréomètre*, G *Aräometer*, (H *areómetro*).

Konstruita el Gr *araiós* "maldensa, maldika" (de nekonata origino) k *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

AREST/I (f; RE): A *arrest*, I *-are*, (H *-ar*), F *arrêter* (kp *arrestation* "aresto"), G *arretieren* (kp *Arrestat* "arestito"), Po *aresztować'*, R *arestovat'*. Ps-pf *a(d)-*.

El L mez. *arrestare*, orig. "haltigi", de *ad* "al" (tie ĉi iga pref.) k *restare* "halti; resti" (vd. tiun).

ARGIL/O (f; RE): F *argile*, I *argilla*, (H *arcilla*); L *argilla*. Kp A *argil* "(potista) argilo", *argillaceous* "argileca". ¶ Io *arg/ilo*, Ie *-il*, Ia *-illa*.

El Gr *árgil(l)os* "(blanka) argilo". HE rad. **arg-* "brili" (vd. sub *arĝento*).

ARGUMENT/O (f; RE): AFPoR *argument*, I(H) *-o*, G *Argument*. Ps-sf *-ment*.

El L *argumentum* "konkludo, pruvo", de *arguere* "pruvi, evidentigi". HE rad. **arg-* "brili, klara" (vd. sub *arĝento*).

ARĜENT/O (f; Un): F *argent* [-ĵ-], I *-o* [-ĝ-]; L *argentum*. (Kp H *argentar* [-ĥ-] "arĝenti".) Internacia kemia simbolo: *Ag*. Ea formo kombinanta la ortografion de la fontlingvoj (*-g-*) kun la mola prononco en FI. ¶ 1882 *ardz'a* "arĝenta" (< F, LV 45); 1894 *argent-*. ¶ Io *arjento*, Ie *argent/e*, Ia *-o*.

Orig. "brila (metalo)", el HE rad. **arg-* "brili, klara, blanka", kp Sa *árjuna-* "hela, blanka", Gr *argós* "brila", *árgyros* "arĝento", *árgil(l)os* "argilo" (vd. tiun), L *arguere* "evidentigi" (vd. *argumento*).

ARI/O (1; N-ro 14 1888, RE): AF *air* (kp F *ariette* "arieto, kanzono", G *Arie*, IPo(H) *aria*, R *arija*. Muzika termino bazita sur I.

En tiu ĉi senco ekde 18a jc; orig. "aero"

(proksimuma semantika evoluo: > "aspekto" > "maniero" > "melodio"; kp G *Weise* "maniero; melodio"), el L (akuz.) *aera* (vd. la etimologie identan *aero*).

ARISTOKRAT/O (1; RE): A *aristo/crat*, F *-crate*, I *-cratico*, R *-krat*, G *Aristokrat*, Po *arystokrata*, (H *aristócrata*). – Kolektiva subst.: **ARISTOKRATI/O** (8; Ka; antaŭe *aristokrat/aro*): A *aristo/cracy*, F *-cratie*, I *-crazia*, R *-kratija*, (H *-cracia*), G *Aristokratie*, Po *arystokracja*. Ps-sf *-i* 1.

La individua subst. estas formita (laŭ *demokrat-* ktp) el la kolektiva, el Gr *aristokratía*, propr. "regado de la plej bonaj", el *áristos* "plej bona" k *kratein* "regi" (vd. *demokrato*).

ARITMETIK/O (1; RE): A *arith/metic*, F *-métique*, G *Arithmetik*, I *arit/metica* (H *-mética*), Po *arytmetyka*, R *arifmetik*. Ps-sf *-ik*.

El Gr *arithmetikê (tékhnê)* "kalkula (scienco)", de *arithmós* "nombro", eble prapar. al A (ktp) *rhyme* "rimo" (vd. tiun). Kp *logaritmo*.

ARK/O (f; RE) 1) geom. 2) ark. 3) mil.: A *arc* (1), *arch* (2), F *arc* (1, 2, 3), I(H) *arco* (1, 2, 3), R *arka* (2). Int. konata per der. *arkad-*. ¶ Io =, IeIa *arco*.

El L *arcus* "arko, kurbo", prapar. al A *arrow* "sago". Etimologie identa radiko: *arĉo*; aliaj samfamiliaj radikoj en Eo: *arkado*, *arbalesto*.

ARKAD/O (1; Be): AF *arcad/e*, (H *-a*), G *Arkade*, I *arcata*, PoR *arkada*. Ps-sf *-ad*.

La formoj kun *-d-* el F < I *arcata*, de *arco* "arko" (vd. tiun).

ARKAIK/A (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* Jü): A *archa/ic* [-k-], F *-ïque* [-k-], G *-isch* [-c'-], Po *-iczny* [-ĥ-], I(H) *arcaico*, R *arĥaiĉeskij*. Ps-sf *-ik*.

El Gr *arkhaïkós* "malnovmoda", de *arkhaíos* "antikva, pramalnova" (> eo *arĥaja* ER), de *arkhê* "origino, komenco, regado", kp *árkhein* "komenci; esti la unua, regi". Samfamiliaj radikoj en Eo: *arkaismo*, *arkeolog/o*, *-io*; *arkivo*; *monarko*; vd. krome la ps-pf *arki-*.

ARKAISM/O (*-rĥ-* f',7, *-rk-* 8; *-rĥ-* Jü): A *archa/ism*, F *-ïsme*, [-k-], Po *-izm* [-ĥ-], G *Archaismus* [-c'-], I(H) *arcaismo*, R *arĥaizm*. Ps-sf *-ism*.

El Gr *arkhaismós* "arkaismo; imitado de antikvaj moroj", de *arkhaízein* "esti malnovmoda", de *arkhaíos* "antikva" (vd. *arkaika*).

ARKEOLOG/O (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* Ka; antaŭe *arĥeologi/isto*): A *arch/eologist* [-k-], F *-éologue* [-k-], I *-eologo* [-k-], Po *-eolog* [-ĥ-], G *Archäolog* [-c'-], R *arĥeolog*, (H *arqueólogo* [-k-]). – Sciencnomo: **ARKEOLOGI/O** (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* RE): A *arch/aeology*, F *-éologie*, IPo *-eologia*, G *Archäologie*, R *arĥeologija* [prononcoj analogaj al *arkeolog-*]. Ps-sf *-i* 1. ¶ Io *arkeolog/o*, *-io*; Ie *archeolog*, *-ie*; Ia *archeolog/o*, *-ia*.

El Gr *arkhaiología* "esplorado de antikvaĵoj", de *arkhaiológos* "antikvaĵesploranto", de *arkhaíos* "antikva" (vd. *arkaika*) k *-logos* "esploranto", orig. "rezonanto", agantnomo de *légein* "rezoni, diskuti; diri" (vd. sub *logiko*).

ARKIPELAG/O (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* RE): A *archi/pelago* [-k-], F *-pel* [-ŝ-], Po *-pelag* [-ĥ-], (H *-piélago* [-ĉ-]), G *Archipel* [-c'-], I *arcipelago* [-ĉ-], R *arĥipel*. Ps-pf *arki-*.

El Gr mez. *arkhipélagos*, orig. signifanta la insuloriĉan Egean maron, la "ĉefmaron" de la helenoj, de pref. *arkhi-* "ĉef-, unua" (vd. *arki-* en la listo de ps-pf) k *pélagos* "maro" (vd. sub *plata*).

ARKITEKT/O (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* RE): A *archi/tect* [-k-], F *-tecte* [-ŝ-], I *-tetto* [-k-], Po *-tekt* [-ĥ-], G *Architekt* [-c'-], R *arĥitektor*, (H *arquitecto* [-k-]); L *architectus* [-k-]. Ps-pf *arki-*. – Art- kaj scienconomo: **ARKITEKTUR/O** (*-rĥ-* f, *-rk-* 8; *-rĥ-* EG, *-rk-* Z 1894): AF *archi/tecture*, I *-tettura*, Po *-tektura*, G *Architektur*, R *arĥitektura*, (H *arquitectura*); L *architectura* [prononcoj analogaj al *arkitekt-*]. Ps-pf *arki-*, ps-sf *-ur*. ¶ Io *arkitekt/o*, *-uro*; Ie *architect/e*, *-ura*; Ia *architect/o*, *-ura*.

La artnomo estas formita kiel der. de L *architectus* el Gr *arkhitéktôn* "ĉefkonstruisto", de pref. *arkhi-* "ĉef-, unua" (vd. *arki-* en la listo de ps-pf) k *téktôn* "konstruisto, ĉar-

pentisto", identa kun Sa *takŝan-* s.s., el HE rad. **tekth-* "plekti (kabanon)", vd. *teksi.*

ARKIV/O (*-rĥ-* 3, *-rk-* perm. LK 1922; *-rĥ-* RE): A *archives* [-k-], F *archives* [-ŝ-], G *Archiv* [-c'-], I *archivio* [-k-], Po *archiwum* [-ĥ-], R *arĥiv*, (H *archivo* [-k-]); L *archivum* [-k-].

El Gr *arkheíon* "urbodomo, magistratejo", de *arkhê* "magistrato, urboregantaro", orig. "regado" (vd. sub *arkaika*).

ARLEKEN/O (f; RE): A *harlequin* [-k-], F *arlequin* [-kê], G *Harlekin*, I *arlecchino* [-k-], PoR *arlekin*, (H *arlequín* [-k-]). La latinidaj kaj slavaj formoj sen *h-* regas super la ĝermanaj kun *h-*. Formo bazita ĉefe sur F, kies fina vokalsono povis inspiri al vokalŝanĝo *i* > *e* (por eviti koincidon kun suf. *-in*: vd. *abomeni*). ¶ Io *arlekino*, IeIa *arlequin*.

El F ant. *Hellequin*, nomo de diablo, kies etimologio estas pridisputata: kelkaj vidas en ĝi dim. de la ĝermana vorto por "infero" (A *hell*, G *Hölle*), aliaj devenigas ĝin de A mez. *Herle king* "reĝo Harilo".

ARM/I (f; RE): A *arm* "-i", *arms* "-iloj", F *armer* "-i", *arme* "-ilo", I *armare* "-i", *arme* "-ilo", (H *armar* "-i", *arma* "-ilo"); L *armare* "-i", *arma* "-iloj". Int. konata per der. *arme-*. ¶ Io *arm/o*, Ie *-e*, Ia *-a* "armilo", IoIeIa *armar* "armi".

L *arma* el HE rad. **ar-* "kunmeti, kombini, aranĝi", kp Sa *rtá-* "ĝusta"; Gr *ararískein* "kunigi", *harmózein* "kunigi, kombini" (vd. *harmonio*); L *ars* "arto" (vd. tiun), *artus* "membro, artiko", *ritus* "rito" (vd. ank. *artik(ol)o*, *rito*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *alarmo*, *armeo*, *ĝendarmo*.

ARME/O (1; RE): A *arm/y*, F *-ée*, I *-ata*†, Po *-ia*, R *-ija*, G *Armee* (kp H *armada* "mararmeo, militŝiparo"). ¶ Io *arm/eo*, Ie *-é*, Ia *-ea*.

Propr. "armita (forto)", ptc. perf. de F *armer* "armi" (vd. tiun).

ARMEN/O (8; Jü): A *Armen/ian*, G *-ier*, F *Arménien*, I *armen/o*, (H *-io*), R *armjanin* (kp *Armenija* "Armenio"); kp Po *armén'ski* "armena".

Pere de L *Armenius* el Gr *Arméniosz* s.s.; tiu ĉi ne estas la enlanda nomo de la popolo, kaj ĝia signifo estas nekonata. Kp ev. *ermeno.*

ARNIK/O (2; Jü): L bot. *Arnica*; AFIPo *arnica*, (H *árnica*). ¶ Io *arniko*, Ie *arnica*; mankas en Ia.

Kredeble korupto de Gr *ptarmikê* "terniga (herbo)", de *ptaírein* "terni" (vd. tiun).

AROGANT/A (f; RE): AFG *arrogant*, I(H) *-e*, Po *arogancki*. Ps-sf *-ant*. Kp eo *arog/i* (EG): A *arrog/ate*, I *-ar(si)*, F *(s')arroger*, H *arrogar(se)*; L *arrogare*. ¶ 1882 *kraz'-* "arog-" (etimologio nekonata, vd. PVZ 5, 139). ¶ Io *arog/ar*, *-anta*, Ie *arog/ar*, *-ant*, Ia *arrog/ar*, *-ante*.

El L *arroga/ns -ntis*, ptc. prez. de *arrogare*, de *ad* "al" k *rogare* "postuli, peti, demandi". Samfamilia radiko en Eo: *prerogativo*. Rilatigebla al HE rad. **reg-* "direkti" (vd. *regi*), se orig. "direkti (peton al)".

AROM/O (1; Jü): AI(H) *arom/a*, F *-e*, PoR *-at*, G *Aroma*. Ps-pf *-m(at)*. ¶ 1882 *rom-*.

El Gr *árôma* "spico".

ARPEĜ/O (1; Be): AIPo *arpeggio* [-ĝ-], F *arpège* [-ĵ], G *Arpeggio* [-ĝ-], (H *arpegio*). Muzika termino bazita sur I. ¶ Io *arpejo*, Ia *arpeggio*; mankas en Ie.

Propr. "harpaĵo", de I *arpa* "harpo" (vd. tiun).

ARSENIK/O (f; RE): AF *arsenic*, I *-o*, G *Arsen(ik)*, Po *arzenik*, (H *arsénico*). Ps-sf *-ik*. Por diferencigi la elementon de la kombinaĵoj, oni enkondukis eo *arsen/o* (Wü) por la unua (laŭ modelo de G aŭ pro influo de Io). ¶ Io *arseno*, Ie *arsenic*, Ia *arsenico*.

Pere de L *arsenicum* "aŭripigmento" el Gr *arsenikón* s.s., popoletimologia transformo (*arsenikós* "vireca") de orienta vorto (kp ekz. Ar *zarnîq* s.s.), orig. der. de Pe *zar* "oro" (kp R *zoloto* "oro").

ART/O (f; RE): AF *art*, I(H) *-e*; L *ar/s -tis*. Int. konata per der. *artist-*. Io *art/o*, IeIa *-e*.

Latin(id)a vorto etimologie identa kun G *Art* "maniero; speco", Sa *rtí-* "maniero"

(HE rad. **ar-*, vd. *armi*). Samfamilia radiko en Eo: *artifiko.*

ARTERI/O (2; RE): A *artery* [-i], F *artère* (kp *artériel* "arteria"), G *Arterie*, IPo(H) *arter/ia*, R *-ija*; L *arteria.*

El Gr *artêría* s.s., orig. kredeble "alpendigaĵo, alligaĵo", de *aeírein* "alligi" (analoge al *aorto*, vd. tiun).

ARTIFIK/O (f; RE): AF *artifi/ce*, I *-zio*, (H *-cio*); L *artificium* [klas. -k-]. La L-devena elemento *-fic-* normale reprezentiĝas per *-fik-* en Eo; plej ofte tiu elemento troviĝas en verboj, kie ankaŭ aliaj fontlingvoj almenaŭ en derivaĵoj montras prononcon [k], vd. ekz. *klasifiki.* ¶ Io *artifi/co*, Ie *-cie*, Ia *-cio.*

Propr. "arta agmaniero, artefaritaĵo", de L *ar/s -tis* "arto" k *facere* "fari" (vd. tiujn).

ARTIK/O (f; RE): L *articulus*; I *art/icolo*, (H *-ículo*); kp AF *artic/ulation*, I *-olazione*, H *-ulación* s.s. Anatomia termino bazita sur L, sed mallongigita por eviti kolizion kun *artikol-*, vd. tiun. ¶ 1894 *junktur-* (< L *iunctura* "junto"). ¶ Vd. sekv.

Etimologie identa kun *artikolo*, vd. tiun.

ARTIKOL/O (f; RE; *artikul/o* Du): AF *article*, G *Artikel*, I *art/icolo*, (H *-ículo*), Po *artykul'*. La modernlingvaj idoj de L *articulus* (vd. sube) havas almenaŭ tri signifojn: 1) artiko, 2) gazeta traktaĵo, 3) varo. La du unuajn Z diferencigis, prenante *artik-* por 1 kaj *artikol-* por 2; al tio poste aldoniĝis eo *artikl-* (Wü) por 3. El tiuj diferencigoj, *artikol-* reprezentas la normalan Ean formon de L *-ulus* (*-ula*, *-ulum*): ĝi baziĝas sur I, evidente por eviti aspekton de vorto formita per sufikso *-ul.* Kp *ampolo, fenkolo, frangolo, garolo, kukolo, lupolo, muskolo, orakolo, pendolo, pilolo, pirolo, popolo, primolo, ranunkolo, regolo, skapolo, skrofolo, titolo, tremolo* (esceptoj kun konservita *ul* tamen ne estas maloftaj; ekzemplojn vidu sub *angulo*). La tipo *artik-* (kun apokopo de *ul*) retroviĝas en *furunko, krepusko, monedo, pediko.* La tipo *artikl-* (laŭ AF) aperas en la oficialaj *binoklo, disĉiplo, fablo, miraklo, spektaklo, tablo, vestiblo.* Ĝuste en tiu ĉi kazo Z hezitis inter la tri eblecoj: *artikul-* Du, *artikol-* RE, *artikl-* 1894. Analogan "triĝemelan" radikformon ni trovas ĉe *cirkel-/cirkl-/cirkul-* kaj *tabel-/tabl-/tabul-*; kp ank. *fabel-/fabl-*. ¶ 1894 *artikl-*. ¶ Io *artiko* (1), *artiklo* (2); Ie *articul* (2), *-ation* (1); Ia *articulo* (1, 2, 3).

El L *articulus* "artiko; membro; parteto (de parolado)", dim. de *artus* "artiko, membro", kp Gr *árthron* "artiko" (vd. *artrito*): HE rad. **ar-* "kunmeti", vd. *armi.*

ARTILERI/O (1; RE): A *artiller/y*, F *-ie*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Artillerie*, I *artiglieria*, Po *artyleria.* Ps-sf *-eri.* ¶ Io *artilrio* > *artilerio* 1951, Ie *artiller/íe*, Ia *-ia.*

De F ant. *artill(i)er* "ekipi, armi", probable modifo (sub influo de *art* "arto") de *atillier* "ekipi, ornami", variantformo de *atirier* s.s. (de ĝerm. origino, kp G *zieren* "ornami").

ARTIŜOK/O (f; EG): A *arti/choke* [-ĉ-], F *-choc* [-ŝó], R *-ŝok*, G *Artischocke* [-ŝ-]. Kp I *carciofo* [-ĉ-], Po *karczoch* [-ĉ-], (H *alcachofa* [-ĉ-]). Ea formo fonetike konforma al GR(F). ¶ 1894 *articok-*. ¶ Io *artichoko*, IeIa *artichoc.*

El Ar *al-ħarŝûf* s.s. (*al* dif. art., vd. *algebro*)

ARTRIT/O (f; EG): A *arthrit/is*, F *-e*, I *artrit/e*, (H *-is*); L *arthritis.* Ps-sf *-it* 1.

El Gr *arthrítis* s.s., de *árthron* "artiko" (vd. tiun).

AS/O (f; RE): A *ace*, FPo(H) *as*, G *As*, I *asso.* ¶ Io =, Ie *ass*, Ia *-e.*

El L *as* (gen.: *assis*) "unuo (de pezo, mono)", orig. "kvarangula metalpeco", identa kun L *assis* "tabulo".

ASEKUR/I (f; RE): A *assure*†, F *assurer*, I *assicurare*, Po *asekurowac'*, (H *asegurar*). La Ea formo ŝajnas farita laŭ la etimologia prototipo (vd. sube), eble kun influo de Po; Eo *sekur-*, kiu reprezentas la bazvorton, aperis pli malfrue (4-a OA) kaj do ne ludis rolon en tiu ĉi kazo. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *asekurar*, IeIa *assecurar.*

Propr. "sekurigi", el L vulg. *assecurare* s.s.: *ad* "al" (tie ĉi iga pref.), *securus* "sekura"

(vd. tiun).

ASEMBLE/O (8; PVS; ne ĉe Z): A *assembl/y*, F *-ée*, I *-ea*, (H *asamblea*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *asemblo*, Ie *assembl/é*, Ia *-ea*.

De F *assembler* "kunigi" el L vulg. **assimulare* s.s., de *ad* "al" k *simul* "kune; samtempe" (vd. sub *simila*; etimologie paralela estas *asimili*).

ASERT/I (1; Jü): A *assert*, I *asser/ire* "-i", *-to* "-o"; kp F *assertion* "-o", (H *aserto* "-o"). Bazita sur L supina radiko (vd. sube) videbla en la A verbo kaj cetere en respondaj substantivoj. Ps-pf *-a(d)*. ¶ Io *asertar*, Ie *asserter*, Ia *asserer*.

El L *asserere* (sup.: *assert-*) "atribui (al si), pretendi", propr. "alligi (al si), apudmeti": *ad* "apud", *serere* "vicigi, kunigi" (vd. *serio*, kp *dezerto*).

ASESOR/O (1; N-ro 14 1888, Jü): APo *assess/or*, F *-eur*, I *-ore*, G *Assessor*, R *assessor*, (H *asesor*). Ps-pf *a(d)-*, ps-sf *-or* 1.

El L *assessor* s.s., propr. "apudsidanto", agantnomo de *assidere* "sidi apud(e)": *ad* "apud", *sedere* "sidi" (vd. tiun).

ASFALT/O (1; RE): A *asphalt*, F *-e*, G *Asphalt*, Po *asfalt*, I(H) *-o*, R *asfal't*. Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *ásphaltos* s.s., propr. "ne-faliga (substanco)" (ĉar ĝi efikas tiel, ke muroj ne disfalegas), el *a-* "ne-" k *sphállein* "faligi".

ASIGN/I (f; RE): A *assign*, F *-er*, I *assegnare*, Po *asygnowac'*, R *assignovat'*, (H *asignar*); L *assignare*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "marki (ion por iu)", el L *ad* "al" k *signum* "marko" (vd. *signo*).

ASIMIL/I (2; Jü): A *assimil/ate*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, R *-irovat'*, Po *asymilowac'*, (H *asimilar*). Ps-pf *a(d)-*.

El L *assimilare* "similigi" (semantika evoluo: > "konformigi (al si)" > "alproprigi"), el *ad* "al" (tie ĉi iga pref.) k *similis* "simila" (vd. tiun). Kp. spec. *asembleo*.

ASIST/I (8; Jü): A *assist*, F *-er*, G *-ieren*, I *-ere*, R *-irovat'*, Po *asystowac'*, (H *asistir*). Ps-pf *a(d)-*.

El L *assistere* "asisti, helpi, apogi", propr. "star(iĝ)i apud(e)": *ad* "apud", *sistere* "stariĝi" (vd. sub *stari*).

ASOCI/O (1; Jü) 1) societo 2) kunligiteco: AF *associa/tion* (1, 2), I *-zione* (1, 2), G *Assoziation* (2), Po *asocjacja* (2), R *associacija* (1, 2), (H *asociación* 1, 2). Malgraŭ fruaj formoj pli proksimaj al tiuj de la fontlingvoj (*asoziacion/o* 1890, *asociaci/o* 1983; kp *asoc[iaci]i* Wü scienca term.) la pli mallonga formo kun haplologio (*..ci..ci* > *...ci*) enradikiĝis, sendube pro pli facila prononcebleco. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *asoci/ar* (vb) kun diversaj der. (*-ado*, *-itaro*, *-uro*); IeIa *association*.

De L *associare* "kun(l)igi": *ad* "al", *sociare* "kunigi" de *socius* "kunulo" (vd. *socio*).

ASONANC/O (2; Jü): AF *asson/ance*, I *-anza*, G *Assonanz*, Po *ason/ans*, (H *-ancia*). Ps-sf *-anc.*

De L *assonare* "kunsoni, akordi": *ad* "apud", *sonare* "soni" (vd. tiun).

ASPARAG/O (f; RE): L *asparagus*; A *asparag/us*, I *-o*, F *asperge*, G *Spargel*, Po *szparag*, R *sparĵa*, (H *espárrago*). L botanika termino forme apogata de AI. ¶ IoIa =, Ie *asparge*.

El Gr *asp(h)áragos* "asparago; juna ŝoso", eble par. al *spargán* "ŝveli"; kp ev. sub *aspergi*.

ASPEKT/O (1; Jü): AF *aspect*, (H *-o*), I *aspetto*. Ps-pf *a(d)-*.

El L *aspectus* "vido, rigardo" (kp semantike *el/rigardi* Z = aspekti), de *aspicere* "(al)rigardi": *ad* "al", *specere* "rigardi" (vd. *spektaklo*).

ASPERG/I (2; Jü): F *asper/ger*, I *-gere*, (H *-jar*); L *aspergere*. Kp A *asperse* "aspergi". Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *asper/sar*, Ie *-ser*, Ia *-ger*.

De L *ad* "al" k *spargere* "disŝprucigi, dissemi", kredeble par. al A *sprinkle*, G *sprengen*, A *spark* "sparko" (HE rad. **sperg-*).

ASPID/O (f; RE): L *asp/is -idis*; A *asp*, F *-ic*, I *-ide*, (H *áspid*). Zoologia termino laŭ L. ¶ Io *aspiko*, Ie *aspide*; mankas en Ia.

El Gr *asp/ís -ídos* s.s.; la vorto estas kredeble identa kun *aspís* "ŝildo", ĉar la koncerna serpento atakante plilarĝigas la kolon ŝil-

doforme.

ASPIR/I (3; Jü; *aspirant-* Be): A *aspir/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *aspirare*. La der. *aspir/ant-* estas ankoraŭ pli internacia (kp G *Aspirant*, Po *aspirant*). Ps-pf *a(d)-*.

Propr. "alspiri" (ev. semantika evoluo: > "proksimiĝi al" > "provi atingi, pretendi, aspiri"): L *ad* "al", *spirare* "spiri" (vd. tiun).

ASTM/O (1; Jü): A *asthm/a*, F *-e*, G *Asthma*, I(H) *asma*, PoR *astma*; L *asthma*. Ps-sf *-m(at)-*.

El Gr *ásthma* "astmo, spiregado", kredeble el HE rad. **an-* "spiri" (vd. *animo*).

ASTR/O (1; Jü): F *astr/e*, I(H) *-o*; L *astrum*. Kp A *astral*, R *astral'nyj* "astra". Int. konata per der. *astro/log(i)-*, *-nom(i)-*. ¶ IoIa =, Ie *astre*.

El Gr *ástron* "astro, stelo", kp *astêr* "stelo", ambaŭ kun prosteza *a-*; vd. plue *stelo*. Kp la sekvajn.

ASTROLOG/O (1; Jü): PoR *astrolog*, A *-er*, F *-ue*, I *-o*, G *Astrolog*, (H *astrólogo*); L *astrologus*. – Sciencnomo: **ASTROLOGI/O** (1; RE): A *astrolog/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Astrologie*. Ps-sf *-i* 1.

Pere de L *astrologia* "astro/nomio, -logio" el Gr *astrología* s.s., de *astrólogos* (> L *astrologus* ktp) "astro/nomo, -logo", de *ástron* "astro" (vd. tiun) k *-logos* "esploristo" (vd. *arkeologo*). Kp sekv.

ASTRONOM/O (1; Ka; antaŭe *astronomi/isto*): PoR *astronom*, A *-er*, F *-e*, I *-o*, G *Astronom*, (H *astrónomo*); L *astronomus*. – Sciencnomo: **ASTRONOMI/O** (1; RE): A *astronom/y*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Astronomie*; L *astronomia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *astronomía* s.s., de *astronómos* "astronomo" (> L *astronomus* ktp), orig. probable "grupiganto de steloj (laŭ konstelacioj)", de *ástron* "astro" (vd. tiun) k *-nomos*, agantnomo de *némein* "distribui, grupigi; posedi, loĝi (en, sur); paŝti". Kp la subst. *nómos* "leĝo, regulo", *nomás* "paŝtisto, nomado", *nómisma* "monero". Parencaj radikoj en Eo: *agronomo, aŭtonoma, ekonomio, gastronomio, nomado, numismatiko*. – La semantiko de tiu ĉi Gr vortgrupo prezentas problemojn, kiuj ne estas komplete solvitaj; ĝi estas par. al G *nehmen* "preni"; vd. ank. *numero*.

ATAK/I (f; Du, RE): A *attack*, G *-ieren*, F *attaquer*, I *attaccare*, Po *atak/owac'*, R *-ovat'*, (H *atacar*). Ps-pf *a(d)-*.

Orig. elipso de la I esprimo *attaccare battaglia* "komenci (propr.: kunligi) batalon": *attaccare* "alligi, alfiksi" (*a* "al"; pri la bazo *tacc-* vd. *taĉmento*) > F *attacher*, A *attach* "alfiksi".

ATAVISM/O (2; Jü) A *atavism*, F *-e*, (H) *-o*, G *Atavismus*, Po *atawizm*, R *atavizm*. Ps-sf *-ism*.

Konstruita (19a jc) el L *atavus* "prapraavo", de pref. *at-* "transe, plie" (kp Sa *áti* "trans, tre") k *avus* "avo" (vd. tiun).

ATEISM/O (2; Jü): A *atheism*, F *athéisme*, G *Atheismus*, I *ate/ismo*, PoR *-izm*, (H *ateísmo*). Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-ism*. Nomo de ano: **ATEIST/O** (3; Jü): A *atheist*, F *athée*, G *Atheist*, I *ate/o*, *-ista*, Po *ate/ista*, R *-ist*, (H *ate/o*, *-ísta*). Ps-pf *a(n)-*, ps-sf *-ist*.

Konstruitaj (16a jc) surbaze de Gr *átheos* "sendia": *a-* "sen-", *theós* "dio" (vd. *teologo*).

ATENC/I (f; RE): A *attempt* "-i; -o", F *attent/er* "-i", *-at* "-o", I *attent/are* "-i", *-ato* "-o", G *Attentat* "-o", (H *atent/ar* "-i", *-ado* "-o"). La Ea radiko montras sonŝanĝon *t* > *c*, bezonatan por diferencigi ĝin de *atent-*. (Sama ŝanĝo en *ci*, *parenco*, *senco*.) Formo **atentat-* estus neoportuna pro la sufikso *-at*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894 *atentad-*. ¶ Pri IoIeIa, vd. sub *atenta*.

El L *at/tent/are*, *-tempt-* "ataki; provi": *ad* "al", *tentare*, *temptare* "provi; tenti" (vd. tiun).

ATEND/I (f; Un): F *attendre*, I *attendere*†. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *vartar* (< G *warten*) "ĝisatendi (ion)", *expektar* (< A *expect*, L *exspectare*) "atendi, antaŭvidi, esperi"; Ie *atender* resp. *expectar*; Ia *attender* resp. *expectar*.

Orig. "esti atenta (je iu, io)". Etimologie identa kun *atenta*.

ATENT/A (f; N-ro 14 1888, RE): A *attent/ive*, F *-if*, I *-o*, (H *atento*); L *attentus*.

Z preferis la sensufiksan formon de LI(H), probable pro oportuneco. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1882 *matt-* (< R *vnimatel'nyj*). ¶ Io *atencar* "atenti" (kp *atentar* "atenci"), Ie *atenter* "atenti" (kp *atentar* "atenci"), Ia *attender* "atenti" (kp *attentar* "atenci"). Adj.: Io *atenc-ema*, Ie *atent-iv*, Ia *attent(iv)e*.

Propr. "(kun) streĉita (menso)", ptc. perf. de L *attendere* "streĉi":*ad* "al", *tendere* "streĉi, tendi" (vd. tiun). Etimologie identa radiko: *atendi*.

ATEST/I (f; N-ro 14 1888, RE): A *attest*, F *-er*, I *-are*, (H *atest/ar, -iguar*); L *attestari*. Kp G *Attest*, R *attestat* "atesto". Ps-pf *a(d)-*.

De L *ad* "al; apud" k *testari* "atesti, pruvi", de *testis* "testo", orig. **tri-stis* "staranta kiel tria (neŭtrala partio)"; vd. *tri* resp. *stari*. Samfamilia radiko en Eo: *testamento*.

ATING/I (f; RE): L *attingere*; A *attain*, F *atteindre*. Kp ank. Pg *atingir*. Radikformo bazita sur L; iom analoga estas *estingi* (F *éteindre*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *ating/ar*, Ie *-er*, Ia *attinger*.

Orig. "tuŝi je (io)", de L *ad* "al, je" k *tangere* "tuŝi" (vd. *tangento*).

ATLANTIK/O (8; *Atlantika Oceano* EG): A *Atlant/ic*, F *-ique*, G *-ik*, I *-ico*, Po *-yk*, R *Atlantičeskij okean*, (H *Atlántico*); L *Oceanus Atlanticus*. Ps-sf *-ik*. Kp ank. Gr *Atlantikón pélagos* "Atlantika maro".

Nomita laŭ la Atlas-montaro en nordokcidenta Afriko, en proksimeco de la koncerna maro; laŭ helena mitologio, la montaro estas transformaĵo de la titano *Atlaso* (Gr *Atlas*, vd. *atlaso*).

ATLAS/O 1) ŝtofo (2; RE) 2) maparo (8; Jü): AF *atlas* (2), G *Atlas* (1, 2), I *atlante* (2), Po *atl'as* (1), *atlas* (2), R *atlas* (1, 2), (H *atlas* 2). Moderna sinonimo en la senco 1: eo *sateno* PIV < AFI *satin*, G *Satin*, H *satén*, Po *satyna*. ¶ Io *atlaso* (2), *satino* (1); Ie *atlas* resp. *satine*; Ia *atlas* resp. *satin*.

Homonimoj kun diversaj etimoj: (1) el Ar *atlas* "glata" el *talasa* "glatigi, ebenigi"; (2) el *Atlas*, nomo de maparo eldonita de Mercator en 1595 (kies titolbildo montris la titanon Atlaso (Gr *Atlas*) surŝultre portantan la firmamenton), propr. "porteganto", el intensiga pref. *a-* (HE **sm-*, vd. sub *sama*) k *tlas*, part. de *tlênai* "porti" (vd. *toleri*). Kp *Atlantiko*.

ATLET/O (1; Be): A *athlete*, F *athlète*, G *Athlet*, R *atlet*, IPo(H) *-a*.

El Gr *athlêtês*, propr. "konkursanto", agantnomo de *athleín* "konkursi, lukti", de *á(e)thlon* "konkurso".

ATMOSFER/O (1; RE): A *atmo/sphere*, F *-sphère*, IPoR(H) *-sfera*, G *Atmosphäre*.

Konstruita (17a jc) el Gr *atmós* "vaporaĵo" (eble par. al *aênai* "blovi", vd. *aero*) k *sphaíra* "globo, pilko" (vd. *sfero*).

ATOM/O (1; RE): APoR *atom*, F *-e*, I *-o*, G *Atom*, (H *átomo*). Ps-pf *a(n)-*.

El Gr *átomos*, propr. "nedividebla (partikulo)", el *a-* "ne-" k *témnein* "tranĉi" (subst. *tomê* "tranĉo", kp *anatomio*); kp L *tondere* "tondi" (vd. tiun).

ATRIBU/I (1; Jü): A *attribu/te*, F *-er*, I *-ire*, (H *atribuir*); L *attribuere*. Ps-pf *a(d)-*.

De L *ad* "al" k *tribuere* "disdoni". Kp sekv. kaj *dis-*, *kon/tribui*; vd. plue *tributo*.

ATRIBUT/O (3; Jü) 1) distingilo 2) fil.: FR *attribut* (1, 2), A *-e* (1, 2), I *-o* (1, 2), G *Attribut* (1, 2), Po *atrybut* (2), (H *atributo* 1, 2). Ps-pf *a(d)-*.

El L *attributum* "(io) atribuita (al iu)", ptc. perf. de *attribuere* "atribui" (vd. tiun).

ATRIPL/O (f; RE): L *atripl/ex -icis*; I *atre/plice, atri-*. Botanika termino bazita sur L. La apokopo de *-ex* havas analogaĵojn en kelkaj aliaj biologiaj terminoj: *cimo* (< *cimex*), *kulo* (< *culex*), *pulo* (< *pulex*), *verto* (< *vertex*). ¶ Mankas en Io IeIa.

L *atriplex* (> F *arroche*) estas (popoletimologia) transformo de Gr *atráphaxys* s.s., de nekonata origino.

ATUT/O (f; RE): F *atout*, G *Atout*†, Po *atut*. Prenita el F same kiel la nomoj de la kartludaj emblemoj. ¶ Io *trumpo*, Ie *trump* (< A *trump*, G *Trumpf*); Ia *triumpho**.

Propr. "por ĉio": F *à* "al, por", *tout* "ĉio" (vd. *tuta*).

AŬ (f; Un): L *aut*; kp F *ou*, I(H) *o*. Z prenis la plej multajn kon- kaj subjunkciojn el L (vd. Gregor 1958, 97). La finkonsonanto de *aut* estas forstrekita por pli bona prononcebleco antaŭ konsonanto; analoge en *laŭ* < G *laut*. ¶ 1894 *u*. ¶ Io *o(d)*, Ie *o*, Ia *aut*.

Kp L *autem* "sed"; Gr *au* "ree; aliflanke"; Sa *u* "kaj; ankaŭ" (HE **au*).

AŬD/I (f; Un): L *audire*; F *ouir*† (kp *auditeur* "aŭdanto", *audition* "aŭdado" ktp), I *udire* (kp *auditore* "aŭdanto", *audizione* "aŭdado" ktp), (H *oir*, kp *audible* "aŭdebla", *auditivo* "aŭda" ktp). Kp ank. A *audible* "aŭdebla" k.a. Int. konata per der. *aŭdienc-*, *aŭditori-*. ¶ 1882 *od-*; 1894 *entend-* (< F *entendre*). ¶ Io *audar*, IeIa *audir*.

L *aud-* kredeble el **aŭisd-*, par. al Gr *aisthánesthai* (< *aŭis-*) "percepti" (vd. *estetiko*), Sa *âvís* "evidente". Samfamiliaj radikoj en Eo: *aŭdienco*, *aŭditorio*, *obei*.

AŬDAC/A (8; *aŭdac/i* PV; ne ĉe Z): A *aud/acious*, F *-acieux*, I *-ace*, (H *-az*); L *aud/ax -acis*. Ps-sf *-ac* 1. ¶ Io *audac-oza*, Ie *audaciosi*, Ia *audac(ios)e*.

De L *audere* "aŭdaci, riski", de **audus* "ema" = *avidus* "avida" (vd. tiun). La semantika evoluo komenciĝis en nea uzo: "ne emi > ne riski". – El L supina radiko *aus-*: F *oser*, I *osare* "kuraĝi".

AŬDIENC/O (1; RE): AF *audi/ence*, Po *-encja*, R *-encija*, (H *-encia*), G *Audienz*, I *udienza*. Ps-sf *-enc*.

El L *audientia* "aŭskultado, aŭdado", de *audire* "aŭdi", vd. tiun.

AŬDITORI/O (2; RE): A *audi/torium*, F *-toire*, I(H) *-torio*, G *Auditorium*, Po *audytorium*, R *auditorija*. Ps-sf *-ori*. ¶ Io *aud-eyo*; Ie *auditor/ia*, Ia *-io*.

El L *auditorium* "aŭskultejo", de *audire* "aŭdi" (vd. tiun).

AŬGUR/I (6; *-o* "-isto" N-ro 30 1889, Jü): A *augur*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*); L *augurari*. ¶ IoIeIa *augurar*.

De L *augur* "aŭguristo", kies unua elemento ofte estis asociita kun *avis* "birdo" (vd. *aviado*), ĉar la aŭguristoj divenis la volon de dioj laŭ flugado kaj sonoj de birdoj. Samfamilia radiko en Eo: *in- aŭguri*.

AŬGUST/O (f; Du, RE): AG *August*, F *août*, I(H) *agosto*, R *avgust*; L *(mensis) Augustus*. ¶ 1881 *Augusto*; 1882 *Aŭgusto*; 1894 *avgust-*. ¶ Io *agosto*, Ie *august*, Ia *-o*.

Nomita honore al la romia imperiestro *Augustus* (> Eo *Aŭgust/o* f', 7; Du), alnomo signifanta "majesta, respektinda" (vd. sub *aŭkcio*).

AŬKCI/O (1; Cart 1903, Jü): A *auction*, G *Auktion*, Po *auk/cja*, R *-cion*. Ps-sf *-cio*. ¶ Io *auciono*, IeIa *auction*.

El L *auctio* "pligrandigo (de la prezoj)", de *augere* "pli(grand)igi" (kp F *augmenter* s.s.). Kp L *augustus* "majesta" (orig. "pli granda"), *auctor* "iniciatinto"; Gr *áuxein* "kreskigi"; Sa *ójas* "forto"; G *wachsen* "kreski" (HE rad. **aŭ(e)g-* "pligrandigi, kreskigi". Samfamiliaj radikoj en Eo: *aŭgusto*, *aŭtoro*.

AŬREOL/O (6; Jü): A *aureol/a*, *-e*, IPo(H) *-a*, F *auréole*, R *oreol*.

El L *aureola (corona)* "ora (krono)", de *aureus* "ora", de *aurum* "oro" (vd. tiun).

AŬSKULT/I (f; Un): L *auscultare*; F *écouter*, I *ascoltare*, (H *escuchar*). Kp (med. term.) A *auscult/ate*, F *-er*, H *-ar* "brustaŭskulti". ¶ 1881 *ott-* (modifo de *od-* "aŭdi", vd. PVZ 5, 143); 1894 *askult-*). ¶ Io *askoltar*, Ie *escutar*, Ia *ascoltar*.

Kredeble el **aus-clutare*; por la unua elemento, kp L *auris* "orelo" (vd. tiun); por la dua, kp L *cluere* "nomiĝi, aŭdi certan nomon" (vd. sub *laŭta*).

AŬSTRALI/O (8; PR,Jü): AIPo(H) *Austral/ia*, F *-ie*, G *-ien*, R *Avstralija*. Ps-sf *-i* 2. ¶ IoIeIa *Australia*.

El L *Terra Australis* "suda lando" (nomo donita al la supozata kontinento jam antaŭ la malkovro), de *Auster* "suda vento", kredeble par. al A *east*, G *Osten* "oriento" (kp eo *Aŭstr/ujo* EG < AL *Austr/ia*, propr. "Orienta Regno": G *Österreich*). HE bazo

**aus-* "matenruĝo, aŭroro" (> "oriento"), kp L *aurora* (> eo *aŭror/o* Wü, ank. mit. *Aŭror/o* GE), Gr *êôs*, Sa *uŝâh* "matenruĝo". Vd. ank. *oro.*

AŬT/O (8; PV; ne ĉe Z): A (Us) *auto*, FI(H) *auto*, G *Auto.* ¶ IeIa *auto*, Io *automobilo.*

Mallongigo de *aŭtomobilo*, vd. tiun.

AŬTENTIK/A (1; Jü;*aŭtent/a* ER): A *authent/ic*, F *-ique*, G *-isch*, I *autent/ico*, Po *-yczny*, (H *auténtico*). Ps-sf *-ik.*

El Gr *authentikós* "aŭtentika, fidinda, vera", de *authentês* "memfarinto", kunm. de *autós* "mem" (vd. sekv.) kaj dua elemento trovebla en *(h)anyein* "efektivigi, plenumi".

AŬTOBIOGRAFI/O (2; Jü): A *autobiogra/phy*, F *-phie*, IPo *-fia*, (H *-fía*), G *Autobiographie*, R *avtobiografija.* Ps-sf *-i* 1.

Konstruita (19a jc) el Gr *autós* "mem" (de necerta origino; ank. en *aŭtentika, aŭto, -buso, -grafo, -krat(i)o, -mato, -mobilo, -noma*) k *biografio*, vd. tiun.

AŬTOBUS/O (8; Wü; ne ĉe Z): FIPo *autobus*, G *Autobus*, R *avtobus*, (H *autobús*). ¶ Io *autobuso*, IeIa *autobus.*

Konstruita (en F, 1907) el *auto* "aŭto" k la finsilabo de *omnibus* "omnibuso" (vd. tiujn).

AŬTOGRAF/O (2; Jü): A *autogra/ph*, F *-phe*, I *-fo*, Po *-f*, G *Autograph*, R *avtograf*, (H *autógrafo*).

El Gr *autógraphos* "skribita per (ies) propra mano", de *autós* "mem" (vd. *aŭtobiografio*) k *-graphos* de *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafo*).

AŬTOKRAT/O (2, 7; RE): A *auto/crat*, F *-crate*, I *-crata*, Po *-krata*, G *Autokrat*, R *avtokrat*, (H *autócrata*). – Nomo de sistemo: **AŬTOKRATI/O** (3; Jü): A *autocra/cy*, F *-tie*, I *-zia*, Po *-cja*, (H *-cia*), G *Autokratie*, R *avtokratija.* Ps-sf *-i* 1.

El Gr *autokrateía* "aŭtokratio", de *auto/kratês* (ank. *-krátôr*) "aŭtokrato, memreganto", kunm. de *autós* "mem" (vd. *aŭtobiografio*) kaj agantnomo de *krateín* "regi" (vd. *demokratio*).

AŬTOMAT/O (1; RE): I *automa*, A *-ton*, F *-te*, Po *-t*, G *Automat*, R *avtomat*, (H *autómata*).

El Gr *autómatos* "spontanea, okazanta per si mem", kunm. de *autós* "mem" (vd. *aŭtobiografio*) k *-matos*, probable identa kun Sa *matá-* "pensita" k par. al L *mens* "menso" (vd. tiun).

AŬTOMOBIL/O (1; Jü): AFI *auto/mobile*, (H *-móvil*), G *Automobil*, R *avtomobil'.* (En pluraj fontlingvoj la termino arkaikiĝis aŭ estis mallongigita, same kiel en Eo, je *aŭto*, vd. tiun.) Sufikso identa kun ps-sf *-bl.* ¶ Io *auto/mobilo*, Ie *-móbile*, Ia *-mobile.*

Orig. adj. signifanta "memmoviĝanta (veturilo)", konstruita (en F, ĉ. 1875) el Gr *autós* "mem" (vd. *aŭtobiografio*) k L *mobilis* "movebla" (vd. *movi*). Kp *aŭtobuso.*

AŬTONOM/A (4; PV): G *autonom*, A *-ous*, F *-e*, I *-o*, Po *-iczny*, R *avtonomnyj*, (H *autónomo*). (Nomo de sistemo: eo *aŭtonomi/o* ER < A *autonom/y*, F *-ie*, H *-ía*, IPo *-ia*, G *Autonomie*, R *avtonomija.*) ¶ Io *autonom/a, -eso*; Ie *autonom, -ie*; Ia *autonom/e, -ia.*

El Gr *autónomos* (adj., de kiu subst. *autonomía*), propr. "havanta proprajn leĝojn", de *autós* "mem" (vd. *aŭtobiografio*) k *nómos* "leĝo" (vd. sub *astronomo*).

AŬTOR/O (f',1; Un): A *author*, F *auteur*, G *Autor*, Po(H) *autor*, I *-e*, R *avtor.* Ps-sf *-or* 1. ¶ Io *autoro*, IeIa *autor.*

El L *au(c)tor* "garantianto; aŭtoritatulo; iniciatinto; verkisto", orig. "akcelanto", agantnomo de *augere* "kreskigi, pligrandigi" (vd. *aŭkcio*). Kp sekv.

AŬTORITAT/O (f',1; Ald,RE): A *authority*, F *autor/ité*, I *-ità*, Po *-ytet*, (H *-idad*), G *Autorität*, R *avtoritet.* Ps-sf *-tat.*

El L *auctori/tas -tatis* "garantio, fidindeco, rajt(ig)o, povo; imitinda modelo; graveco, aŭtoritato", de *auctor* (vd. *aŭtoro*).

AŬTUN/O (f; Un): A *autumn* [-tem], F *automne* [-tón], I *autunno*, (H *otoño*); L *autumnus.* En la modernlingvaj formoj, nur unu nazalo estas prononcata, kaj Eo sekvas la modelon de FI. Kp *solena.* ¶ 1894 *atun-.* ¶ Ie *autun*, Io *-o*, Ia *autumno.*

L vorto de necerta origino.

AV/O (f; Un): L *avus*; I *avo*. Kp F *aïeul*, H *abuelo* s.s. Bazita sur L kiel la plej multaj familianaj terminoj (*filo, frato, infano, nepo, patro* ktp). ¶ 1882 *avo*. ¶ IoIeIa *avo*.

L vorto (el dim. **aviolus* devenas la FH formoj) kun der. *atavus* "praavo" (vd. *atavismo*) k *avunculus* "onklo" (vd. tiun). Par. al Gt *awo* "avino", G *O(heim)* "onklo" (HE **aŭo-*).

AVANTAĜ/O (8; Wü; ne ĉe Z): A *advantage*, F *avantage*, I *vantaggio*, (H *ventaja*). Ps-sf *-aĝ*; cetere laŭ F. ¶ Io *avantajo*, IeIa *avantage*.

Propr. "antaŭaĵo", de F *avant* "antaŭ" (vd. tiun).

AVAR/A (f; Un): L *avarus*; A *avar/icious*, F *-e*, I(H) *-o*. ¶ 1906a *avra*. ¶ Ia *avar*, Io *-a*, Ie *-i*.

De L *avere* "deziregi" (vd. *avida*).

AVEL/O (f; EG): L *(nux* "nukso") *avellana, abellana* (kp L bot. *Corylus avellana* "avelujo"); F *aveline*, I(H) *avellana*. Apokopo, evidente por eviti aspekton de derivaĵo kun suf. *-an* (analoge en *orfo*). ¶ Io *avel/ano*, Ie *-ane*, Ia *-lana*.

Orig. "(nukso) el Abella" (urbo en Kampanio, kiu ricevis sian nomon pro la tiea kultivado de pomoj, kp A *apple*, G *Apfel*, R *jabloko* "pomo".

AVEN/O (f; RE): L *avena*; F *avoine*, I(H) *avena*. ¶ Ie *aven*, Io *-o*, Ia *-a*.

Kp R *ovës*, Po *owies* s.s.

AVENTUR/O (f; RE): A *adventure*, F *aventur/e*, (H *-a*), G *Abenteuer*, I *avventura*, Po *awantura*, R *avantjura*. Formo laŭ F. Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *aventur/o*, IeIa *-a*.

El L mez. *adventura (res)* "(io) alvenonta (= okazonta)", ptc. fut. de *advenire* "okazi, alveni": *ad* "al", *venire* "veni" (vd. tiun). Kp spec. *advento* k sekv.

AVENU/O (8; Wü; ne ĉe Z): AF *avenue*, G *Avenue*, (H *avenida*). ¶ Io *aven/uo*, Ie *-úe*, Ia *-ue*. Ps-pf *a(d)-*.

Orig. "alvenejo", substantivigita ptc. perf. de F ant. *avenir* "alveni: *à* "al", *venir* "veni" (vd. tiun). Kp spec. *advento, aventuro*.

AVERT/I (f; RE): F *avertir*, I *avvertire*, (H *advertir*). Ps-pf *a(d)-*. ¶ Io *avertar*, IeIa *advertir*.

El L *advertere* "(sin) turni al, atentigi" (kp A *advertise* "anonci"), de *ad* "al" k *vertere* "turni" (kp *konverti*; vd. plue sub *verso*).

AVIAD/O (5; Dmitriev 1920; ne ĉe Z): AF *avia/tion*, I *-zione*, R *-cija*, (H *-ción*), Po *awiacja*. Surpriziga traktado de la fontlingva sufikso (normale *-cio*) sen analogaĵoj; eble por sugesti signifnuancon similan al tiu de Eo *-ad* (*-cio* ofte signifas unuopan agon), aŭ pro konsidero al pluformado (*aviad-il-o* preferinda al **aviaci-il-o*). Estas ankaŭ imageble, ke la konkuranta formaĵo A *aviatics*, G *Aviatik* s.s. (nuntempe arkaika) ludis rolon ĉe la kreo de la termino; tamen tio ankaŭ ne klarigas la radikfinon. ¶ Io *aviac(ad)o*, IeIa *aviation*.

Konstruita (en F, 1863) el L *avis* "birdo" (> H *ave*; el L dim. **avicellus*: F *oiseau*, I *uccello*). Kp Sa *veh* "birdo", Gr *aietós* "aglo" (HE **aŭei-*). Ev. par. al *aŭguri*; kp ank. *ovo*.

AVID/A (f; RE): A *avid*, F *-e*, I *-o*, (H *ávido*); L *avidus*. Ps-sf *-id*. ¶ 1906 *avda*. ¶ Ie *avid*, Io *-a*, Ia *-e*.

De L *avere* "deziregi, sopiri" (kp *avara*), par. al Sa *ávati* "favoras, protektas".

AVIZ/O (f; RE): A *advice* "-o", *advise* [-z] "-i", F *avis* "-o", *-er* [-z-] "-i", G *Avis*† "-o", *avisieren*† "-i", I *avvis/o* [-z-] "-o", *-are* "-i", Po *awiz/o* "-o", *-owac'* "-i", R *adviz*† "-o", *-ovat*† "-i", (H *avis/o* "-o", *-ar* "-i"). Eo *-z-* havas fortan apogon en la prononco de la fontlingvoj kaj sekvas la ĝeneralan tendencon voĉigi intervokalan *s*; kp cetere la samfamiliajn *vizo, vizio, viziero*. Ps-pf *a(d)-*. ¶ 1894 *avis-*. ¶ Io =, Ie *avis/e*, Ia *-o*.

Orig. "opinio", elipso de la F ant. esprimo *ce m'est à vis* "tio ŝajnas al mi": *à* "al; laŭ", *vis* < L *visum* "kio ŝajnas, vidiĝas", ptc. perf. de *videre* "vidi" (vd. tiun).

AZEN/O (f; Un): L *asinus*; A *ass*, F *âne*, I *asino* [-z-], (H *asno* [-z-]). Kp ank. G

Esel, Po *osiol'*, R *osël* s.s. Bazita sur L kun voĉigo de intervokala *s* (kp *avizo*) kaj ŝanĝo de *-in-* je *-en-* (vd. sub *abomeni*; ĉe bestonomoj, konsideroj al la in-formo igas tiun ŝanĝon aparte dezirinda: **azin-in-o* malplaĉus pro malbonsoneco. Kp *ermeno*). ¶ 1894 *asen-*. ¶ Io *asno*, Ie *ásino*, Ia *asino*.

La cititaj formoj ĉiuj fontas en L *asinus*, kredeble, samkiel Gr *ónos* s.s., pruntita de malgrandazia lingvo; kp Aramea *ês* s.s.

AZI/O (8; PR,Be): A(H) *Asia*, F *Asie* [-z-], G *Asien*, I *Asia* [-z-], Po *Azja*, R *Azija*. Eo *-z-* laŭ la plimulto de la fontlingvoj. ¶ Io *Azia*, IeIa *Asia*.

Pere de L *Asia* (precipe "Malgrandazio") el Gr *Asía* s.s., de nekonata origino; i.a. asociita kun Asiria *Asu* "oriento, sunleviĝo".

AZIL/O (2; Jü): A *asylum*, F *asile* [-z-], G *Asyl*, I(H) *asilo* [I -z-], Po *azyl*; L *asylum*. Intervokala *s* voĉigita kiel kutime en Eo, kp ekz. *azeno*. Ps-pf *a(n)-*. ¶ Io =, Ie *asil*, Ia *asylo*.

El Gr *ásylon* "rifuĝejo", propr. "(loko) ne prirabenda", el *a-* "ne-" (vd. ps-pf *a(n)-*) k *sylán* "rabi".

AZOT/O (f; RE): Po *azot*, F *-e*, I *-o*, (H *ázoe*). Kp A *azotic* "azota". Ps-pf *a(n)-*. (Moderna sinonimo: eo *nitrogen/o* PV < A *nitro/gen*, F *-gène*, I *-geno*, H *nitrógeno*.) ¶ Io *azoto*, Ie *azot*, *nitrogen*, Ia *nitrogeno*.

Konstruita (en F de de Morveau 1787) el Gr *a-* "ne" k *zoê* "vivo" (pro la nespirebleco de la koncerna elemento); vd. *zoologio*, kp *vivi*.

B

BABIL/I (f; Un): A *babble*, F *babiller*. Kp G *babbeln* "babilaĉi". Formo laŭ F kun *-l-* reprezentanta [l'], vd. *abelo*. ¶ Io *babilar*, Ie *babillar*, Ia *garrular* (< L *garrulus* "babilemulo").

Onomatopea vorto; vd. ank. *balbuti*, *barbaro*.

BACIL/O (2; Jü): A *bacill/us*, F *-e*, I *-o*, R *-a*, G *Bazillus*, Po *ba(k)cyl*, (H *bacilo*); L bot. *Bacillus* (genra nomo).

Konstruita (de Cohn, 1872) el L postkl. *bacillus* "bastoneto", dim. de L *bacul/us*, *-um* "bastono", par. al Gr *báktron* "bastono" (vd. *bakterio*) kaj A *peg* "kejlo" (HE bazo **bak-*).

BAGATEL/O (f; RE): F *bagat/elle*, I *-tella*, Po(H) *-ela*, G *Bagatelle*.

Plej ofte klarigita kiel der. de L *baca* "bero", do orig. "malgrandaĵo", aŭ de L mez. *baga* "pakaĵeto" (de ĝerm. orig., kp A *bag* "sako").

BAJONET/O (f; RE): A *bayonet*, (H *-a*), F *baïonnette*, G *Bajonett*, I *baionetta*, Po *bagnet*.

El la nomo de la F urbo *Bayonne*, kie oni unue fabrikis tiujn armilojn (16a jc).

BAK/I (f; Un): A *bake*, G *backen* [bak-]. Kp Nd *bakken*, Sv *baka*. Specifa verbo mankas en la latinidaj lingvoj (vd. Collinson 1959, 8), kiuj uzas la frazon "kuiri en la forno" (F *cuire au four*, H *cocer al horno*, I *cuocere al forno*). ¶ 1894 *inform-*. ¶ Io *bakar*, Ie *panificar* (propr. "panfari"), Ia *cocer in le forno*.

El pĜ rad. **bak-*, kp R *pekar'* "bakisto"; par. al Gr *phôgein* "rosti" (HE rad. **bhog-*).

BAKTERI/O (2; Jü): A *bact/erium*, F *-érie*, (H *-eria*), G *Bakterie*, I *batterio*, Po *bakter/ja*, R *-ija*.

Konstruita (19a jc) el Gr *bakt/êrion*, *-êría* "bastoneto", dim. de *báktron* "bastono" (vd. *bacilo* kun komuna origino kaj analoga semantiko).

BAL/O (f',1; Du, RE): A *ball*, F *bal*, G *Ball*, I *ballo*, PoR *bal*, (H *baile*). ¶ Io =, Ie *ball*, Ia *ballo*.

Orig. "dancado", de L postkl. *ballare* "danci", kredeble el Gr *ballízein* s.s., propr. "ĵeti (la gambojn)", de *bállein* "ĵeti" (vd. *balistiko*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *balado*, *baleto*.

BALA/I (f; Un): F *balayer*. Tiu ĉi estas la sola verbkaraktera radiko finiĝanta per *a*; por eviti malagrablajn hiatojn kiel *balaas* Z en 1894 proponis *balaj-*. ¶ IoIe *balayar*, Ia *scopar* (de *scopa* "balailo" < H *escoba*, I *scopa*).

De F *balai* "balailo" el Bretona *bala(z)n* "genisto" (ĉar oni iam fabrikadis balailojn el tiu speco de arbustoj).

BALAD/O (2; RE): A *ball/ad*, F *-ade*, I *-ata*, PoR *-ada*, G *Ballade*, (H *balada*). Ps-sf *-ad*. ¶ 1881 *balladdo*.

El Oc *ballada*, orig. "danckanto", de *ballar* "danci" (kp *balo*).

BALANC/I (f; Un): F *balanc/er*, (H *-ear*). Kp A *balanc/e*, G *-ieren* "ekvilibr(ig)i", R *balansirovat'* "ekvilibri". Z donis F sencon al la internacia radiko. ¶ 1894 *ba-*

lanz-. ¶ Io *baskul-igar* (*-ar* "balanciĝi" < F *basculer*), Ie *balan/sar*, Ia *balanciar*.

De F *balance* (H *balanza*) "pesilo" el L *bilancia* s.s. Vd. *bilanco*.

BALAST/O (1; RE): AFR *ballast*, G *Ballast*, Po *balast*.

Kredeble el la ĝerm. esprimo *barlast* "nuda ŝarĝo" (kp Sv *barlast* "balasto") t.e. kion portas la ŝipo kiam ĝi estas 'nuda', sen kargo. Unua elemento: A *bare*, G *bar* (pĜ rad. **baz-*; kp R *bosoj* "nudpieda": HE **bhoso-* "nuda"). Dua elemento: G *Last*, kp G *laden*, A *load* "ŝarĝi" (pĜ rad. **hladh-*, par. al R *klast'* "meti").

BALBUT/I (f; RE): F *balbu/tier*, (H *-cir*, *-cear*), I *balbettare*; L *balbutire*. ¶ 1881 *balb-*. ¶ Io *balbut/ar*, IeIa *-iar*.

Kp L *balbus* "balbutanta". De onomatopea origino, kp Sa *balbalakaróti* "balbutas". Vd. ank. *babili*, *barbaro*.

BALDAKEN/O (f; RE): A *balda/chin*, *-quin* [-k-], F *-quin* [-kê], I *-cchino* [-k-], Po *-chim* [-ĥ-], R *-ĥin*, (H *-quín* [-k-]), G *Baldachin* [-k-]. Vokalŝanĝo *i* > *e* en Eo (tie ĉi eble inspirita de F prononco, kp *arlekeno*) por eviti similecon de la radikfino al la sufikso *-in*; vd. *abomeni*. ¶ Io *balda/kino*, Ie *-chine*; mankas en Ia.

De I mez. *Baldacco* "Bagdado" (la vorto orig. signifis delikatan ŝtofon el tiu urbo).

BALDAŬ (f; Un): G *bald*. Inter la *aŭ*-vortoj prenitaj el G troviĝas ankoraŭ unu kun tempa signifo, nome *morgaŭ*. Pri la vortfino *-aŭ*, vd. la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1894 *prestu* (< I *presto*). ¶ Io *balde*, Ie *bentost* (F *bientôt*, I *bentosto*†), Ia *tosto* (< I *tosto*).

Pere de G mez. *balde* "kuraĝe, verve" el G ant. *bald* "kuraĝa", kp A *bold* s.s. (pĜ **baltha-*).

BALEN/O (f; RE): F *baleine* [-lén], I *balena*, (H *ballena*); L *balaena* [L zool. -lén-]. Vokalismo laŭ I kaj prononce ankaŭ laŭ FI(L); por F *ei* [e] > Eo *e* kp *neĝo*, *peno*. ¶ Ie *balen*, Io *-o*, Ia *-a*.

El Gr *pháll/aina*, *-ê* s.s.; la besto estis tiel nomata pro sia buleca formo (kp *phállos* "peniso"; vd. plue sub *bulo*).

BALET/O (6; Du, RE; en PV rigardata kiel dim. de *bal/o*): AF *ballet*, I *-to*, G *Ballet*, PoR *balet*, (H *bailete*). Ps-sf *-et*.

Dim. de I *ballo* "danc(ad)o", vd. *balo*.

BALISTIK/O (2; Be): A *bal/listics*, F *-istique*, I *-istica*, Po *-istyka*, R *-listika*, (H *-ística*), G *Ballistik*. Ps-sf *-ik*.

Formita (18a jc) el L *ballista* "balisto, antikva katapulto", kp Gr *ballístra* s.s. der. de *bállein* "ĵeti" (apofoniaj variantoj *ball-*, *bl(e)-*, *bol-*, kp *balo*, *emblemo*, *problemo*, *diablo*, *paroli*, *simbolo*), eble par. al Sa *gálati* "malsuprengutas", G *Quelle* "fonto" (HE rad. **gŭel-* "fali, lasi fali").

BALKON/O (1; Du, RE): A *balc/ony*, F *-on*, I *-one*, (H *-ón*), G *Balkon*, PoR *balkon*. Ps-sf *-on*. ¶ 1881 *balk-*.

Itala aŭgmentativo de la ĝerm. rad. *balk-* "trabo" (ekz. A *balk*, G *Balken* < pĜ **balkan-*; detala pritrakto de Golden, Akad. St. 1987, 188 s.), par. al Gr *phálanx* "ŝtipo, trunko" (vd. *falango*); kp ank. G *Block* "bloko" (vd. tiun).

BALON/O (2; Jü): A *balloon*, F *ballon*, G *Ballon*, I *pallone*, Po *balon*, (H *balón*). Ps-sf *-on*.

Propr. "pilkego", aŭgmentativo de I *palla* (F *balle*) "pilko", de ĝerm. origino (kp A *ball*, G *Ball* s.s. < pĜ **ballan-*; vd. plue sub *bulo*). Samfamilia radiko en Eo: *baloti*.

BALOT/I (2; RE): A *ballot*, I *-tare*, R *-irovat'*, Po *balotowac'*, (H *balotar*). Kp F *ballotage* "nedecidiga baloto".

Der. de I *ballotta* "balotglobeto", dim. de I dial. *balla* "pilko" (= I *palla*, vd. *balono*).

BALUSTRAD/O (f; RE): AF *balustr/ade*, Po *-ada*, G *Balustrade*, I *balaustr/ata* (H *-ada*), R *baljustrada*. Ps-sf *-ad*.

Der. de F *balustre* "koloneto", el Gr *balaústion* "granatarba floro" (kies kalikeroj similas al kolonetoj).

BALZAM/O (2; RE): A *bal(sa)m*, F *baume* (kp *balsamique* "balzama"), G *Balsam*, Po *balsam*, I *-o*, R *bal'zam*, (H *bálsamo*). La Ea formo montras *-z-* (apogata nur de R) en pozicio inter voĉa konsonanto

kaj vokalo; kp *-lz-* en *kolzo*, *-nz-* en *bronzo* (vd. tiun), *-rz-* en eo *kurzo* (PV). Kp. ank. sekv. ¶ Io =, Ie *balsam*, Ia *-o*.

El Gr *bálsamon* "balzam(arb)o", pruntita de semida lingvo (kp Ar *baŝâm*, He *beŝem* s.s.). Kp sekv.

BALZAMIN/O (2; Jü): AF *balsamin/e*, IPo(H) *-a*, G *Balsamine*, R *bal'zamin*. Eo *-lz-* analoge al *balzamo*. ¶ Io =, Ia *balsamina*; mankas en Ie.

El Gr *balsamínê* (kiu tamen signifas alian planton, nome "Kreta piretro" = *Anacyclus radiatus*), propr. "balzama (herbo)", de *bálsamon* "balzamo" (vd. tiun).

BAMBU/O (f; RE): A *bamb/oo*, F *-ou*, I *-ù*, Po *-us*, R *-uk*, (H *-ú*), G *Bambus*. Kp L bot. *Bambusa*. ¶ Io *bamb/uo*, Ie *-ú*, Ia *-u*.

El Malaja *bambu* s.s. (konata en Eŭropo ekde la fino de la 16a jc).

BAN/I (f; Un): F *baigner*, I *bagnare*, (H *bañar*). Kp R *banja* "banejo". Latinida [n'] redonita per *n*, vd. *akompani*. – Kiel mnemonikan apogon oni povas rigardi (neparencajn) A *bathe*, G *baden* s.s. ¶ 1894 *bagn-*. ¶ IoIe *balnar* (< L *balneare*, vd. sube), Ia *baniar*.

El L postkl. *balneares*.s., de L *balneum* "bano" el Gr *balaneíon* "ban(ej)o".

BANAL/A (2; Ka): AFG(H) *banal*, I *-e*, Po *-ny*, R *-'nyj*. Ps-sf *-al*.

De F *ban* "dekreto (de feŭdestro)†" (semantika evoluo: > "deviga por ĉiuj pro dekreto" > "komunuza" > "neoriginala") el Franka *ban*, ĝerm. vorto identa kun A *ban* "malpermeso", G *Bann* "ekskomuniko" (HE rad. **bha-*, vd. *fablo*). Kp *bandito*.

BANAN/O (2; Be): PoR *banan*, AI(H) *-a*, F *-e*, G *Banane*.

El Pg *banana* (16a jc) de pridisputata origino; kredeble ĉerpita el afrika dialekto en Gvineo aŭ Kongolando.

BAND/O (f; RE): A *band*, F *-e*, IPoR *-a*, (H *-o*), G *Bande*. ¶ Io *band/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Itala vorto, orig. "soldataro kun komuna standardo", kp L mez. *bandum* "standardo" (de ĝerm. origino, vd. *banderolo*).

BANDAĜ/O (2; N-ro 14 1888, RE): AF *band/age*, Po *-az'*, R *-aĵ*, G *Bandage*. Ps-sf *-aĝ*.

De F *bander* "bandaĝi", de *bande* "bendo" (de ĝerm. origino, vd. *bendo*).

BANDEROL/O (1; RE): G *Banderole*†, Po *bander/ola*, R *-ol'*. Kp (neparencan) F *bande*. Latinida vorto akceptita kun slava-ĝermana signifo. ¶ Io *(paper)bendo*, Ie *banderol* (ank. "flagrubando"). Kp Ia *bandierola* "flagrubando".

El I *banderola* "flageto" (kp AF *banderole* s.s.), dim. de *bandiera* "flago, standardo" el L vulg. **bandaria* (kp A *banner*, F *bannière*, G *Banner* "standardo") de L mez. *bandum* "milita signo, standardo" (de ĝerm. origino, kp Gt *bandwa* s.s.; vd. ank. *bando*).

BANDIT/O (2; Jü): AFR *band/it*, I *-ito*, Po *-yta*, (H *-ido*), G *Bandit*. Ps-sf *-it*.

Propr. "ekzilito", ptc. perf. de I *bandire* "ekzili; proklami" el ĝerm. radiko trovi ĝanta en G *Bann* "ekskomuniko", vd. *banala* (I *-d-* pro kruciĝado kun la radiko en Gt *bandwjan* "signali").

BANK/O (1; RE): APoR *bank*, F *banque*, G *Bank*, I *banc/a*, *-o*, (H *banco*). ¶ Io =, Ie *bank*, Ia *banca*.

Itala vorto, propr. "benko (de monŝanĝisto)", de ĝerm. origino (vd. etimologie identan *benko*). Kp sekv.

BANKIER/O (6; RE): A *bank/er*, Po *-ier*, R *-ir*, F *banqu/ier* [-k-], (H *-ero* [-k-]), G *Bankier*, I *banchiere* [-k-]. Kun apogo de FGIPo, Eo *-ier-* reprezentas la plimulton de la fontlingvoj; vd. cetere la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1881 *bankir/o*. ¶ Io *bank/isto*, Ie *-ero*, Ia *banchero*.

Latinida der. de la subst. signifanta "banko", vd. tiun. Kp sekv.

BANKROT/O (1; RE): A *bank/ruptcy*, Po *-ructwo* (kp *-rut* "-inta"), R *-rotstvo* (*-rot* "-inta"), F *banqueroute*, G *Bankrott* (*b-* "-inta"), I *banca/rotta*, (H *-rrota*). Bazo estas evidente la radiko *bank-*; la vokalo *-o-* trovas apogon en ĝermana, latinida kaj slava lingvoj (GIR). ¶ Io =, Ie *bankruptie*, *bancrotte*, Ia *bancarupta*.

El I esprimo *bancarotta*, propr. "ruinigita banko": *banca*, vd. *banko*; *rotta* propr. "rompita", ptc. perf. de *rompere* "rompi" (vd. tiun).

BANT/O (f; RE): R *bant*. La vorto havas etimologian kaj semantikan rilatojn ankaŭ al A *band* "ligilo", G *Band* [bant] "ligilo, rubando, bendo" (kp *Bandschleife* "banto" Kor. UV), F *bande* "bendo". ¶ 1894 *nod-* (vd. *nodo*). ¶ Specifa vorto mankas en IoIeIa; Io (laŭ Jacobs) *nodo, slingo*.

R *bant* el G *Band* (vd. *bendo*).

BAPT/I (f; Un): A *bapt/ize*, F *-iser*, (H *-izar*), I *battezzare*; L *baptizare*. Apokopo en Eo, verŝajne por eviti kolizion kun la pseŭdosufikso *-iz* (sama apokopo en *gargari*). Oni ankaŭ povas konsideri la eblecon de retroformaĵo el *baptist-* (A *baptist*, F *-e*, L *-a*, I *battista*). ¶ Io *baptar* (espismo), IeIa *baptisar*.

El Gr *baptízein* "bapti; trempi", de *báptein* "trempi".

BAR/I (f; Un): A *bar*, F *barrer*, I *sbarrare*. ¶ Io *barar*, IeIa *barrar*.

Latinida der. de subst. signifanta "stango, barilo": F *barre*, IH *barra* < L vulg. **barra*, eble de kelta origino. Samfamiliaj radikoj en Eo: *bariero, embaraso*.

BARAK/O (2; Jü): F *baraque* [-k], G *Baracke*, I *baracca*, PoR *barak*, (H *barraca*). Kp A *barracks* "kazerno". ¶ Io =, Ie *baracca*, Ia *barraca*.

H vorto, kredeble de *barro* "koto, ŝlimo" (do orig. pri kabano farita el terŝmiraĵo), eble de ibera origino.

BARAKT/I (f; RE): R *barahtat'sa* (refl.). R *ĥ* > Eo *k* kiel en *kreno*. Senrefleksivigo en Eo, vd. *aboni*. ¶ 1894 *sping-* (kredeble < I *spingere* "puŝi"). ¶ Io *baraktar* (espismo); Ie *stramplar* (< G *strampeln*); Ia *debatter se* (< F *se débattre*).

Slava vorto (kp Po *borykac'sie* "lukti, barakti"), supozeble pluformaĵo de R *borot'sa* "lukti" (tiuokaze par. al L *ferire* "bati").

BARB/O (f; Un): F *barbe*, I(H) *barba*; L *barba*. Kp G *Bart* s.s. ¶ Io *barb/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

Latin (id) a vorto el HE **bhardha* (rad. kiel en *barĉo*), kp ank. A *beard*, Po *broda*, R *boroda*. Samfamilia radiko en Eo: *barbiro*.

BARBAR/O (1; RE): A *barbar/ian*, F *-e*, I *-o*, G *Barbar*, Po *barbarzyn'ca*, R *varvar*, (H *bárbaro*); L *barbarus*.

El Gr *bárbaros* "fremdulo, neheleno", orig. "persono kiu parolas nekompreneble (balbute)" (onomatopea vorto). Kp Sa *bárbara-* "balbuta". Vd. ank. *babili, balbuti*.

BARBIR/O (f; RE): A *barb/er*, F *-ier*, I *-iere*, (H *-ero*), G *Barbier* [-ír]. Ps-sf *-i(e)r*. ¶ 1894 *barbier-*. ¶ Io *barb/isto*, IeIa *-ero*.

El L postkl. *barbarius* "barbisto", de L *barba* "barbo" (vd. tiun).

BARĈ/O (f; RE): Po *barszcz* [-ŝĉ], R *borŝĉ*. Bazita sur Po kun necesa fonetika simpligo *ŝĉ* > *ĉ* por plifaciligi la prononcon al neslavoj. ¶ 1894 *barc-*. ¶ Mankas en IoIeIa, kiuj anstataŭe uzas kunmetojn (Io *betravsupo*, Ie *sup de bet-rapes*, Ia *suppa de betarapas*).

Slava vorto, orig. "herakleo" (analoga supo estis pli frue farata el tiu herbo), tiel nomita pro siaj pintaj folioj, el HE **bhar(e)s-* "io elstara: pinto, brosharo k.s.", kp Sa *bhrsti-* "pinto, rando", G *Bürste* "broso". Vd. ank. *barbo, brodi* kaj ev. *broso*.

BARD/O (1; La E-isto 2,1889; Wü): APoR *bard*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Barde*; L postkl. *bardus*. ¶ IoIe *bardo*; mankas en Ia.

Kelta vorto, kp Ir *bard* s.s.

BAREL/O (f; Un): A *barr/el*, (H *-il*), F *bar/il*, I *-ile*, Po *baryl'ka*. Formo laŭ A; **baril-* estus neebla pro *bar-il-o*. ¶ Io =, Ie *baril*, Ia *barril*.

Latinida vorto kun duba etimologio. Samfamilia radiko en Eo: *barikado*.

BARELIEF/O (3; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *mal/alt/reliefo*): A *bas-relief* [besri-, bari-], F *bas-relief* [bar-], G *Basrelief* [bar-], I *basso-rilievo*, R *barel'ef*, (H *bajo-relieve*). La formo de la unua elemento estas bazita sur F prononco (F > AGR; rimarku ties F-similan prononcon!); la dua

nature devis konformiĝi al *reliefo* (1a OA). ¶ Io *reliefo basa*, Ie *bass-relief*, Ia *basse relievo*.

Propr. "malalta reliefo". Vd. *baso* resp. *reliefo*.

BARIER/O (3; Jü): A *barr/ier*, F *-ière*, I *-iera*, (H *-iera*), G *Barriere*, Po *bariera*, R *bar'er*. ¶ Io *bar-il-o*, Ie *barr/iere*, Ia *-iera*.

De F *barre* (HI *barra*) "stango, barilo" (vd. *bari*).

BARIKAD/O (2; Be): AF *barric/ade*, I *-ata*, (H *-ada*), G *Barrikade*, Po *barykada*, R *barrikada*. Ps-sf *-ad*.

Kredeble de F *barrique* "barelo" (ĉar bareloj estis uzataj por la unuaj barikadoj), gaskona vorto kun la sama radiko kiel *barelo*.

BARITON/O (1; Be): A *bar/itone*, FPo *-yton*, I *-itono*, R *-iton*, (H *-itono*), G *Bariton*.

I termino, el Gr *barytonos* "malalttona", de *barys* "peza" (vd. *barometro*) k *tónos* "tono" (vd. tiun).

BARK/O (f; RE): A *bark*, F *barque* [-k], G *Bark(e)*, I(H) *barca*, PoR *barka*. ¶ Io =, IeIa *barca*.

El L *barca* s.s., de Gr *báris* "barĝo, floso", el Eg (kp Kopta *bar* "boateto").

BAROMETR/O (f; RE) A *baro/meter*, F *-mètre*, I *-metro*, PoR *-metr*, G *Barometer*, (H *barómetro*).

Konstruita (en A de Boyle, 1655) el Gr *báros* "pezo" (kp *barys* "peza", vd. *baritono* kaj plue sub *grava*) k *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

BARON/O (1; Du, RE): AFPoR *baron*, I *-e*, G *Baron*, (H *barón*).

El L mez. *bar/o -onis* "(libera) viro", de ĝerm. origino (resp. al G ant. *baro* "viro, batalisto".

BAS/O (1; RE): A *bass*, F *-e*, I *-o*, G *Bass*, PoR *bas*, (H *bajo*). ¶ Io =, IeIa *basso*.

I vorto, propr. "malalta" (kp ank. F *bas*, H *bajo* s.s.), el L postkl. *bassus* "dika, kompakta", eble de oska origino. Samfamilia radiko en Eo: *bareliefo*.

BASEN/O (2; Jü): A *basin*, F *bassin* [-ê], G *Bassin* [-ê], I *bacino*, Po *basen*, R *bassejn*. La radikfino *-en*, per kiu estas evitata simileco al sufikso *-in*, estas tie ĉi apogata de Po(R) ortografio kaj FG prononco. Vd. sub *abomeni*. ¶ Io = (espismo), Ie *bassin/e*, Ia *-o*.

El L vulg. *baccinum* "pelvo" (> G *Becken* s.s.), de **bacca* "akvujo", kredeble de gaŭla origino.

BASK/O (f; RE): F *basque* [-k]. Moda termino prenita el F. ¶ Io =, Ie *falde* (propr. "faldaĵo"); mankas en Ia.

Pli frue F *baste*, el Oc *basto* "refaldaĵo", subst. de *bastir*, identa kun F *bâtir* "loze kudri" (vd. *bastiono*). – La F formo eble sub influo de *basquine* "(speco de) jupo" (identa kun H *basquiña*, Pg *vasquinha*, cititaj de Bastien s.v.), kiu ne estas parenca (propr. "vaskaĵo").

BAST/O (f; RE): A *bast*, G *Bast*. ¶ Io *bast/o*, Ie *-e*, Ia *libro* (< LFH *liber*, I *libro*).

Ĝerm. vorto (kp Sv *bast* s.s.), eble par. al L *fascis* "fasko" (vd. tiun). Der. verbo: **bastjan* "plekti", vd. *bastiono*.

BASTARD/O (1; Be): APoR *bastard*, I(H) *-o*, F *bâtard*, G *Bastard*. Ps-sf *-ard*.

El F ant. *bastard*, kredeble el L mez. *bastum* "ŝarĝoselo" (> F *bât*, I *basto* s.s.), do propr. "generita sur selo (ne en geedza lito)", kp F ant. *fils de bast* "eksteredzeca filo". – L *bastum* orig. "portaĵo" de **bastare* "porti" el Gr postkl. **bastán* s.s., kp Gr *bastázein* "porti".

BASTION/O (f; RE): AFPoR *bastion*, I *-e*, G *Bastion*, (H *bastión*). Ps-sf *-on*.

De I *bastia* "bastiono" (> G *Bastei* s.s.), orig. "palisaro", kun radiko identa kun tiu de F *bâtir* "konstrui; (loze) kudri", de ĝerm. origino (pĜ **bastjan* "plekti"). Kp *basto*.

BASTON/O (f; Un): F *bâton* (kp *bastonnade* "-ado"), I *bastone*, (H *bastón*). Kp ank. A *baton* "taktobastoneto", G *Bastonnade* "-ado". ¶ Io =, IeIa *baston*.

Der. de L (4a jc) *bastum* "bastono"; se orig. "apogilo", ĝi povas esti rilatigata al la vortoj cititaj sub *bastardo*.

BAT/I (f; Un): F *battre*, I *battere*, (H *batir*); L *battuere*. Kp A *batter* "batadi,

frakasi"; ankaŭ A *beat* "bati" (neparenca) pro identeco de konsonantismo povas esti rigardata kiel apogo por la radiko. ¶ Io *batar*, IeIa *batter*.

Latin (id)a vorto de gaŭla origino. Samfamiliaj radikoj en Eo: *batalo, bataliono, baterio, debati, rabato.*

BATAL/o (f; Un): A *battle*, F *bataille*, I *battaglia*, (H *batalla*). Latinida [l'] redonita per *l* kiel en *detalo, medalo.* Kontrastas *bataliono*, vd. tiun kaj plue sub *abelo.* (Ps-sf *-al.*) ¶ Io *batalio*, Ie *battal/ie*, Ia *-ia.*

El L (6a jc) *battualia* "(speco de) skermo", de *battuere* "bati" (vd. tiun). Kp semantike G *schlagen* "bati": *Schlacht* "batalo".

BATALION/O (1; RE): A *batt/alion*, I *-aglione*, F *bat/aillon*, Po *-alion*, R *-al'on*, (H *-allón*), G *Bataillon.* Latinida [l'] redonita per *li* kiel en *brilianto, felietono, medaliono, miliardo, talio*; kp *abelo.* Ps-sf *-on.*

I vorto, aŭgmentativo de *battaglia* "batal(trup)o", vd. *batalo.*

BATERI/O (1; RE) 1) mil., 2) elektr.: A *batt/ery* (1,2), F *-erie* (1,2), I *-eria* (1,2), G *Batterie* (1,2), Po *bat/eria* (1,2), R *-areja* (1,2), (H *-ería* 1,2). Ps-sf *-eri.*

F vorto, orig. "batado" (semantika evoluo: > "batilo" > "kanonoj grupigitaj" > "piloj grupigitaj"), de *battre* "bati", vd. tiun.

BATIST/O (2; RE): R *batist*, AF *-e*, I(H) *-a*, G *Batist*, Po *batyst.*

F vorto, el la nomo de iu *Baptiste*, kiu laŭdire la unua teksis tiun ŝtofon (13a jc) en Cambrai, Francujo.

BAZ/O (1; Jü): A *bas/e, -is*, FI(H) *base* [FI z], G *Basis* (kem. *Base*), Po *baza*, R *baz/a, -is.* Eo *-z-* estas normala en tiu ĉi tipo de grekdevenaj radikoj (kp ekz. *dozo, frazo, krizo, tezo*; vd. ps-pf *-z*)), krome tie ĉi necesa por diferencigi disde *bas/o*, samtempe oficialigita. ¶ Io =, IeIa *base.*

El Gr *básis* "fundamento; tio, sur kio oni iras; irado", de *baínein* "iri" (kp *akrobato, diabeto*; vd. sub *veni*).

BAZALT/O (2; Be): A *basalt*, F *-e* [-z-], I(H) *-o* [I -z-], G *Basalt*, Po *bazalt*, R *bazal't.* ¶ Io =, Ie *basalt/e*, Ia *-o.*

El L (Plinio) *basaltes* s.s., misskribo de Gr *basanítês líthos* "tuŝŝtono; elprovado", el Eg *baħan* "speco de ardezo" (uzita por elprovi oron).

BAZAR/O (f; RE): A *bazaar*, FIPoR(H) *bazar*, G *Basar, Bazar.* ¶ Io =, IeIa *bazar.*

El Pe *bazar* "vendejo".

BAZILIK/O (2; Jü): AI *basil/ica* [I -z-], F *-ique* [-z-], G *Basilika*, Po *bazylika*, R *bazilika*, (H *basílica*); L *basilica.* Ps-sf *-ik.*

El Gr *basilikê (stoá)* "reĝa (halo)", de *basileús* "reĝo", de nehelena origino. Kp sekv.

BAZILISK/O (1; Jü): A *basil/isk* [-z-], F *-ic* [-z-], I(H) *-isco* [I -z-], G *Basilisk*, Po *bazyliszek*, R *vazilisk*; L *basiliscus.* ¶ Io =, Ie *basilisco*; mankas en Ia.

El Gr *basilískos* s.s., propr. "reĝeto" (pro la kronforma ŝvelaĵo sur la kapo de la besto), dim. de *basileús* "reĝo" (vd. *baziliko*).

BEB/O (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *infan/eto*): A *baby* [béjbi], F *bébé*, G *Baby* [bé:bi], (H *bebé*). La Ea formo povas esti kopio de F aŭ proksimuma transskribo de A. ¶ Io *infant-et-o*, Ie *bebé*, Ia *baby.*

A vorto, kredeble dim. formo (kp *babe* s.s.). Infanvorto de onomatopea origino. Kp ev. *bubo.*

BED/O (f; RE): A *bed*, G *Beet.* Akcepto de la A formo ebligis uzon de *bet-* kun alia signifo. Collinson 1959, 5. ¶ Io =, Ie *bed*; Ia *parterre* (< F).

Propr. "lito" (kp, kun tiu senco, A *bed*, G *Bett*, Sv *bädd* < pĜ **badhja-*). Se orig. "kavigita kuŝejo", par. al la vortoj cititaj sub *fosi.*

BEDAŬR/I (f; Un): G *bedauern* [-aŭ-]. Forfalo de neakcentata *-e-* kiel en (ankaŭ G-devenaj) *daŭri, flustri, kaŭri.* Collinson (1959, 10) nomas la elekton surpriza. Tamen la alternativo (**regret-* < A *regret*, F *-ter*) havas la malavantaĝon esti konfuzebla kun afikso kaj komence kaj fine. Detala pritrakto ĉe Golden 1983 (kiu konsideras prunton de antaŭa planlingvo, konstatante ke Mundografie de von Gablenz 1864 havas radikon

bedur-). ¶ 1894 *regret-*. ¶ IoIe *regretar*, Ia *regrettar*.

Nurgermana vorto, el G mez. *(be)tären*, orig. el la esprimo *des (be)täret mich* "tio estas tro kosta por mi", de *tiure* "kosta" (> G mod. *teuer*, kp A *dear* "kara").

BEK/O (f; N-ro 15 1888, RE): A *beak*, F *bec*, I *becco*; L *beccus*. (Kp H *pico*, Pg *bico*.) ¶ Io =, Ie *bec*, Ia *becco*.

Latin(id)a vorto, probable de gaŭla origino.

BEL/A (f; Un): F *beau*, *bel(le)*, I(H) *bello*; L *bellus*. Kp A *belle* "belulino", *embellish* "plibeligi". ¶ 1881 *bell-*. ¶ Io =, Ie *bell*, Ia *-e*.

Orig. dim. de L *bonus* "bona" (kp semantike H *bueno* "bona", *bonito* "beleta"). Vd. *bona*; kp *beladono*, *beletristiko*.

BELADON/O (f; RE): AIR *bella/donna*, F *-done*, Po(H) *-dona*, G *Belladonna*†; L bot. *Atropa belladonna*.

El I esprimo *bella donna* "bela virino" (ĉar ekstrakto el tiu planto estis uzata por plibeligi virinajn okulojn). Vd. *bela* k *damo*.

BELETRISTIK/O (1; Jü; *beletr/o* PV; kp *beletrist/o* LI 1896): AF *belles-lettres* [belletr] (kp A *belletristic* "-a"), G *Belletristik*, I *belle lettere*, Po *beletrystyka*, R *belletristika*, (H *bellas letras*). La oficiala Ea formo estas bazita sur GR; tamen la ĉeesto de du pseŭdosufiksoj (*-ist*, *-ik*) kvazaŭ invitis al oportunigo de la radiko per mallongigo; kp ankaŭ la pli mallongajn latinidajn variantojn. Tiu procezo atingis sian finon en PIV, kie oni registras *beletr/o* kiel ĉefan formon kaj arbitre donas al *beletristik/o* la sencon "esplorado kaj pristudo de beletro". ¶ Io *(bela) literaturo*, Ie *bell-litteratura*, Ia *belles-lettres* (kp adj. *belletristic*).

Formita en G de *Belletrist* "-isto", bazita sur F *belles-lettres*, propr. "bela literaturo" (vd. *bela* resp. *litero*).

BELG/O (8; Jü): Po *Belg*, A *-ian*, F *-e*, G *-ier*, I(H) *belga*, R *bel'giec*. ¶ IoIe *Belgo*, Ia *belga*.

El L *Belga*, nomo de ano de antikva popolo en norda Gaŭlujo; vorto de kelta origino, kutime asociita kun Ir *bolgaim* "ŝvelas" (do orig. "grandulo"?), kp G *Balg* "balgo", A *belly* "ventro" (HE rad. **bhelgh-*).

BEN/I (f; Un): F *bénir*, I *benedire*, (H *bendecir*); L *benedicere*. Mallonga radikformo laŭ F, kredeble kun konsidero al pluformado (*mal/beni* ktp). ¶ 1881 *ben-*; 1894 *benedik-*. ¶ Io *bene/dikar*, Ie *-dir*, Ia *-dicer*.

Propr. "diri bonon (al iu)", de L *bene* "bone" k *dicere* "diri". Vd. *bona*.

BEND/O (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *stri/o*): A *band*, F *bande*, G *Binde*, *Band*, I *benda*, (H *venda* [b-], *banda*). I aperas kiel kredebla fonto, sed pli verŝajna estas transpreno de Io *bendo*. Kp Ie *band*, Ia *banda* (rimarku, ke *band-* en Eo estis okupita per alia signifo ; iom analoga estas la paro *banko* : *benko*).

De ĝerm. origino: pĜ **banda-* "ligilo", apofonia varianto de **bindan* "ligi", kp Gt *bandi* "ligilo", Sa *bandhá-* "ligo". Vd. plue *bindi*; kp spec. *bandaĝo*, *banto*.

BENK/O (f; Un): A *bench*, F *banc*, G *Bank*, I *panca*, *banco*, (H *banco*). Kp ank. Sv *bänk* [benk]. La formo *bank-* estante necesa por alia signifo, Z prenis la vokalon *-e-* el A. ¶ Io = (kp *banko* "banko"), Ie *banca* (kp *bank* "banko"), Ia *banco* (kp *banca* "banko").

Ĝerm. vorto (pĜ **banki-*); la kutimo havi sidbenkojn laŭ la muroj de la domo estas orig. ĝermana. – Etimologie identa kun *banko*.

BENZIN/O (1; Jü): R *benzin*, AF *-e* (kem.), I *-a*, G *Benzin*, Po *benzyna*, (H *bencina*). Ps-sf *-in* 2.

Konstruita (de Mitscherlich, 1833) el L mez. *benzoe* "benzoo" (benzino estis origine fabrikata el benzoa rezino), el Ar *lubângâwi* "incenso el Javo", par. al He *levônâ* "incenso".

BER/O (f; RE): A *berry*, G *Beere*. Kp ank. Sv *bär* [ber]. Collinson 1959, 5. ¶ 1894 *bak-* (< L *bacca*). ¶ Io =, Ie *bere*, Ia *baca*.

Ĝerm. vorto (pĜ **basja-*), kp ank. Gt *weina-*

basi "vinbero".

BERIL/O (2; Jü): APo *beryl*, F *béryl*, G *Beryll*, I *berillo*, R *beril*, (H *berilo*); L *beryllus*. ¶ Io *ber/ilo*, Ie *-ille*, Ia *-yllo*.

El Gr *bêrylloss*.s., de hinda origino: (Prakrita *veruliya*, kredeble de *Velur*, nomo de urbo en suda Hindujo (nuntempe *Belur*). Kp *brili*.

BEST/O (f; Un): F *bête* (kp *bestial* "besteca"), IL *bestia*. Kp A *beast* "besto, spec. kvarpiedulo, rajdbesto, bredbesto", (H *bestia* "ŝarĝo-, tir/besto, kvarpiedulo"); krome G *Bestie*, R *bestija* "sovaĝbesto". Forstreko de *i* laŭ AF, eble por konservi la akcenton sur la unua silabo (kp tamen eo *besti/o* "sovaĝbesto" PIV!). ¶ 1894 *animal-*. ¶ Io *bestio* (kp *animalo* "animalo"), Ie *bestie, animale*, Ia *bestia, animal*.

Latin(id)a vorto. Laŭ kelkaj de HE rad. **dhŭes-* "spiri" (ekz. en Li *dvesiù* "spiras"); se tiel, par. al G *Tier* "besto". (Kp semantike L *animal* de HE rad. **an-* "spiri".)

BET/O (f; RE): A *beet*, F *bette*, G *Beete*, I *bietola*, (H *betarraga*); L *beta*. ¶ Io =, Ie *bet*, Ia *-a*.

Latin(id)a vorto, kredeble de kelta origino.

BETUL/O (f; RE): L *betul(l)a*; F *bouleau*, I *betulla*, (H *abedul*, Pg *bétula*). Botanika termino bazita sur L. ¶ 1894 *betl-*. ¶ Io *birko* (< A *birch*, G *Birke*), Ie *betul*, Ia *-a*.

Latin(id)a vorto de gaŭla origino (kp Ki *bedwen* s.s.).

BEZON/o (f; Un): F *besoin* [-z-], I *bisogno* [-z-]; kp ank. Oc *bezonh*. La Ea formo povas esti rigardata kiel simpligo de F (*oin* [oê] malfacile transskribebla; kp tamen F *foin* > Eo *fojno*) aŭ kiel miksformo de FI (kun *-n-* por [n'], vd. *akompani*). ¶ 1894 *beson-*. ¶ Io =, Ie *beson*, Ia *besonio**.

Latinida vorto (kp F *soin*, Oc *sonh*, L vulg. *sonium* "zorgo") de ĝerm. origino (*be-* ĝerm. pref. kiel en *bedaŭri*); kp G *Sühne* "pentofaro; kontentigo".

BIBLI/O (1; Un): A *Bible*, F *bible*, G *Bibel*, I *bibbia* (kp *biblico* "biblia"), Po *Biblia*, R *Biblija*, L *Biblia*. La dua *-i-* en Eo inspirita ĉefe de L? ¶ Io *biblo*, Ie *bible*, Ia *Biblia*.

El Gr *biblía*, propr. "libroj (sanktaj)" (sing.: *biblíon*), orig. dim. de *bíblos, byblos* "papiruso; papirusa rulo, libro", el *Byblos*, greka nomo de la fenica urbo *Gebal* (nuntempe *Ĝebail*), de kie papiruso estis eksportata. Samfamiliaj radikoj en Eo: *biblio/graf(i)o, -teko*.

BIBLIOGRAF/O (7; Wü; antaŭe *bibliografi/isto*): A *biblio/grapher*, F *-graphe*, I *-grafo*, PoR *-graf*, G *Bibliograph*, (H *bibliógrafo*). – Sciencnomo: **BIBLIOGRAFI/O** (2; Jü): A *biblio/graphy*, F *-graphie*, IPo *-grafia*, R *-grafija*, (H *-grafía*), G *Bibliographie*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *biblíon* "libro" (vd. *biblio*) kaj *-gráphos* "(pri)skribanto" resp. *-graphía* "(pri)skribado" (de *gráphein* "skribi", vd. *telegrafi*). Ambaŭ kunm. jam en Gr ant. ("libroskribisto, kopiisto" resp. "libroskribado"); nuna senco ekde 17a jc.

BIBLIOTEK/O (f; Du, RE): F *biblio/thèque*, I(H) *-teca*, PoR *-teka*, G *Bibliothek*; L *bibliotheca*.

El Gr *bibliothêkê* s.s., de *biblíon* "libro" (vd. *biblio*) k *thêkê* "deponejo" (kp *apoteko*; vd. *tezo*).

BICIKL/O (1; Be): A *bicycle, bike*, F *bicyclette* (antaŭe ank. *bicycle*), I *bicicl/etta*, (H *-eta*). Atendeble, Z evitis la diminutivaspektan vortfinon por ebligi formadon de Ea diminutivo *bicikl-et-o*. ¶ Io *biciklo*, Ie *bicycl/ette*, Ia *-etta*.

Konstruita en A (ĉ. 1870) el L pref. *bi-* "du-" (ank. en *bilanco*; kp *binoklo, bis*; vd. sub *du*) k Gr *kyklos* "rado" (vd. *ciklo*).

BIEN/O (f; RE): F *bien*. Kp (H *bienes* "terposedaĵoj"), I *beni* "riĉaĵo", Pg *bens* "posedaĵoj". ¶ Io *domeno* (< A *domain*, F *-e*), Ie *domen*, Ia *proprietate rural* ("kampara posedaĵo"), *latifundio* (< L *latifundium*), *dominio*. Kp Ie *ben*, Ia *benes* "proprietaĵo(j)".

Orig. "bonaĵo(j)", el L *bene* "bone; io bona", kp *bonus* "bona" (vd. tiun).

BIER/O (f; Un): A *beer* [-ie], F *bière*, G *Bier*, I *birra*. La Ea formo kongruas skribe kun FG, prononce kun F(A). ¶ Ie *bir*, Io *-o*, Ia *-a*.

Okcidentĝermana vorto kun pridisputata etimologio; i.a. asociita kun L *bibere* "trinki".

BIFSTEK/O (1; Jü): A *beefsteak* [bi:f-], F *bifteck*, G *Beefsteak* [bi:f-], I *bistecca*, Po *befsztyk*, R *bifšteks*, (H *biftec*). Videble bazita sur la A originvorto. ¶ Io =, Ie *bifstec*, Ia *beefsteak*.

Propr. "bov-rostaĵo", de A *beef* "bovaĵo" (vd. *bovo*) k *steak*, orig. signifanta viandon trapikitan per rostostango (kp A *stick* "piki"), de skandinava origino (kp Sv *stek* "rostaĵo", *sticka* "piki"; vd. plue sub *instigi*).

BIGOT/O (1; *-a* Jü): AFPo *bigot*, I *-to*; G *bigott* "bigota". ¶ Io *bigota* (adj.), Ie *bigott* (adj.), Ia *bigot* (subst.).

F vorto, orig. nomo per kiu la frankoj moknomis la normandojn, eble laŭ ilia ĵuresprimo A ant. *bîgod* "je Dio" (A *by God*, kp G *bei Gott*). Kp sub *bivako*.

BILANC/O (1; RE): A(H) *balance*, F *bilan*, G *Bilanz* [-ts], I *bilancio*, Po *bilans*, R *balans*. Komencsilabo *bi-* estis nepra por diferencigi la radikon disde la jam ekzistanta *balanc-*. ¶ Io =, Ie *bilancie*, Ia *balancia*.

Orig. "ekvilibro", el L *bilancia*, *bilanx* "pesilo (kun du teleroj)", de *bi-* "du-" (vd. *biciklo*) k *lan/x -cis* "pelvo", kp Gr *lékos* s.s. Etimologie identa kun *balanci*.

BILARD/O (2; RE): A *bill/iards*, F *-ard*, G *Billard*, I *biliardo*, Po *bilard*, R *bil'jard*, (H *billar*). Latinida [l'] redonita per *-l-*kiel en *bileto*, *gilotino*, *vanilo* (vd. sub *abelo*). Kun *bilard-* kontrastas *miliard-*. Ps-sf *-ard*. ¶ IoIa *biliardo*, Ie *billiard*.

De F *bille* "globeto", de ĝerm. origino (Franka **bikil* "ĵetkubo").

BILD/O (1; Jü): G *Bild*. Kp Ji *bild*, krome Sv *bild*. La latinida ekvivalento (L *imago* ktp) jam estis okupita per alia signifo (*imag-* RE). ¶ Io *imajo*, Ie *imag/e*, Ia *-ine* (vd. sub *imagi*).

Ĝerm. vorto (kp ank. Nd *beeld*) de necerta origino.

BILET/O (3; RE; *biljet-* N-ro 5 1889): F *billet*, G *Billet*, I *biglietto*, PoR *bilet*, (H *billete*). La nura *-l-*kiel reprezentanto de latinida [l'] (vd. *bilardo*) havas bonan ortografian apogon (FGPoR). Ps-sf *-et*. ¶ Io *bilieto*, IeIa *billet*.

Modifo (laŭ F *bille*, vd. *bilardo*) de F ant. *bullette*,, dim. de *bulle* "buleo" el L mez. *bulla* "buleo, (dokumento kun) sigelo", orig. "kapselo por sigelo; aerveziko" (vd. *boli*).

BIND/I (f; Un): A *bind*, G *binden*; kp Nd *binden*, Sv *binda*. La cititaj formoj konsistigas la ĝeneralan ĝermanan vorton por "ligi"; Z specialigis la sencon en Eo sendepende de la fontlingvoj. Certagrade analoga estas *baki* : *kuiri*, sed tie la sencospecialigo kuŝas jam en la etnaj lingvoj. Kp ankaŭ la paron *streĉi* : *etendi* (Collinson 1959, 8-9). ¶ 1894 *interlig-*. ¶ Io *bindar* (espismo); mankas en IeIa, kie oni uzas *ligar* "ligi" ankaŭ en tiu senco.

Ĝerm. vorto (pĜ **bind-*), kp Gt *bindan* "ligi", G *Band* "rubando, bendo", *Bund* "ligo", A *bond* "ligilo". Par. al Sa *badhnâti* "ligas", *bandhá-* "ligo", Gr *peísma* (< **penthsma*) "šnurego" (HE rad. **bhendh-*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *bandaĝo*, *banto*, *bendo*.

BINOKL/O (3; Jü): A *bin/oculars*, F *-ocle*, I *-oc(c)olo*, R *-okl'*, (H *-óculo*). Bazita sur F kun apogo de R. Kp eo *monokl/o* EG. ¶ Io *bi-lorn-eto*, Ie *bilorniette*, Ia *binoculo*.

El L mod. *binoculus* "speco de duobla teleskopo", konstruita (de de Rheita, 1645) el L *bini* "duopaj" (kp *kombini*; vd. plue sub *du*) k *oculus* "okulo" (vd. tiun).

BIOGRAF/O (7; Wü; antaŭe *biografi/isto*): A *bio/grapher*, F *-graphe*, I *-grafo*, PoR *-graf*, G *Biograph*, (H *biógrafo*). – Arto- kaj verkonomo: **BIOGRAFI/O** (2; RE): A *bio/graphy*, F *-graphie*, IPo *-grafia*, R *-grafija*, (H *-grafía*), G *Biographie*. Ps-sf *-i* 1.

La agantnomo estas farita (18a jc), laŭ modelo de *geograf-* k.a., el la artonomo, de Gr mez. *biographía* "priskribo de (ies) vivo",

de Gr *bíos* "vivo" (kp *amfibio, biologi(i)o*; vd. plue sub *vivi*) k *gráphein* "skribi" (vd. *telegrafi*). Kp spec. *aŭtobiografio.*

BIOLOG/O (7; Wü; antaŭe *biologi/isto*): PoR *biolog*, A *-ist*, F *-iste*, I *-o*, G *Biologe*, (H *biólogo*). – Sciencnomo: **BIOLOGI/O** (1; Be): A *bio/logy*, F *-ie*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), G *Biologie*. Ps-sf *-i* 1.

Sciencistnomo farita laŭ modelo de *arkeolog-* k.a.; sciencnomo konstruita en F (de Lamarck, 1802) el Gr *bíos* "vivo" (vd. *biografo*) k *-logía* "scienco", de *-lógos* "esploristo" (kp *arkeologio*; vd. *logiko*).

BIRD/O (1; Un): A *bird*. Formo bazita sur A ortografio sen konsidero al la prononco same kiel en ekz. *boato, gurdo*. Radikelekto eble inspirita de Vp *böd* (Golden 1979c). ¶ 1894 *ukcel-* (< I *uccello*). ¶ Io *ucelo*; Ie *avie*, Ia *ave* (< L *avis*).

Nur-angla vorto (A ant. *brid* "birdido") de nekonata origino.

BIRET/O (4; Jü): A *biretta*, F *barrette*, G *Barett*, I *berretta*, Po *biret*, R *beret*, (H *birrete*). Bazita su APo, evidente ĉar la vokaloj -a- kaj -e- estis netaŭgaj pro konfuzeblo kun *bar-et-o* resp. *ber-et-o*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *berete*; mankas en Ia.

De L postkl. *birrus* "mantelo kun kapuĉo", probable de gaŭla origino (kp Ki *byr* "mallonga").

BIRM/O (8; Wü; ne ĉe Z): A *Burma*, F *Birman/ie*, I(H) *-ia*, G *Birma, Burma*, R *Birma*. Vokalo *-i-* laŭ la plimulto de la fontlingvoj. ¶ IoIe *Burma*, Ia *Birmania**.

El *bama* [bemá], unu nomo de la ĉefa enlanda lingvo. La duoblecon de formoj (*-i-,-u-*) kaŭzis diversaj provoj transskribi tiun nomon per A ortografio.

BIS (4; Be): FIPoR(H) *bis*. ¶ IoIeIa *bis*.

El L *bis* "dufoje", identa kun Sa *dvíh*, Gr *dís*, A *twice* s.s. (HE **dŭis*). Kp *biskvito*; vd. *du*.

BISKVIT/O (f; RE): AF *biscuit* [F -kŭí], G *Biscuit* [-kv-], I *biscotto*, Po *biskwit* [-kv-], R *biskvit*, (H *biscocho*). Bazita sur F, kies formo disvastiĝis al GPoR. ¶ Io *bisquito*, IeIa *biscuit*.

Latinida vorto, el L mez. **biscoctus*: *bis* "dufoje" (vd. *bis*), *coctus* "kuirita, bakita" (> F *cuit*, H *cocho*, I *cotto*), ptc. perf. de *coquere* "kuiri" (vd. tiun).

BISMUT/O (f; RE): AF *bismuth*, G *Wismut*, I(H) *bismuto*, Po *bizmut*, R *vismut*. ¶ Io =, Ie *bis/mut*, Ia *-muth*.

G vorto (> L mod. *bisemutum*), probable nomita laŭ la unua bismutminejo (1440) en *St. Georgen in der Wiesen* [vi:s-]; la dua elemento el G mez. *muten* "voli, deziri (ion havi), peti permeson (por ekspluati minon)" de *Mut* "intenco†, menso†" (nun: "kuraĝo").

BITUM/O (1; Jü): A *bitumen*, FI *bitume*, G *Bitumen*, Po *bitum(en)*, (H *betún*); L *bitu/men -minis*. La mallonga formo en Eo povas esti inspirita de FI sed ankaŭ reprezentas unu manieron trakti L *-men* (vd. sub *fulmo*). ¶ Io =, Ie *bitúmine*, Ia *bitumine*.

L vorto de kelta origino. Kp Sa *játu* "lako, gumo", G *Kitt* "mastiko" (HE **gŭetu* "rezino"). Etimologie identa estas eo *betono* ER < F *béton*, G *Beton*, H *betón*.

BIVAK/O (1; Jü): AF *bivouac*, G *Biwak*, I *bivacco*, Po *biwak*, R *bivak*, (H *vivac* [b-]). ¶ Io =, IeIa *bivac*.

El malaltG *bi-wake*, propr. "apud-gardantaro" (eksterdoma, kontraste al la ĉefa gardantaro loĝanta endome), kunm. de *bî* (G *bei*) "apud" (kp A *by* "apud", Nd *bij* "ĉe, apud": pĜ **bi* < HE **bhi*, var. de **ambhi* "ĉirkaŭ", vd. *ambicio*) k *wake* (G *Wache*) "gard(antar)o" (vd. *veki*). Kp *bigoto*.

BLANK/A (f; Un): F *blanc*, I *bianco*, (H *blanco*). ¶ Io =, IeIa *blanc*.

Latinida vorto de ĝerm. origino (kp G *blank* "brila", A *blank* "senskriba, blanka (pp papero)"; prapar. al *flamo*, vd. tiun.

BLASFEM/I (1; RE): A *blas/pheme*, F *-phémer*, (H *-femar*), I *bestemmiare*; L postkl. *blasphemare*. ¶ IoIe *blas/femar*, Ia *-phemar*.

El Gr *blasphêmeín* "insulti", de *phêmê* "diro" (kp *famo*); la unua elemento estas eble *blábê* "damaĝo".

BLAT/O (f; RE): L *blatta;* F *blatte*, I

piattola. Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =, Ie *blatt/e*, Ia *-a.*

L vorto kun necerta etimologio. (I formo diminutiva.)

BLAZON/O (1; Jü): A *blazon*†, F *blason* [-z-], I *blasone* [-z-], (H *blasón*). ¶ Io =, IeIa *blason.*

F vorto de nekonata origino.

BLEK/I (f; RE): G *blöken* "ŝaf-, bov/-bleki"; kp Gr *blêkhásthai* "ŝafbleki", ank. Ji *bleketsen.* Kredeble bazita sur G sola. Por G *ö* > Eo *e*, kp *meblo, mevo, pekli.* La formoj **bal-*, **bel-*, kiuj havus pli grandan internaciecon (vd. sube) estis neeblaj pro aliaj signifoj atribuitaj al tiuj sonkombinoj. ¶ 1894 *kri-*. ¶ Io *bramar* (< H *bramar*). Ĝenerala vorto mankas en IeIa; kp Ie *belar* "ŝafbleki" (< F *bêler*), Ia *balar* "ŝafbleki" (< L *balare*).

Onomatopea vorto, precipe imitanta la krion de ŝafoj. Paralelaj formoj estas krome A *bleat*, H *balar*, I *belare*, R *blejat'.*

BLIND/A (f; RE): AG *blind.* Kp ank. NdSv *blind.* Collinson 1959, 8 alkalkulas la vorton al ĝermandevena grupo de korpaj difektoj (ank. *lam-*, *kripl-*). La latinidaj lingvoj ne havas klaran alternativon (F *aveugle*, I *cieco*, H *ciego* malfacile asimileblaj). ¶ Io =; Ie *ciec*, Ia *cec.*

Kp Gt *blinds* s.s. Orig. signifo "malhela, obskura", kp Li *blandùs* "neklara" (HE rad. **bhlendh-*).

BLOK/O (3; RE): A *block*, F *bloc*, G *Block*, I *blocco*, PoR *blok*, (H *bloque* [-ke]). ¶ Io =, Ie *bloc*, Ia *-o.*

Ĝerm. vorto, kredeble par. al pĜ **balkan-* "trabo" (vd. *balkono*). Kp sekv.

BLOKAD/O (3; *blok/ad/o* Jü): A *blockade*, F *blocus*, G *Blockade*, I *blocco*, PoR *blokada*, (H *bloqueo*). Ps-sf *-ad*; tamen daŭre analizebla kiel rad. *blok-* + suf. *-ad*, vd. PIV. ¶ Io *blokuso*, IeIa *blocada.*

La formo kun *-ad-* (AGPoR) reprezentas (arkaikiĝintan) latinidan derivaĵon (I *bloccata*† k.a.) de I *blocco* (resp. F *bloc*, H *bloque*), vd. *bloko.*

BLOND/A (f; RE): AFG *blond*, I *biondo*, (H *blondo*); kp Po *blondynka*, R *blondin* "blondulino". Carlevaro PL 7, 1983, 14. ¶ Ie *blond*, Io *-a*, Ia *-e.*

Latinida vorto (kp L mez. *blundus* "flava"), kiun oni (nepruvite) supozas esti de ĝerm. origino. Eble par. al Sa *bradhná-* "ruĝ/eca, -eta".

BLOV/I (f; Un): A *blow.* A *ow* > Eo *ov* ankaŭ en *bovlo, brovo*; kp *droni.* ¶ 1894 *sofl-* (< F *souffler*, I *soffiare*, H *soplar*). Collinson 1959, 9. ¶ Io *suflar*, IeIa *suflar.*

Ekskluzive A vorto; la aliaj ĝerm. lingvoj prezentas radikon plivastigitan per *-s*: G *blasen*, Nd *blazen*, Sv *blåsa* [-o:-]. De HE rad. **bhlê-*, kp L *flare* "blovi" (de la der. *sufflare* devenas la cititaj latinidaj formoj).

BLU/A (f; Un): A *blue*, F *bleu*, G *blau*, I *blu.* Z preferis la pli simplan vokalismon de AI. ¶ Io =, Ie *blu*, Ia *blau.*

Vorto de ĝerm. origino: pĜ **blewa-*, identa kun L *flavus* "flava, blonda" (malgraŭ la senco; signifoj de koloradjektivoj ofte forte varias en diversaj lingvoj).

BLUZ/O (1; Jü): AF *blouse* [F -u-, AF -z], G *Bluse*, I *blusa, bluse* [-z-], Po *bluz(k)a*, R *bluza*, (H *blusa*). ¶ Io =, Ie *blus/e*, Ia *-a.*

F vorto, kredeble el L mez. *pelusia* "teksaĵo el *Pelusium*" (urbo en norda Egiptujo, kie estis fabrikataj indigokoloraj kiteloj).

BOA/O (f; RE) 1) serpento, 2) peltaĵo: AFIPoR(H) *boa* (1, 2), G *Boa* (1, 2); L zool. *Boa.* La radikfina *a* troviĝas en ĉiuj fontlingvoj; do estas nature ĝin konservi malgraŭ maloportuna hiato (**bo/o* cetere estus neebla pro la prefikso *bo-*). De tiu tipo, nur *boa/o* kaj *mana/o* troviĝas en UV; ili fariĝis modelo por multaj aliaj (ekz. *firma/o* Wü, *vila/o* PV). La senpera apudesto de tri vokaloj (*oao*) estas unika en la oficiala vortprovizo (kp tamen eo *ia/i* PIV). ¶ Io =, IeIa *boa.*

El L *boa* "akvoserpento" de necerta origino.

BOAT/O (f; RE): A *boat*, F *bateau*, G *Boot*, I *battello*, R *bot*, (H *bote*). Bazita sur A ortografio; *bat-* same kiel *bot-* estis

okupitaj per aliaj signifoj (ambaŭ en Un). A-devena *-oa-* ankaŭ en *koakso.* ¶ Io *batelo,* Ie *bote,* Ia *barca* (< HI *barca*).

Ĝerm. vorto (kp Nd *boot,* Sv *båt* [bo:t]) de pridisputata origino. Oni supozas kiel orig. signifon "kavigita (trunko)", sed ne estas klare, ĉu oni rilatigu la vorton al L *findere* "fendi" aŭ L *fodere* "fosi" (vd. tiujn). (F kaj I formoj diminutivaj.)

BOBEN/O (f; RE): A *bobbin,* F *bobine,* (H *bobina*). Vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti koincidon kun sufikso *-in* (vd. *abomeni*; tie ĉi sen ia ajn apogo prononca). ¶ 1894 *bobin-.* ¶ Io *bobin/o,* Ie *-e,* Ia *-a.*

F vorto kun necerta etimologio (eble de onomatopea origino).

BOJ/I (f; Un): A *bay,* F *aboyer,* I *abbaiare.* Formo bazita sur F (*-oy-* traktita kiel *-oi-*, kp *fojo, fojno*) sed kun aferezo de sama speco kiel en *lerta, migdalo.* La aferezo povas esti inspirita de A; tiuokaze oni devus rigardi la formon kiel miksaĵon de A kaj F. Aŭ Z, konsciante la onomatopean karakteron de la vorto, volis senbalastigi ĝin je la neesprimiva prefikso. ¶ 1894 *aboj-.* ¶ IoIe *aboyar,* Ia *latrar* (< L *latrare*).

FI vorto (A < F), kp F ant. *abaiier.* De onomatopea elemento **bai-*, imitanta hundoblekon.

BOJKOT/I (2; Jü): A *boycott,* F *-er,* G *boykottieren,* I *boicottare,* Po *bojkot/owac',* R *-irovat',* (H *boicotear*). ¶ Io *boikotar,* Ie *boicottar,* Ia *boycottar.*

A vorto, el *Boycott,* nomo de irlanda bienadministristo, kiu (en 1880) estis punata de farmista organizaĵo per kolektiva rifuzo.

BOKS/I (1; Jü): A *box,* F *-er,* G *-en,* (H *-ear*), Po *boksowac' sie* (kp *boks* "boksado"), R *boksirovat'* (kp *boks* "boksado"). ¶ IoIeIa *boxar.*

A vorto, orig. subst. signifanta "bato" (kp Nd *beuken* "bategi"). Pridisputata etimologio (eble onomatopea).

BOL/I (f; Un): A *boil,* F *bouillir,* I *bollire,* (H *bullir*). Formo laŭ I, kiu prezentas simplan vokalismon. ¶ Io *boliar,* Ie *bollir,* Ia *bullir.*

El L *bullire* s.s., orig. "vezikumi, formi aervezikojn", de *bulla* "aerveziko" (vd. *bulo*). Samfamilia radiko en Eo: *buljono.*

BOLIVI/O (8; *Bolivuj/o* Jü, *Bolivi/o* Wü): AI(H) *Boliv/ia,* F *-ie,* G *-ien,* R *-ija,* Po *Boliwia.* Ps-sf *-i* 3. ¶ IoIeIa *Bolivia.*

Nomita (1825) laŭ *Simon Bolívar* ("liberiganto de Sud-Ameriko"), per kiu la lando ricevis sian unuan konstitucion.

BOMB/O (2; RE): A *bomb,* F *-e,* IPoR(H) *-a,* G *Bombe.* ¶ Io *bomb/o,* Ie *-e,* Ia *-a.*

Pere de L *bombus* "obtuza sono" el Gr *bómbos* s.s. (onomatopea vorto). Kp sekv.

BOMBARD/I (1; RE): A *bombard,* F *-er,* G *-ieren,* I *-are,* Po *-owac',* R *-irovat',* (H *-ear*). Ps-sf *-ard.* ¶ IoIeIa *bombardar.*

De F *bombarde* "bombkanono", de *bombe* "bombo" (vd. tiun).

BOMBAST/O (4; Wü; ne ĉe Z): A *bombast,* G *Bombast*; kp H *bombástico* "bombasta". ¶ Io *patos-acho, grandioza parol(ad)o,* Ie *bombaste,* Ia *emphase.*

A vorto, orig. "kotonaĵo (uzata kiel ŝtopaĵo)" (semantika evoluo: > "ŝvelaĵo" > "ŝvelparolo"), pere de L mez. *bombacium* "kotono" el Gr *pambákion* s.s. el Pe *pänbäk* s.s.

BOMBON/O (f; RE): A *bonbon*†, F *bonbon,* G *Bonbon,* (H *bombón*). Kp Po *bombonierka,* R *bonbon'erka* "bombonujo". Eo *bom-* kredeble por eviti konfuzon kun eventuala duobligo de *bon-* (kp *plen/plena* k.s.); modelon Z trovis en Po. Cetere tiu asimilo de *n* antaŭ *b* estas tute natura, preskaŭ neevitebla. ¶ 1894 *bonbon-.* ¶ IeIa *bonbon,* Io *-o.*

F infanvorto, intensiga duobligo de *bon* "bon(gust)a" (vd. *bona*).

BON/A (f; Un): F *bon,* I *buono* (kp *bontà* "-eco"), (H *bueno,* kp *bondad* "-eco"); L *bonus.* ¶ 1881 *bon-.* ¶ IeIa *bon,* Io *-a.*

El L ant. *dvenos* kun necerta etimologio. Adv. L *bene* "bone". Dim. L *bellus* (< **benulus*) "bel(et)a". Samfamiliaj radikoj en Eo: *beni, bieno, bombono; bela.*

BOR/I (f; RE): A *bore,* G *bohren* [bó:r-], Po *borowac',* R *buravit'.* Radikformo

ĝermana kaj slava superregis la latinan ekvivalenton ; cetere **for-* estis neebla pro alia funkcio de tiu sonkombino. ¶ 1894 *for-* (LI *forare*, F *forer*). ¶ Io *borar*, IeIa *forar*.

Ĝerm. vorto, kp ank. Nd *boren*, Sv *borra* (la slavaj formoj estas, almenaŭ parte, pruntitaj el ĝerm.): pĜ **burôn*, el HE rad. **bher-* "trapiki", kp L *forare* (vd. supre), *ferire* "frapi, bati, piki", Gr *pharán* "plugi".

BORAKS/O (f; RE): AF *borax*, G *Borax*, I *borace*, Po *boraks*, R *bura*, (H *bórax*). ¶ 1906a *borac/o* (kredeble por eviti konfuzon kun *bor-aks-o*). ¶ Ie *borax*, Io *-o*, Ia *borace, borax*.

Pere de Ar *bûraq* el Pe *bûräh* s.s. – El tiu vorto estis kreata (19a jc) la elementnomo A *boron*, F *bore*, G *Bor*, HI *boro*, PoR *bor* > eo *bor/o* (*bor/a* ER).

BORD/O (f; Un): F *bord*, (H *-e*). ¶ 1894 *riv-* (< F *rive*, LI *ripa*). ¶ Io *rivo, litoro* (< L *lit/us -oris*), Ie *rive*, Ia *ripa*.

Orig. "(ŝip)rando" (kp F *bord*, H *-e*, I *-o* "rando"; A *board*, G *Bord*, R *bort* "ŝiprando"; ank. en eo *babord/o* Jü, kp *bordo de ŝipo* Z), de ĝerm. origino: pĜ **burdha-* "tabulo", par. al la vortoj cititaj sub *breto*. Kp *bordelo, borderi*.

BORDEL/O (1; Wü; antaŭe *mal/ĉast/ejo*): A *brothel*, F *bordel*, I *-lo*, G *Bordell*, (H *burdel*). ¶ Io *lupanaro* (< L *lupanar*), Ie *bordell/e*, Ia *-o*.

De F ant. *borde* "ligna dometo", el Fk **borda* "kabano el tabuloj", el pĜ **burdha-* "tabulo" (vd. *bordo*).

BORDER/I (f; RE): AF *border*. Kp G *Bordüre*, R *bordjur* "borderaĵo", ank. Pg *bordar* "borderi". La Ea formo estas nura transskribo de F kun enkorpigo de la F infinitiva finaĵo (*-er*), vd. *diri*. ¶ 1894 *bord-*; 1906a *bord/aĵ/i*. ¶ Io *bord-iz-ar*, IeIa *bordar*.

Propr. "randumi", de F *bord* "rando" (vd. *bordo*).

BORS/O (f; RE): F *bourse*, G *Börse*, I *borsa*, R *birĵa*, (H *bolsa*). Vokalismo laŭ I; rimarku la karakteron de komerca termino. ¶ Io =, IeIa *bursa*.

Laŭ nomo de placo (*burse*) en Brugo, Belgujo, kie kunvenis en la 15a jc eksterlandaj komercistoj; ĝi havis sian nomon laŭ apude loĝanta maklerista familio *van der Burse*, nomita laŭ tri monujoj en la familia blazono (kp F *bourse*, G *Börse*, H *bolsa*, I *borsa* "monujo" el L *bursa* s.s., propr. "saketo", el Gr *byrsa* "felo").

BOSK/O (2; RE): F *bosquet* [-é], G *Boskett*, I *boschetto* [-k-], (H *bosquecillo* [-k-]). Kp Pg *bosque* [-ke]. Apokopo de la diminutiva sufikso enhavata en la fontlingvaj formoj por ebligi formadon de Ea diminutivo (vd. *abio*). ¶ Io =, IeIa *bosco*.

Latinida vorto, dim. de resp. F *bois*, H *bosque*, I *bosco* "arbaro", eble de ĝerm. origino (kp A *bush*, G *Busch*, Sv *buske* "arbusto"). Samfamiliaj radikoj en Eo: *bukedo, embusko, hobojo*.

BOT/O (f; Un): A *boot*, F *botte*, Po *but*, (H *bota*). Kp R *botinka* "boteto". ¶ Io =, Ie *bott/e*, Ia *-a*.

Latinida vorto (L mez. *botta* s.s.) kun necerta etimologio.

BOTANIK/O (1; N-ro 14 1888,RE): A *botan/y* (kp *-ical* "-a"), F *-ique*, I *-ica*, PoR *-ika*, G *Botanik*, (H *botánica*). Ps-sf *-ik*.

Pere de L mod. *botanice* el Gr *botanikê* (*tékhnê*) "herba (scienco)", de *botánê* "herbo", kp *bóskein* "paŝti".

BOTEL/O (f; Un): A *bottle*, F *bouteille*, I *bottiglia*, Po *butelka*, R *butylka*, (H *botella*). Latinida [l'] redonita per *-l-* (vd. *abelo*). ¶ Io =, Ie *botelle*, Ia *bottilia*.

El L vulg. *butticula*, dim. de *buttis* "kuvo", kredeble de greka origino (kp Gr *pytínê* "vinbotelo ĉirkaŭvolvita per basto").

BOV/O (f; Un): L *bos* (gen.: *bovis*); F *boeuf*, I *bove, bue*, (H *buey*). Kp F *bovin*, A *-e*, HI *-o* "bova"; ank. A *beef* "bovaĵo". Bazita sur L kiel zoologia termino. ¶ Io =, IeIa *bove*.

Latinida vorto, prapar. al A *cow*, G *Kuh* "bovino", kp Sa *gau-* "bovo", Gr *boús* "bovo", R *govjadina* "bovaĵo" (HE **gŭoŭ-* "bovo"). Samfamiliaj radikoj en Eo: *bifsteko, butero*.

BOVL/O (8; GE): A *bowl*, F(H) *bol*, G *Bowle*, Po *bowl*. Formo laŭ A (*ow* > *ov* kiel en *blovi*, *brovo*); *bol-*jam havis alian signifon. ¶ Io *bolo*, Ie *bol*, Ia *scutella* (< L).

A vorto (A ant. *bolla*), nomita laŭ la ronda formo, kp Sv *boll* "pilko". Vd. *balono* kaj plue sub *bulo*.

BRACELET/O (2; Jü; antaŭe *ĉirkaŭ/man/o*): AF *bracelet*, I *braccialetto*, Po *bransoleta*, R *braslet*, (H *brazalete*). Sugestita al Z de Beaufront, vd. LZ I, 45 (18.X.03); la formo kopias F. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *brasselett*, Ia *bracialetto*.

Der. de L *brachiale* "brakringo" de *brachium* "brako" (vd. tiun).

BRAK/O (f; RE): L *brachium* [-k-]; F *bras* (kp *brachial* [-k-] "braka"), I *bracchio* [-k-], (H *brazo*). Kp A *embrace* "ĉirkaŭbraki". Anatomia termino bazita ĉefe sur L ; la forstrekon de *-i-* (kiu maloportune havus la akcenton) eble inspiris F (kp ekz. *absinto*, *branko*, *diluvo*, *ekzilo*, kie modernaj lingvoj prezentas formojn sen *i*; normale tamen en sciencaj terminoj L *-ium* > Eo *-io*, vd. Wüster Esp. princ. 55). ¶ 1881 *arm-* (< A *arm*, G *Arm*). ¶ Io *brakio*, Ie *brasse*, Ia *brachio*.

Latin(id)a vorto el Gr *brakhíôn* "(supra) brako", kiu videble signifas "pli mallonga" (ol la antaŭbrako?), komp. de *brakhys* "mallonga", kp L *brevis* s.s. Samfamilia radiko en Eo: *braceleto*.

BRAM/O (f; RE): L zool. *Abramis brama*; A *bream*, F *brême*, G *Brassen*, (H *brema*); kp ank. Oc *bramo*. Formo *brem-* laŭ AF(H) certe estus ebla (kp 1894); kiel do estiĝis *bram-*? Laŭ Waringhien 1946, 93, la formo estas miksaĵo kun G vokalo kaj A konsonantoj (kp *plugi*, *strato*, *ŝtupo*). Albault 1961, 89, atentigas pri la koincido kun Oc. Ŝajnas tamen pli probable, ke Z tutsimple prenis la zoologian terminon el la L specinomo (aŭ el la genra nomo kun aferezo laŭ la nacilingvaj formoj). ¶ 1894 *brem-*. ¶ Io *bremo*, Ie *brem*; mankas en Ia.

Ĝerm. vorto (pĜ **brehsmo*, var. **brahsmo*). Nomita laŭ la koloro, kp pĜ **brehwan* "brileti", A *bright* "hela, brila", *birch* "betulo". Kp plue R *brezĵit'* "tagiĝi", Sa *bhrâjate* "brilas" (HE rad. **bhreg-*).

BRAMAN/O (2; Jü): A(H) *brahm/an*, *-in*, F *brahmane*, G *Brahmane* [*-h-* neaŭdebla en AFGH], I *bram/ano*, *-ino*, Po *bramin*, R *brahman*. Nek *bramano* nek **bramino* estas kontentiga laŭ Z-aj principoj pro koincido kun sufiksoj; tamen la dua evidente estus pli konfuziga. ¶ Io =, IeIa *brahman*.

Pere de L *Brachman/es*, *-ae*, *-i* (plur.) kaj Gr *Brakhmánes* (plur.) el Sa *brâhmaná-* "bramano, ano de pastra kasto", de *bráhman-* "adorado, preĝado; religia scienco, teologio" (kiu restas etimologie necerta, malgraŭ multaj hipotezoj).

BRAN/O (f; RE): A *bran*, F *bran*† (*de son*). ¶ Io =, Ie *brane*, Ia *furfure* (< L *furfur*).

F vorto de gaŭla origino, kp Bretona *brenn* s.s.

BRANĈ/O (f; Un) 1) bot. 2) fig., kom.: A *branch* (1, 2), F *-e* (1, 2), G *Branche* (2), I *branca*† (1, 2) (spec. *branca madre* "ĉefbranĉo"), Po *branz'a* (2). AF *ch* normale reprezentiĝas en Eo per *ĉ*. ¶ 1894 *ram-* (< L *ram/us*, I *-o*, H *-a*). ¶ Io *brancho*, *ramo*, Ie *branche*, *rame*, Ia *branca*, *ramo*.

El L postkl. *branca* "bestopiedo", kredeble de gaŭla origino. (La semantika evoluo klariĝas per tio, ke branĉoj diselstaras de la trunko same kiel fingroj de la piedo.)

BRAND/O (f; Un): A *brandy*, G *Branntwein* (*Wein* "vino"). Bazita sur A. Por la apokopo, kp. *dando* < A *dandy*. ¶ 1894 *akvavit-* (< G *Aquavit*, I *acquavite*). ¶ Io *brandio*, Ie *brandy*, *aquavite*, Ia *brandy*.

A *brandy*, pli frue *brandywine* (kp G supre k ank. Nd *brandewijn*), propr. "bruligita (= distilita) vino", kp A *fire-brand* "brulaĵo", G *Brand* "brulo" (pĜ **brandha-*), subst. de la responda verbo A *burn*, G *brennen* "brul-(ig)i" (vd. *bruli*).

BRANK/O (f; RE): AI *branchia* [-k-], F

branchies (plur.), (H *bránchia* [-k-]); L *branchia* [-k-]. Ellaso de *-i-*, kredeble por konservi la akcenton de la fontlingvoj (krom F); kp sub *brako.* ¶ Io *brankio*, Ie *branchies* (plur.), Ia *branchia.*

El Gr *bránkhia* (plur.) "brankoj", ligita (almenaŭ per popola etimologio) al *brónkhos* "bronko" (vd. tiun).

BRASIK/O (f; RE): L *brassica*; (H *berza*). Botanika termino bazita sur L. ¶ Io *kaulo*, Ie *caul*, Ia *-e* (< F *chou*, G *Kohl*, H *col*, I *cavolo*; L *caulis*).

L vorto kun nekonata etimologio.

BRAV/A (f; RE): AF *brave*, G *brav*, I(H) *bravo*, R *bravyj*. Kp itj. AFG(H)IR *bravo*, Po *brawo* "brave!" ¶ Ie *brav*, Io *-a*, Ia *-e.*

Kredeble el L *barbarus* "barbara, sovaĝa" (semantika evoluo: > "batalema" > "brava"). Vd. *barbaro.*

BRAZIL/O (8; *Brazilujo* PR, *Brazili/o* LR, *Brazil/o* GD): A *Brazil* [-z-], F *Brésil* [-z-], G *Brasilien*, I *Brasile* [-z-], Po *Brazylia*, R *Brazilija*, (H *Brasil*). ¶ Io *Brazilia*, Ie *Brasilia*, Ia *Brasil.*

Nomita (de la portugaloj) laŭ unu el siaj produktoj, la pernambuka ligno (HPg *brasil*, kp A *brazil*, *-wood*, F *brésil* s.s.), el kiu oni ekstraktis ruĝan kolorigilon; kredeble de HPg *brasa* "lignoardaĵo", eble de ĝerm. origino (kp Sv *brasa* "ŝtipfajro").

BREĈ/O (2; Be): A *breach* [-ĉ], F *brèche*, G *Bresche*, I *breccia* [-ĉ-], R *breŝ*, (H *brecha* [-ĉ-]). AF *ch* normale reprezentiĝas en Eo per *ĉ.* ¶ Io *brech/o*, Ie *-e*, Ia *-a.*

F vorto, orig. "rompo", de ĝerm. origino (Fk **breka*, G ant. *brecha* "rompo"; kp G *brechen* "rompi"). Samfamilia radiko en Eo: *briko.*

BRED/I (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *kultur/i, eduk/i*): A *breed.* A *-ee-* [i:] reprezentiĝas per *-e-*, ĉar *brid-*jam havis alian signifon. ¶ Io *kultivar, edukar*, IeIa *elevar* (< F *élever*).

A vorto (ank. "naski"), identa kun G *brüten* "kovi" (pĜ **brôdjan*, der. de **brôd-*, kp A *brood* "idaro"). La orig. signifo estis "elkovi per varmo"; par. estas *brogi*, vd. tiun.

BREMS/I (5; Verax 1910, Wü; ne ĉe Z; antaŭe *halt/ig/ilo*): G *Bremse.* Kp. ank. Da *bremse*. ¶ IoIa *freno*, Ie *fren* (< F *frein*, HI *freno*).

G vorto, orig. kredeble "premilo", kp malaltG mez. *pramen* "premi".

BRET/O (f; RE): G *Brett.* ¶ 1894 *tavl-* (varianto de *tabulo*). ¶ Io *tabulo*, Ie *tabul-iere*, Ia *planca* (< F *planche*).

Ĝerm. vorto, orig. "tabulo" (kp Da *bræt*, Sv *bräda* [-e-] "tabulo"), apofonia varianto de pĜ **burdha-* (vd. *bordo*). Oni komparas Sa *bárdhaka-* "ĉarpentisto".

BRID/O (f; RE): A *bridle*, F *bride*, I *briglia*, (H *brida*). ¶ Io *brid/o*, Ie *-e*, Ia *-a.*

Latinida vorto de ĝerm. origino, kp A ant. *bridel*, G ant. *brittil* s.s. (sama bazo en *brettan* "tiri").

BRIGAD/O (2; RE): AF *brig/ade*, I *-ata*, R(H) *-ada*, G *Brigade*, Po *brygada.* Ps-sf *-ad.*

F sencospecialigo de I *brigata*, ank. "trupo, aro", der. (pere de verbo) de *briga* "lukto†, kverelo†", kiun kelkaj kredas de ĝermana, aliaj de kelta origino.

BRIK/O (f; RE): A *brick*, F *brique* [-ik]. Int. konata per la dim. A *briquet(te)*, F *briquette*, G *Brikett*, Po *brykiet*, R *briket*, (H *briqueta*) "(karba) briketo". ¶ Io =, Ie *brique*, Ia *bricca.*

El Nd mez. *bricke* s.s., kredeble par. al Nd *breken*, A *break*, G *brechen* "rompi" (do orig. "rompitaĵo, peco"). Se tiel, *brêo* estas samfamilia radiko. Kp ank. *fragmento.*

BRIL/I (f; Un): F *brill/er*, I *-are*, (H *-ar*). Latinida [l'] redonita per *-l-*, vd. *abelo.* (Kun *bril/i* kontrastas *briliant/o*, kp *batali* : *bataliono*, *medalo: medaliono.*) ¶ Io *brilar*, Ie *brill/iar*, Ia *-ar.*

El L vulg. **berillare* "brili kiel berilo". Vd. *berilo*; kp sekv.

BRILIANT/O (f; RE): A *brill/iant*, F *-ant*, I(H) *-ante*, G *brillant* [brilj-], Po *brylant*, R *bril'jant.* Origina latinida [l'] aperas tie ĉi kiel *-li-* (kp *bataliono*), evidente por diferencigi la radikon de *bril/ant/o.* Kp sub *brili.* Ps-sf *-ant.* ¶ 1894

brilant-. ¶ Io =, Ie *brill/iante*, Ia *-ante*.

Propr. "brilanta (gemo)", substantivigita ptc. prez. de la verbo citita sub *brili*.

BROĈ/O (1; Be): A *brooch* [-ĉ], F *broche*, G *Brosche*, Po *broszka*, R *broŝka*, (H *broche* [-ĉ-]). Adoptante *-ĉ-*, Z pli konsideris la ortografian bildon (*-ch-* en AF) ol la prononcon ([ŝ en FGPoR). ¶ Io *broch/o*, Ie *-e*, Ia *-e*, *fibula* (< L).

Orig. "pinglo, pikilo", el L vulg. **brocca*, substantivigita formo de *broccus* "(kun) elstara(j dentoj)", eble de kelta origino. Samfamilia radiko en Eo: *broŝuro*.

BROD/I (f; RE): F *broder*. Kp A *embroider*, ank. Sv *brodera*. Kudrarta termino bazita sur F. ¶ IoIeIa *brodar*.

F vorto de ĝerm. origino (Fk **brozdôn*, orig. "piki", de pĜ **bruzdha-* "pikilo"; vd. plue sub *barĉo*). Kp semantike G *sticken* "brodi", par. al *stechen* "piki". (H *bordar* "brodi", citita de Bastien, ne estas parenca.)

BROG/I (f; RE): G *brühen* estas la verŝajna fonto, sed du punktoj bezonas klarigon: (1) kial *-o-*? (2) de kie *-g*? Teorie, *brühen* rezultigus **bruh/i* (por *ü* > *u* kp *früh* > *frua*, *schütten* > *ŝuti*), sed tre malmultaj Eaj radikoj finiĝas per *h* (oficiala nur *ŝah-*, krome *subtrah-* Z) evidente pro risko de tro malforta prononco de tiu sono inter vokaloj (en tiu ĉi kazo, la ekzisto de *bru/i* cetere malebligis tian formon); ĝi estas anstataŭigita per *g* (eble laŭ modelo de R, kie *g* ofte anstataŭas fremdlingvan *h*, ekz. *geroj* "heroo", *gospital'* "hospitalo"). La *-o-* estas malfacile klarigebla; mi sugestis (vd. Vilborg 1951), ke Z ĝin prenis el la (parencaj) A *broth*, I *brodo* "brogaĵo, buljono" (kp eble ank. G *brodeln* "boli"). La tuto do estus iaspeca miksformo (AI vokalo, modifita G konsonantismo), da kiuj Eo posedas kelkajn (vd. sub *draŝi*). ¶ 1894 *skald-* (< A *scald*, H *escaldar*). ¶ Io *eskaldar*, Ie *scaldar*, Ia *escaldar*.

G *brühen* (subst.: *Brühe* "brogaĵo, buljono") estas par. al la supre cititaj AGI vortoj (pĜ bazo **brudh-*, de HE rad. **bher-*, **bhru-* "agitiĝi"; vd. *fervoro*).

BROKANT/I (2; Jü): F *brocanter*. ¶ Io *brokantar*, Ie *brocantar*; mankas en Ia.

De ĝerm. origino (kp A *broker* "makleristo; brokantisto†"), ne ekzakte determinita.

BROM/O (1; Be): PoR *brom*, A *-ine*, F *-e*, I(H) *-o*, G *Brom*.

Konstruita en F (de Balard, 1826) el Gr *brômos* "fiodoro" (pro ĝia malplaĉa odoro), identa kun *brómos* "bruo" (semantika evoluo: > "furzo" > "fiodoro"), kp *brémein* "brui, susuri" (onomatopea vorto).

BRONK/O (2; Be): A *bronch/i*, *-ia* [-k-] (plur.), F *bronche*, G *Bronchien* [-k-] (plur.), I *bronco*, (H *bronquio* [-k-]); L med. *bronchus* [-k-]. Ellaso de *i* analoga al tiu en *branko*. ¶ Io *bronkio*, Ie *bronch/ie*, Ia *-io*.

El Gr *brónkhia* (plur.) "bronkoj", de *brónkhos* "traĥeo", kp *brókhtos* "gorĝo", par. al G *Kragen* "kolumo". Samfamilia radiko en Eo: *bronkito*; kp ank. *branko*.

BRONKIT/O (2; Be): A *bronch/itis*, FI *-ite*, Po *-it*, G *Bronchitis*, (H *bronquitis*); L med. *bronchitis*. La radiko devis kongrui kun *bronk/o*; kp krome la prononcon [-k-] en AI(H)L. Ps-sf *-it* 1. ¶ Io =, Ie *bronchit/e*, Ia *-is*.

Konstruita (19a jc) el L med. *bronchus* (vd. *bronko*).

BRONZ/O (f; RE): AF *bronz/e*, I *-o*, R *-a*, G *Bronze*, Po *braz*, (H *bronce*). ¶ IoIa *bronz/o*, Ie *-e*.

I vorto, kredeble el Pe *biringî* "kupro".

BROS/O (f; Un): A *brush*, F *brosse*. Formo laŭ F. Oni povas kompari plurajn iom similajn formojn en aliaj lingvoj, kiuj apogas almenaŭ la konsonantismon: G *Bürste* "broso", I *brusca* "ĉevalbroso", H *brocha* "peniko", *bruza* "ĉevalbroso". ¶ Io *bros-il-o*, Ie *bross/e*, Ia *-a*.

F vorto de necerta origino; ĉiuokaze, parenceco al pĜ **bursti-* "porkharo" (G *Borste*) estas dubinda.

BROŜUR/O (1; Du, RE): AF *brochure* [-ŝ-], G *Broschüre* [-ŝ-], Po *broszura* [-ŝ-], R *broŝjura*. Eo *-ŝ-* baziĝas sur prononca-

kordo en la fontlingvoj. Ps-sf *-ur.* ¶ Io *broshuro,* Ie *brochur/a,* Ia *-e.*

Der. de F *brocher* "stebi", de *broche* "diverss-peca pika instrumento" (vd. *broĉo*).

BROV/O (f; RE): A *(eye-)brow,* G *Braue,* Po *brew,* R *brov'.* La Ea formo povas esti rigardata kiel transskribo de A kaj R (por *ov* < A *ow,* kp *blovi*). ¶ Io = (espismo), Ie *brove* (espismo), Ia *supercilio* (< L *supercilium*).

El HE **bhrû-,* kp Sa *bhruh,* Gr *o-phrys,* Li *bruvs* s.s.

BRU/I (f; Un): F *bruire.* ¶ 1882 *bru-*; 1894 *rumor-* (< L *rumor* "bruo, murmurego"). ¶ Io *bruisar,* Ie *bruir,* Ia *ruitar* (< H *ruido* "bruo"), *strepitar* (< LI *strepitare*).

Ekskluzive F vorto, kruciĝo de L *rugire* "(leon) bleki" (kp A *roar* "muĝi", Sa *raúti* "krias": HE rad. **reu-*) k L vulg. **bragere* (> F *braire* "azenbleki").

BRUL/I (f; Un): F *brûler.* La komenca konsonantduopo estas apogata de G *brennen,* la tuta unua silabo de I *bruciare* s.s. ¶ 1881 *brul-*; 1894 *ard-* (vd. *ardi*). ¶ IoIe *brular,* Ia *urer* (< L *urere*), *flagrar* (< L *flagrare*).

F vorto, kruciĝo de L *ustulare* (der. de *urere* "bruli", supina radiko: *ust-*; kp Sa *óśati* "brulas") k alia verbo, ev. tiu ĝermana citita supre en formo de G *brennen.*

BRUN/A (f; RE): A *brown,* F *brun,* G *braun,* I(H) *bruno,* Po *brunatny.* Kp R *brjunet* "brunulo". ¶ 1881 *bur/a* (< R *buryj,* vd. PVZ 5, 132; Albaut 1961, 89 komparas Oc *bourre* s.s). ¶ Io =, IeIa *brun.*

Ĝerm. vorto (pĜ **bruna-*), kp ank. Li *brúnas* s.s. – HE **bhrûno-,* kp Sa *ba-bhrú-* "bruna", de bazo **bher-,* i.a. troiĝanta en bestonomoj ("brunulo"): A *bear,* G *Bär* "urso"; A *beaver,* G *Biber,* L *fiber* "kastoro".

BRUST/O (f; Un): A *breast,* G *Brust.* Kp ank. Sv *bröst.* Apartenanta al malgranda grupo de korpopartaj terminoj de ĝermana origino, vd. Collinson 1959, 5. ¶ 1894 *pekt-* (< L *pect/us -oris*). ¶ Io *pektoro,* Ie *péctor,* Ia *pectore.*

Ĝerm. vorto (pĜ **breusta-*; kp Gt *brusts*) de necerta origino, eble prapar. al R *brjuho* "ventro".

BRUT/O (f; Un Po): AF *brut/e,* I(H) *-o.* Internacie konata per der. AFGH *brutal,* I *-e,* Po *-ny* "bruteca" (> eo *brutal/o* Wü, *-a* GD). ¶ IoIa *brut/o,* Ie *-e.*

El L *brutus* "malvigla, malinteligenta" (*animal brutum* "bruto"), orig. "peza", dial. vorto identa kun L *gravis* s.s. (vd. *grava*).

BUB/O (f; RE): G *Bube.* Oni komparu *knabo,* same eksluzive germana vorto. ¶ Io *bubo* (espismo), Ie *garson(acho),* Ia *garson(astro)* (< F *garcon* "knabo" kun malindiga sufikso).

Ĝerm. vorto, orig. "knabo" (pĜ **bôban-*; kp Nd *boef* "fripono"; de paralela formo devenas A *boy* "knabo"), kredeble infanvorto de la sama tipo kiel *bebo.*

BUBAL/O (f; RE): L *bubalus*; A *buffalo,* F *buffle,* G *Büffel,* I *bufalo,* Po *bawol',* R *bujvol,* (H *búfalo*). Zoologia termino bazita sur L.

L *bubalus* "gazelo; bubalo" el Gr *boúbalos* "antilopo; bubalo", kredeble formita el *boús* "bovo" (vd. tiun).

BUĈ/I (f; RE): A *butcher* [buĉ-] "buĉi; buĉisto", F *boucher* "buĉisto". Z ekstraktis verbon el la F vorto, forstrekante la agantnoman sufikson *-er.* Eo *ĉ* ofte respondas al F *ch* kaj iufoje al A *tch* (*kaŭĉuko*; alie eo *matĉo* GD). ¶ 1894 *buc-.* ¶ IoIe *buchar* (espismo), Ia *abatter* (< F *abattre*).

F vorto, kredeble der. de *bouc* "virkapro", supozeble de kelta origino (ank. en ĝerm., kp A *buck,* G *Bock* s.s. > eo *bok/o* PIV).

BUD/O (f; RE): A *boothe* [bu:-], G *Bude,* Po *buda,* R *budka.* Kp Ji *bude, budke,* krome Sv *bod* [bu:d]. ¶ Io *echopo* (< F *échoppe*). Mankas ekzakta ekvivalento en IeIa.

Ĝerm. vorto (pĜ **bôthô-*), propr. "loĝejo", de radiko troviĝanta en Sv *bo,* Gt *baúan* "loĝi", G *bauen* "konstrui", ank. Li *bùtas* "domo". De HE rad. **bhû-* "esti, ekzisti" (vd. sub *fiziko*).

BUDĜET/O (3; RE; *buĝet/o* 8; Wü): AF

budget [A -ĝ-], G *Budget* [-ĝ-], Po *budz'et* [-ĝ-], R *bjudĵet*. La duoblan reprezenton de [d] – *d* kaj *ĝ* – sendube estigis deziro alproksimigi la aspekton de la Ea formo al la ortografio de la okcidenteŭropaj fontlingvoj (kp A *match* > eo *matĉ/o* GD). Ps-sf *-et*. ¶ Io *budjeto*, Ia *budget*, Ie *-e*.

A vorto, orig. "aktujo", el F ant. *bougette* "saketo", dim. de *bouge* "leda sako" el L *bulga* s.s., de kelta origino. De HE rad. **bhel-* "ŝveli", vd. *bulo*.

BUDUAR/O (1; Wü): A *boudoir* [bú:dŭa:], F *boudoir* [buduá:r], G *Boudoir* [budoá:r], PoR *buduar*. F *-oir* estas redonita per Po(R) skribmaniero, kiu respegulas la F prononcon; kp *trotuaro*. ¶ Io =, Ie *buduore*; mankas en Ia.

F vorto, de *bouder* "paŭti" (do orig. signifanta lokon, kie oni ne devas bridi sian humoron), kredeble onomatopea vorto.

BUF/O (f; RE): L *bufo*. Zoologia termino prenita el L. ¶ 1894 *bufon-*. ¶ Io *rospo* (< I *rospo*; kp Io *bufar* "pufigi"), Ie *buf/o*, Ia *-on*.

L vorto, kp R *ĵaba* s.s. (HE bazo **gŭebh-*, eble onomatopea).

BUFED/O (f; RE): AF (HI *buffet*, G *Büfett*, I *buffè*, Po *bufet*. Konsonantŝanĝo *t* > *d* en Eo por eviti koincidon kun *buf-et-o* (kiel en *bukedo, cigaredo, pikedo, planedo*; vd. plue sub *aldo*. ¶ 1894 *bufet-*. ¶ Io *bufeto*, Ia *buffet*, Ie *-e*.

F vorto kun nekonata etimologio.

BUK/O (f; RE): A *buckle*, F *boucle* [bukl]. Deirpunkto estas la F vorto, kies du signifojn Z diferencigis per (a) *bukl-*, la (prononce) integra formo, (b) *buk-*, formo reduktita je unu fonemo. Vd. War. LV 79. ¶ 1894 *bokl-*. ¶ Io *buklo*; Ie *fibul*, Ia *-a* (< L *fibula*).

Pri la etimologio, vd. *buklo*.

BUKED/O (f; RE): AF *bouquet* [buk-], G *Bukett*, Po *bukiet*, R *buket*. Konsonantŝanĝo en Eo *t* > *d* por eviti koincidon kun *buk-et-o*; vd. *bufedo*. ¶ 1894 *buket-*. ¶ Io *buketo*, Ie *buquete*, Ia *bouquet*.

F vorto, orig. "arbareto, bosko", dim. de dial. formo de F *bois* "bosko" (kp I *boschetto* s.s.), vd. tiun.

BUKL/O (f; RE): F *boucle* [bukl], Po *pukiel*, R *buklja*. La sama (F) fonto donis ankaŭ *buko*, vd. tiun. Ŝajnas, ke Z konservis la integran vortformon por la iom pli internacia signifo. ¶ Io *loklo* (bazita sur A *lock*, G *Locke*, R *lokon*; *-l-* el Eo *bukl-*?), Ie *bucl/e*, Ia *-a*.

F vorto, el L *buccula* "vangeto" (semantika evoluo: > "ĝibo de ŝildo" > "metala ringo" > "hara buklo"), dim. de *bucca* "vango" (vd. *buŝo*).

BUKS/O (1; Jü): L *buxus*; A *box*, F *buis*, G *Buchsbaum* [-ks-] (*Baum* "arbo"), I *bosso*, Po *bukszpan*, (H *boj*). Botanika termino bazita sur L. ¶ Io *buso*, Ie *busso*, Ia *buxo*.

El Gr *pyxos* s.s., fremdvorto de nekonata origino. Samfamilia radiko en Eo: *buŝelo*.

BUL/O (f; RE): A *ball* (ank. "pilko"), F *boule* [bul], (H *bola*). Evidente bazita sur F. Vd. *bulko* pri evitita radikkoincido. ¶ Io *bulo* (ank. "ludglobeto"), *grumelo* (< F *grumeau*); Ie *bul* (ank. "kuglo"), *grumel*; Ia *balla, grumo*.

Pri A *ball*, vd. *balono*. La latinida vorto el L *bulla* "aerveziko". Ambaŭ el la tre disvastigita HE rad. **bhel-* "ŝveli, puf(ig)i", ekz. en Gr *phálanx* "trabo" (kp *falango*), *phállaina* "baleno" (kp tiun), *phallós* "peniso"; L *bullire* "boli, formi aervezikojn" (kp *boli*), L mez. *bulla* "papa dekreto", orig. "kapsulo de sigelo" (> eo *bull/o* ER, *bule/o* Wü; kp *bileto, bulteno*); F *balle* "pilko" (kp *ba- loti*), *bille* "globeto" (kp *bilardo*); I *palla* "pilko" (kp *balono*); A *bubble* "aerveziko", *bullet* "kuglo"; G ant. *bald* "kuraĝa" (kp *baldaŭ*), G *Ball* "pilko"; R *bulka* "bulko" (kp tiun). – Formo **bhlê-*: L *flare* "blovi"; A *blow* "blovi" (kp tiun); G *blasen* "blovi". – Formo **bhelgh-*: Sa *barhís-* "kuseno"; L *bulga* "leda sako" (kp *budĝeto*); A *belly* "ventro"; G *Balge* "balgo".

BULB/O (f; RE): A *bulb*, F *-e*, I (H) *-o*; L *bulbus*. Kp G *Bolle* s.s. ¶ IoIa *bulb/o*, Ie *-e*.

El Gr *bolbós* s.s., eble ligita kun la vortoj

cititaj sub *bulo*.

BULGAR/O (8; La E-isto 1890, Jü): A *Bulgar/ian*, FG *-e*, I *bulgaro*, Po *Bul'gar*, R *bolgarin*, (H *búlgaro*). ¶ IoIe *Bulgariano*, Ia *bulgaro*.

El L postkl. *Bulgari* (plur.) aŭ Gr biz. *Boulgaroí* (plur.), nomo de necerta origino, eble par. al R rivernomo *Volga*, ĉe kiu tribo tiel nomata havis regnon en la 5a jc.

BULJON/O (f; N-ro 16 1888, RE): F *bouillon* [bujô:], G *Bouillon* [bujô:], Po *bulion*, R *bul'on*. Kp Sv *buljong*. La reprezento de F *-ill-* [j] per *-lj-* estas unika (kp ekz. *patrouille* > *patrolo*); ĝi aperas esti provo transskribi la R prononcon. Ps-sf *-on*. ¶ Io *buliono*, Ie *bullion*, Ia *bouillon*.

F vorto, propr. "io bolinta", de *bouillir* "boli" (vd. tiun).

BULK/O (f; RE): Po *bul'ka*, R *bulka*; kp Ji *bulke*. Kp ank. F *boulanger* "bakisto", krome H *bollo*, Sv *bulle* "bulko". Akceptante la slavan radikformon, Z evitis eventualan kolizion kun la radiko *bul-*, pli ĝenerale signifanta rondforman objekton. ¶ 1894 *blanke pano*. ¶ Io *semlo* (< G *Semmel*), Ie *panette*, *pane blanc*, Ia *panetto molle*.

Slava vorto (*-ka* dim. suf., kp *ŝelko*), eble pruntita el F *boule* "bulo" aŭ prapar. al la vortoj cititaj sub *bulo*.

BULTEN/O (5; Wü; ne ĉe Z): AF *bulletin* [F byltê:], G *Bulletin* [-tê], I *bollettino*, Po *biuletyn*, R *bjulleten'*, (H *boletín*). Deirpunkto estas la F formo, modifita per (1) forstreko de neakcentata *-e-* (analoge en *bulvardo*), (2) vokalŝanĝo *i* > *e*, tie ĉi apogata de R kaj iomgrade de la F prononco (vd. *abomeni*). Ambaŭ ŝanĝoj celas eviti samsonecon kun sufiksoj (*-et*, *-in*). ¶ Io *buletin/o*, Ie *-e*, Ia *bulletin*.

Propr. "buleeto", dim. de I *bolla* "buleo, papa dekreto" el L *bulla* (vd. sub *bulo*).

BULVARD/O (1; N-ro 30 1889, Jü): AF *boulevard* [A bú:lva:, F bulvá:r], G *Boulevard*, Po *bulwar*, R *bul'var*, (H *bulevar*). La Ea formo ellasas *-e-*, neprononcatan en AF kaj neskribatan en PoR (sama ellaso, parte apogata de aliaj fontlingvoj, en *bulteno*, *dekolti*, *kalsono*, *kamloto*, *kanvaso*, *koklušo*, *kotleto*, *palto*, *plušo*). ¶ Io =, Ie *bulevard*, Ia *boulevard**.

F vorto, orig. "fortikaĵaro, bastiono" (la bulvardoj de Parizo estis konstruataj kie antaŭe situis la urbaj remparoj), de ĝerm. origino: G mez. *bolwerk* "remparo", kies unua elemento identas kun G *Bohle* "tabulego" (par. al *Balken*, vd. *balkono*) kaj dua kun G *Werk* "faritaĵo" (vd. *verko*). Kp A *bulwark*, G mod. *Bollwerk* "remparo".

BURD/O (f; RE): F *bourdon* [burdô:]. Eble inspirite de la prononco (kun naza vokalo, ne nazalo), Z faris el la lasta vokalo Ean finaĵon kaj tiel mallongigis la radikon (kp *gudro* < *goudron*, *pišto* < *piston*). ¶ 1894 *burdon-*. ¶ Io *burdono*, Ie *burdon*, Ia *bombo* (< L *Bombus*).

F vorto de onomatopea origino.

BURĜ/O (f; RE): AF *bourgeois* [-ĵ-], G *Bürger*, I *borghese*, Po *burz'uj* [-ĵ-], R *burĵua*, (H *burgués*). Eo *-ĝ-* permesas kombini la grafismon de AFGI(H) kun indiko de mola prononco. Z ellasis la sufikson (malsaman en la diversaj fontlingvoj kaj tial malfacile trakteblan). ¶ 1894 *borges-*. ¶ Io *borgez-o*, Ie *borg-eso*, Ia *burg-ese*.

Orig. "ano de fortika urbo", formita per latinida sufikso (F *-ois*, H *-és*, I *-ese*) aldonita al ĝerm. radiko, kp G *Burg* "fortika kastelo" (identa kun A *borough* "urbo", Gt *baúrg* "urbo": pĜ **burgs*, de kelkaj rilatigata al G *bergen* "protekti", de aliaj al G *Berg* "monto".

BURĜON/O (f; RE): F *bourgeon* [-ĵô:]. Kp ank. A *burgeon* [-ĝ-] s.s. (poezia vorto). Eo *ĝ* kiel kutime el F *g* [ĵ]. ¶ 1894 *boton-* (< F *bouton*, kp. H *botón*). ¶ Io *burjono*, Ie *burgeon*, Ia *button*.

El L vulg. **burrio*, der. de *burra* "maldelikata lano" (pro la vileco de multaj arbaj burĝonoj), vorto kun necerta etimologio.

BURLESK/A (2; Jü): AF *burl/esque* [-esk], G *-esk*, I(H) *-esco*. Kp Po *burleska* "burleskaĵo". Ps-sf *-esk*.

HI vorto, de HI *burla* "ŝerco", kredeble el L **burrula*, dim. de *burrae* "petolaĵoj".

BURNUS/O (2; Be): A *burnous(e)* [-nu:s], F *burnous*, G *Burnus*, PoR *burnus*, (H *albornoz*). ¶ Io =, IeIa *burnus*.

El Ar *burnus* s.s., pere de Gr *bírros* "(speco de) mantelo" el L *birrus* "mantelo kun kapuĉo", orig. kelta vorto (kp Ki *byrr* "mallonga", vd *bireto*).

BUST/O (1; RE): A *bust*, F *-e*, I (H) *-o*, G *Büste*, Po *biust*, R *bjust*. ¶ IoIa *bust/o*, Ie *-e*.

I vorto, orig. signifanta buston sur tombo, el L *bustum* "tombo, tumuluso; kadavro-bruligejo", orig. ptc. perf. signifanta "(io) bruligita", de *urere* "bruligi" (*b-* estas neorigina kaj aldonita pro malĝusta divido, ekz. de *amb/ustum* "ĉirkaŭbruligita"). Kp *bruli*.

BUŜ/O (f; Un): F *bouche* [buŝ], I *bocca*, (H *boca*). Baziĝas ekskluzive sur F; transskribo *ch* > *ŝ* laŭ la prononco, kiel en *kaŝi*, *kuŝi*, *poŝo*, *tuŝi*. ¶ 1882 *bus'-*; 1894 *bok-*. ¶ Io *boko*, Ie *bocca*, Ia *bucca*.

El L *bucca* "(pufigita) vango", de HE rad. **bu-* "pufigi" (kp A *pocket* "poŝo", G *Bauch* "ventro". Samfamilia(j) radiko(j) en Eo: *buk(l)o*.

BUŜEL/O (f; EG): A *bushel* [-ŝ-]. Kp F *boisseau*. ¶ 1894 *busel-*. ¶ Io *bushelo*, Ie *bushel*, Ia *modio* (< L *modius*).

El L mez. *bussellus* s.s., der. de L *buxis* "skatolo" (kp A *box*, F *boîte* s.s.) el Gr *pyxís* "skatolo" (orig. el bukso), de *pyxos* "bukso" (vd. tiun).

BUTER/O (f; Un): A *butter*, F *beurre* (kp *butyreux* "butereca"), G *Butter*, I *burro* (kp *butirroso* "buterhava"); L *butyrum*. Videble bazita sur AG. ¶ 1894 *butr-*. ¶ Io *butro*, Ie *buttre*, Ia *butyro*.

El Gr *boútyron* s.s., propr. "bovina fromaĝo", kunm. de *boús* "bov(in)o" (vd. *bovo*) k *tyrós* "fromaĝo" (kredeble par. al R *tvorog* > G *Quark* "kazeo").

BUTIK/O (f; RE): F *boutique* [butík], I *bottega*. Kp ank. Sv *butik*. ¶ Io =, Ie *butica*, Ia *boteca*.

Latinida vorto (kp H *bodega* "vinkelo"), pere de L *apotheca* "provizejo; vinkelo" el Gr *apothêkê* "varodeponejo" (kp *apoteko*, kiu do estas etimologie identa).

BUTON/O (f; Un): A *button*, F *bouton* [bu-], I *bottone*, (H *boton*). La Ea formo estas kombino de A kaj F. ¶ Io =, Ie *buton*, Ia *button*.

F vorto (ank. "burĝono") de *bouter*† "puŝiĝi" (> "ĝermi"), el Fk **bôtan* "frapi", par. al A *beat* "bati".

C

CAR/O (1; Jü): A *czar, tsar* [za:, tsa:], F *tsar, czar*, G *Zar* [ts-], I *(c)zar*, Po *car*, R *car'*, (H *zar*). La natura reprezento de [ts] en Eo estas *c*; tio donis la formon *car-*, apogatan de Po. ¶ Io *car(ul)o*, Ie *tsar*, Ia *czar, tsar.*

R vorto, pere de Gt *kaísar* "imperiestro" (kp G *Kaiser* s.s.) el L *Caesar* (orig. alnomo de *C. Iulius Caesar*, 100-44 a.K., poste aplikata kiel honora titolo de la romiaj imperiestroj).

CED/I (f; RE): A *cede*, F *céder*, G *zedieren*† [ts-], I *cedere*, (H *ceder*); L *cedere.* ¶ Io *ced/ar*, IeIa *-er.*

L vorto (sup. rad. *cess-*), orig. "for-, re/iri", en kunmetoj "iri", kredeble par. al Gr *hodós* "vojo" (vd. *metodo*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *absceso, akcesora, eksceso, necesa?, procedi, proces/o, -io, sukcesi; ĉesi.*

CEDR/O (f; RE): A *cedar*, F *cèdre*, G *Zeder* [ts-], I(H) *cedro*, Po *cedr*, R *kedr*; L *cedrus.* ¶ IoIa *cedr/o*, Ie *-e.*

El Gr *kédros* "cedro; junipero" (la du arbospecioj estis identigataj kredeble pro simila odoro de ligno), de necerta origino. Kp ev. *citrono.*

CEJAN/O (f; RE): L bot. *Centaurea cyanus*; G *Zyane* [ts-], I *ciano*, (H *aciano*). Botanika termino bazita sur L. Oni atendus **cian/o.* Motivo kaj modelo de la (unika) ŝanĝo *i* > *ej* estas nekonataj. Ĉu pro la kemia termino *cian/o* EG (Wüster Esp. princ., 53)? Aŭ eĉ pro *ci/an/o*? La procedo de la sonŝanĝo estas ankoraŭ pli obskura ("Sekve de ioma simileco inter *y* kaj *ej* aŭ laŭ R kromformo?" Wüster l.c.). ¶ 1894 *cian-.* ¶ Io *aciano*, Ie *centauréa, cianette*, Ia *cyano.*

El Gr *kyanos* s.s. (nomo ankaŭ de aliaj blua-ĵoj ekz. "lazurŝtono" k "blua emajlo", kaj fonto de la kemia termino G *Zyan*, Po *cyjan*, R *cian* > eo *cian/o* Be), probable de malgrandazia origino.

CEL/o (f; Un): G *Ziel* [tsi:l] (kp *zielen* "-i"), Po *cel* (kp *celowac'* "-i"), R *cel'* (kp *celit'sa* "-i"). Oni povas dubi, ĉu Z konis la komunan originon de G kaj PoR; estas tamen verŝajne, ke li rigardis G kiel apogon por la formo, kiu videble baziĝas sur la slavaj. La adopto de *cel-* kun tiu signifo kaŭzis konsonantŝanĝon en *ĉel-* kaj *ĉiel-* (kp Modrijan 38). ¶ 1894 *skop-* (< A *scope*, I *scopo*). ¶ Io *skopo*, Ie *scop/e*, Ia *-o, fin* (< F *fin*). Por "celi" Io uzas *vizar*, IeIa *visar* (< F *viser*).

Ĝerm. vorto (PoR < G): pĜ **tila-*, kp A *till* "ĝis" (propr. "celdirekte al").

CELERI/O (2; Jü): A *celery* [-i], F *céleri*, G *Sellerie*, Po *seler*, R *sel'derej.* Eo *c-* iom surprizas, ĉar formo kun *s-* estus tute nekonfuzebla; ĉu bazita sur F kiel gastronomia termino? ¶ Io =, Ie *seler/í*, Ia *-i.*

Pere de I dialekto (*-i* indikas pluralon) el L *selinon* < Gr *sélinon* "apio", de nekonata origino. Samfamilia radiko en Eo: *petroselo.*

CELULOZ/O (2; Jü): AF *cellul/ose* [-z], I *-osa* [-z-], G *Zellulose* [ts-], PoR *celu-*

l/oza, (H *-osa*). Ps-sf *-oz*.

Der. moderna (F, 19a jc) de L *cellula* "ĉelo" (do propr. "ĉel-oz-a teksaĵo"), dim. de *cella* (vd. *ĉelo*).

CEMENT/O (f; RE): APoR *cement*, (H *-o*), F *ciment*; G *Zement* [ts-]. Ps-sf *-ment*. ¶ Ie *cement*, IoIa *-o*.

El L *caementum* "murŝtono, ŝtonhakaĵo" (dum la mezepoko oni faris morteron el frakasitaj brikoj), de *caedere* "haki" (kp *ĉizi*; vd. plue sub *decidi*).

CEND/O (1; PR, Jü): AFPoR *cent*, G *Cent*. Sonŝanĝo *t* > *d* en Eo por eviti koincidon kun la numeralo *cent*; vd. *aldo*. ¶ Io *"cent"*, (Ie *centime*), Ia *cent*.

Nomita laŭ L *centum* "cent" (ĉar centono de dolaro aŭ guldeno; kp F *centime* "centono de franko", H *céntimo* "centono de peseto", *centavo* "centono de peso", I *centesimo* "centono de liro") kaj do etimologie identa kun tiu.

CENT (f; Un): L *centum*; F *cent*, I *cento*, (H *ciento*). Krome la latin(id)a formo estas internacie konata per vortoj kiel *centimetro*, *procento* ktp; kp ank. A *century* "jarcento", *cent* "cendo". ¶ 1881 *cen*. ¶ IoIe *cent*, Ia *-o*.

El HE **kmtom* "100", kp Sa *catám*; Gr *(he)katón* (vd. *hektogramo*); A *hund(red)*, G *hund(ert)*; PoR *sto*. La vorto praorigine signifis "deko (da dekoj)": HE **dkmtom*, der. de **dekm* "10", kp *dek*. Samfamiliaj radikoj en Eo: *cendo*, *centi/gramo*, *-litro*, *-metro*, *centimo*, *procento*.

CENTIGRAM/O (2; Jü): AF *centi/gramme*, I *-grammo*, (H *-gramo*), G *Zentigramm* [ts-], Po *centygram*, R *santigramm*. – **CENTILITR/O** (2; Jü): AF *centi/litre*, I(H) *-litro*, G *Zentiliter* [ts-], Po *centylitr*, R *santilitr*. – **CENTIMETR/O** (2; PR,Be): A *centimetr/e*, I-*o*, F *centimètre*, G *Zentimeter* [ts-], Po *centymetr*, R *santimetr*, (H *centímetro*). ¶ Io =, Ie *centi/gramme*, *-litre*, *-metre*, Ia *-gramma*, *-litro*, *-metro*.

Konstruitaj en F (1795) el L *centum* "cent" (vd. tiun) k Gr *grámma*, *lítra*, *métron* (vd. *gramo*, *litro*, *metro*).

CENTIM/O (f',7; PR,Be): AF *centime*, G *Centime*, Po *centym*, R *santim*, (H *céntimo*). ¶ Io =, IeIa *centime*.

Konstruita en F (18a jc) el F *cent* (vd. *cent*) analoge al F *décime* "dekono de franko" el L *decima (pars)* "dekono".

CENTIMETR/O, vd. sub **CENTIGRAM/O**

CENTR/O (f; RE): AF *centre*, G *Zentrum* [ts-], I(H) *centro*, Po *centrum*, R *centr*; L *centrum*. ¶ IoIa *centr/o*, Ie *-e*.

El Gr *kéntron* "mezpunkto; cirkela pinto", orig. "pikilo", de *kenteín* "piki", par. al Ki *cethr* "najlo". Samfamiliaj radikoj en Eo: *central/o*, *-izi*, *koncentri*.

CENTRAL/O (8; PVS; ne ĉe Z; antaŭe *centr/ejo* k.s.): FI *centr/ale*, Po *-ala*, R *-al'*, (H *-al*), G *Zentrale* [ts-]. Kp A *centre* kun (parte) s.s. Ps-sf *-al*. ¶ Io *centr-al-o*, Ia *central*, Ie *-e*.

Substantivigo de adj. FH(I) *central(e)* "centra", vd. sekv.

CENTRALIZ/I (3; Jü; antaŭe *al/centr/igi*): A *central/ize*, F *-iser* [z-], I *-izzare*, Po *-izowac'*, R *-iz(ir)ovat'*, (H *-izar*), G *zentralisieren* [ts-]. Ps-sf *-iz*. ¶ Io *centr-al-ig-ar*, IeIa *centralisar*.

Verbo faktitiva, formita el adj. AFH *central*, I *-e*, Po *-ny*, R *-'nyj*, G *zentral*, der. de la subst. citita sub *centro*.

CENZUR/O (1; RE): AF *censur/e*, I(H) *-a*, G *Zensur* [ts-], PoR *cenzura*. Eo *-z-* ŝajnas inspirita de la slavaj formoj; kp *-nz-* en *benzino*, *bronzo*, kie pluraj fontlingvoj apogas tiun skribon. Ps-sf *-ur*. ¶ Io *censur/o*, IeIa *-a*.

El L *censura* "ofico de censisto", de *censere* "censi, taksi la havaĵon (de iu), prijuĝi, opinii", eble par. al Sa *camŝati* "proklamas".

CEP/O (8; Wü; ne ĉe Z; antaŭe *bulb/o*): L *cepa*; H *cebolla*, I *cipolla*, Po *cebula*. Botanika termino bazita sur L. ¶ Io *onyono* (< A *onion*, F *oignon*), Ie *cebul*, Ia *cepa*.

L vorto (la latinidaj formoj el dim. *cepula*, el kiu ank. G *Zwiebel*) de nekonata origino.

CERAMIK/O (4; ER): A *ceram/ics*, I

-ica, Po *-ika*, F *céramique*, G *Keramik*, R *keramika*, (H *cerámica*). Ps-sf *-ik*.

El Gr *keramikê (tékhnê)* "argilvaza (arto)", adj. de *kéramos* "ceramika argilo; ceramikaĵo, argila vazo" de necerta origino (eble fremdvorto).

CERB/O (f; RE): L *cerebrum*; F *cerveau* [-vó:] (kp *cérébral* "cerba"), I *cervello* (kp *cerebrale* "cerba"), (H *cerebro*). Kp A *cerebral* "cerba". Z mallongigis la radikon, kredeble laŭ modelo de F (ellaso de la dua *-e-*, ĉefine prononcata [o] akceptita kiel substantiva signo; *-b-* tamen ne estis anstataŭigebla per *-v-*, ĉar *cerv-* estis bezonata por alia signifo). ¶ 1894 *cerebr-*. ¶ IoIa *cerebr/o*, Ie *-e*.

L vorto, orig. "kapaĵo", de HE bazo **ker-* "kapo, pinto; korno", kp Sa *s'íras* "kapo, pinto"; Gr *kára* "kapo", *kraníon* "kranio" (kp tiun), *koryphê* "pinto" (vd. *korifeo*); G *Hirn* "cerbo". Por la derivaĵoj signifantaj "korno", vd. tiun kaj kp *cervo*.

CEREMONI/O (1; Du, RE): A *ceremon/y*, Po(H) *-ia*, R *-ija*, F *cérémonie*, G *Zeremonie* [ts-], I *cerimonia*.

El L *caerimonia* "religia ceremonio; sankteco, devoto", eble de etruska origino.

CERT/A (f; Un): AF *certain*, I *certo*, (H *cierto*, kp *certeza* "certeco"); L *certus*. Kp ank. G *Zertifikat* [ts-], R *sertifikat* "certigatesto". ¶ Ie *cert*, Io *-a*, Ia *-e*.

Propr. "distingita, klara", ptc. perf. de L *cernere* "distingi" (vd. *diskreta*).

CERV/O (f; RE): L *cervus*; F *cerf*, I *cervo*, (H *ciervo*)). Zoologia termino bazita sur L. ¶ IoIa *cerv/o*, Ie *-e*.

Latin(id)a vorto kun orig. signifo "kornulo" (kp Gr *keraós* "kornohava", R *korova* "bovino") el HE bazo **ker-* (vd. plue *korno*; kp *cerbo*).

CETER/A (f; Un): L *ceterus*; int. konata per la L esprimo *et cetera* "kaj cetere" (AFG =, H *etcétera*, I *eccetera*). ¶ Io *ceter/a*, Ia *-e*, Ie *céteri*.

L vorto, kies ĉefa parto estas **etero-* "alia", de HE demonstrativa rad. **e-/i-* "tiu" (kp G *er* "li"); la unua elemento povas esti partikulo **ce* "tie" (kp *ĉi*).

CI (f; Du, RE): Ĉiuj personaj pronomoj en Eo finiĝas per *-i* (vd. *mi*). Kiel konsonanton por la duapersona pronomo singulara la fontlingvoj sugestis *t-* (A *thou*†, FIL *tu*, PoR *ty*, kp H *tú*; dentalo ankaŭ en G *du*). Tamen eventuala posesiva pronomo **tia* estus konfuzebla kun la demonstrativa adjektivo *tia* "tiuspeca, tiukvalita". Do Z ŝanĝis la atendatan *t* je *c*, kiu ja ankaŭ enhavas la sonon [t]; ĉe tio, certaj polaj formoj eble servis al li kiel modelo (Po *ci* "al ci", *cie* "cin"). (La ŝanĝo ne estas unika, kp *atenci*, *parenco*, *senco*.) Vd. Waringhien 1946, 21; LV 59; Gregor 1958, 97. ¶ 1881 *to*; 1894 *tu*. ¶ IoIeIa *tu*.

La cititaj AFGHIPoR formoj el HE **tu* "ci", kp ank. Sa *tv-am*, Gr *sy* (dial. *ty*).

CIDONI/O (2; Jü): L bot. *Cydonia*, L kl. *cotoneum* (el kiu la modernaj, ne tre similaj formoj: A *quince*, F *coing*, G *Quitte*, I *cotogna*). La Ea radiko bazita sur L kiel botanika termino. ¶ Io *quingo*, Ie *cidonio*, Ia *cydonia*.

El Gr *kydônion mêlon* (*mêlon* "pomo") asociita kun la urbonomo *Kydônía* en Kreto (nuna Ĥanio) probable pro popola etimologio, la fruktonomo kredeble estante de malgrandazia origino.

CIDR/O (1; Jü): A *cider*, F *cidre*, G *Zider* [ts-], I *sidro*, Po *cydr*, R *sidr*, (H *sidra*). ¶ Io *cidr/o*, Ie *-e*, Ia *-a*.

El L postkl. *sicera* "ebriiga trinkaĵo", pere de Gr *síkera* s.s. el He *ŝêkâr* "ebriiga trinkaĵo el fruktoj kaj mielo", de *ŝâkar* "ebriigi sin".

CIFER/O (f; RE): F *chiffre*, G *Ziffer* [ts-], IR(H) *cifra*, Po *cyfra*. Formo laŭ G kun konservita radikfina silabo *-er* (same en *kelnero*, *telero*; male en *fingro*, *hamstro*; kp ank. *cirkelo*). Eventuala formo **cifr-* estus tro simila al *ĉifr-* (kiu tamen aperas pli malfrue). ¶ 1894 *cifr-*. ¶ Io *cifr/o*, Ia *-a*, Ie *ciffre*.

La vorto signifis "nul" antaŭ ol ekhavi (ĉ. 1400) sian nunan signifon. Pere de L mez. *cifra* el Ar *sifr* "nul", orig. "malplena". De la

sama Ar formo (pere de **zefro*) AI *zero*, F *zéro*, H *cero* "nul". Etimologie identa radiko en Eo: *ĉifro*; samfamilia: *deĉifri*.

CIGAN/O (1; RE): F *tsigane*, G *Zigeuner* [ts-], I *zingaro* [ts-], Po *Cygan*, R *cygan*. Kp Pg *cigano*. Formo bazita sur la akordo de FPoR. ¶ IoIe =, Ia *tsigano*.

El Gr biz. *Athínganoi*, nomo de gento en Malgrandazio.

CIGAR/O (f; Un): A *cigar*, F *-e*, (H *-ro*), G *Zigarre* [ts-], I *sigaro*, Po *cygaro*, R *sigara*. ¶ Io *sigaro*, Ie *cigarr/e*, Ia *-o*.

H vorto de necerta (eble sudamerika) origino. Samfamilia radiko en Eo: *cigaredo*.

CIGARED/O (f; Un): AF *cigarette*, G *Zigarette* [ts-], I *sigaretta*. (Kp H *cigarillo* s.s.) Sonŝanĝo *t* > *d* en Eo por eviti konfuzon kun *cigar-et-o* (vd. *aldo*; kp spec. *bufedo*, *pikedo*, *planedo*). ¶ 1894 *cigaret-*. ¶ Io *sigareto*, Ie *cigarrett/e*, Ia *-a*.

Dim. de la vorto por "cigaro" (vd. tiun).

CIGN/O (f; RE): L *cygnus*; F *cygne*, I *cigno*, (H *cisne*). Kp A *cygnet* "cignido". Zoologia termino bazita sur L; pro tio konservita *-gn-* (kiel en *digna*, *ligno*, *signo*; FI prononcas [n']). ¶ Io *cign/o*, Ie *-e*, Ia *cygno*.

El Gr *kyknos* s.s., eble de onomatopea origino.

CIKAD/O (2; J): L *cicada;* A *cicada*, F *cigale*, G *Zikade* [c-], I *cicala*, Po *cykada*, R *cikada*, (H *cigarra*). La L termino estas apogata de pluraj modernaj lingvoj (AGPoR). ¶ Io =, Ie *cicad/e*, Ia *-a*.

L vorto, probable pruntita el iu mediteranea lingvo.

CIKATR/O (f; RE): L *cicatr/ix* (gen.: *-icis*); AFI *cicatrice*, (H *cicatriz*). Z ellasis la finan silabon de la L radiko (normale reprezentantan en Eo per *-ik*, vd. sub *filiko*), kiu nenecese plilongigas la vorton. Analoga ellaso en *koturno* < L *coturnix*, *tetro* < *tetrix* (vd. Wüster, Esp. princ. 58). ¶ Io = (espismo), Ie *cicatre* (espismo), Ia *cicatrice*.

L vorto sen evidenta etimologio.

CIKL/O (2; Jü) 1) periodo, 2) lit., 3) velocipedo: AF *cycle* (1,2,3), G *Zyklus* [ts-] (1,2), I *ciclo* (1,2,3†), Po *cykl* (1,2), R *cikl* (1,2), (H *ciclo* 1,2). ¶ Io = (1,2) Ie *cicle*(1,2) Ia *cyclo*(1,2,3).

El Gr *kyklos* "rondo, rado" el HE **kŭekŭlo-* "rado", kp Sa *cakra-*, A *wheel*, Po *kol'o*, R *koleso* s.s. Formita per duobligo de la radiko **kŭel-* "turni" (vd. *poluso*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *biciklo*, *ciklono*, *ciklopo*.

CIKLON/O (2; Be): AF *cyclone*, G *Zyklon* [ts-], I *cicl/one*, (H *-ón*), Po *cyklon*, R *ciklon*. ¶ Io =, Ie *ciclon*, Ia *cyclon*.

Konstruita en A (de Piddington, 1848) por signifi "rondvento", kp Gr *kykloún* "rondiri, turniĝi", de *kyklos* "rondo" (vd. *ciklo*).

CIKLOP/O (2; Be): A *Cyclops*, F *cyclope*, G *Zyklop* [ts-], I(H) *ciclope*, Po *cyklop*, R *ciklop*. ¶ Io =, Ie *ciclop*, Ia *cyclope*.

El Gr *Kyklôps* s.s., propr. "rondokul(ul)o", de *kyklos* "rondo" (vd. *ciklo*) k *ôps* "okulo" (vd. *optiko*).

CIKONI/O (f; RE): L *ciconia*; F *cicogne*, I *cicogna*, (H *cigüeña*). Zoologia termino bazita sur L; pro tio konservita *-ni-*, kie la latinidaj lingvoj prononcas [n'] (sama reprezento en *linio*, *pinio*). ¶ Io =, Ie *storc* (< A *stork*, G *Storch*), Ia *ciconia*.

Latin(id)a vorto kun pridisputata etimologio.

CIKORI/O (f; RE): L *cichorium* [-k-]; A *chicory*, F *chicorée*, G *Zichorie* [cik-], I *cicoria*, Po *cykoria*, R *cikorij*, (H *achicoria*). Botanika termino bazita sur L, kp *apio* < *apium*, *geranio* < *geranium*, *lilio* < *lilium*. ¶ Io =, Ie *cicoré*, Ia *cichorea*.

El Gr *kikhór/ê*, *-ion* s.s.

CIKUT/O (1; Jü): L *cicuta*; F *cigu*, I(H) *cicuta*, Po *cykuta*. ¶ Io =, Ie *cicut/e*, Ia *-a*.

Latin(id)a vorto kun nekonata etimologio.

CILINDR/O (1; RE): APo *cylind/er*, F *-re*, G *Zylinder* [ts-], R *cilindr*, I(H) *-o*. ¶ Io =, Ie *cilindre*, Ia *cylindro*.

El Gr *kylindros* "rulo", de *kylíndein* "ruli", eble de HE rad. **(s)kel-* "fleksi, kurbigi" (vd. *kolubro*).

CIM/O (f; RE): L *cim/ex* (gen.: *-icis*); I

cimice, (H *chinche*). Zoologia termino bazita sur L sed kun ellaso de la fina radiksilabo; kp *kulo*, *pulo*, ank. *atriplo* (bot.), *verto* (anat.). ¶ Io = (espismo), Ie *címice*, Ia *cimice*.

Latin(id)a vorto kun necerta etimologio.

CIMBAL/O (f; RE): A *cymbal*, F *-e*, G *Zimbel* [ts-], I *cembalo, cimbalo*, R *kimval(y)*, Po *cymbaly* , (H *cimbalo*). ¶ Io =, Ie *cimbale*, Ia *cymbalo*.

El Gr *kymbalon* s.s., orig. "pelvo", de *kymbê* "trinkvazo, pelvo", par. al Sa *kumbhá-* "poto".

CINABR/O (f; RE): A *cinnabar*, F *cinabr/e*, I *-o*, (H *-io*), G *Zinnober* [ts-], Po *cynober*, R *kinovar'*; L *cinnabaris*. Formo bazita sur FI; kaj **cinabar-* kaj **cinober-* donus sufikssimilan radikfinon. ¶ Io *cinabr/o*, Ie *-e*, (Ia *cinnabare*).

El Gr *kinnábari* s.s., fremdvorto de orienta origino.

CINAM/O (f; RE): A *cinnamon*, G *Zimt* [ts-], Po *cynamon*; L *cinnam(om)um*. Kp F *cinnam(om)e*, (H *cinamomo*), L bot. *Cinnamomum* "cinamarbo". Z preferis la mallongan formon de FL, utiligante la lastan vokalon de la pli longa formo kiel substantivsignon (kp *arbo, falko, gudro, piŝto*). ¶ Io *cinam/o*, Ie *-on*; Ia *cannella* (< F *cannell/e*, I *-a*, H *canela*).

El Gr *kínnam/on -ômon* s.s., prenita el semida lingvo (la fenica?); kp He *qinnâmôn* s.s.

CINDR/O (f; RE): A *cinder(s)*, F *cendre*, I *cenere*, (H *ceniza*); L *cin/is -eris*. Ŝajne kompromisa formo inter A kaj F; eble L decidigis favore al la vokalo *-i-*. ¶ Io *cindr/o*, Ie *-e*, Ia *cinere*.

Orig. "polvo", par. al Gr *kónis* "polvo, cindro", de (H)E rad. **ken-* "grati, skrapi", kp A *nip* (< *kn-*) "pinĉi".

CINIK/A (2; Jü): A *cyn/ic*, F *-ique* [-ík], Po *-iczny*, G *zynisch* [ts-], I *cin/ico*, R *-iĉeskij*, (H *cínico*). Ps-sf *-ik*. ¶ Io *cinik(al)a*, Ie *cinic*, Ia *cynic*.

El Gr *kynikós* s.s., propr. "hunda" (ĉar la cinikismanoj volis reiri al "laŭnatura" vivado; moknomo farita per vortludo pri la gimnazio *Kynósarges* apud Ateno, kie la cinikismo estis instruata), de *kyôn* (gen.: *kynós*) "hundo" (vd. tiun).

CIPRES/O (f; RE): A *cypress*, F *cyprès*, G *Zypresse* [ts-], I *cipr/esso*, (H *-ès*), Po *cyprys*, R *kiparis*; L *cupressus*. Evidenta Ea formo: *cipr-* laŭ AFIPo(H), *-es* laŭ AFGIL(H). ¶ Io *cipr/eso*, Ie *-esse*, Ia *cypresso*.

L vorto, pruntita – same kiel Gr *kypárissos* s.s. – el iu mediteranea lingvo.

CIR/O (f; RE): F *cirage* (kp *cirer* "-i", *cireur* "-isto"). Rimarku F *cire*, HIL *cera* "vakso". Z utiligis kaj la ĝermanan kaj la latinidan vorton por "vakso"; al la unua li donis la ĝeneralan signifon, al la dua (aŭ pli ĝuste al ĝia F formo) la specialigitan signifon "ŝuvakso". Vd. Collinson 1959, 5. ¶ Io *cirajo*, Ie *cir-age*, Ia *cera pro scarpas*.

Kredeble pruntita el Gr *kêrós* s.s., de nekonata origino.

CIRK/O (1; Be): A *circus*, F *cirque* [-k], G *Zirkus* [ts-], I(H) *circo*, Po *cyrk*, R *cirk*. ¶ Io =, IeIa *circo*.

El L *circus* "hipodromo; rondo", el Gr *kírkos, kríkos* "ringo", eble de HE rad. **ker-* "fleksi, kurbigi" (vd. *kurbo*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *cirkelo, cirklo, cirkonstanco, cirkumflekso, cirkul/i, -ero, ĉirkaŭ*.

CIRKEL/O (f; RE): G *Zirkel* [ts-] (ank. "cirklo"), Po *cyrkiel*, R *cirkul'*. La ideon adopti tiun ĉi radikon por signifi la ilon certe donis la slavaj lingvoj (kie la vorto **ne** signifas "cirklo"), sed la formo estas prenita el G (kun ŝanĝo de la origina akcento; same en *grifelo, kahelo, kitelo*; kontraste *kringo, keglo, kuglo*, kp *cirklo*). ¶ 1894 *cirkl-*. ¶ Io *kompaso*, Ie *compass/e*, Ia *-o* (< F *compas*, A *-ses*, I *-so*, H *compás*).

Etimologie identa kun *cirklo*, vd. tiun.

CIRKL/O (8; Jü; antaŭe *rond/o*): A *circle*, F *cercle*, G *Zirkel* [ts-], I *cerchio, circolo*, (H *círculo*); L *circulus*. Bazita sur AF por diferencigi la vorton de *cirkel-*. Efektive, *cirkl-* reprezentas unu el la Eaj radiktipoj devenantaj de L *-ulus* (*-ula, -ulum*);

ankoraŭ alia retroviĝas en *cirkul-* (vd. sub *artikolo*). Kune, *cirkel-/cirkl-/cirkul-* do konsistigas "trinaskitan radikon", por uzi la terminon de Wiener 1950, 104. ¶ Io =, Ie *circul*, Ia *-o*.

Dim. de L *circus* "rondo" (vd. *cirko*). Etimologie identaj radikoj: *cirkelo, cirkuli.*

CIRKONSTANC/O (f; RE): A *circumstance*, F *circonstance*, I *circostanza*, (H *circunstancia*); L *circumstantia*. Bazita sur la F asimilita formo por eviti la pezan konsonantkombinon *-mst-* (AL). Pri ps-pf *cirkon-*, vd. *cirkumflekso*. Ps-sf *-anc*. ¶ Io =, Ie *circumstant/ie*, Ia *-ia*.

Propr. "ĉirkaŭstaraĵo" (do 'tio, kio staras ĉirkaŭ iu okazo'; kp la kalkeon G *Umstand* s.s.), subst. de L *circumstare*: *circum* "ĉirkaŭ", *stare* "stari" (vd. tiujn).

CIRKUL/I (3; Ka; antaŭe *rond/iri*): A *circul/ate*, F *-er*, (H *-ar*), G *zirkulieren* [ts-], I *circolare*, Po *cyrkulowac'*, R *cirkulirovat'*. La radikfino *-ul* estas apogata de granda plimulto inter la fontlingvoj. Kune kun *cirkel-* kaj *cirkl-*, tiu ĉi vorto formas trioblan idaron el la sama fontvorto (vd. sub *cirklo*). ¶ Io *cirkular*, IeIa *circular*.

El L *circulari* "formi rondon", el *circulus* "rondo" (vd. *cirklo*).

CIRKULER/O (f; RE ; *cirkular-* N-ro 15,1888): A(H) *circul/ar*, F *-aire* [-ér], G *Zirkular* [ts-], I *circolare*, R *cirkuljar*. La formo respegulas F prononcon; ĉu Z timis konfuzon kun sufikso *-ar*? Nek *-ar* nek *-er* estas kutime evitata en radikfino, vd. Wüster, Esp. princ. 52. ¶ 1894 *cirkular-*. ¶ Io = (espismo), Ia *circular*, Ie *-e*.

Propr. "rondletero" (orig. A *circular letter*, I *lettera circolare* ktp), el L postkl. *circularis* "rond(form)a", de *circulus* "rondo" (vd. *cirklo*).

CIRKUMFLEKS/O (2; Jü): A *circumflex*, F *circonflexe*, G *Zirkumflex* [ts-], I *circonflesso*, Po *cyrkumfleks*, (H *circunflejo*); L *(accentus) circumflexus*. Ps-pf *cirkum-* (ank. en eo *cirkumcidi* ER), var.: *cirkon-* (vd. *cirkonstanco*; ank. en eo *cirkonferenco* Wü), *cirkv-* (vd. *cirkvito*); etimologie identa kun *ĉirkaŭ*. ¶ Io *cirkonflexo*, Ie *circumflexe*, Ia *accento circumflexe*.

Propr. "ĉirkaŭfleksita (akcento)" (pro la formo de la akcentsigno), ptc. perf. de L *circumflectere*: *circum* "ĉirkaŭ", *flectere* "fleksi" (vd. tiujn).

CIRKVIT/O (8; PV; *cirkuit/o* Wü; ne ĉe Z): AF *circuit*, I(H) *circuito*. La formo kun *-kv-* celas eviti neoportunan hiaton. ¶ Io *cirkuito*, Ie *circuit/e*, Ia *-o*.

El L *circuitus* "rondiro", de *circu-* "ĉirkaŭ-" (vd. tiun k *cirkumflekso*) k *itus* "iro" de *ire* "iri" (vd. tiun). Kp spec. *preterito, transito.*

CISTERN/O (3; Jü): A *cistern*, IR(H) *-a*, F *citerne*, G *Zisterne* [ts-], Po *cysterna*. ¶ Io =, Ie *cistern/e*, Ia *-a*.

El L *cisterna* s.s., de *cista* "kesto" (vd. tiun).

CIT/I (f; RE): A *cit/e*, F *-er*, I *-are*, R *-irovat'*, (H *-ar*), G *zitieren* [ts-], Po *cytowac'*. ¶ IoIeIa *citar*.

El L *citare* "voki al si (kiel atestanton), venigi, movigi", verbo intensa de *ciere* "venigi, movigi", de HE rad. **kei-*, **ki-* "ekmovi", kp Sa *cyávate* "ekmoviĝas", Gr *kineín* "movi", *kínêma* "moviĝo" (kp eo *kino*), G *heissen* "ordoni; nom(iĝ)i". Samfamiliaj radikoj en Eo: *eksciti, inciti, recitativo.*

CITADEL/O (1; Jü): A *citadel*, F *-le*, G *Zitadelle* [ts-], I *cittadella*, Po *cytadela*, R *citadel'*, (H *ciudadela*). ¶ Io =, Ie *citadell/-e*, Ia *-a*.

Dim. de I *città* "urbo" (vd. *civito*).

CITR/O (f; RE): A *zither*, F *cistre, cithare*, G *Zither* [ts-], I *cetra*, Po *cytra*, R *citra*, (H *cítara*). Z evitis sufiksosimilan radikfinon (*-ar* laŭ F, *-er* laŭ AG), bazanta la radikformon sur PoR + I. ¶ Io *citaro*, Ie *cítare*, Ia *cithera*.

El Gr *kithára* "citro, liuto", de nekonata origino. Etimologie identa radiko: *gitaro.*

CITRON/O (f; Un): F *citr/on*, (H *-ón*), G *Zitrone* [ts-], Po *cytryna*. Ps-sf *-on*. ¶ Io *citron/o*, Ie *-e*, Ia *citro, limon* (< A *lemon*, I *limone*).

Latinida der. (laŭ modelo de I *limone*, kp

limonado) de L *citrus* "citronarbo; tujo", iel ligita kun *cedrus* "cedro" (kp tiun) aŭ ev. pruntita el Gr *kédros* s.s. La uzado de la nomo de la cedro pri la citronarbo eble dependas de simila utiligado de la du lignospecoj.

CIVIL/A (1; RE): AF(H) *civil*, I *-e*, G *zivil* [ts-], Po *cywilny*. Ps-sf *-il*. ¶ Io =, IeIa *civil*.

El L *civilis* "civitana; inda je civitano, ĝentila", de *civis* "civitano", probable orig. "samdomano" kaj do prapar. al Gt *heiwa-* "domo" kaj al la vortoj cititaj sub *hejmo*. Samfamiliaj radikoj en Eo: *citadelo, civiliz/i, -acio, civito*.

CIVILIZ/I (f; Du, RE): A *civil/ize* [-z], F *-iser* [-z-], I *-izzare*, R *-izovat'*, (H *-izar*), G *zivilisieren* [ts-], Po *cywilizowac'*. – Nomo de rezulta ago: **CIVILIZACI/O** (3; Be): A *civil/ization*, F *-isation* [-z-], I *-izzazione*, R *-izacija*, (H *-ización*), G *Zivilisation* [ts-], Po *cywilizacija*. Ps-sf *-iz, -cio*. ¶ 1894 *civilis-*.

Modernaj derivaĵoj (18a jc) de L *civilis* en la senco "ĝentila, urbaneca, kulturita" (vd. *civila*).

CIVIT/O (3; Ka): L *civitas*. Kp A *city*, F *cité* "urb(ocentr)o", I *città* "urbo", (H *ciudad* "urbo") kaj ties respektivajn derivaĵojn A *citizen*, F *citoyen*, I *cittadino*, (H *ciudadano*) "civitano". Iamaniere oni povas rigardi *civit-* kiel retrogradan formaĵon de *civitan-* (kp la cititajn nacilingvajn formojn), ĉar la derivaĵo sendube estas pli ofte uzata; ĝi postulas bazvorton kun la senco "civito", kiu ne ekzistas en la modernaj lingvoj sed troviĝas en L. Ps-sf *t(at)*. ¶ Io *civito* "urbo-ŝtato; urbocentro", *civit-an-o* "civitano"; Ie *cité* "urbo", *cive* "civitano", *città* "civitaneco"; Ia *cive* "urbano; civitano", *citate* "urbo", *citatano* "civitano".

Propr. "civitaneco", der. de L *civis* "civitano" (vd. *civila*).

COL/O (f; RE): G *Zoll* [ts-], Po *cal*. Kp. Ji *tsol*. Z transprenis la G vorton; la Ea ortografio (*ts* = *c*) efikis, ke la radiko montras konsiderindan similecon al la responda Po vorto. ¶ 1894 *dit-* (< I *dito* "fingro"). ¶ IoIe *inch* (< A); Ia *pollice* (< F *pouce*, I *pollice*).

El G mez. *zol* "ŝtipeto" (probabla semantika evoluo: > "fingra artiko" > "colo"), par. al R *dolja* "parto", Sa *dalam* "peco" (vd. sub *doloro*).

Ĉ

ĈAGREN/I (f; Un): A *chagrin*†, F *chagriner* (kp *chagrin* [-ê] "-o"). Eo *ĉ-* respondas normale al AF *ch.*Vokalŝanĝo *i* > *e* por eviti koincidon kun sufikso *-in* (kun certa apogo en la prononco de la F subst.), vd. *abomeni.* ¶ 1894 *cagren-.* ¶ Respondas etimologie Io *chagrenar* "ĉagreniĝi, afliktiĝi", Ie *chagrinar* "aflikti", semantike ank. Io *iritar, vexar,* Ie *despitar, enoyar, iritar, vexar,* Ia *enoiar, irritar, vexar.*

F vorto kun pridisputata etimologio.

ĈAM/O (f; RE): AF *chamois,* I *camoscio,* (H *gamuza*); L vulg. *cam/ox -ocis.* Eo *ĉ* reprezentas, kiel ordinare, AF *ch;* en la etimologie identa *ŝam/o,* Z anstataŭe prenis la AF prononcon [ŝ-] kiel deirpunkton. La radiko estas mallongigita, eble ĉar la radikfino tre varias en la diversaj fontlingvoj kaj tial estas malfacile transskribebla. Se oni atentas la L formon, oni trovas ke Z utiligis la enradikan *o* kiel substantivsignon laŭ la sama metodo kiel en *arbo, korpo* ktp (alie en *ezoko* < *esox*). ¶ 1894 *kamos-.* ¶ Io *chamo,* Ie *chamuse,* Ia *camoce.*

Vorto el iu alpa lingvo, par. al G *Gemse* s.s.

ĈAMBELAN/O (f; RE): A *chamberlain* [ĉ-], F *chambell/an,* (H *-án* [ĉ-]), I *ciambellano* [ĉ-], Po *szambellan.* ¶ 1894 *cambelan-.* ¶ Io *chambel/ano,* Ie *-lano,* Ia *camerero.*

F vorto, propr. "ĉambristo", el Fk **kamarling* s.s. (kp G *Kämmerling* s.s.), der. de la latindevena vorto signifanta "ĉambro", vd. tiun.

ĈAMBR(/O (f; Un): A *chamber* [ĉ-], F *chambre,* I *camera,* (H *cámara*). Bazita sur (A)F; tamen ankaŭ la I(H) formo estis adoptata kun specialigita senco (vd. *kamero*; kp G *Kammer* "ĉambreto", R *kamera* "ĉambreto, ĉelo"). ¶ 1881 *c'embr-* (kp Vp *cem*); 1894 *cambr-.* ¶ Io *chambr/o,* Ie *-e,* Ia *camera.*

Latinida vorto (kun parazita *-b-* inter *m* kaj *r* en AF) el L *camera* (vd. *kamero*). Kp. ankaŭ *ĉambelano.*

ĈAMPAN/O (f; N-ro 15 1888,RE): AF *champagne* [A ĉ-], G *Champagner,* Po *szampan,* R *ŝampanskoe,* (H *champaña* [ĉ-]). Latinida [n'] redonita per *-n-* (laŭ modelo de PoR?), vd. *akompani.* ¶ 1894 *campan-.* ¶ Io *champanio,* IeIa *champagne.*

F vorto, elipso de *vin de Champagne* kaj do identa kun la provincnomo *Champagne* (el L vulg. *campania* "ebenaĵo", vd. *kampo*).

ĈAN/O (f; RE): F *chien,* I *cane.* Miksita formo kun komencsono bazita sur F kaj I vokalismo. Pli serĉita ŝajnas la hipotezo de Waringhien, LV 80, ke *ĉan/o* estas kompromiso inter F *chien* kaj G *Hahn.* Rimarku, ke *kan-* estis samtempe akceptata kun alia signifo. ¶ 1894 *kanet-.* ¶ Io *hano,* Ie *clave* (< L *clavis* "ŝlosilo"), Ia *cane.*

La koncerna peco kompariĝas kun diversaj bestoj: la FI vorto signifas "hundo" (< L

canis; vd. sub *hundo*), la G vorto "koko" (vd. sub *kanti*); kp ank. A *cock* s.s., propr. "koko", H *gatillo* s.s., propr. "kateto".

ĈAP/O (f; Un): A *cap*, G *Kappe*, Po *czapka* [ĉ-], R *ŝapka*. Kp Ji *tshapke*. Komencsono kredeble inspirita de Po (Ji): *kap-* havis alian signifon; krome *ĉap-* prezentas mnemoteknikan avantaĝon pro paraleleco al *ĉapel-*. ¶ 1894 *cap-*. ¶ Io *boneto* (< F *bonnet*), kp *shapko* "pelta ĉapo"; Ie *cappe*; Ia *bonetto*, *tocca* (< F *toque*).

El L mez. *cappa* "(mantelo kun) kapuĉo" kun nekonata etimologio. Samfamiliaj radikoj en Eo: *ĉapelo*, *kapoto*, *kapuĉo*, *kepo*.

ĈAPEL/O (f; Un): F *chapeau*, I *cappello*, Po *kapelusz*; kp Pg *chapéu*. Komenca *ĉ-* laŭ F (eble pro *kapel-*, kiu aperas unue en RE sed kredeble, estante internacia vorto, jam dekomence havis lokon rezervitan en la radikaro; kp IoIe). ¶ 1894 *capel-*. ¶ Io *chapelo*, Ie *chapel*, Ia *cappello*.

El L vulg. **cappellus*, dim. de *cappa* "(mantelo kun) kapuĉo" (vd. *ĉapo*).

ĈAPITR/O (f; N-ro 15 1888,RE): A *chapter* [ĉ-], F *chapitre*, G *Kapitel*, I *capitolo*, (H *capítulo*). Komenco laŭ AF, radikfino laŭ F. La motivo de tiu prefero restas neklara; la alternativaj radikformoj alprenis aliajn signifojn: *kapitel/o* RE, *kapitol/o* EG, *kapitul/o* Wü. Cetere Io sekvis Eon. ¶ 1894 *capitr-*. ¶ Io *chapitro*, Ie *capitul*, Ia *-o*.

El L *capitulum* "ĉapitro, sekcio (de verko)", propr. "kapeto" (> "ĉefsekcio"), dim. de *caput* "kapo" (vd. tiun).

ĈAR (f; Un): F *car*, "kun modifo de la konsonanto por eviti la kolizion kun *kara*" (Waringhien LV 62). Malgraŭ tio, Z poste allasis homoniman radikon *ĉar/o* Jü. ¶ 1881 *kor* (evidente alia provo de diferencigo disde *kar-*); 1894 *nam* (< L). ¶ Io *nam* (konj.), *proke* (subj.; kp H *porque*, I *perché*); Ie *nam* (konj.), *proque* (subj.); Ia *nam* (konj.), *proque*, *poisque* (subj.; por la lasta, kp F *puisque*, I *poiché*), F vorto, el L *quare* "kial", propr. "pro kiu afero", abl. de *qui* (demanda kaj rilativa pron., kp korelativon *kiu*) k de *res* "afero" (vd. *respubliko*).

ĈAR/O (2; Jü): A *car(t)*, F *char(iot)* (kp *charrette* "ĉareto"), G *Karren*, I(H) *carro*; L *carrus*. Kp R *kareta* "kaleŝo". Ĉar la evidenta radikformo **kar-* jam estis okupita per alia signifo, Z modifis la komencan konsonanton laŭ F (sammaniere kiel en *ĉar*). ¶ Io *char(et)o*, Ie *carr/e*, Ia *-o*.

Latin (id) a vorto de gaŭla origino, prapar. al L *currus* s.s. (vd. *kuri*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *kariero*, *karikaturo*, *ŝargi*.

ĈARLATAN/O (f; RE): AF *charlat/an*, (H *-án* [ĉ-]), G *Scharlatan*, I *ciarlatano* [ĉ-], Po *szarlatan*, R *ŝarlatan*. Forme influita de AF, prononce de I. ¶ 1894 *carlatan-*. ¶ Io *sharlatano*, IeIa *charlatan*.

I vorto, kredeble kruciĝo de *ciarlare* "babili" (onomatopea vorto) k *cerretano* "fuŝkuracisto", propr. "ano de *Cerreto*" (vilaĝo konata dum la mezepoko kiel bazo de vagantaj drogvendistoj).

ĈARM/o (f; RE): A *charm* [ĉ-], F *-e*, G *Charme*, *Scharm*. ¶ 1894 *carm-*. ¶ Io *charm/o*, IeIa *-e*.

F vorto, el L *carmen* "ensorĉ(a kant)o", der. – pere de hipoteza formo **canmen* – de *canere* "kanti" (vd. tiun).

ĈARNIR/O (f; RE): F *charn/ière*, (H *-ela* [ĉ-]), G *Scharnier* [-ír], I *cerniera* [ĉ-], R *ŝarnir*. Komencsono laŭ F grafismo, radikfino laŭ R. ¶ 1894 *carnier-*. ¶ Io *charnir/o*, Ie *-e*, Ia *cardine* (< L, vd. sube).

El L vulg. **cardinaria*, der. de L *card/o -inis* "pordpivoto" kun necerta etimologio. Samfamilia radiko en Eo: *kardinalo*.

ĈARPENT/I (f; RE): A *carpenter*, F *charpenter*, (H *carpintear*). Kp I *carpentiere* "ĉarpentisto". Pro nekonata kialo Z preferis *ĉ-* laŭ la F grafismo, malgraŭ ke la aliaj fontlingvoj prezentas komencan *k-*. (Konformigo al *ĉar/o* estas neverŝajna, ĉar tiu radiko aperis pli malfrue; konfuzo kun *kar-* kaj *pent-* ŝajnas neebla.) ¶ 1894 *carpent-*. ¶ Io *karpentar*, Ie

carpentar; kp Ia *carpentero* "ĉarpentisto".

Orig. "fabriki veturilojn", el L *carpentum* "durada veturilo", vorto de gaŭla origino.

ĈARPI/O (f; RE): F *charpie*, G *Scharpie*, Po *szarpie*, R *korpija*. Formo respegulanta F; sendube Z konis la F originon de la vorto. ¶ 1894 *carpi-*. ¶ Io *sharpio*, Ie *charpie*; mankas en Ia.

F vorto, de *charpir*† "kardi, deŝiri", el L *carpere* "deŝiri, pluki" (HE rad. **ker-* "tranĉi", vd. sub *korko*).

ĈAS/I (f; RE): A *chase* [ĉ-], F *chasser*, I *cacciare*, (H *cazar*). Kiel kutime, Eo redonas AF *ch* per *ĉ*. ¶ 1894 *venatr-* (kp L *venator* "ĉasisto"). ¶ Io *chasar*, IeIa *chassar*.

El L vulg. **captiare*, var. de L *captare* "kapti" (vd. tiun, kiu do estas etimologie identa).

ĈAST/A (f; RE): A *chaste* [ĉ-], F *chaste*, I(H) *casto*; L *castus*. Ea formo laŭ AF; rimarku, ke *kast-* (1; RE) prezentiĝas kiel internaciismo kun alia signifo (Modrijan, 41). ¶ 1881 *dekast-* "malĉast-"; 1894 *cast-*. ¶ Ie *chast*, Io *-a* (kp *caste* resp *kasto* "kasto"), Ia *caste* (kp *casta* "kasto").

Orig. "pura (de), libera (de)", samradika kun L *carere* "malhavi", kredeble par. al *castrare* "kastri" (vd. tiun).

ĈE (f; Un): F *chez* [ŝe]. Transskribo *ch* > *ĉ*, vd. *aĉeti*. (Semantike, tamen, la prep. respondas al G *bei*, RPo *u*, vd. Back 1980, 24l.) ¶ 1881 *di* (sen etimologio, vd. PVZ 5, 134); 1894 *ce*. ¶ IoIe *che* (espismo), Ia *(a) presso (de)* (< I *(ap)presso*), *apud*.

F vorto, propr. "en la domo (=hejmo) de", el L *casa* "dom(et)o" (vd. *kazino*).

ĈEF/O (f; RE): A *chief* [ĉ-], F *chef*, G *Chef*, I *capo*, Po *szef*, R *ŝef*, (H *jefe*). Kiel kutime, Eo *ĉ* respondas al AF *ch*. ¶ 1894 *cef-*. ¶ Io *chefo*, IeIa *chef*.

F vorto, el L *caput* "kapo" (kp I; vd. *kapo*, kiu do estas etimologie identa).

ĈEK/O (1; Be): A *cheque* [ĉ-], F *chèque*, G *Scheck*, Po *czek* [ĉ-.], R *ček*, (H *cheque* [ĉeke]).

A vorto, propr. "(dokumento por) kontrolo" (orig. pri la kontrola kupono restanta en la ĉeklibro), substantivigo de *check* "kontroli, haltigi", orig. metafora uzo de la ludtermino *check!* "ŝak!" (vd. *ŝako*, kiu do estas etimologie identa).

ĈEL/O (f; RE): A *cell*, F *cellule*, G *Zelle*, I *cell(ul)a* [ĉ-], Po *cela*, (H *célula*). Kp R *kel'ja* "monaĥeja ĉelo". Radikformo prijuĝenda kunlige kun *cel/i* kaj *kel/o*: *ĉel-* sendube ŝuldas sian cirkumflekson al diferencigo disde *cel-* (tamen kun apogo de la I prononco). (Formo **celul-* certe estus ebla; ĝi probable estis evitata pro sufikseca fino.) Por *kel-*, kiu originas en la sama bazo, la G formo prezentis oportunan komencliteron, kiu diferencigas ĝin de *ĉel-*. Kp Modrijan 38, Waringhien LV 78. ¶ 1894 *cel-*. ¶ Io *celulo*, Ie *cellul*, Ia *-a*.

El L *cella* (dim.: *cellula*) "kamero", propr. "kaŝejo", kp *celare* "kaŝi" (vd. *okulta*). Etimologie identa radiko: *kelo*; samfamiliaj: *celulozo*, *kelnero*.

ĈEMIZ/O (f; Un): F *chemise* [-z], I *camicia*, (H *camisa*). Kp A *chemise* [ĉ-,-z] "virina ĉemizo", G *Chemisett* "surĉemizo", R *ŝemizetka* "surĉemizo". Formo laŭ F (el kiu AGR). ¶ 1894 *kamis-*. ¶ Io *kamizo*, Ie *camis/e*, Ia *-a*.

El L *camisia* s.s., eble de gaŭla origino, prapar. al G *Hemd* s.s. (HE rad. **kem-* "kovri"). Etimologie identa radiko: *kamizolo*.

ĈEN/O (f; Un): A *chain* [ĉejn], F *chaîne* [ŝen], G *Kette*, I *catena*, (H *cadena*); L *catena*. Formo baziĝanta sur AF; Z tamen utiligis ankaŭ la IL varianton en la senco "ĉeno por ligi malliberulojn" (*katen-*), diferencigo ne troviĝanta en IoIeIa. ¶ 1894 *katen-*.

Vd. la etimologie identan *kateno*.

ĈERIZ/O (f; Un): A *cherry* [ĉ-,-i], F *cerise* [-z], G *Kirsche*, I *ciliegia* [ĉ-], (H *cereza*); L *ceras/us, -um*. Kp Po *czeres'nia* [ĉ-] "bigarelo, ruĝa-blanka ĉerizo". Bazita sur F (formo konata ankaŭ en A en la senco "ĉerizkolora"); la ŝanĝo al *ĉ-* plivastigas la etimologian bazon (AIPo). ¶ 1894 *ceras-*. ¶ Io *cerizo*, Ie *ceres/e*, Ia *-ia*.

El Gr *kérasos* "ĉerizujo", eble de malgrandazia origino.

ĈERK/O (f; Un): F *cerceuil*, G *Sarg*. Kp ank. Nd *zerk* "tomboŝtono". Bazita sur F minus la malfacile transskribebla vortfino (kp tamen 1894); la mallongigon eble inspiris G. La kialo de la komenca cirkumfleksigo estas nekonata. ¶ 1894 *cerkel-*. ¶ Io *sarko* (mll de *sarkofago*), Ie *sarco*, Ia *sarcophago*.

El (mallongigita formo de) L *sarcophagus* (vd. *sarkofago*, kiu do estas etimologie identa).

ĈERP/I (f; RE): Po *czerpac'* [ĉ-], R *ĉerpat'*. Kp ank. Ĉe *ĉerpati*. ¶ 1894 *cerp-*. ¶ Io *cherpar* (espismo), Ie *hauster*, Ia *haurir* (< L *haurire*, supina rad. *haust-*).

Slava vorto (pSl **cerpti*), prapar. al L *carpere* "deŝiri, pluki" (vd. *ĉarpio*), Gr *karpós* "frukto" ("plukitaĵo"), Sa *krpânî* "ponardo", A *harvest* "rikolto" (HE **kerp-* "detranĉi, depreni", plivastigita formo de rad. **ker-* "tranĉi", vd. *korko*).

ĈES/I (f; Un): A *cease*, F *cesser*, I *cessare* [ĉ-], (H *cesar*). La komenca cirkumfleksigo (evidente laŭ I) ŝajnas nemotivita. ¶ 1894 *ces-*. ¶ Io *cesar*, IeIa *cessar*.

El L *cessare* "heziti; paŭzi, nenifaradi", verbo intensa de *cedere* "retiriĝi, (for)iri" (vd. *cedi*).

ĈEVAL/O (f; Un): F *cheval*, I *cavallo*, (H *caballo* [-v-]). Kp R *kobyla* "ĉevalino". Int. konata per der. *kavaleri-* (kp tiun). Kial franceca formo? Golden (1981b) montris al la fakto, ke Vp havas *jeval* [ŝ-]; tiu ĉi povas esti unu el tiuj punktoj, kie Z estis influita de Schleyer. Estas konstateble, ke kelkaj internaciaj vortoj samoriginaj (kiel *kavalir-*, *kavalkad-*) ne plu asociiĝas kun la nocio 'ĉevalo'; eble Z volis diferencigi la bestnomon de tiuj. Rimarku, ke **kaval-* donus konfuzeblecon **kaval/ir/o*: *kavalir/o*. ¶ 1894 *kaval-*; 1906a *kval/o*. ¶ Io *kavalo*, Ie *cavall/e*, Ia *-o*.

El L *caballus* "ĉeval(aĉ)o" (kp L zool. *Equus caballus* "ĉevalo"), kp Gr *kabállês* "tirĉevalo": migra kulturvorto de necerta (eble malgrandazia) origino. Samfamiliaj radikoj en Eo: *kavalerio*, *kavaliro*.

ĈEVRON/O (4; Jü): F *chevron*, (H *cabrio*). Kp A *chevron* "ĉevrono (heraldika termino)". Unu el pluraj domkonstruaj terminoj prenitaj el F, kp ekz. *plafono*, *planko*. ¶ Ie *chevron*, Io *-o*; mankas en Ia.

El L vulg. **capr/io -ionis*, propr. "kapro" (por la signifo, kp ekz. I *cavalletto* "truso", propr. "ĉevaleto"), de *capra* "kapro" (vd. tiun).

ĈI (f; Un): F *ci* (ekz.: *ceci* "tio ĉi", *celui-ci* "tiu (ĉi)", *ci-joint* "ĉi-kune"); kp I *ci* [ĉ-] "tien ĉi". Bazita sur F (kiel montras la uzado de la partikulo) sed kun komenca sono probable inspirita de I ([ĉ-] troviĝis jam en pEo; ĝi do ne estas kaŭzita de la nur poste formita persona pronomo *ci*). ¶ 1881 *c'i* [ĉ-]; mankas en 1894 (kp *hik* "tiu ĉi", *ho* "tio ĉi", *ic* "tie ĉi"); 1906b *s'-* (ekz. *s'tu* "tiu ĉi"). ¶ Ie *ci* [ts-] (*ti ci* "tiu ĉi", *to ci* "tio ĉi"). Sen ekzakta ekvivalento en Io (kp. *ica*, *ca* "tiu ĉi", *ico*, *co* "tio ĉi", *hike* "tie ĉi") kaj Ia (kp *iste* "tiu ĉi", *isto* "tio ĉi", *hic*, *ci* "tie ĉi").

F *ci* (kp I *qui*, H *aqui* "tie ĉi") el L *ecce hic* (*ecce* "jen", *hic* "tie ĉi"). Ambaŭ vortoj enhavas finaĵe la partikulon *ce* "ĉi" (kp *cetera*) < HE **ke* de pronoma radiko **ko-* "tiu ĉi" (kp L *cis* "ĉi-flanke", A *he* "li", G *hier* "tie ĉi"). – L *hic* "tie ĉi" (> 1894, IoIa) apartenas al la radiko de la pronomo *hic* "tiu ĉi", *hoc* "tio ĉi" (> 1894), vd. plue *hodiaŭ*.

ĈIA (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *omne* (< L *omnis*). ¶ Io *omnaspeca*, Ie *de omni species*, Ia *omni/forme, -mode*.

ĈIAL (f',7; ER): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ Io *omnakauze, pro omno*; Ie *pro omni cause(s)*; Ia *a causa de toto, per omne motivo*.

ĈIAM (f; *ĉian* Un, *ĉiam* Ald,RE): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *c'ian*; 1894 *semper* (< L). ¶ IoIe *sempre*, Ia *semper*.

ĈIE (f; Un): Vd. la sekcion pri korelati-

vaj vortoj. ¶ 1882 *c'ii*; 1894 *partutu* (< F *partout*). ¶ Io *omnaloke*, Ie *partú, in omni loc*, Ia *ubique* (< L), *in omne partes (locos)*.

ĈIEL (f; RE): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1894 *omnemaniere*. ¶ Io *omnamaniere*, Ie *in omni maniere*, Ia *in omne modo*.

ĈIEL/O (f; Un): F *ciel*, I(H) *cielo* [I ĉ-]; L *caelum*. Kp A *celestial* "ĉiela". Tiu ĉi radiko devas esti prijuĝata kune kun *cel-* kaj *ĉel-*. Laŭ Modrijan 38, Z kreis *ĉiel-* (laŭ I) kaj *ĉel-* por tiel distingi L *caelum* disde L *cella* (kiuj ambaŭ donus **cel-*); la cirkumflekso estis necesa pro la ekzisto de *cel/i* < G *zielen*. Laŭ Waringhien LV 78, oni povas klarigi la supersignon de *ĉiel/o* nur per la hipotezo, ke en pli frua stadio de la lingvo la verbo *cel/i* havis la (germanecan) formon **ciel/i* (kiu do estis neebla por tiu ĉi nocio); kiam Z poste ŝanĝis **ciel-* al *cel-*, la radiko *ĉiel/o* tamen restis (sed alia ĉenreakcia modifo iĝis necesa: la antaŭa **cel/o* < L *cella* fariĝis *ĉel/o*). Oni tamen povas imagi malpli komplikan procedon: evidente L *caelum* ne povis esti adoptata en la formo **cel-* pro la aludita radikkolizio. Z tiam sin turnis al la latinidaj lingvoj, kiuj akorde proponis **ciel-*. La cirkumfleksigo certe ne estis necesa; tamen estas fakto, ke Z en pluraj kazoj sen nepra neceso preferis I komencsonon *ĉ-* (*ĉesi, ĉirkaŭ, ĉizi*). ¶ 1894 *ciel-*. ¶ Io *cielo*, Ie *ciel*, Ia *celo*.

Latin(id)a vorto kun necerta etimologio.

ĈIES (f',7; PR): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ Io *di omnu, di omni*, Ie *de chascun, de omnes*, Ia *de omne(s)*.

ĈIF/I (f; RE): F *chiffonner*. Radiko mallongigita ĉar *ĉifon-* estis adoptata kun alia signifo. ¶ 1894 *cif-*. ¶ Io *krumplar* (< A *crumple*); Ie *(co)rugar*, Ia *(cor)rugar* (< L *corrugare*).

Propr. "ĉifonigi", de *chiffon* "ĉifono" (vd. tiun).

ĈIFON/O (f; RE): F *chiffon*. Ps-sf *-on*. ¶ 1894 *cifon-*. ¶ Io *rago* (< A *rag*), *shifono*, Ie *chifon*, Ia *pannello* (< L *pannus*, I *pannicello*).

Der. de F *chiffe* "ŝtofaĉo" el A *chip* "fragmento, peceto". Samfamilia radiko en Eo: *ĉifi*.

ĈIFR/O (3; Dmitriev 1914,Wü; ne ĉe Z): A *cipher*, F *chiffre*, G *Chiffre*, I(H) *cifra* [I ĉ-], Po *szyfr*, R *ŝifr*. Modelo certe estis la pli malnova *deĉifri* (EG), el kiu la radiko ŝajnas ekstraktita. Cetere radiko bazita rekte sur la fontlingvoj kredeble donus la saman rezulton: *ĉ-* laŭ FG ortografio kaj I prononco (mola komencsono ankaŭ en FGPoR), *-fr-* ĉie krom en A. Je tiuj du punktoj la radiko diferenciĝas oportune de la alisignifa sed etimologie identa *cifer-*. ¶ Io *chifro*, Ie *ciffre*, Ia *cifra*.

F vorto, orig. "skribo per ciferoj" (ekde 18a jc), identa kun *chiffre* "cifero" (vd. tiun).

ĈIKAN/I (f; RE): F *chicaner*, G *schikanieren*, Po *szykanować*. Kp A *chicanery* "-ado", ank. Pg *chicanar* "-i". Eo *ĉ-* respegulas (A)F *ch-*. – Origine la citita etimologio koncernis nur la formon, ĉar Z atribuis al la radiko la signifon "babili malicajojn"; post kiam *klaĉi* estis oficialigita (4a OA), la signifo de *ĉikan/i* konformiĝis al tiu de la nacilingva responda vorto. Vd. Waringhien LV 81, 87. ¶ 1894 *interfam-*; 1906 *ĵaz/i* (< F *jaser*). ¶ Io *shikanar*, Ie *chicanar, molestar* (< F *molester*), *vexar* (< A *vex*, F *-er*), Ia *vexar, importunar* (< F *importuner*).

F vorto kun nekonata etimologio.

ĈIO (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *c'io*; 1894 *omno*. ¶ Io *omno*, Ie *omnicos*, Ia *toto, omne cosa* (pri etimologio, vd. *omnibuso* resp. *tuta*; *cosa* "aĵo" < F *chose*, I *cosa*).

ĈIOM (f', 7; PR): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ Mankas en IoIeIa, kie tiu ĉi nocio kunfandiĝas kun "ĉio".

ĈIRKAŬ (f; Un): L *circa*. En la senco "proksimume", ĝi retroviĝas en modernaj lingvoj: AI *circa* [I ĉ-], G *zirka*, (H *cerca de*). L formo modifita en Eo komence kaj fine: *ĉ-* povas esti inspirita de

I aŭ nura cirkumfleksigo, probable por klare distingi la prepoziciajn kunmetojn disde tiuj kun la pseŭdoprefikso *cirkon-/cirkum-*; *-aŭ* anstataŭas *-a*, kredeble por plifaciligi pluformadon (**ĉirka* donus adjektivon **ĉirkaa*: Manders 1947, 315). Pri la vortfino *-aŭ*, vd. cetere la liston de pseŭdosufiksoj. ¶ 1894 *cirku*; 1906a *ĉir.* ¶ Io *cirkum*, Ie *circ/um*, Ia *-a.*

L vorto, formita (analoge al *infra* "malsupre de", *supra* "supre de" k.a.) el *circus* "rondo" (vd. *cirko*).

ĈIU (f; Un): Vd. la sekcion pri korelativaj vortoj. ¶ 1881 *c'iu*; 1894 *omnu* (vd. sub *omnibuso*). ¶ Io *omn/u, -a*; *singl/u, -a* ("ĉiu unuopa", < A *single*); Ie *omni, chascun* (< F *chacun*, I *ciascuno*); Ia *omne, tote* (vd. sub *tuta*), *cata (uno)* (< HPg *cada*).

ĈIZ/I (f; RE): A *chisel* [ĉizl], F *ciseler* [-z-], (H *cincelar*); kp G *ziselieren*, I *cesellare* [ĉ-] "cizeli". Envere la verbo estas formita el la nomo de la ĉizilo (A *chisel*, F *ciseau*, H *cincel*, I *cisello*); ankaŭ Z versâjne havis tiun kiel deirpunkton, egaligante *-el* al Eo *-il-*, kaj retrograde formis pli mallongan verbradikon. (Kp tamen la poste enkondukitan *cizeli* PV kun specialigita senco; cetere Z en 1894 konsideris pli longan formon.) Ne estas klare, pro kio Z evitis *c-*; eble la komencsono estas italeska kiel en *ĉesi, ĉi.* ¶ 1894 *cisel-.* ¶ Io *cizelar*, Ie *cisel/ar*, Ia *-lar.*

El L vulg. **cisellus* "ĉizilo", der. de L *caedere* "haki" (kp *cemento*; vd. plue sub *decidi*).

ĈOKOLAD/O (f; RE): A(H) *chocolate* [ĉ-], F *chocolat*, G *Schokolade*, I *cioccolata* [ĉ-], Po *czekolada* [ĉ-], R *ŝokolada.* Eo *ĉ-* estas apogata de la plimulto de fontlingvoj (AI prononco, AF ortografio); kiom koncernas la radikfinon, la akordo de G kaj PoR estis evidente sufiĉa, por ke Z adoptu *-ad* (nek *-ad* nek *-at* estis ideala laŭ liaj principoj). ¶ 1894 *cokolat-.* ¶ Io *chokolado*, IeIa *chocolate.*

Vorto enkondukita en Eŭropon pere de H, orig. pruntita el la Azteka (ĉe kio la hispanoj kredeble konfuzis la vortojn *ŝokoatl* "trinkaĵo el fermentita maizo" k *kakaŭatl* "trinkaĵo el kakao kaj maizo", ambaŭ kun lasta elemento *atl* "akvo"; la meza *-l-* pro la analogio al aliaj nomoj de trinkaĵoj, ekz. *posolatl* "trinkaĵo el kuirita maizo". Kp *kakao.*

ĈU (f; Un): Po *czy* [ĉ-] (demanda partikulo, ekz. *czy tak?* "ĉu estas tiel?"; uzata ankaŭ kiel demanda subjunkcio kaj duopa konjunkcio alternativa, respondo al Eo *ĉu...ĉu*, vd. Duc Goninaz 1974, 38). Normala transskribo en Eo estus **ĉi* (kp pEo), sed tiu formo estis rezervita por alia signifo. Kp cetere Ji *tsi*, par. al la Po formo; eble tiu akordo igis Z preferi tiun ĉi partikulon. La kialo de la vokalo *u* restas obskura (oni sugestis diversajn motivojn, vd. Gold 1980, 319 (hiperkorekta prononco de Ji? *u* supra vokalo samkiel *i*?). ¶ 1882 *c'i*; 1894 *num* (< L *num* "ĉu vere?"). ¶ Io *ka(d)* (< Sa *ka-*, radiko de demanda pronomo); Ie *esque* (< F *est-ce que*); Ia *an* (< L).

Po *czy* estas adverbo de HE **kŭi-* (kp L *qui* "kiel?", G *wie* "kiel?"), demanda radiko paralela al **kŭo-* "kiu" (vd. la sekcion pri korelativaj vortoj).

D

DA (f; Un): I *da*. Etimo nur forma, ne senca, ĉar I *da* respondas al Eo *de*. Kp en I *di* (*un chilo di burro* "unu kilogramo da butero"), en F *de* (*un verre de vin* "glaso da vino"), en H *de* (*una docena de naranjas* "dekduo da oranĝoj"). Tamen tiuj prepozicioj havas ankaŭ aliajn uzojn; la formo *de* rekomendas sin por la signifo "de, mal-al" (FHL). Por uzo post kvantaj kaj mezuraj esprimoj Z do elektis *da*, formon kun ioma simileco al *de* sed klare diferencigitan de ĝi. ¶ Mankas en 1894 (ekz. *botelo vino*). ¶ IoIeIa *de*.

I *da* el L *de ab* (pri *de*, vd. tiun; pri *ab*, vd. la liston de pseŭdoprefiksoj).

DAKTIL/O (f; RE) 1) bot. 2) metr.: A *date* (1), *dactyl* (2); F *datte* (1), *dactyle* (2), G *Dattel* (1), *Daktylus* (2), I *dattero* (1), *dattilo* (2), Po *daktyl* (2), R *daktil'* (2), (H *dátil* 1, *dáctilo* 2); L *dactylus* (1,2), kp L bot. *Phoenix dactylifera* "daktilujo". Por la botanika signifo (RE,UV) Z sendube prenis L kiel deirpunkton (formoj **dato*, **datilo* estus neoportunaj en Eo pro *dat/o*); la metrika signifo (Jü) sin trudis pro internacieco. ¶ Io *datelo* (1), *daktilo* (2), Ie *datil* (1), *dáctilo* (2), Ia *dattilo* (1), *dactylo* (1,2).

El Gr *dáktylos* (1,2), propr. "fingro" (la frukto estis tiel nomata pro sia formo, la versero ĉar ĝi havas unu longan kaj du mallongajn 'falangojn'), kun necerta etimologio.

DALI/O (2; Wü; antaŭe *georgin/o* Bat): AF *dahlia*, G *Dahlie*, I(H) *dalia*; L bot. *Dahlia* [-h- ĉie neprononcata]. Ne-Za radiko. Ps-sf *-i* 4. ¶ Io "*dahlia*", Ie *dalia*, Ia *dahlia*.

L bot. termino farita (1791) el la nomo de sveda botanikisto *Dahl* (1751-1789).

DAM/O(J) (f; *-oj* RE, *-o* Jü, *dam/lud/o* Wü; kp *dam/o* "sinjorino, virino" N-ro 14 1888): F *jeu de dames* ('ludo de damoj'), G *Dame*, I *dama*, (H *juego de damas* 'ludo de damoj'). Kp PoR *dam(k)a* (nomo de figuro aŭ peco en damo, ŝako, kartludoj ktp). ¶ Io *damo-ludo*, *dami* (plur.), Ie *dama-lude*, Ia *joco de damas*.

La ludo estas nomita laŭ atuta disko, 'damo' (= "sinjorino", kp AF *dame*, G *Dame*, HIR *dama* > eo *damo* "sinjorino" PG). F vorto, el L *domina* "mastrino" (vd. *domeno*).

DAMASK/O (f; EG): AR *damask*, F *damas*, G *Damast*, I(H) *damasco*, Po *adamaszek*. ¶ Io =, Ie *damast*, Ia *damasco*.

Pere de I el la nomo de la urbo Damasko (L *Damascus* < Ar *Dimaŝq*), kie la ŝtofo unue estis fabrikata.

DAN/O (8; N-ro 33 1890; *dan/a* Be): A *Dane*, F *Danois*, G *Däne*, I *danese*, (H *danés*). Kp Po *Dania*, R *Danija* "Danlando". ¶ Io *Dano*, Ie *dano*; Ia *danese*

Antikvepoka gentonomo (Sk ant. *danir*, L *Dani*, Gr *Danoî*) kun pridisputata etimologio.

DANC/I (f; Un): A *dance*, F *danser*, G *tanzen* [-ts-], Po *tanczyc*, R *tancovat'*, (H *danzar*). Kp I *danza* [-ts-] "-o". Estas eble

heziti inter *-c-* kaj *-s-*; Z elektis *-c-* laŭ A ortografio, GIR prononco. ¶ 1894 *danz-*. ¶ IoIeIa *dansar.*

F vorto, kredeble de ĝerm. origino (kp ev. G ant. *dansôn* "tiri, treni").

DAND/O (f; RE): AF *dandy*, G *Dandy*, Po *dandys*, R *dendi*. Apokopo de vortfina *-y* [i] kiel en (same angladevenaj) *brando, gurdo, kando* (male en eo *hobi/o* PIV < A *hobby*). ¶ Io *dandio*, Ie *dandy*; Ia *adonis* (< A *Adonis*, kp FH *Adonis* "belulo", nomo el greka mitologio.).

A vorto, unue uzita en Skotlando, eble identa kun *Dandy*, karesa formo de la nomo *Andrew* "Andreo".

DANĜER/O (f; Un): AF *danger* [A *-ĝ-*, F *-j̑-*]. Eo *-ĝ-* kombinas la ortografion kun la mola prononco; vd. *aĝo*. ¶ 1894 *perikl-* (< A *peril*, F *péril*, I *pericolo*; L *periculum*). ¶ Io *danjero*, Ie *dangere*; Ia *periculo.*

F vorto, orig. "(absoluta) potenco" (semantika evoluo: "esti sub ies potenco" > "esti en danĝero"), el L vulg. **dominiarium*, de *dominus* "mastro" (vd. *domeno*).

DANK/I (f; Un): A *thank*, G *danken*. Kp Ji *danken*, krome Nd *danken*. Bazita sur G. ¶ 1894 *grati-* (< L *gratias* "dankon"). ¶ Io *dankar*; Ie *mersiar* (< F *merci* "dankon"); Ia *regratiar* "-i", *gratias* "-on" (< L; kp H *gracias*, I *grazie* "dankon").

Ĝerm. vorto (kp Gt *thagks* "danko"), orig. "penso" (semantika evoluo: > "bonvola penso" > "dankemo"), subst. de la verbo signifanta "pensi": A *think*, G *denken*, Gt *thagkjan* < pĜ **thankjan.*

DAT/O (f; EG): AF *date*, G *Datum*; IPoR(H) *data*. Ps-pf *-at* 1. ¶ IoIa *dat/o*, Ie *-e.*

El L mez. *data* s.s., propr. "donita" (laŭ la iama leterfina frazo "(Letero) donita la ...-an de ... en ..."), ptc. perf. de *dare* "doni", identa kun Gr *dotós* (kp *anekdoto*). Vd. sub *doni*; kp. sekv.

DATIV/O (f; RE): A *dat/ive*, F *-if*, I(H) *-ivo*, G *Dativ*; L *dativus (casus)*. Ps-sf *-iv.*

Orig. "dona (kazo)", der. de L *dare* "doni" (vd. tiun; kp *dato*).

DATUR/O (f; RE): L bot. *Datura*; FI(H) *datura*. ¶ Io =; mankas en IeIa.

Pere de Pg *datura* el Hi *dhatûrâ* s.s. (< Sa *dhattûra-* kun pluraj variantoj; eble prearja plantonomo).

DAŬR/I (f; Un): G *dauern*; kp F *dur/er*, I *-are*, (H *-ar*) s.s., ank. A *during* "dum (la daŭro de)". Bazita sur G; la forstreko de (neakcentata) *-e-* havas ekzaktan paralelon en *bedaŭri* (vd. tiun). Pri altgermana *au* en Eaj radikoj, vd. Collinson 1959, 4. – La motivo por elekto de la G formo ne estas klara; eble kontribuis timo pri eventuala konfuzo de **dur-* kun la signifo de F *dur*, I(H) *duro* "malmola" (> eo *dur/a* PG). ¶ 1894 *dur-*. ¶ IoIeIa *durar.*

El L *durare* "daŭri; elteni", orig. "malmol-(iĝ)i" (proksimuma semantika evoluo: > "resti firma" > "daŭri"), de *durus* "malmola", eble orig. "ligneca" kaj tiuokaze par. al Gr *drys* "kverko", Sa *dâru-* "ligno", A *tree* "arbo".

DE (f; Un): F(H) *de*; L *de*. Kp I *di*, *da*. ¶ 1878 *de*; 1881 *de*; 1906b ank. *ab* (post pasivo; < L). ¶ Io *de* (ĝenerale), *di* (genitivo), *da* (post pasivo); Ie *de*, *fro* ("mal-al"; < A *from*); Ia *de*, *ab* ("mal-al"), *per* (post pasivo).

Latin(id)a vorto, identa kun Ir *dí* "for de" kaj devenanta de HE demonstrativa radiko **de-/do-*, sur kiu baziĝas multaj diverslingvaj partikuloj, ekz. L *dum* "dum" (vd. tiun), A *to* "al", R *do* "ĝis", Gr *en-do-* "en-". – La prepozicio estas identa kun la ps-pf *de-*, vd. la koncernan liston.

DEBAT/O (2; Be): A(H) *debate*, F *débat(s)*, G *Debatte*, I *dibattimento* (kp *dibattere* "debati"), Po *debata*. ¶ Io =, Ie *debatt/e*, Ia *-o.*

De F *débattre* "debati", orig. "forte bati", de *de-* (intensiga pref.) k *battre* "bati" (vd. tiun).

DEBET/O (3; *debit/o* Be, *debet/o* Jü): A *debit*, F *déb/et*, *-it*, G *Debet*, I *debito*, PoR *debet*, (H *debe*, *débito*). Bazita sur G + PoR

(certe ankaŭ kun konsidero de la L originformo, vd. sube); la alternativa formo *debit/o* aperas jam en Jü kun alia signifo ("vendado de varo"; < F *débit*). ¶ Io *debet/o*, Ie *-e*, Ia *debito*.

El L *debet* "li/ŝi ŝuldas", prez. (3a pers. sing.; sama finaĵo *-t* en *deficito, kredito*) de *debere* "ŝuldi", propr. "havi (ion) de (iu)", el *de* "de" k *habere* "havi" (vd. tiujn). Kp spec. la etimologie identan *devi*.

DEC/I (f; RE): L *decet* "decas". Kp A *decent*, I(H) *-e*, F *décent* "deca". La Ea formo estas aŭ prunto de L aŭ retroformaĵo bazita sur AFI. La unua ŝajnas pli probabla; kp la semantikan paralelon *konvenas* = L *convenit*. ¶ Io *decar*, Ie *decer*; en Ia mankas verbo, kp *esser decente* "esti deca".

L vorto (kun responda subst. *decus* "ornamo, deco", kp *dekoracio*) de HE rad. **dek-* "akcepti" (> "respekti; esti akceptebla, esti ĝusta, taŭgi; lerni", kp Sa *dákŝate* "taŭgas"; Gr *dék(h)esthai* "akcepti", *dokeín* "kredi; ŝajni", *dóxa* "opinio" (kp *ortodoksa*), *dógma* "opinio" (kp *dogmo*); L *dignus* "digna" (kp tiun), *discere* "lerni" (kp *disĉiplo*), *docere* "instrui" (kp *doktoro*), plue la vortojn por "dekstra" (orig. "ĝustaflanka").

DECEMBR/O (f; Du,RE): A *december*, F *décembre*, G *Dezember* [-ts-], I *dicembre*, R *dekabr'*, (H *diciembre*); L *(mensis) December*.

Propr. "la deka (monato)" (de la origina jarkomenco en la romia kalendaro, la 1-a de marto), de L *decem* "dek" (vd. tiun).

DECID/I (f; Un): A *decid/e*, I *-ere*, (H *-ir*), F *décider*, Po *decydowac'*. Ps-pf *de-*. ¶ 1881 *c'id-* (verŝajne afereza formo de la sama etimo). ¶ Io *decid/ar*, Ia *-er*.

El L *decidere* "interkonsenti; tuj fini (aferon)", propr. "dehaki", de *de* "de" (vd. tiun) k *caedere* "haki"; kp ev. Sa *khídati* "ŝiras". Samfamiliaj radikoj en Eo: *akcizo, cemento, ĉizi, konciza, preciza*.

DECIGRAM/O (2; Wü): *deci/gram(me)*, I *-gramma*, R *-gramm*, (H *-gramo*), F *décigramme*, G *Dezigramm* [-ts-], Po *decygram* [-ts-]. – **DECILITR/O** (2; Jü): A *deci/litre*, I(H) *-litro*, R *-litr*, F *décilitre*, G *Deziliter* [-ts-], Po *decylitr* [-ts-]. – **DECIMETRO** (2; Be): A *deci/metre*, I *-metro*, R *-metr*, F *décimètre*, G *Dezimeter* [-ts-], Po *decymetr* [-ts-], (H *decímetro*). ¶ IoIeIa *deci-*; vd. cetere sub *centigramo*.

Konstruitaj en F (1795) el L *decem* "dek" (vd. tiun) k Gr *grámma, lítra, métron* (vd. *gramo, litro, metro*).

DECIMAL/A (2; Jü): A(H) *decimal*, I *-e*, F *décimal*, G *dezimal* [-ts-], Po *decymalny* [-ts-]. Ps-sf *-al*. ¶ IeIa *decimal*, Io *-a*.

F vorto, de L *decimus* "deka" (kp Eo-snn. *dek/um/a*), identa kun Sa *dácama-* s.s. (HE **dekemos*). Kp *dek*.

DECIMETR/O, vd. sub **DECIGRAM/O**.

DEĈIFR/I (f; EG): A *de/cipher*, G *-chiffrieren*†, I *-cifrare* [-ĉ-], F *déchiffrer*, (H *descifrar*). Kp, kun indiĝenaj prefiksoj, G *ent-ziffern*, Po *od-cyfrowac'*. Eo *-ĉ-* (laŭ I) supozeble por maksimuma diferencigo disde *cifer-*. Ps-pf *de-*, var. de *dis-*. – El tiu ĉi radiko estis ekstraktata *ĉifr-* (OA3), kp tiun. ¶ 1894 *decifr-*. ¶ Io *de/chifrar*, Ia *-cifrar*, Ie *de(s)ciffrar*.

Latinida vorto, propr. "elĉifrigi", de (ekz.) F *dé-* "el-, mal-" (vd. la ps-pf *dis-*) k *chiffre* "ĉifro" (vd. tiun).

DEDIĈ/I (f; RE): A *dedic/ate*, I *-are*, (H *-ar*), F *dédier* (kp *dédicace* "-o"); L *dedicare*. Kp G *dedizieren* [-ts-], Po *dedykowac'* "dediĉi, donaci". Eo *-ĉ-* malhavas apogon en la fontlingvoj, kiuj ĝenerale prononcas [-k-]. Evidente Z ial decidis cirkumfleksigi la *-c-* de AIPoL kontraste kun aliaj radikoj de la sama etimo (*ab-, in-, pre/diki*; kp *kondiĉo*, kie tamen la fontlingvoj kondutas alie). La motivo estas malfacile divenebla; ke ekzistas aliaj Eaj radikoj *de* kaj *dik* apenaŭ ŝajnas sufiĉa kialo. Ps-pf *de-*. ¶ 1894 *dedik-*. ¶ Io *de/dikar*, IeIa *-dicar*.

Orig. signifo "konsekri, dediĉi", kunm. de L *de-* (intensiga pref.) k *dicare* "konsekri", orig. "solene proklami" (vd. *abdiki* k plue

diri).

DEDUKT/I (3; Jü): A *deduc/e*, (H *-ir*), F *déduire*, G *de/duzieren*†, I *-durre*, Po *-dukowac'*. Bazita sur la L supina radiko, troviĝanta en la responda subst. (A *deduction*, F *déduction*, G *Deduktion*). Ĝi kongruas kun *indukti*; kp ank. *pro-*, *re/dukti*. Ps-pf *de-*. ¶ Io *de/duktar*, Ie *-ducter*, Ia *-ducer*.

El L *deducere* (sup.: *deductum*), propr. "konduki [venigi] (ion) el (io)", de *de* "de, el" k *ducere* "konduki" (vd. tiun). Kp semantike G *ableiten* s.s.: *ab-* "de-", *leiten* "konduki".

DEFEND/I (f; Un): A *defend*, (H *-er*), F *défendre*, I *difendere*; L *defendere*. Radiko internacie konata per la der. A *defens/ive*, H *-iva*, Po *-ywa*, F *défensive*, G *Defensive*, I *difensiva* (> eo *defensiv/o* Wü), bazita sur la L supina radiko, kiu ankaŭ inspiris la Z-ajn reformojn kaj Io. Ps-pf *de-*. ¶ 1894 *defens-*; 1906 a *fensi*, b *defens/i*. ¶ Io *de/fensar*, IeIa *-fender*.

Propr. "forpuŝi (malamikon)", de L *de* "for, de" k *-fendere* "puŝi, bati" (vd. *ofendi*).

DEFICIT/O (1; Be): AIR *deficit*, F(H) *déficit*, Po *deficyt*. Ps-pf *de-*. ¶ Ia *deficit*, Io *-o*, Ie *-e*.

El L *deficit* "mankas", prez. (3a pers. sing.; kp *debeto*) de *deficere* "manki" (vd. *difekto*).

DEFINITIV/A (1; Be): A *definit/ive*, G *-iv*, I(H) *-ivo*, Po *-ywny*, F *définitif*. Ps-pf *de-*; ps-sf *-iv*.

El L *definitivus* "difin(it)a", de *definire* "difini" (vd. tiun).

DEGEL/I (f; RE): F *dégeler*, I *sgelare*, (H *deshelar*). Kp Pg *degelar*. Bazita sur F ortografio. Ps-pf *de-*, var. de *dis-*. ¶ Io *desfrostar*; Ie *degelar*, Ia *disgelar*.

Latinida vorto, propr. "malfrostiĝi", kunm. de F *dé-* (kp H *des-*, I *s-*) "mal-, dis-" (vd. la ps-pf *dis-*) k verbo signifanta "frostiĝi": F *geler*, H *helar*, IL *gelare*, kp L *gelu* "frosto" de (H)E rad. **gel-* "frost-, ank. en L *glacies* "glacio", A *cold*, G *kalt* "malvarma". Samfamiliaj radikoj en Eo: *gelateno*, *glacio*.

DEGENER/I (f; RE): A *degener/ate*, G *-ieren*†, I *-are*, Po *-owac' sie* (refl.), (H *-ar*), F *dégénérer*; L *degenerare*. Formo laŭortografia. Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *degenerar*.

L vorto, aludanta malplivaloriĝon de gento, el *de-* "malsupren-" (vd. la ps-pf *de-*) k *gen/us -eris* "gento" (vd. tiun k *generacio*).

DEGRAD/I (f; RE): A *degrad/e*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, (H *-ar*), F *dégrader*; L postkl. *degradare*. Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *degradar*.

Propr. "rangmalaltigi", el L *de-* "malsupren-" (vd. la ps-pf *de-*) k *gradus* "rango; ŝtupo; paŝo" (vd. *grado*).

DEĴOR/I (f; RE): Po *dyż'urowac'* [-ĵ-], R *deĵurit'*. Kp Ji *dizhurirn* [-ĵ-], ank. F *être de jour* "esti deĵoranta, deĵori". Bazita sur R sed kun vokalmodifo (laŭ F ortografio?), kredeble por eviti konfuzon kun *de/ĵur/i* (Wü). Ps-pf *de-*. ¶ 1894 *servo/gard-*. ¶ Io *dejurar*, Ie *dejorar*, Ia *esser de servicio*.

Vorto farita en slavaj lingvoj surbaze de la citita F esprimo, propr. "de la (hodiaŭa) tago" (kp semantike G *Tagesdienst* "deĵoro"): *de* "de", *jour* "tago" (vd. *ĵurnalo*).

DEK (f; Un): L *decem* [dek-]; F *dix*, I *dieci*, (H *diez*); Gr *déka*. Kp A *decuple*, F *décuple*, I *decuplo* (H *décuplo*) "dekobla", ank. Pg *dez* "dek". Kiel ĉe la plej multaj numeraloj, L estas la bazo de la Ea formo. Sur L resp. Gr baziĝas ankaŭ internaciaj terminoj kiel *decimetro*, *dekagramo* ktp. ¶ 1881 *dek*. ¶ Io =, Ie *deci*, Ia *dece*.

El HE **dekm* "10", kp ank. Sa *dáca*, A *ten*, G *zehn*, R *desjat'*, Po *dziesiec'*. Samfamiliaj radikoj en Eo: *decembro*, *deci/gramo*, *-litro*, *-metro*, *decimala*, *deka/gramo*, *-litro*, *-metro*, *dekano*, *denaro*. Vd. ank. sub *cent*.

DEKADENC/O (3; Jü kun preseraro): A *decad/ence*, I *-enza* [-ts-], Po *-encja*, R *-ans*, (H *-encia*), F *décadence*, G *Dekadenz* [-ts]. Ps-pf *de-*, ps-sf *-enc*. ¶ Io *dekado* (*dekadar* "dekadenci"), Ie *decadent/ie*, Ia *-ia*.

El L mez. *decadentia*, subst. de L *decadere*

"malsuprenfal(ad)i": *de-* "malsupren-" (vd. ps-pf *de-*), *cadere* "fali" (vd. *kadenco*).

DEKAGRAM/O (2; Jü): A *deca/gram(me)*, I *-gramma*, (H *-gramo*), F *décagramme*, G *Deka(gramm)*, Po *deka/gram*, R *-gramm.* – **DEKALITR/O** (2; Wü): A *deca/litre*, I(H) *-litro*, F *décalitre*, G *Dekaliter*, PoR *dekalitr.* – **DEKAMETR/O** (2; Be): A *deca/metre*, I *-metro*, F *décamètre*, G *Dekameter*, PoR *dekametr*, (H *decámetro*). ¶ Io *deka-*, IeIa *deca-*; vd. cetere sub *centigramo.*

Konstruitaj en F (1795) el Gr *déka* "dek" (vd. tiun) k *grámma, lítra, métron* (vd. *gramo, litro, metro*).

DEKAN/O (1; Jü): A *dean* (kp *decanal* "dekana"), F *doyen* (kp *décanat* "dekaneco"), G *Dekan, Dechant*, I(H) *decano*, Po *dziekan*, R *dekan*; L *decanus.* Bazita ĉefe sur L kiel eklezia kaj universitata termino. Ps-sf *-an.* ¶ Io =, IeIa *decano.*

L vorto, orig. "estro de dek (soldatoj)" (semantika evoluo: > "estro de dek monaĥoj" > "ĉefo de kanonikaro" > "ĉefo de fakulto"), de *decem* "dek" (vd. tiun).

DEKLAM/I (1; RE): A *declaim*, F *déclamer*, G *deklam/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *declam/are*, (H *-ar*). Ps-pf *de-.* ¶ 1882 *deklam-.*

El L *declamare* "oratori", propr. "laŭte paroli", de *de-* (intensiga pref.) k *clamare* "voki" (vd. *aklami*).

DEKLAR/I (1; Jü): A *declar/e*, (H *-ar*), F *déclarer*, G *deklar/ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *dichiarare.* Ps-pf *de-.* – Agonomo: **DEKLARACI/O** (3; RE): A *declar/ation*, (H *-ación*), F *déclaration*, G *Deklaration*, I *dichiarazione*, Po *deklar/acja*, R *-acija.* Ps-pf *de-*; ps-sf *-cio.*

El L *declaratio* "sciigo, klarigo" kaj *declarare* "deklari, montri", propr. "klarigi", de *de-* (intensiga pref.) k *clarare* "klarigi", de *clarus* "klara" (vd. tiun).

DEKLINACI/O (f; RE): A *declension*, F *déclinaison*, G *Deklination*, I *declin/azione*, (H *-ación*), Po *deklinacja*; L *declinatio.* Bazita ĉefe sur L kiel gramatika termino. Ps-pf *de-*; ps-sf *-cio.* ¶ 1894 *deklin-*; 1906b *deklini* "deklinacii". ¶ Io *deklin-(ad)o*, IeIa *declination.*

Subst. de L *declinare* "deklinacii", propr. "de-klini" (ĉar la antikvuloj imagis la nominativon kiel 'rektan' formon, la aliajn kazojn kiel 'oblikvajn'; kp L *casus*, propr. "falo"): *de-* "de-", *clinare* "klini" (vd. tiujn). Kp spec. sekv.

DEKLIV/O (f; RE): A *decliv/ity*, (H *-e*), I *-io* (kp *-e* "-a"), F *déclivité* (kp *-e* "-a"); L *decliv/e* (kp *-is* "-a", *-itas* "-eco"). Ps-pf *de-.* ¶ Io *pento* (< F *pente*), *taluso* (< F *talus*); Ie *declive*; Ia *scarpa* (< I), *costa* (< F *côte*, H *cuesta*, I *costa*).

L vorto, de *de-* "malsupren-" (vd. ps-pf *de-*) k *clivus* "deklivo" (vd. sub *klini*).

DEKOLT/I (1; Wü): F *décolleter* [-kolté], G *dekolletieren*, Po *dekoltowac'*, R *dekol'tirovat'.* Kp A *décolleté(e)* "-ita", I (kun alia pref.) *scollare* "-i". Franca vesta termino; la slavaj formoj aŭ la F prononco sugestis forstrekon de *-e-* por eviti sufikssimilan radikfinon (kp *bulteno* < F *bulletin*; vd. plue *bulvardo*). Ps-pf *de-*, var. de *dis-.* ¶ Io *dekoltar*, Ie *decoltar*; mankas en Ia.

Orig. "forpreni la koltukon", de F *dé-* "sen-, dis-" k *collet* "kolumo k.s.", der. de F ant. *col* "kolo" (vd. tiun). – Bastien citas H *escotar*, Pg *decotar*, kiuj ne estas parencaj.

DEKORACI/O (3; RE; ank. *dekor(ac)/i* PV, *dekor/o* PIV): A *decor/ation*, I *-azione*, (H *-ación*), F *décoration*, G *Dekoration*, Po *dekor/acja*, R *-acija*; L postkl. *decoratio.* Ps-sf *-cio.* ¶ Io *dekor-uro*, IeIa *decoration.*

Subst. de L *decorare* "ornami", de *dec/us -oris* "ornamaĵo" (vd. *deci*).

DEKRET/O (1; *-i* Jü): A *decree*, F *décret*, G *Dekret*, I(H) *decreto*, PoR *dekret*; L *decretum.* Ps-pf *de-.*

Orig. "decido", subst. de L *decernere* "decidi": *de-* (intensiga pref), *cernere* "decidi", orig. "kribri" (vd. tiun; kp spec. *diskreta, sekreta*).

DEKSTR/A (f; Un): L *dext/er* , (ina formo) *-(e)ra*; I *destro*, (H *diestro*). Kp Pg *dextro.* Bazita sur la mallonga varianto

de la L radiko. ¶ Io *dextr/a*, Ie *-i*, Ia *dext(e)re.*

Latin(id)a vorto, bazita sur HE **deksi* "dekstre", kp Sa *dákŝina-* "dekstra", Gr *dexi(ter)ós* "dekstra"; orig. probable plivastigita formo de HE rad. **dek-* "(esti) ĝusta" (vd. *deci*); la vortoj por "dekstra (mano)" ofte havas orig. signifon "ĝusta", kp A *right* "ĝusta; dekstra", G *recht* "ĝusta; dekstra", R *pravyj* "vera; dekstra".

DELEG/I (1; Be): A *deleg/ate*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, (H *-ar*), F *déléguer.* Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *delegar.* – Kolektiva subst.: **DELEGACI/O** (3; Be): A *deleg/ation*, I *-azione*, Po *-acja*, R *-acija*, (H *-ación*), F *délégation*, G *Delegation.* Ps-pf *de-*; ps-sf *-cio.* ¶ Io *deleg-it-aro*, IeIa *delegation.*

El L *delegatio* "forsend(ad)o" (moderna senco evoluinta en F, 19a jc) k *delegare* "forsendi", kunm. de *de-* "for-" (vd. *de*) k *legare* "komisii [iun] kiel senditon", de *lex* "leĝo, dekreto" (vd. *leĝo*).

DELFEN/O (f; RE): A *dolphin* [-f-], F *dauphin* [-fê], G *Delphin* [-f-], Po *delfin*, I *-o*, R *del'fin*, (H *delfín*); L *delphinus* (zool. *Delphinus delphis* [-f-]). Radikfina ŝanĝo *-in-* > *-en-* por eviti aspekton de vorto formita per sufikso; vd. *abomeni.* ¶ Io *delfin/o*, Ie *-e*, Ia *delphino.*

El Gr *delph/ís -ínos* s.s., bazita sur *delphys* "utero" (pro la ekstera korpa formo), kp Sa *gárbha-* "utero; feto"; A *calf*, G *Kalb* "bovido" (HE **gŭelbh-*). Samfamilia radiko en Eo: *didelfo.*

DELIKAT/A (f; RE): A *delic/ate*, I *-ato*, (H *-ado*), F *délicat*; kp G *delikat* "bongusta; facile rompebla; tikla"; Po *delikat/-ny*, R *-nyj* "delikatsenta". Bazita semantike sur la anglo-latinidaj vortoj, forme sur la akordo de ĉiuj fontlingvoj. Ps-pf *de-*. ¶ 1881 *delk-* (arbitra mallongigo de la sama etimo). ¶ Io =, Ie *delicat*, Ia *-e.*

El L *delicatus* "alloga, tentanta; voluptema" (kp *deliciae* "ĝuado, volupto"), kredeble de verbo paralela al *delicere* "forlogi", de *de-* "for-" (vd. *de*) k *lacere* "logi", samradika kun *lax* "fraŭdo, ruzo". Kp *diletanto*; *laĉo.*

DELIR/I (f; RE): F *délirer*, I *delir/are*, (H *-ar*); L *delirare.* Kp subst. APoL *delir/ium*, I(H) *-io*, F *délire*, G *Delirium.* Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *delirar.*

De L *delirus* "freneza", propr. "elsulkiĝinta" (t.e. "devojiĝinta"), de *de* "for-, el-" (vd. *de*) k *lira* "sulko", par. al G *(Ge)leise* "relparo" (HE **loisa*). Kp *lerni.*

DEMAGOG/O (2; RE): A *demag/ogue* [-g], I(H) *-ogo*, PoR *-og*, F *démagogue* [-g], G *Demagoge.* – Agonomo: **DEMAGOGI/O** (3; Wü; antaŭe *demagog/eco*): A *demagog/y*, IPo *-ia*, R *-ija*, (H *-ía*), F *démagogie*; G *Demagogie.* Ps-sf *-i* 1. ¶ Io =, Ie *demagog*, *-ie*, Ia *demagog/o*, *-ia.*

El Gr *dêmagôgía* "popolgvidado", der. de *dêmagôgós* "popolgvidanto", kunm. de *dêmos* "popolo" (vd. *demokrato*) k *agôgós* "gvidanto", de *ágein* "gvidi, konduki" (vd. sub *agi*). Kp spec. *pedagog(i)o*, *sinagogo.*

DEMAND/I (f; Un): F *demander* (ank. "peti"), I *domandare.* Evidente bazita sur F; la sama verbo en A *demand*, (H *demandar*), sed kun alia signifo ("postuli, peti"). Malgraŭ tiu dusenceco en la fontlingvoj Z preferis tiun ĉi radikon al la alternativa **kvest-* (AF *question*, I *-e*, H *cuestión* "demando": kp *kvestoro*) pro nekonata motivo. Ps-pf *de-*. ¶ 1882 *mand-* (afereza formo de la sama etimo; kp *pond-* "respond-"). ¶ IoIe *questionar* (kp *demandar* "peti" resp. "postuli"), Ia *questionar*, *querer* "demandi", *demandar* "demandi; peti".

El L *demandare* "transdoni, konfidi, komisii" (> "peti, postuli [ion de iu]" > "konigi [al iu] kion oni deziras scii"): *de-* (intensiga pref., vd ps-pf *de-*), *mandare* "transdoni" (vd. *mandato*).

DEMOKRAT/O (2; Be): A *democrat*, I *-a*, F *démocrat*, G *Demokrat*, PoR *demokrat*, (H *demócrata*). – Nomo de reĝimo: **DEMOKRATI/O** (8; Jü): A *democra/cy*, I *-zia*, (H *-cía*), F *démocratie*, G *Demokratie*, Po *demokra/cja*, R *-cija.* Ps-sf *-i* 1.

La individusignifa subst. formita en F (18a

jc) laŭ modelo de F *aristocrate* (bazita sur la Gr agantnomo *-kratês*, vd. *aŭtokrato*); la reĝimnomo el Gr *dêmokratía*, propr. "popolregado", el *dêmos* "popolo" (ank. en *demagog/o, -io*) kaj *krateín* "regi" (kp *aristo-, aŭto-, pluto/-krato*). – Gr *dêmos* "popolo; distrikto", orig. probable "parto, sekcio", kp *daíesthai* "disdividi" (HE rad. **dâ-*, kp Sa *dâti* "dividas"; vd. ank. *demono, domaĝo, geodezio*). – Gr *krateín* "regi, esti forta" (kp *krátos* "forto") estas par. al la ĝerm. vortoj cititaj sub *hardi.*

DEMON/O (f; RE): APoR *demon*, I(H) *-io*, F *démon*, G *Démon*, ¶ Io =, Ie *demon*, Ia *-e, -io.*

El Gr *daímôn* "spirito, diaĵo", kredeble orig. "distribuanto" (de bono k malbono?), kp *daíesthai* "disdividi, distribui" (vd. sub *demokrato*).

DEMONSTRACI/O (3; Wü): A *demonstr/ation*, Po *-acja*, R *-acija*, F *démonstration*, G *Demonstation*, I *dimostrazione*, (H *demostración*). Ps-pf *de-*; ps-sf *-cio.* -

DEMONSTRATIV/O (2; Jü): L *(pronomen) demonstrativum*; A *demonstrative*, F *démonstratif*, G *Demonstrativ(pronomen)*, I *pronome dimostrativo*, (H *pronombre demostrativo*). Gramatika termino bazita unuavice sur L. Ps-pf *de-*; ps-sf *-iv.* ¶ Io *demonstr/o*, Ie*la -ation*; Io *pronomo demonstrativa*, Ie *pronómine demonstrativ*, Ia *pronomine demonstrative.*

El L *demonstratio* "elmontrado" resp. *demonstrativus* "elmontra", subst. resp. adj. de *demonstrare* "elmontri" (> A *demonstr/ate*, G *-ieren*, Po *-owac'*, R *-irovat'*, F *démontrer*, H *demostrar*, I *dimostrare*, kp eo *demonstr/i* PV): *de-* "de-, el-" (vd. *de*), *monstrare* "montri" (vd. tiun).

DENAR/O (f; RE): LA *den/arius*, F *-ier*, I *-aro*, Po *-ar*, (H *-ario*), G *Denar*, R *dinarij.* Antikvakultura termino bazita sur L. Ps-sf *-ar(i).* ¶ Io =, Ie *denare*, mankas en Ia.

De L *deni* "po dek" (unu denaro valoris dek asojn), bazita sur *decem* "dek" (vd. tiun). Etimologie identa estas eo *dinar/-o* Wü.

DENS/A (f; Un): AF *dens/e*, I(H) *-o*; L *densus.* ¶ Io =, Ie *dens/i*, Ia *-e.*

Latin (id) a vorto; kp Gr *dasys* s.s. – Faktitiva verbo en L: *condensare* "densigi" > eo *kondens/i* Wü.

DENT/O (f; Un): L *dens* (gen.: *dentis*); F *dent*, I *-e*, (H *diente*). Internacie konata per la derivaĵo A *dentist*, F *-e*, I(H) *-a*, G *Dentist*, Po *dentyst*, R *dantist* "dentisto". Normala traktado de tiutipa L subst., kp *fonto, gento, lento, monto, ponto* (sed *menso*). ¶ Io =, IeIa *dente.*

Latin (id) a vorto, el HE **dent-*, kp Sa *dant-*, Gr *odoús* (gen.: *odóntos*; kun prosteza *o-*), A *tooth*, G *Zahn.* Propr. "manĝanto", ptc. prez. de HE rad. **ed-* "manĝi", kp Sa *ádmi* "mi manĝas", Gr *édô* "mi manĝas", L *edere*, A *eat*, G *essen* "manĝi".

DENUNC/I (f; RE): A *denounce*, F *dénoncer*, G *denun/zieren* [-ts-], I *-ziare* [-ts-], Po *-cjowac'*, (H *-ciar*). Ps-pf *de-.* ¶ 1894 *denunz-.* ¶ Io *denunc/ar*, IeIa *-iar.*

El L *denuntiare* "denunci; anonci": *de-* intensiga pref. (vd ps-pf *de-*), *nuntiare* "sciigi, anonci" (vd. *anonci*).

DEPARTEMENT/O (2; RE): A (Us) *depart/ment*, PoR *-ament*, (H *-amento*), F *département*, G *Departement.* La franca karaktero de la vorto motivigas Eo *-e-*; oni povus atendi *-a-* analoge al *apart-, fund-, parl/amento* (ĉiuj kun F *-e-*). Ps-pf *de-*, var. de *dis-*; ps-sf *-ment.* ¶ Io *depart/mento*, Ie *-ement*, Ia *-imento.*

F vorto, orig. "parto, sekcio (de la administracio)", de *départir* "disdividi": *dé-* "dis-"; *partir* "dividi" el L *partiri* s.s., der. de *pars* "parto" (vd. tiun).

DEPEŜ/O (1; RE): A *dispatch*, F *dépêche* [-ŝ], G *Depesche* [-ŝ-], I *dispaccio*, Po *depesza* [-ŝ-], R *depeŝa.* Franca diplomatia termino, kiu disvastiĝis en plurajn lingvojn kaj per tio ebligis solidan bazon por la radiko (FGPoR). Ps-pf *de-*, var. de *dis-.* ¶ Io *depesho*, IeIa *depeche.*

F vorto, orig. "ekspedo", de *dépêcher*, orig. "malligi, liberigi", de *dé-* "mal-, dis-" k la radiko de la antonimo *em-pêcher* "malhel-

pi", propr. "kateni", el L vulg. **im-pedicare*: *in-* "en-"; *pedica* "pied/kaptilo, -kateno", der. de *pes* "piedo" (vd. tiun). Kp spec. *ekspedi.*

DEPON/I (3; Jü): A *deposit*, F *déposer*, G *deponieren*, I *deposit/are*, (H *-ar*), Po *deponowac'*; L *deponere*. Kp R *depo* "deponejo". Bazita rekte sur la L originverbo (same kiel en *dis-*, *im-*, *kom-*, *pro/poni*). Ps-pf *de-*. ¶ Io *depozar*, Ie *deposir*, Ia *deponer.*

Propr. "demeti", de L *de-* "for-, de-" (vd. ps-pf *de-*) k *ponere* "meti" (sup. rad.: *posit-*, videbla en la formoj AHI cititaj supre), vd. plue *pozitiva.*

DEPUT/I (f; RE): A *deput/e*, G *-ieren*, I *-are*, Po *-owac'*, F *députer*, (H *diputar*). Kp R *deputat* "deputito". Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *deputar.*

El L *deputare* "destini (por io), elekti (por io)", propr. "detranĉi": *de-* "de-" (vd. tiun) k *putare* "tranĉi" (vd. *amputi*).

DERIV/I (4; Jü): A *deriv/e*, (H *-ar*), F *dériver.* Kp I *derivare* (itr) "deveni". Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *derivar.*

El L *derivare* "deirigi, forkonduki (akvon)", de *de-* "de-, for-" (vd. *de*) k *rivus* "rivereto" (vd. *rivero*).

DES (f; Un): G *desto.* Koincidas kun Sv *dess*, *desto* s.s. Ĉar tiu koincido verŝajne estas hazarda, la radiko baziĝas ekskluzive sur G kun unusilabigo por konformigi ĝin al la responda adverbo *ju* (cetere la plena formo estus neebla pro fina *-o*). Vd. plue sub *ju*. ¶ 1894 *tantu* (< L *tanto*). ¶ Pri IoIeIa, vd. *ju.*

G *desto* < G ant. *des diu*, formoj (genitivo kaŭza resp. instrumentalo mezura) de la demonstrativo *der* "tiu" (vd. la sekcion pri korelativaj vortoj).

DESEGN/I (f; RE): A *design*, F *dessiner*, I *disegnare*, (H *diseñar*). Duasilaba *-e-* (laŭ I aŭ la prononco de la responda F subst. *dessin* [-ê]) kredeble por malebligi malĝustan analizon *de-sign-*. Kp spec. *asigni*, *insigno* (kie tiu risko ne ekzistas). Pri *-gn-*, vd. *digna.* Ps-pf *de-*. ¶ Io *desegnar* (espismo), Ie *dessinar*, Ia *designar.*

El L *designare* "reprezenti per bildo", propr. "signi, marki": *de-* "de-, el-" (vd. *de*); *signare* "signi, marki", de *signum* "signo" (vd. tiun).

DESERT/O (1; Be): AF *dessert*, G *Dessert*, Po *de/ser*, R *-sert.* La duoblaĵo *-ss-* normale rezultigas nevoĉan *-s-* en Eo; tiel aŭtomate estis evitata kolizio kun la (jam antaŭe ekzistanta) radiko *dezert-*. Vd. ank. Golden 1981a. Ps-pf *de-*, var. de *dis-*. ¶ Io *desero*, Ia *dessert*, Ie *-e.*

F vorto, de *desservir* "forpreni la manĝilaron" (origine deserto estis surtabligata nur post tiu ago), kunm. de *dés-* "mal-, sen-" (vd. ps-pf *dis-*) k *servir* "prezenti, surtabligi (pladon)", propr. "servi" (vd. tiun).

DESPOT/O (1; RE): AR *despot*, F *-e*, IPo *-a*, G *Despot*, (H *déspota*). ¶ Io =, Ie *despot*, Ia *-a.*

El Gr *despótês* "mastro", propr. "dommastro": la unua elemento reprezentas HE **dems* "de domo", la dua retroviĝas en Gr *pósis* "mastro". Kp Sa *dám-pati-* "mastro". Vd. resp. *domo* k *povi.*

DESTIN/I (1; Jü): A *destin/e*, F *-er*, I *-are*, (H *-ar*). Ps-pf *de-*. ¶ IoIeIa *destinar.*

El L *destinare* "destini; celi; fiksi", propr. "starigi", de *de-* (vd. *de*, tie ĉi intensiga pref.) k *stan-*, plivastigita formo de la radiko en L *stare* "stari" (vd. tiun; kp spec. *obstina*).

DETAL/O (f; *-a* N-ro 14 1888; RE): A *de/tail*, I *-ttaglio*, Po *-tal*, R *-tal'*, (H *-talle*), F *détail*, G *Detail.* Pri *-l-* reprezentanta latinidan [l'] (tie ĉi laŭ Po?), vd. *abelo*, *batalo.* Ps-pf *de-*, var. de *dis-*. ¶ Io =, Ie *de/tallie*, Ia *-talio.*

Der. de F *détailler* "distranĉi, dispecigi": *dé-* "dis-" (vd. ps-pf *dis-*), *tailler* "tranĉi" (vd. *tajloro*).

DETERMIN/I (2; Be): A *determin/e*, I *-are*, Po *-owac'*, (H *-ar*), F *déterminer.* Ps-pf *de-*. Sugestita al Z de de Beaufront, vd. LZ I, 22. ¶ IoIeIa *determinar.*

El L *determinare* "fiksi", propr. "limigi" (kp semantike *definire*, vd. sub *difini*): *de-* "de-" (vd. tiun); *terminare* "limigi", de *terminus*

"limo" (vd. *termino*).

DETRU/I (f; Un): A *destroy*, F *détruire*, I *distruggere*, (H *destruir*). Kp G *destruk/tiv*, Po *-cyjny*, R *-tivnyj* "detrua". Formo sen *-s-* bazita specife sur F; la tiel kreita malparaleleco al *konstru-* estas eble intenca. Ps-pf *de-*. ¶ 1894 *distru-*. ¶ Io *de/struktar*, Ie *-structer*, Ia *-struer*.

El L *destruere* "malkonstrui, neniigi": *de-* "de-, for-, mal-" (vd. ps-pf *de-*), *struere* "konstrui, amasigi" (vd. *strukturo*; kp. *konstrui*).

DEV/I (f; Un): F *devoir*, I *dovere* (kp *devo* "mi devas"), (H *deber* [-v-]); L *debere*. Kp Pg *dever*. La modernaj fontlingvoj sugestas *-v-* prefere al *-b-*; iom analoga estas *havi*. – Ĉiuj cititaj formoj signifas ankaŭ "ŝuldi"; Z evitis la dusencecon, prenante ĝermanan radikon por tiu lasta nocio. ¶ 1878 *debá* "devas"; 1881 *deb-*; 1882 *dev-*. ¶ Io *devar* (kp *debar* "ŝuldi"), Ie *dever* (kp *debir* "ŝuldi"), Ia *deber* (ank. "ŝuldi").

Latin(id)a vorto kun orig. signifo "ŝuldi"; vd. plue la etimologie identan *debeto*.

DEVIZ/O (f; RE) 1) moto, 2) fin.: A *device* (1), F *devise* [-z] (1,2), G *Devise* (1,2), I(H) *divisa* [I -z-] (I 1; H 1,2), Po *dewiza* (1,2), R *deviz* (1). Senco 2 ne-Za. Ps-pf *de-*, var. de *dis-*. ¶ 1894 *devis-*. ¶ Io = (1), Ie *devis/e* (1,2), Ia *-a* (1,2).

Latin(id)a vorto, propr. "divid(aĵ)o" (semantika evoluo: > "fako en blazono" > "moto troviĝanta en blazono aŭ ĝin akompananta"; la moderna financa signifo eble pro tio, ke mondevizoj origine surhavis moton), subst. de L vulg. **divisare*, verbo intensa de L *dividere* "dividi" (vd. tiun).

DEZERT/O (f; Un): A *desert* [-z-], F *désert* [-z-], I *deserto* [-z-], (H *desierto*). La prononco de la fontlingvoj sugestas *-z-* kaj tiel lasas lokon liberan al *desert-* kun alia signifo (kp tiun). Vd. ank. Golden 1981. Ps-pf *de-*. ¶ 1894 *desert-*. ¶ Io =, Ie *desert/e*, Ia *-o*.

El L ekl. *desertum* s.s., propr. "forlasitaĵo", ptc. perf. de L *deserere* "forlasi" (el kiu, kun specialigita senco, A *desert*, H *-ar*, F *déserter*, G *desertieren*, I *disertare*, Po *dezert/owac'*, R *-irovat'* > eo *dizert/i* Wü), orig. "malplekti, malligi", de *de-* "de-, for-, mal-" (vd. ps-pf *de-*) k *serere* "kunplekti, vicigi" (vd. *serio*).

DEZIR/I (f; Un): A *desire* [-z-], F *désirer* [-z-], I *desiderare* [-z-], (H *desear*). Primara fonto F. Ps-pf *de-*. ¶ 1882 *deg-* (< ?; Albault 1961, 90 komparas Kt *desig*); 1894 *desir-*. ¶ Io *dezirar*, Ie *desirar*, Ia *desi(de)rar*.

El L *desiderare* "sopiri, deziri", evidente de *de* "de" (vd. tiun) k *sid/us -eris* "stelo", kun necerta orig. signifo ("atendi de la steloj", orig. termino de aŭgurado?). Kp ĉiuokaze *konsideri*.

DI/O (f; Un): F *dieu*, I *dio*, (H *dios*); L *deus*. Kp A *deify* "diigi". Vokalismo laŭ I(F), evidente por eviti homonimecon kun la prep. *de* (1894 tamen *de* "de", *De-* "Di-"; rimarkinda estas ankaŭ *De-í-no* Ekz 2, kiu povas esti restaĵo de pli frua radikformo). ¶ IoIeIa *deo*.

Latin(id)a vorto, kp L adj. *divus* "dia", Gr *díos* "dia", Sa *déva-* "dio" (HE **dejŭos*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *adiaŭ*, *diveni*; kp ank. *jaŭdo*.

DIABET/O (2; Jü): L med. *diabetes (mellitus)*; R *diabet*, A(H) *-es*, I *-e*, F *diabète*, G *Diabetes*. Kp Po *diabetyk* "-ulo". Ps-pf *dia-*.

El Gr *diabêtês* s.s., propr. "trairanto" (la nomo aludas tralason de urino), agantnomo de *diabaínein* "trairi": *diá* "tra" (vd. ps-pf *dia-*), *baínein* "iri" (kp *akrobato*; vd. plue sub *veni*).

DIABL/O (f; Du,RE; *diabol-* N-ro 15 1888): A *devil* (kp *diabolical* "-eca"), F *diable*, G *Teufel* (kp *diabolisch* "-eca"), I *diavolo* (kp *diabolico* "-eca"), Po *diabel'*, R *d'javol*, (H *diablo*); L *diabolus*. Formo bazita sur F (kaj per tio kontrastanta al *apostol-*, vorto de la sama greka tipo). Ps-pf *dia-*. ¶ Io =, Ie *diábol*, Ia *diabolo*.

El Gr *diábolos* s.s., propr. "kalumnianto", agantnomo de *diabállein* "kalumnii, denunci, akuzi, rifuzi ktp", orig. proks. "priĵeti":

diá "tra" (tie ĉi intensiga pref.; vd. ps-pf *dia-*), *bállein* "ĵeti" (vd. *balistiko*).

DIADEM/O (1; RE): APo *diadem*, IR(H) *-a*, F *diadème*, G *Diadem*. Ps-pf *dia-*, ps-sf *-m(at)*. ¶ Io =, Ie *diadem*, Ia *-a*.

El Gr *diádêma* "ĉirkaŭligaĵo", de *diadeín* "ligi ambaŭflanke": *diá* "trans, dise" (vd. ps-pf *dia-*), *deín* "ligi" (kp Sa *dâma-* "ligilo".

DIAFAN/A (2; Be): A *diaphan/ous*, F *-e*, I *diafano*, (H *diáfano*). Ps-pf *dia-*. ¶ Io =, Ie *diafan*, Ia *diaphane*.

El Gr *diaphanês* s.s., propr. "tramontra", de *diá* "tra" (vd. ps-pf *dia-*) kaj rad. *phan-* "montri" (vd. *fantazio*).

DIAFRAGM/O (1; Jü): A *diaphragm*, F *-e*, G *Diaphragma*, I *dia/framma*, (H *-fragma*); L med. *diaphragma*. Ps-pf *dia-*, ps-sf *-m(at)*.

El Gr *diáphragma* s.s., propr. "apartigaĵo", de *diá* "tra(ns)" (vd. ps-pf *dia-*) k *phrágma*, subst. de *phrássein* "bari, (en)fermi".

DIAGNOZ/O (1; Jü; *diagnostik-* Be): A *diagn/osis*, F *-ostic*, I *-osi* [-z-], (H *-óstico*), R *diagnoz*, Po *-a*. Ps-pf *dia-*, ps-sf *-z*. ¶ Io =, IeIa *diagnose*.

El Gr *diágnôsis* "distingo, ekkono", de *diagignôskein* "distingi, ekkoni (pere de io)": *diá* "per, tra" (vd ps-pf *dia-*), *gignôskein* "koni" (kp *prognozo*; vd. plue sub *koni*). – El la responda adj. *diagnôstikós* devenas la supre cititaj FH formoj, plue A *diagnost/ics*, Po *-yka*, R *-ika* > eo *diagnostik/o* Jü.

DIAGONAL/O (1; RE): A(H) *diagon/-al*, FI *-ale*, R *-al'*, G *Diagonale*. Ps-pf *dia-*; ps-sf *-al*.

El L *diagonalis* "-a", de Gr *diagônios* s.s., propr. "traangula (linio)", de *diá* "tra" (vd. ps-sf *dia-*) k *gônía* "angulo", par. al *góny* "genuo" (vd. tiun).

DIAKON/O (1; RE): A *deacon* [dí-], F *diacre* (kp *diaconat* "-eco"), G *Diakon*, I *diacono*, PoR *diakon*, (H *diácono*); L ekl. *diaconus*. (Ps-pf *dia-*.)

El Gr *diákonos* s.s., orig. "servisto", kredeble de pref. *dia-* (tie ĉi kun necerta rolo) k verbradiko videbla en *en-koneín* "rapidi, diligenti".

DIALEKT/O (1; Ald,RE): A *dialect*, F *-e*, (H *-o*), G *Dialekt*, I *dialetto*, PoR *dialekt*. Ps-pf *dia-*.

El Gr *diálektos* "dialekto, lingvo", orig. "interparolo, konversacio", subst. de *dialégein* "interparoli", de *diá* "tra" (tie ĉi proks. "inter", pref. ofta en reciprokaj verboj. Vd. ps-pf *dia-*) k *légein* "paroli, diri" (vd. *logiko*). Kp sekv.; samelementa radiko en Eo: *dialogo*.

DIALEKTIK/O (2; Jü): A *dialect/ics*, F *-ique*, G *Dialektik*, I *dialettica*, Po *dialekt/yka*, R *-ika*, (H *dialéctica*). Ps-pf *dia-*; ps-sf *-ik*.

El Gr *dialektikê* s.s., propr. "diskuta (arto)", de *diálektos* "diskuto, interparolo" (vd. *dialekto*).

DIALOG/O (1; RE): AF *dia/logue* [-g], I *-logo*, PoR *-log*, G *Dialog*, (H *diálogo*). Ps-pf *dia-*.

El Gr *diálogos* "interparolo", subst. de *dialégein* "interparoli, diskuti" (vd. *dialekto*).

DIAMANT/O (f; Du,RE): A *dia/mond*, F *-mant*, I(H) *-mante*, Po *-ment*. ¶ 1881 *diant-* (kun arbitra sinkopo). ¶ Io =, IeIa *diamante*.

El L mez. *diam/as -antis* s.s., kredeble aliformigo (sub influo de multaj Gr vortoj komenciĝantaj per *dia-*) de L *adam/as -antis* el Gr *adám/as -antos* "diamanto; malmola metalo (ŝtalo?)", propr. "nesubigebla, nedresebla", de *a-* "ne-" (vd. ps-pf *a(n)-*) k *damáein* "subigi, malsovaĝigi". Kp Sa *dámáyati* "malsovaĝigas", L *domare* (> F *dompter*) "malsovaĝigi", A *tame* "malsovaĝa" (HE rad. **dem-*).

DIAMETR/O (1; RE): A *dia/meter*, F *-mètre*, I *-metro*, R *-metr*, G *Diameter*, (H *diámetro*). Ps-pf *dia-*.

El Gr *diámetros* s.s., propr. "tramezura (linio)", de *diá* "tra" (vd. ps-pf *dia-*) k *métron* "mezuro" (vd. *metro*).

DIANT/O (2; Jü): L bot. *Dianthus*. Prenita el L ĉar botanika termino. ¶ Io =, Ie *di/ante*, Ia *-antho*.

El Gr *dianthês* "havanta duoblajn florojn",

de *di-* "du-" (ank. en *didelfo, dilemo, diplom/o, -ato*; vd. sub *du*) k *ánthos* "floro" (vd. *antologio*).

DIAPAZON/O (2; Be) 1) tonamplekso, 2) tonforketo: AFI *diapason* [-z-] (1,2), R *diapazon* (1), (H *diapasón* 1, 2). Ps-pf *dia-*. ¶ Io = (2), Ie *diapason* (1), Ia *diapason* (1,2).

El Gr *diapasôn* "oktavo", propr. "tra ĉiuj (kordoj)": *diá* "tra" (vd. ps-pf *dia-*), *pasôn* oblikva formo de *pás* "ĉiu" (vd. *panoramo*).

DIBOĈ/I (f; RE): A *debauch* [diboĉ] "-igi" (kp *debauch, -ery* "-o"), F *débaucher* [-bo-] "-igi" (kp *débauche* "-o"). Z netransitivigis la radikon (eble bazante sin sur la agesprima substantivo) kaj krome ŝanĝis *de-* al *di-* por eviti asociadon al prep. *de* (analoge al *ri-* anst. *re-* en *ricevi* ktp); sama procedo en *difekti, difini* (War. LV 78). Ps-sf *di-*, var. de *dis-*. ¶ 1894 *deboc-*. ¶ IoIe *debochar*; kp Ia *excesso, dissolution* "diboĉo".

F vorto, orig. "korupti, misgvidi, forlogi", de *dé–* "dis-, for-" (vd. ps-pf *de-*, var. de *dis-*) k dua elemento, kiun oni ordinare identigas kun F *bau* "trabo, baŭo" (< ĝerm. *balk-*, vd. *balkono*); la semantika evoluo estus "fendi lignon por konstruado" > "fendi, apartigi, disigi" > "devojigi".

DIDAKTIK/O (2; Be): A *didact/ics*, F *-ique* [-ík], G *Didaktik*, I *didattica*, Po *dydaktyka*, R *didaktika*, (H *didáctica*). Ps-sf *-ik*.

El Gr *didaktikê (tékhnê)* "instrua (arto)", de *didáskein* "instrui", eble par. al L *discere* "lerni" (kp ev. *disĉiplo*).

DIDELF/O (f; RE): L zool. *Didelphys*; Po *dydelf*, (H *didelfo*). Kp F *didelphe* "marsupiulo". Zoologia termino bazita sur L. ¶ Io =; IeIa *opossum* (< AFIR).

Konstruita (18a jc) el Gr *di-* "du-" (vd. *dianto*) k *delphys* "utero" (vd. *delfeno*), kalkulante la enventran uteron kaj la surventran haŭtpoŝon.

DIET/O (1; RE): A *diet*, IPoR(H) *-a*, F *diète*, G *Diät*. ¶ Io =, Ie *diet/e*, Ia *-a*.

El Gr *díaita* "vivmaniero; dieto", de *diaitást-hai* "vivi (laŭ certa dieto)", orig. "distribui, disdoni, porciigi (nutraĵojn)", de *di(a)-* "dis-" (vd. ps-pf *dia-*) kaj radiko videbla en *aísa* "parto, porcio, lotaĵo". Kp *etiologio*.

DIFEKT/o (f; RE): A *defect* [di-] "neperfektaĵo, manko" (kp *-ive* "difektita"), F *défaut* "malperfektaĵo, manko, difekto" (kp *défectueux* "difektita"), G *Defekt* "malperfektaĵo, manko" (kp *defekt* "difektita"), I *difetto* "malperfektaĵo", (H *defecto* "manko, difekto"). Z modifis la etiman vorton tiel forme kiel sence. Forme, *di-* (laŭ I?) ŝajnas adoptita por eviti asociadon al prep. *de* (vd. *diboĉi*). La senca modifo estas negranda; ĝi povas esti inspirita de la fontlingva adjektivo ("mankhava" > "difektita"). Krome, la fontlingvoj ne uzas respondan verbon, dum la Ea radiko rolas ĉefe verbe. Ps-sf *di-*, var. de *de-*. ¶ 1894 *defekt-*. ¶ Io *domajar*, Ie *damagear* (etimologie = Eo *domaĝi*; kp Io *defekto*, Ie *defecte* "manko"); Ia *damnificar* (*damno* "difekto"; kp *defecto* "manko, malperfektaĵo".

El L *defectus*, subst. de *deficere* "manki, ne sufiĉi, elĉerpiĝi", orig. "liberigi sin de, fari sin libera de", kunm. de *de-* "de" k *facere* "fari; meti" (vd. tiujn). Etimologie identa radiko: *deficito*.

DIFERENC/O (f; RE): A *dif/ference*, F *-férence*, I *-ferenza* [-ts-], (H *-erencia*), G *Differenz* [-ts]; L *differentia*. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*; ps-sf *-enc*. ¶ 1894 *diferenz-*.

De L *differre* "diferenci, esti malsama", propr. "konduki en malsamaj direktoj", de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *ferre* "konduki, porti" (vd. *oferi*). Kp spec. *indiferenta*.

DIFIN/I (f; RE): A *defin/e* [di-], G *-ieren*, I *-ire*, Po *-iowac'*, (H *-ir*), F *définir*; L *definire*. Eo *di-* evidente por malebligi malĝustan analizon **de/fin/i* (analogaj modifoj en *diboĉi, difekto*; la I apogo, kiun oni povas citi por *difekto*, mankas tie ĉi). Ps-sf *di-*, var. de *de-*. ¶ Io *defin/ar*, IeIa *-ir*.

L vorto, orig. "limigi" (limigi sencon de vorto = difini vorton), de *de-* "de-, el-" (vd.

de; tie ĉi intensiga pref.) k *finire* "limigi, determini", de *finis* "limo, fino" (vd. *fini*).

DIFTERI(T)/O (*-it/o* 1; Jü; *-i/o* 8; PVS): A *diphtheria*, F *diphthérie*, G *Diphtherie* (*Diphtheritis*), I *difterite*, Po *dyfteryt*, R *difterit*, (H *difteria*); L med. *diphtheria*. La duoblaj Eaj formoj respegulas duoblecon en la fontlingvoj. La formo *-i/o*, apogata de la grandaj okcidentaj lingvoj, aperis malfrue sed venkis rapide (PIV pri *difterit/o*: "Malnova nomo de difterio."). Ps-sf *-it* 1 resp. *-i* 1. ¶ Io *difterio*, Ie *difteri(t)e*, Ia *diphtheria*.

Konstruita en F (*-ite* Bretonneau 1826, *-ie* Trousseau 1855) el Gr *diphthéra* "(preparita) besthaŭto" (la nomo aludas la falsajn membranojn formiĝantajn dum la malsano), probable de *déphein* "knedi, fuli".

DIFTONG/O (1; N-ro 20 1889, Jü): A *diphth/ong*, F *-ongue* [-g], G *Diphthong*, I *dittongo*, Po *dyftong*, R *diftong*, (H *diftongo*). ¶ IoIe =, Ia *diphthongo*.

El Gr *díphthongos* s.s., propr. "du(obla) sono", de *di-* "du-" (vd. *dianto*) k *phthóngos* "sono", subst. de *phthéngesthai* "soni".

DIG/O (f; RE): A *dike*, F *digue* [-g], G *Deich*, I *diga*, (H *dique*). Eo *-g-* laŭ FI por eviti kolizion kun *dik-*. ¶ Io =, Ie *diga*, Ia *dica*.

Ĝerm. vorto (ank. Nd *dijk* s.s.). Kp spec. Gr *teikhos* "muro" (HE rad. **dheigh-*, vd. *figuro*).

DIGEST/I (f; RE): A *digest*, F *digérir*, I *diger/ire*, (H *-ir*); L *digerere*. Kp F *digest/ion*, I *-ione*, (H *-ión*), L *-io* "-o". Bazita sur L supina radiko, uzata verbe en A kaj ĝenerale en la substantivo, krome en la responda adjektivo (A *digest/ive*, F *-if*, I *-ivo* ktp). Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io *digest/ar*, Ie *-er*, Ia *digerer*.

Propr. "distribui, disporti (manĝaĵojn)", de L *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *gerere* "(trans)porti" (vd. *gesto*).

DIGN/A (3; Wü; antaŭe *ind/a*): F *dign/e*, (H *-o*), I *degno*; L *dignus*. Kp A *dignity* "-eco". La L grafismo *-gn-* estas ordinare konservata en Eo malgraŭ eventuala latinida prononco [n'], kp *asigni*, *cigno*, *desegni*, *indigni*, *insigno*, *ligno*, *pugno*, *signo*. ¶ Io =, Ie *dign/i*, Ia *-e*.

Vorto samradika kun L *decet* "decas" (vd. *deci*).

DIK/A (f; Un): A *thick*, G *dick*; kp Nd *dik*. Bazita sur G. ¶ 1894 *gros-* (< F *gros*, I *-so*, kp H *grueso*). ¶ Io (dimensio) *dika*, (ampleksa) *grosa*, (pri pers.) *korpulenta* (< AF *corpulent*, kp eo *korpulent/a* GE); Ie (dimensio) *spess* (< F *épais*, H *espeso*, I *spesso*; L *spissus*); (ampleksa) *gross*; (pri pers.) *corpulent*; Ia resp. *spisse*, *grosse*, *corpulente*.

Ĝerm. vorto, kp. ank. Da *tyk* (pĜ **theku-*).

DIKT/I (f; RE): A *dict/ate*, F *-er*, (H *-ar*), G *dikt/ieren*, R *-irovat'*, I *dettare*, Po *dyktowac'*; L *dictare*.

Orig. verbo intensa ("diradi") de L *dicere* "diri" (vd. tiun). Kp sekv.

DIKTATOR/O (2; RE): A *dictat/or*, F *-eur*, G *Diktator*, I *dittatore*, Po *dyktator*, R *diktator*, (H *dictador*); L *dictator*. Ps-sf *-or* 1.

Orig. agantnomo de L *dictare* "dikti; komandi" (vd. *dikti*).

DILEM/O (2; Be): AIR *dilem/ma*, F *-me*, (H *-a*), G *Dilemma*, Po *dylemat*. Ps-sf *-m(at)*. ¶ Io =, IeIa *dilemma*.

El Gr *dílêmma* (termino de logiko) "duobla premiso" (tipo 'aŭ... aŭ'), de *di-* "du-" (vd. *dianto*) k *lêmma* "premiso, supozo", propr. "preno" (kp semantike L *as-sumptio* "supozo", propr. "al-preno"), subst. de *lambánein* "preni" (radiko *lab-*, vd. *silabo*).

DILETANT/O (3; *dilet/ant/o* Jü): AFI *dilet/tante*, R *-ant*, (H *-ante*), G *Dilettant*, Po *dyletant*. Ps-pf *di-*, var. de *de:-*; ps-sf *-ant*. ¶ Io *dilet-anto*, Ie *dilettant*, Ia *-e*.

I vorto, propr. "(sin) amuzanta", ptc. prez. de *dilettare* "amuzi", el L *delectare* "ĝojigi, ĝuigi, amuzi", de *de-* (vd. *de*; tie ĉi intensiga pref.) k *lactare*, verbo intensa de *lacere* "logi" (vd. *delikata*).

DILUV/O (4; Gen, Wü; antaŭe *super/akv/eg/o*): A *deluge* (kp *antediluvian* "antaŭdiluva"), F *déluge* (kp *antédiluvien*

"antaŭdiluva"), I(H) *diluvio*; L *diluvium*. Bazita ĉefe sur L; la ellason de *-i-* eble sugestis AF. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ IoIa *diluv/io*, Ie *-ie*.

De L *diluere* "forlavi", de *dis-* "dis-, for-" (vd ps-pf *dis-*) k *luere* "lavi" (vd. tiun).

DIMANĈ/O (f; Un): F *dimanche*, I *domenica*, (H *domingo*). Kp A *dominical* "-a". Prenita el F same kiel la aliaj nomoj de la tagoj de la semajno. ¶ 1894 *domink-*. ¶ Io *sun-dio* ("sun-tago", kp A *Sunday*), Ie *soledí* ("sun-tago"); Ia *dominica*.

El L *(dies) dominica* "(tago) de la Sinjoro", adj. de *dominus* "sinjoro", orig. "dom-mastro", der. de *domus* "domo" (vd. tiun).

DIMENSI/O (4; Jü): AF *dimens/ion*, I *-ione*, (H *-ión*), G *Dimension*. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*; ps-suf. *-sio*, var. de *-cio*.

El L *dimens/io -ionis* "mezurado", subst. de *dimetiri* "mezuri", de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *metiri* "mezuri" (vd. tiun).

DINAMIK/O (2; Be): A *dynam/ics*, F *-ique*, G *Dynamik*, I *dinam/ica*, R *-ika*, Po *dynamika*, (H *dinámica*). Ps-sf *-ik*.

Formita el Gr adj. *dynamikós* "forta", de *dynamis* "forto, povo, potenco", subst. de *dynasthai* "povi". Samfamiliaj radikoj en Eo: *dinam/ito, -ometro, dinastio*.

DINAMIT/O (2; Be): AF *dynam/ite*, Po *-it*, G *Dynamit*, I *dinam/ite*, R *-it*, (H *-ita*). Ps-sf *-it* 3. ¶ Io =, Ie *dinamite*, Ia *dynamite*.

Konstruita en Sv (*dynamit*, Nobel, 1867) el Gr *dynamis* "forto" (vd. *dinamiko*).

DINAMOMETR/O (2; Jü): A *dynamo/-meter*, F *-mètre*, Po *-metr*, G *Dynamometer*, I *dinam/ometro*, R *-ometr*, (H *-ómetro*).

Konstruita (ĉ. 1800) el Gr *dynamis* "forto" (vd. *dinamiko*) k *métron* "mezurilo" (vd. *metro*).

DINASTI/O (1; Be): A *dynast/y*, F *-ie*, Po *-ia*, G *Dynastie*, I *dinast/ia*, R *-ija*, (H *-ía*). Ps-sf *-i* 1.

El Gr *dynasteía* "potenco, superregado", de *dynástês* "reganto, po tenculo", agantnomo de *dynasthai* "povi" (vd. *dinamiko*).

DIPLOM/O (1; RE): AI(H) *dipl/oma*, F *-ôme*, R *-om*, G *Diplom*, Po *dyplom*. Ps-sf *-m(at)*. ¶ Io =, IeIa *diploma*.

El Gr *díplôma* "rekomenda letero, pasporto ktp", propr. "duoble faldita (dokumento)", de *diploún* "duobligi", de *diploús* "duobla": *di-* "du-" (vd. *dianto*), *-ploos* "fald(it)a" (vd. *faldi* kaj suf. *-obl*). Kp sekvajn.

DIPLOMAT/O (f', 1; Be; kp *diplomat/-isto* N-ro 15 1888): AR *diplomat*, F *-e*, I *-ico*, G *Diplomat*, Po *dyplomata*, (H *diplomático*). Ps-sf *-at* 1. ¶ Io *diplomac-isto*, Ie *diplomate*, Ia *diplomat/e, -ico*. – Agadnomo: **DIPLOMATI/O** (f', 7; Du, RE): A *diploma/cy*, F *-tie*, I *-zia*, R *-tija*, (H *-cía*), G *Diplomatie*, Po *dyplomacja*. La Ea radiko havas *-t-* por konformiĝi al *diplomat-*. Kp ank. *aristokrati/o*. Ps-sf *-i* 1. ¶ Io *diplomaco*, Ie *diplomati/e*, Ia *-a*.

Konstruita en F (1791, laŭ modelo de *aristocrate* : *aristocratie*) el Gr *díplôma* "dokumento" (vd. *diplomo*).

DIR/I (f; Un): FI *dire*, (H *decir*, kp *diré* "mi diros"); L *dicere*. Formo laŭ FI; enkorpigo de la latin(id)a infinitiva finaĵo *-r-* (kiel en *borderi, drapiri, erari, fari, iri, kuiri, kudri, pentri, stari*; kp ank. *poluri*.) Plej ekzaktan analogecon prezentas *far/i*. ¶ Io *dicar*, Ie *dir*, Ia *dicer*.

Latin(id)a vorto kun prasignifo "indiki, montri", de HE rad. **deik-*, kp Sa *dicáti* "montras"; Gr *deiknynai* "montri" (kp *paradigmo*); A *teach* "instrui", G *zeigen* "montri", *Zeichen* "signo". Ĝemela vorto en L: *dicare* "proklami" (kp *abdiki, dediĉi, indiki, kondiĉo, predik/i, -ato*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *dikt/i, -atoro, edikto*.

DIREKT/I (f; *-o* N-ro 14 1888; RE): A *direct*, F *diriger* (kp *direction* "-o"), I *dirigere* (kp *direzione* "-o"), (H *dirigir*, kp *dirección* "-o"); L *dirigere* (sup. rad.: *direct-*). Bazita sur L supina radiko troviĝanta en la substantivo kaj ankaŭ verbe uzata en A. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io *direktar* (kp *direciono, sinso* [verŝajne arbitra modifo de F *sens*] "-o"), Ie *direct/er* (kp *-ion* "-o"), Ia *diriger* (kp *direction* "-o").

De L *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *regere* "regi,

direkti" (vd. *regi*). Etimologie identa radiko: *dresi*. Kp sekv.

DIREKTOR/O (1; Du, Be): A(H) *direct/or*, F *-eur*, G *Direktor*, I *direttore*, Po *dyrektor*, R *direktor*. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*; ps-sf *-or* 1. ¶ Io *direkt-isto*, IeIa *director*.

El L postkl. *director* "direktanto, gvidanto", agantnomo de *dirigere* "direkti, gvidi" (vd. *direkti*).

DISCIPLIN/O (2; Du, Be): AF *disciplin/e*, IR(H) *-a*, G *Disziplin* [-sts-], Po *dyscyplina* [-sts-]; L *disciplina*. ¶ Io *diciplino*, Ie *disciplin/e*, Ia *-a*.

Orig. "edukado, instruado", de L *discipulus* "lernanto" (vd. *disĉiplo*).

DISĈIPL/O (3; *discipl/o* Jü, *disĉipl/o* prop. OA 2): AF *disc/iple*, I *-epolo*, (H *-ípulo*); L *discipulus*. La Z-a formo donis maloportunan homonimecon *discipl/in/o* : *disciplin/o*; Grosjean-Maupin solvis la problemon per cirkumfleksigo de *c* (vd. Waringhien 1980, 168), kies apogon li povis trovi en la I prononco (*-sc-* [ŝ]) aŭ en la Z-a *fasĉin/o* Jü (cetere troviĝas pluraj ekzemploj pri cirkumfleksigo de unuopa *c*, vd. *ĉelo, ĉi, dediĉi*). Eo *-l-* (laŭ AF) respondanta al L *-ul-* kiel en *binoklo, fablo, kuniklo, miraklo, spektaklo*; kp sub *artikolo*. ¶ Io *dicipulo*, Ie *disc/iple*, Ia *-ipulo*.

L vorto de necertaj tipo kaj etimologio, plej ofte rilatigita (ev. nur per popola etimologio) al *discere* "lerni" (< **di-dk-*, kp Gr *didáskein* "instrui", vd. *didaktiko*) de HE rad. **dek-* (vd. *deci*). Samfamilia radiko en Eo: *disciplino*.

DISENTERI/O (1; Jü): A *dysenter/y*, F *-ie*, G *Dysenterie*, I *dissenteria*, Po *dyzenteria*, R *dizenterija*, (H *disentería*); L med. *dysenteria*. Eo *-s-* malgraŭ la slavaj formoj; rim. la prononcon [s] en AFGI. Ps-sf *-i* 1. ¶ Io *disenteri/o*, Ie *-e*, Ia *dysenteria*.

El Gr *dysentería* s.s., propr. "intestmalsano", de pref. *dys-* "mis-, malbone" (ank. en *dispepsio*; kp Sa *dus-* s.s.) k *énteron* "intesto" (orig. "internaĵo", der. de *en* "en", vd. tiun).

DISK/O (1; Jü) 1) sport., 2) rondforma objekto: A *discus* (1), *disc* (2), F *disque* [-k] (1,2), G *Diskus* (1), I(H) *disco* (1,2), Po *dysk* (1), R *disk* (1); L *discus* (1). ¶ Io = (1,2), IeIa *disco* (1,2).

El Gr *dískos* (1,2), orig. "ĵetilo", de *dikeín* "ĵeti".

DISKONT/I (f; RE): A *dis/count*, G *-kontieren*, Po *dyskontowac'*, (H *descontar*). Kp (kun alia pref.) F *escompter*, I *scontare*. Por la dua elemento, I kune kun GPo determinis la formon (komerca termino!); kp cetere *kont/o*. Ps-pf *dis-*. ¶ Io *dis/kontar*, IeIa *-contar*.

El I ant. *discontare*, propr. "dekalkuli", de *dis-* "dis-, for-, de-" (vd. *dis-*) k *contare* "kalkuli" el L *computare* s.s. (vd. *konto*).

DISKRET/A (1; Jü): A *dis/creet*, F *-cret*, G *-kret*, I(H) *-creto*, Po *dyskretny*. Ps-pf *dis-*. ¶ Io =, Ie *discret*, Ia *-e*.

El L mez. *discretus* "diskreta, prudenta, modesta""; la adj. prenis tiujn sencojn el la subst. *discretio* "diskreteco, modesteco, ne-sintrudo", orig. "izoleco, apartigo"; ambaŭ estas der. de L *discernere* "apartigi, disigi; distingi, prijuĝi", de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *cernere* "distingi; decidi", orig. "kribri". Samfamiliaj radikoj en Eo: *certa, dekreto, sekreta*. Vd. plue sub *kribri*. (La skizita semantika evoluo L > L mez. > mod. lingvoj reprezentas nur unu el pluraj eblecoj.)

DISKUT/I (1; Be): A *discuss*, F *discut/er*, I *-ere*, (H *-ir*), G *diskut/ieren*, R *-irovat'*, Po *dyskutowac'*. Ps-pf *dis-*. ¶ Io *dis/kutar*, Ie *-cusser*, Ia *-cuter*.

El L *discutere* "frakasi, disskui (por esplori)" (kp subst. *discussio*, ank. "ekzameno, diskuto"), de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *quatere* "skui", par. al G *schütten* "ŝuti" (vd. tiun kaj *skui*; kp *kasko*).

DISPEPSI/O (1; Jü): A *dyspeps/ia*, F *-ie*, Po *-ja*, G *Dyspepsie*, I *dispeps/ia*, R *-ija*, (H *-ía*); L med. *dyspepsia*. Ps-sf *-i* 1.

El Gr *dyspepsía* s.s., de *dys-* "mis-, malbone" (vd. *disenterio*) k *pépsis* "digesto", subst. de *péttein* "kuiri, digesti" (vd. sub *kuiri*).

DISPON/I (f; RE): A *dispos/e*, F *-er* (kp

disponible "-ebla"), G *dis/ponieren*, I *-porre* (kp *-ponibile* "-ebla"), (H *disponer*). Ea formo bazita sur la L originverbo (vd. malsupre) same kiel en *de-*, *im-*, *kom-*, *pro/poni*. Ps-pf *dis-*. ¶ Io *dispon/ar*, Ia *-er*, Ie *disposir*.

El L *disponere* "aranĝi, ordigi", propr. "dismeti": *dis-* "dis-" (vd. tiun), *ponere* "meti" (vd. *pozitiva*).

DISPUT/I (f; Un): A *disput/e*, F *-er*, G *-ieren*, I *-are*, R *-irovat'*, (H *-ar*), Po *dysputowac'*. Ps-pf *dis-*.

El L *disputare* "diskuti, esplori", orig. "zorge kalkuli", de *dis-* "dis-" (vd. tiun; kp semantike la saman pref. en *diskuti*) k *putare* "kalkuli", orig. "ordigi, netigi" (vd. *amputi*).

DISTANC/O (1; Jü): AF *dist/ance*, I *-anza* [-ts-], R *-ancija*, (H *-ancia*), G *Distanz* [-ts], Po *dystans*. Ps-pf *di-*, var. de *dis-*; ps-sf *-anc*. ¶ 1882 *denc-* (mallongigo de la int. formo?). ¶ Io *disto*, Ie *distant/ie*, Ia *-ia*.

El L *distantia* "distanco, diferenco", propr. "disstaro", subst. de *distare* "stari dise", de *dis-* "dis-" k *stare* "stari" (vd. tiujn).

DISTIL/I (f; RE): A *distil*, F *-ler*, I *-lare*, R *-irovat'*, G *destillieren*, (H *destilar*). AFIR donas solidan bazon por la formo *di-*, kiun Z preferis, probable por malebligi misanalizon (*de, stil-*); kp *diboĉi*, *difekti*. Ps-sf *di-*, var. de de-. ¶ Io *distil/ar*, IeIa *-lar*.

El L *destillare* "deguti": *de-* "de-" (vd. tiun); *stillare* "guti", de *stilla* "guto", eble dim. de *stiria* "frostigita guto, glaciero".

DISTING/I (f; N-ro 14 1888, RE): A *distin/guish*, F *-guer* [-gé], I *-guere*, (H *-guir*); L *distinguere*. Radikfino oportunigita, eble laŭ F prononco (analoge en *estingi*; vd. *angilo*). Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io *distingar*, Ie *distinter*, Ia *distinguer*.

Orig. "marki, signi (por diferencigi)", de L *dis-* "dis-, el-" (vd. *dis-*) k *stinguere* "piki" (vd. *instigi*).

DISTR/I (f; RE): A *dis/tract*, F *-traire* [distrér], I *-trarre*, (H *-traer*). La FI formoj aperas mallongigitaj (kp ank. F *distrait* [distré], I *distratto* "-ita"), kio supozeble sugestis al Z la mallongan radikformon; ĝi do kontrastas kun la aliaj radikoj de la sama fonto (*abstrakta, ekstrakto, kontrakto*; ankoraŭ alie *subtrahi*). Ps-pf *dis-*. ¶ 1894 *distrakt-*. ¶ Io *dis/traktar*, Ie *-tracter*, Ia *-traher*.

El L *distrahere* (sup. rad.: *distract-*) "distiri": *dis-* "dis-" (vd. tiun), *trahere* "tiri" (vd. *ekstrakto*).

DISTRIBU/I (8; Jü; antaŭe *dis/doni*): A *distribu/te*, F *-er*, I *-ire*, (H *-ir*); L *distribuere*. Ps-pf *dis-*. ¶ Io *distribu/tar*, IeIa *-er*.

De L *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *tribuere* "disdoni" (vd. *tributo*; kp spec. *a-*, *kon/tribui*).

DISTRIKT/O (f; RE): AF *district*, G *Distrikt*, I *distretto*, Po *dystrykt*, (H *distrito*). Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io =, Ie *district/e*, Ia *-o*.

El L mez. *districtus* "jurisdikci(a teritori)o", orig. "(perforta) devigo, punado", de *distringere* "puni, (perforte) devigi" (orig. pri torturaj procedoj, ekz. radumo), en L klas. "disstreĉi", de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k *stringere* "streĉi" (vd. *strikta*).

DITIRAMB/O (2; Jü): A *dithyramb*, F *-e*, G *Dithyrambus*, I(H) *ditirambo*, Po *dytyramb*, R *difiramb*. ¶ Io =, Ie *ditirambe*; mankas en Ia.

El Gr *dithyrambos* s.s., kredeble de pregreka origino.

DIVAN/O (2; Jü): AFR(H) *divan*, I *-o*, G *Diwan*. ¶ Io =, IeIa *divan*.

Pere de Ar *dîwân* s.s. el Pe *dîwân* "benko kun kusenoj (sidejo de oficisto)" < "oficejo" < "kalkula libro" < "skribaĵo", der. de *dibîr* "skribisto". Etimologie identa estas *dogano*.

DIVEN/I (f; RE): A *divine*, F *deviner* (kp *divination* "-ado"); L *divinare*. Kp (kun pref.) I *indovinare*, (H *adivinar*). Ne temas pri ŝanĝo *de-* > *di-* en la Ea radiko (vd. Wiener 1951, 147), ĉar la L etimo havas *di-*; la radikfina silabo tamen montras ŝanĝon *e* > *i*, evidente por eviti koincidon kun sufikso *-in* (vd. *abomeni*).

¶ IoIeIa *divinar.*

Propr. "profeti, esti die inspirita", der. de L *divinus* "dia" de *divus* s.s. (vd. *dio*).

DIVERS/A (f; RE): F *divers*, A *-e*, I(H) *-o*; L *diversus.* Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io =, Ie *divers/i*, Ia *-e.*

Propr. "turnita en malsamaj [kontraŭaj] direktoj", ptc. perf. de L *divertere* "forturni, disigi", de *dis-* "dis-, for-" (vd. *dis-*) k *vertere* "turni" (vd. *verso*).

DIVID/I (f; Un): A *divid/e*, I *-ere*, (H *-ir*), F *diviser*; L *dividere.* Kp G *dividieren* (mat. term.). Ps-pf *di-*, var. de *dis-*. ¶ Io *divid/ar*, IeIa *-er.*

Latin (id)a vorto, kunm. de *dis-* "dis-" (vd. tiun) k verbo reprezentanta HE rad. **ŭidh-* "disigi", kp ekz. Sa *vídhyati* "traboras"; vd. plue *vidvo.* Samfamiliaj radikoj en Eo: *devizo, divizio, individuo.*

DIVIZI/O (1; RE): AF *division*, I *-e*, G *Division*, Po *dywizja*, R *divizija*, (H *división*). La specialigita Ea signifo (mil.) laŭ PoR; AFIH signifas ankaŭ "divido", G ankaŭ "dividado" (mat. term.). Ps-sf *-zio*, var. de *-cio.* ¶ Io *diviziono*, IeIa *division.*

Orig. "dividaĵo, parto", el L *divisio* "divido", de *dividere* "dividi" (vd. tiun).

DO (f; RE): F *donc* [dô]; kp I *dunque.* Verŝajne la F prononco (sen nazalsono, kompreneble) estas la sola fonto de la Ea vorto. Waringhien 1946, 23, citas ankaŭ G *doch* ("tamen"), kiu pro sia preskaŭ kontraŭa signifo apenaŭ povas esti konsiderata. En certaj uzoj, ekz. post imperativo, Eo *do* egalas al Sv *då* [do] (*'venu do' = 'kom då'*), citita (interalie) de Bianchini 75. Apogon por la komenca sono Z povis trovi en certaj ĝermanaj proksimsencaj vortoj, ekz. G *denn.* ¶ 1894 *donku.* ¶ Io *do* (espismo); Ie *do*† (espismo, kp pri ĝi de Wahl en Cosmoglotta 1934, 53: "Proquo ne secuer Espo. e li altri mundlingues in su bon e expressiv formes?"), nuntempe *dunc*; Ia *ergo, igitur* (< L), *dunque.*

F *donc* el L postkl. *dunc*, kredeble kruciĝo de *dum*, partikulo orig. demonstrativa ("tiam", vd. *dum*) sed foje uzata en instigoj (*agedum* "agu do! nu,ek!"), kaj *tunc* (var.: *tum*) "tiam" (vd. la sekcion pri korelativoj).

DOG/O (1; Jü): F *dogue* [dog], G *Dogge*, PoR *dog*, (H *-o*). ¶ Io =, Ie *dogg*; mankas en Ia (kp *bulldog* "buldogo").

A vorto signifanta "hundo" (kp *bulldog*, propr. "taŭro-hundo", > eo *buldog/o* Fab I) kun nekonata etimologio.

DOGAN/O (3; Wü; antaŭe *lim/impost/ejo*): F *douane*, I *dogana*, (H *aduana*). Bazita sur I kiel komerca termino (cetere la ekzisto de *du* kaj *an* faris imiton de F malpli oportuna). ¶ Io =, Ie *doan/e*, Ia *-a.*

El Ar *dîwân* (i.a.) "doganoficejo", de persa origino (vd. la etimologie identan *divano*).

DOGM/O (f', 2; RE): AI(H) *dogm/a*, F *-e*, PoR *-at*, G *Dogma.* Ps-sf *-m(at).* ¶ Io *dogmato*, IeIa *dogma.*

El Gr *dóg/ma -matos* "doktrino, tezo, opinio", de *dokeín* "opinii, kredi; ŝajni" (vd. sub *deci*).

DOK/O (4; GE2): AF(H) *dock* [dok], G *Dock* [dok], PoR *dok.* ¶ Io =, Ie *dock*, Ia *darsena* (< I).

A aŭ Nd (kp Nd *dok*) marista termino kun pridisputata etimologio; ev. ligita kun L vulg. *ductia* "(akvo)kondukilo" (kp *duŝo*).

DOKTOR/O (f', 2; *Dro* Un, *doktor-* Du; RE): A(H) *doct/or*, F *-eur*, G *Doktor*, I *dottore*, PoR *doktor.* Ps-sf *-or* 1.

El L *doctor* "instruisto", agantnomo de *docere* "instrui", orig. kaŭza verbo "akceptigi" (vd. sub *deci*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *doktrino, dokumento.*

DOKTRIN/O (1; Jü): AF *doctrin/e*, (H *-a*), G *Doktrin*, I *dottrina*, Po *doktr/yna*, R *-ina.* Ps-sf *-in* 1. ¶ Io =, Ie *doctrin/e*, Ia *-a.*

El L *doctrina* "instruado", de *doctor* "instruisto" (vd. *doktoro*).

DOKUMENT/O (f', 1; RE): AF *document*, I(H) *-o*, G *Dokument*, PoR *dokument.* Ps-sf *-ment.*

El L *documentum* "pruvo, atestilo", propr. "instruilo", de *docere* "instrui" (vd. *doktoro*).

DOLAR/O (1; Du,Be): AF *dollar*, I *-o*, G *Dollar*, PoR *dolar*, (H *dólar*). ¶ Io *"dollar"*, IeIa *dollar*.

A vorto, el G *Thaler* "talero" (vd. tiun, kiu do estas etimologie identa).

DOLĈA (f; Un): F *doux* (ingenra formo: *douce*), I *dolce* [-ĉ-], (H *dulce*); L *dulcis*. Bazita sur I; eble la internacia muzika termino *dolce* igis Z preferi tiun formon. ¶ 1882 *dolc'-*; 1894 *dolc-*. ¶ Io *dolca*, Ie *dulc/i*, Ia *-e*.

Latin (id) a vorto, probable par. al Gr *glykys* s.s. (*gl-* < *dl-*), kp. *glicirizo*.

DOLOR/o (f; Un): F *douleur*, I *dolore*, (H *dolor*); L *dolor*. Kp A *dolour* (poezia vorto) "malĝojo; doloro". Ps-sf *-or* 2. ¶ Io =, Ia *dolor*, Ie *-e*.

De L *dolere* "dolori"; orig. signifo kredeble "esti disŝirita", de HE rad. **del-* "distranĉi", kp Sa *daláyati* "fendas", R *dolja* "parto", G mez. *zol* "ŝtipeto" (vd. *colo*).

DOM/O (f; Un): L *domus*; PoR *dom*. Kvankam neordinara, la akordo L-slavaj lingvoj donas sufiĉe larĝan bazon por la Ea vorto; kp ank. Gr *dómos*. Ne estas necese supozi (kiel Jespersen 1928, 36), ke Z prenis Vp *dom*, maksimume ke li tie trovis apogon por la elektita formo. ¶ Io = (espismo), Ie *dom* (espismo); Ia *casa* (< HI).

HE vorto por "domo" (**domo-s*); kp Sa *dáma-* s.s. De rad. **dem-* "konstrui, ĉarpenti", ekz. en Gr *démein* "konstrui", A *timber* "(ĉarpento) ligno", G *Zimmer* "ĉambro". Samfamiliaj radikoj en Eo: *damo, dimanĉo, domeno*. Kp ank. *despoto*.

DOMAĜ/O (f; RE): F *dommage* 1) "bedaŭrindaĵo", 2) "difekto". Bazita ekskluzive sur F, tiel forme kiel sence. (La dua signifo de F okaze aperis en Eo, vd. ekz. PV; ĝi krome rezultigis, kune kun A *damage*, eo *damaĝo* PV.) Ps-sf *-aĝ*. ¶ 1894 *domag-*. ¶ Sen ekzakta ekvivalento en la aliaj L.I.; kp Io *domajo* "damaĝo" (ank. "domaĝo"), Ie *damage* "damaĝo"; "estas -e" esprimiĝas en IeIa per *it es regretabil* resp. *il es regrettabile*.

Orig. signifo "damaĝo", de F *dam*† s.s., el L *damnum* "damaĝo, perdo, elspezo", probable par. al Gr *dapánê* "kostoj" (ev. de HE rad. **dâ-* "disdividi", vd. sub *demokrato*).

DOMEN/O (f; RE) 1) vesto, 2) ludo: A *domino* (1), *-es* (2), FIPoR *domino* (1,2), G *Domino* (1,2), (H *dominó* 1,2). Vokalŝanĝo *i* > *e* en Eo por eviti similecon al sufikso *-in* (vd. *abomeni*). ¶ IoIa *domino* (1,2), Ie *dominó* (1,2).

F vorto, orig. signifanta nigran pastran robon, evidente el L *dominus* "sinjoro, mastro" (eble pro la ofteco de tiu vorto en preĝoj k ekleziaj formuloj). La ludo nomiĝis laŭ la vesto (probable pro la nigreco de la ludpec-reversoj). – L *domin/us* "mastro" (kp *-a* "-ino") der. de *domus* "domo", vd. tiun. Kp spec. *damo*.

DON/I (f; Un): F *donner* (sed LI *donare* "donaci"). Kp A *donor* "donanto". Z evidente rigardis la F verbon pli klara kaj pli facile adaptebla ol LI *dare* (H *dar*) "doni"; kp tamen 1894 *dar-*. Vd. plue sekv.

De L *donum* "don(ac)o", kp *dare* "doni", de HE rad. **dô-* "doni", ekz. en Sa *dádâti* "donas"; Gr *didónai* "doni" (kp *anekdoto*), *dósis* "don(aĵ)o" (kp *dozo*); L *dos* "doto" (kp tiun); R *dat'* "doni". Samfamiliaj radikoj en Eo: *donaco; dat/o, -ivo, mandato; adicio, tradicio; perdi*.

DONAC/o (f; Un): A *don/ation*, F *-ation*, I *-azione* [-ts-], (H *-ación*). Tiu vorto, kvankam senduba deirpunkto por la Z-a radiko, tamen ĝenerale signifas "granda monsumo donacita al institucio" (= eo *donaci/o* PIV); la normalaj vortoj por "donaco" estas en la cititaj fontlingvoj: A *present, gift*, F *cadeau, présent*, I *dono*, (H *dádiva*). Sed *donac-* havas la avantaĝon esti internacia kaj krome rilatigita al *don-* (kp samradikajn A *give* : *gift*, G *geben* : *Gabe*, L *dare* : *donum*; ank. He *nâtan* : *matânâh*, vd. Gold 1980, 340). Al Eo *doni* : *donaci* respondas Io *donar* : *donacar* (espismo), IeIa *dar* : *donar*, kp 1894 *dar-* : *don-*. – La radikfino

ac estas neofta varianto de la pseŭdosufikso *-(a)cio*. Eble Z, destinante la radikon al precipe verba uzado, ne volis doni al ĝi finon tipe substantivan; versâjne analoga estas *kurac/i*.

El L *donatio* "fordono; donaco", de *donare* "donaci" (vd. *doni*).

DORLOT/I (f; RE): F *dorloter*. ¶ IoIe *dorlotar*; responda verbo mankas en Ia.

Orig. "frizi" (semantika evoluo: > "prizorgi, flegi" > "dorloti"), de F ant. *dorelot* "buklo" kun pridisputata etimologio.

DORM/I (f; Un): F(H) *dorm/ir*, I *-ire*; L *dormire*. Kp A *dormitory* "dormejo". ¶ Io *dorm/ar*, IeIa *-ir*.

Latin(id)a vorto, par. al Sa *drâti* "dormas", R *dremat'* "dormeti": HE rad. **dre(m)*.

DORN/O (f; EG): A *thorn*, G *Dorn*. Kp Ji *dorn*. Unu el pluraj ĝermanaj radikoj kun rilato al plantoj, vd. Collinson 1959, 5. ¶ 1894 *spin-* (< L *spina*). ¶ Io =; Ie *spine*, Ia *spina*, *aculeo* (< L *aculeus*).

Ĝerm. vorto (kp ank. Da *torn*), el pĜ **thurnuz*, de HE **trnu-* "dorno k.s.", kp Sa *trnam* "pajla [herba] trunketo", Po *ciern'* "dorno".

DORS/O (f; Un): L *dorsum*; F *dos* (kp *dorsal* "-a"), I(H) *dorso*. Kp A *dorsal* "-a". ¶ IoIa *dors/o*, Ie *-e*.

Latin(id)a vorto kun nekonata etimologio.

DOT/o (f; RE): F *dot*, I(H) *-e*; L *dos* (gen.: *dotis*). Kp (desubstantiva verbo) F *dot/er*, IL *-are*, (H *-ar*) "-i". ¶ Io =, Ie *dot*, Ia *-e*.

Latin(id)a vorto (kp ank. A *dowry* < L *dot-arium*), propr. "donaco, donaĵo", de HE rad. **dô-* "doni" (vd. tiun); kp spec. Sa *dâti-* "donaco".

DOZ/O (1: Be): AFI *dose* FI [-z-], G *Dosis*, PoR *doza*. Ps-sf *-z*. ¶ Io =, IeIa *dose*.

El Gr *dósis*, propr. "don(ad)o", subst. de *didónai* "doni" (vd. tiun).

DRAGON/O (1; RE): A *drag/oon*, FPo *-on*, I *-one*, R *-un*, (H *-ón*), G *Dragoner*. Kp sekv. ¶ Io =, Ie *dragon*; mankas en Ia.

F vorto, identa kun *dragon* "drako" (unue nomo de pafarmilo, kiu 'elĵetas fajron' same kiel drako; poste uzata pri kavalerianoj provizitaj per tia armilo), vd. tiun.

DRAK/O (f; RE): AF *dragon*, I *-e*, G *Drache*, R *drakon*, (H *dragón*); L *drac/o -onis*. Bazita sur la L nominativo. La *k*-sono en L prononco + R + Gr (vd. sube) donis oportunan eblecon klare distingi inter tiu ĉi radiko kaj *dragon-*, forme identaj en pluraj el la fontlingvoj. ¶ Io =, IeIa *dracon*.

El Gr *drákôn -ontos* s.s., der. de *dérkesthai* "rigardi" (pro la supozata paraliza rigardo de la besto); kp Sa *dádarca* "mi vidis" (HE rad. **derk-*).

DRAKM/O (2; *draĥm-* RE, *drakm-* Be): APo *drachm/a*, F *-e*, G *Drachme*, I *dramma*, R *drakma*, (H *dracma*). Kp Gr *drakhmê*; la origina formo kun *-ĥ-* baziĝas rekte sur Gr, dum la moderna formo adaptiĝis al la prononco [-k-] en AFGR. ¶ Io *drakmo*, Ia *drachma*; ne trovita en Ie.

Orig. "manpleno (da oboloj)", de Gr *drássesthai* "preni per la mano".

DRAM/O (1; RE): AR(H) *dram/a*, F *-e*, I *-ma*, Po *-at*, G *Drama*. Ps-sf *-m(at)*. ¶ Io *dramato*, IeIa *drama*.

El Gr *drám/a -atos* s.s., propr. "agado" (kp semantike *aktoro*, propr. "aganto"), subst. de *drán* "agi, fari". Samfamilia radiko: *melodramo*.

DRAP/O (f; RE): F *drap*, I *-po*. Kp A *drap/er* "-isto", *-ery* "-aĵoj". Kp. sekv. ¶ Io =, Ie *drap*, Ia *-po*.

El L postkl. *drappus* "ŝtofpeco", vorto de gaŭla origino. Kp Sa *drâpí-* "mantelo, vestaĵo". Kp sekv.

DRAPIR/I (f; RE): A *drap/e*, F *-er*, G *-ieren* [-ír-], Po *-owac'*, R *-irovat'*, I *drappeggiare*. La radiko reprezentas diferencigon disde *drap-*, efektivigitan per inkludo de la GR verbiga sufikso. Kp spec. *borderi*; vd. sub *diri* pri analogaj kazoj. (Formo **draper-* estus malpli oportuna pro la sufikso *-er*.) ¶ 1894 *draper-*. ¶ Io *drapirar* (espismo), Ie *drapar*, Ia *drappar*.

De F *drap* resp. I *drappo* "drapo" (vd. tiun).

DRAŜ/I (f; RE): A *thrash, thresh* [-ŝ], G *dreschen* [-ŝ-]. Waringhien rigardas la radikon kiel miksformon inter A kaj G (LV 80: "*draŝi*, kiu kunigas la vokalon de A kaj la konsonantojn de D [= G], aspektas pli vere internacie ol **dreŝi* aŭ **traŝi*". Analogaj estas tiuokaze (kun A vokalismo, G konsonantismo) *forgesi, ŝlimo, ŝtono.* La eleganta klarigo de Waringhien estas almenaŭ nekompleta, ĉar ankaŭ A posedas formon kun *-e-*, verŝajne pli oftan ol tiu kun *-a-*. La uzo de *thrash* en UV tamen kredigas, ke Z havis tiun A formon antaŭ si. – Parte alie Collinson (1959,4), kiu parolas pri anstataŭigo de *e* per *a*, komparante *traf-* < G *treffen* kaj *varb-* < G *werben.* ¶ 1894 *dras-*. ¶ Io *drashar* (espismo), Ie *drachar* (espismo); Ia *tribular* (< L *tribulare*).

Ĝerm. vorto, kp Nd *dorsen*, Gt *thriskan*, el pĜ **threskan*, par. al L *terere* "(dis)froti" (vd. *tritiko*) k Gr *tríbein* "(dis)froti; draŝi" (HE rad. **ter-*).

DRAT/O (8; Ka; ne ĉe Z; antaŭe *metal/faden/o*): G *Draht*, Po *drut.* Bazita sur G same kiel ĝia preskaŭsinonimo *fadeno.* ¶ Io *metal-filo*, Ie *ferrofil*, Ia *filo metallic* (vd. plue sub *fadeno*).

Ĝerm. vorto (G > Po), identa kun A *thread*, Nd *draad* "fadeno" (< pĜ **thrêduz*). Orig. pri kunŝpinita fadeno, kp G *drehen* "tordi, turni" (HE **tre-* "turnante bori", ekz. en Gr *trêma* "truo").

DRES/I (f; RE): F *dres/ser*, G *-sieren*, R *-irovat'*, Po *tresowac'*. ¶ Io *dresar*, Ie *dresser*, Ia *trainar* (< A *train*).

El L vulg. **directiare* "regi, direkti", der. de L *directus*, ptc. perf. de *dirigere* "direkti, rektigi" (vd. *direkti*, kiu do estas etimologie identa). Por la fonetika evoluo, kp *adreso.*

DRINK/I (f; RE): A *drink* (ank. "trinki"). Kp ank. Sv *drinkare* "drinkulo". El la du ĝermanaj formoj por "trinki" (A *drink*, G *trinken*), Z prenis G por la ĝenerala senco, A por la specialigita, vd. Wiener 1950, 104. La elekto ŝajnas arbitra; *trinkroviĝas* ankaŭ ekster la ĝermana familio, sed ĝuste kun tiu nuanco, kiun Z atribuis al *drink-*: F *trinqueur* "drinkulo", I *trincare* "drinki". ¶ 1894 *bib-* (< L *bibere*, ank. "trinki"). ¶ Io *drink-ach-ar*, Ie *trinc-ach-ar*; en Ia mankas responda verbo, kp *inebriato* "drinkulo", *bibule* "drinkema".

Etimologie identa kun *trinki*, vd. tiun.

DROG/O (f; RE): A *drug*, F *drogue* [-g], G *Droge*, I(H) *droga.* Kp Po *drogeria* "drogvendejo". ¶ Io =, Ie *drog/ue*, Ia *-a.*

F vorto kun tre pridisputata etimologio, eble ligita kun Nd *droog* "seka", kp malalt-G mez. *droge-fate* "bareloj por sekaj varoj".

DROMEDAR/O (1; Jü): A *drom/edary*, F *-adaire*, I(H) *-edario*, PoR *-ader*; L zool. *Camelus dromedarius.* Ps-sf *-ar(i).*

Pere de L postkl. *dromeda(rius)* el Gr *drom/ás* [gen.: *-ádos*] *(kámêlos)* "kura (kamelo)", de *drómos* "kurado" (kp *hipodromo*), kp *dramein* "kuri", par. al Sa *drámati* "kuras".

DRON/I (f; RE): A *drown.* Monoftongigo de *ow* [aŭ], evidente por plifaciligi la prononcon. Antaŭ vokala finaĵo, A *ow* reprezentiĝas per *ov* en *blov/i, brov/o*, kaj la sama rezulto aperas antaŭ konsonanto en *bovl/o*; la traktado tie ĉi restas unika. ¶ IoIe *dronar* (espismo); Ia *necar se* (kp F *se noyer*; L *necare* "mortigi").

Ĝerm. vorto, kp Sv *drunkna* s.s., orig. komenca verbo der. de ptc. perf. de la verbo por "trinki" (ekz. A *drunk* "trinkinta"). La konekso kun "trinki" (vd. tiun) aperas ankaŭ en G *ertrinken*, Nd *verdrinken* s.s.

DU (f; Un): L *duo* (kp *ducenti* "ducent"); F *deux*, I *due*, (H *dos*). La L radiko estas konata en ĝermanaj kaj slavaj lingvoj per internaciaj derivaĵoj, vd. ekz. *dueto.* Kp ankaŭ la vortojn por "duobla": L *duplex*; AF *double* [F du-], G *doppelt*, I *doppio*, H *doble*, Pg *duplo*, Sv *dubbel.* Identan komencsonon havas la praparencaj Po *dwa*, R *dva.* Analoge al la aliaj bazaj numeraloj krom *unu*, Z adoptis unusilaban radikon, oportunan por pluformado: *du/o* ktp. La definitiva formo estas

eble influita de Li *dù*. ¶ 1881 *du*. ¶ IoIe *du*, Ia *duo*.

El HE **dŭo*, kp Sa *dva*, Gr *dyo*, A *two*, G *zwei*, *zwo*. HE adv. **dŭis* "dufoje": Sa *dvih*; Gr *dís* "dufoje", *di-* "du-" (vd. *dianto*); L *bis* "dufoje" (vd. *bis*), *bi-* "du-" (vd. *biciklo*), *bini* "duopaj" (vd. *binoklo*). Samfamiliaj radikoj en Eo: *dualismo, dubi, dueto*. Kp ank. pref. *dis-*.

DUALISM/O (2; Be): A *dual/ism*, F *-isme*, I(H) *-ismo*, PoR *-izm*, G *Dualismus*. Ps-sf *-al*, *-ism*.

Konstruita (18a jc) el L *dualis* "rilata al du", de *duo* "du" (vd. tiun).

DUB/I (f; RE): A *doubt* (kp *dubious* "duba"), F *douter* (kp *indubitable* "nedubebla"), I *dubitare*, (H *dudar*); L *dubitare* (kp *dubius* "duba"). Bazita sur la komuna trunko de la L verbo kaj adjektivo, trovebla ankaŭ (en derivaĵoj) en la latinidaj lingvoj; AF montris la vojon per siaj mallongaj formoj. Rimarku, ke radikfino *-it* ne estus tre oportuna en verbkaraktera radiko. ¶ Io *dubar* (espismo), IeIa *dubitar*.

Latin (id) a vorto, kies unua elemento estas *du-* "du-" (vd. tiun); la dua probable el HE **bhû-* "esti" (kp *superba*; vd. *fiziko*). La vorto do signifas heziton inter du alternativoj, kp semantike G *Zweifel* "dubo" : *zwei* "du".

DUEL/O (1; RE): AF *duel*, I *-lo*, (H *-o*), G *Duell*, R *duel'*. ¶ Io =, Ie *duell/e*, Ia *-o*.

El L ant. *duellum* "milito" (> L klas. *bellum*, vd. *ribeli*); en L mez. la vorto estis asociita kun *duo* "du", pro kio la moderna senco.

DUET/O (1; Jü): APoR *duet*, I *-to*, F(H) *duo*, G *Duett*. Ps-sf *-et*. ¶ Io =, Ie *duett/e*, Ia *-o*.

I vorto, de *due* "du" (FH rekte el I ant. *duo* "du") el L *duo*, vd. *du*.

DUK/O (f; RE): A *duke*, F *duc*, I *duca*, (H *duque* [-ke]). ¶ Io =, Ie *duc*, Ia *-e*.

El L *dux* (gen.: *ducis*) "estro, gvidanto, komandanto" (en L mez. "duko"), subst. de *ducere* "gvidi, estri" (vd. *konduki*). Kp spec. sekv.

DUKAT/O (1; RE): AF *duc/at*, I *-ato*, (H *-ado*), G *Dukaten*, PoR *dukat*. Ps-sf *-at* 1. ¶ 1881 *dukat-*.

I vorto, el L mez. *ducatus* "duklando" (la monero estis nomata laŭ surskribo finiĝanta per tiu vorto), de L mez. *dux* "duko" (vd. tiun).

DUM (f; Un): L *dum* (subj.). La prepozicia uzo estas iniciatita de Z, kredeble laŭ modelo de G, kie *während* "dum" estas tiel prepozicio kiel subjunkcio (Gregor 1958, 107). Z do sekvis sian kutimon preni tiaspecajn vortojn el L, kvankam tie ĉi pli internacia ekvivalento ekzistas (A *during*, F *durant*, HI *-e*); estas vere, ke radikfino *-ant* ne estus oportuna en Eo pro sia verbeca karaktero. ¶ 1882 *dum*. ¶ Io *dum* (prep.), *dum ke* (subj.); IeIa *durante* (prep.), *durante que* (subj.).

L partikulo kun orig. signifo "tiam", formo akuzativa de la HE dem. radiko **do-* "tiu" (kp *de*).

DUNG/I (f; RE): G *dingen* (ptc. perf.: *gedungen*). Ĝenerale oni supozas (Waringhien LV 79; Collinson 1959, 10) ke Z deiris de la G verbo, ial ŝanĝante la radikvokalon *i* al *u*, prenita el la ptc. perf. (analoga vokalŝanĝo en *flugi*; kp ank. *faruno, kubuto, lentugo, poluri*). La motivo restas neklara; ĝi apenaŭ povas esti la ekzisto de suf. *-ing* (Waringhien l.c.). Alloga estis tial la hipotezo de Bianchini 1934, 133, ke Ji *dungen* provizis la vokalon. Tamen aperas (vd. Gold 1980, 314), ke la Ji inf. estas *dingen*, la ptc. perf. *gedungen*, do same kiel en G. ¶ 1894 *mercen-* (kp A *mercen/ary*, F *-aire* "dungosoldato"). ¶ Io *engajar* (< F *engager*), Ie *ingag/ear*, Ia *-iar*.

Ĝerm. vorto (kp Sv *tinga* s.s.), der. de G *Ding* "afero, aĵo", en G ant. "juĝokunsido" (semantika evoluo de la verbo: "juĝi" > "intertrakti" > "interkonsenti pri dungo, dungi"; por la semantika evoluo de la subst., kp *kaŭzo*). Kp A *thing* "afero, aĵo"; el pĜ **thingaz* kun probabla signifo "kunvento-po".

DUŜ/O (2; Jü): (A)F *douche* [duŝ], G *Dusche* [-ŝ-], I *doccia*, R *duŝ*, (H *ducha*). ¶ Io *dusho*, Ie *duch/e*, Ia *-a*.

De I *doccione* " (akvo)kondukilo", el L *duct/io -ionis* "konduko", subst. de *ducere* "konduki" (vd. tiun).

ETIMOLOGIA VORTARO DE ESPERANTO
VOLUMO 1: A - D

ISBN 91 85288 17 9